# Heleco

Pres-organo de:
Astura Esperanta Asocio

Numero 93 Oktobro 2017




## En la Centjaro de la Rusa Revolucio





## Klasbatalo tra la historio





Heleco
Pres-organo de: Astura Esperanta Asocio
Numero 93 Oktobro 2017

**Astura Esperanta-Asocio**
Sidejo: Universitata Kampuso de Vieskes
GIJÓN (ASTURIO-HISPANIO)
Interret-paĝo: http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/
Retadresoj: easturias@telecable.es
mailto:esperanto@uica.info

**Astura Esperanto-Asocio** estas esperantista rondo kiu plenumas sian rolon favore al la disvastigado de la **Internacia Lingvo** unualoke en nia urbo, Gijón, kaj ankaŭ, leŭeble, en tiuj partoj de la Asturia regiono, kie ne ekzistas lokaj grupoj de **Esperanto**.
Nia agado disvolviĝas kadre de: **Cátedra JOVELLANOS de Extensión Universitaria**

Enhavo

| Enhavo | Paĝo |
|---|---|
| Astura Esperanta Asocio – Dumjara vivo de la E-rondo | 3-4 |
| Stumbloj kaj refaloj | 5-7 |
| Klasbatalo tra la historio | 8-9 |
| Revo senĉese renaskiĝanta… …kaj ĉiam sekve fiaskanta | 10-15 |
| Klasbataloj en la romia socio | 16-26 |
| Iu nova subjektiva faktoro: la morala konscienco | 27-34 |
| Meza kaj Moderna Epokoj: La lanta treniĝo de la Historio | 35-45 |
| La Industria Revolucio – Ĝiaj sociaj sekvoj | 46-53 |
| La Rusa Revolucio – Historia neatenditaĵo | 54-60 |
| La faŝismoj – Burĝa histeria reago | 61-65 |
| Malvarma Milito kaj Komfort-Socio | 66-72 |
| Ĉu la fino de la historio? – Eltirante instruon | 73-80 |
| Kial konvenas al ni studi la Rusan Revolucion? | 81-86 |
| La marksismo kaj la klasbatalo en la 21-a jarcento | 87-89 |
| De la soveta revolucio al la tutmonda kapitalismo | 90-95 |
| Filmoj pri la Rusa Revolucio | 96-97 |
| Libroj pri la Rusa Revolucio dum unu jarcento | 98-99 |
| La Internacio | 100 |

La enhavo de la tekstoj de ĉi-tiu revuo ne esprimas oficialan opinion de **Astura Esperanto-Asocio**: pri ili respondecas la verkintoj mem.

Leĝa Registro 0/319/85



# Astura Esperanta Asocio

## DUMJARA VIVO DE LA E-RONDO

Temante pri la vivo de nia Esperantista Asocio dum la lasta jar-periodo, unue ni devas raporti memore al du esperantistoj kiuj havis grandan rilaton kun la esperantismo en Ĥiĥono kaj forpasis ĉi-jare. Temas pri Santiago Mulas Gallego kaj Luis Serrano Pérez, ambaŭ 91-jaraĝaj.

Luis Serrano, kiu mortis la 24-an de aŭgusto, aktivadis ĉe la Esperanto-Grupo de nia urbo dum du jaroj, ekde la jaro 1957 al 1959, tamen lia partopreno ne estis nura membreco sed vera esperantista implikiĝo. Naskiĝinta en Osorno (Palencio), li jam estis esperantisto kiam translokiĝis al Asturio por labori kiel masonisto en la fabriko de **ENSIDESA** en Avileso, kiun oni estis konstruante tiam. Tial ke en tiu epoko ne ekzistis esperantistoj en Avilés, kiam li eksciis ke estis organizita E-movado en Ĥiĥono li translokiĝis al ĉi tiu urbo kaj serĉis kaj trovis laborlokon ĉi tie. Dum lia loĝado en Ĥiĥono li partoprenis en la aktivado de la E-grupo kaj estis membro de ĉi ties estraro. Sed kvankam dum multaj jaroj poste li disvolvis sian E-aktivadon en Sabadell, ĉefe en la organizado ĉiujara de la **INTERNACIA SEMAJNO DE KULTURO KAJ TURISMO**, lia rilato kun la esperantista rondo de nia urbo ne finiĝis post lia foriro el Asturio; li ofte verkadis artikolojn destine al nia revuo **HELECO** kaj vizitis nian urbon kelkfoje.




Santiago Mulas Luis Serrano

Santiago Mulas Gallego, kiu forpasis la 11-an de februaro ĉi-jare, laŭ lia iama aserto, kontaktis kun la Esperanta grupo de Ĥiĥono en la jaro 1959, iomete antaŭ la foriro de Luis Serrano, kaj baldaŭ li komencis kunlabori kun la areto da aktivuloj de tiu E-rondo. En junio de tiu jaro li estis elektita por la ellaborado de bulteno kiun la grupo komencis eldoni tiam kaj kies nomo estis **Ŝpruci**. Post la foriro de Luis Serrano oni reorganizis la estraron de la E-Grupo, en monato aŭgusto de tiu jaro 1959 kaj tiam Santiago Mulas estis elektita membro de tiu komitato. De tiam li partoprenis en la tuta porEsperanta laborado en la urbo kaj la regiono, sed lia ĉefa dediĉiĝo estis la instruado pri la Internacia Lingvo. Fakte, li gvidis Esperanto-kursojn dum prosimume 50 jaroj. Post la jaro 1970, kiam estis forpasintaj aliaj responsuloj kaj aktivuloj de la E-movado en Ĥiĥono, Santiago alprenis la taskon reorganizi la lokan grupon surbaze de la novbakitaj gelernantoj de siaj kursoj. Ekde la jaro 1976 al 2006 li prezidis la lokan organizaĵon de Ĥiĥono, kaj en la jaro 1979 li estas la prezidanto de la Loka Komitato de la 39-a Hispana Kongreso de Esperanto. En 1983 li gvidis E-kurson en Avilés, kiu estis la semo de grupo de Esperanto kiu sekve formiĝis en tiu urbo. Ekde la jaro 2006, kiam estis elektita nova prezidanto de **Astura Esperanta Asocio**, Santiago Mulas estis nomumita Honora Prezidanto. De tiam, kaj dum lia sano tion permesis al li, li plu dediĉiĝis al la instruado pri Esperanto. Ni volas ke nia omaĝo al ambaŭ esperantistoj estu la memorigo de ilia porEsperanta aktivado, substrekante la dediĉon al la instruado pri la Internacia Lingvo.

La organizado de kursoj pri la Internacia Lingvo estis/as la ĉefa tasko de la esperantistaj grupoj, kaj tiu nia plenumis tiun taskon kiel eble plej dece. Eĉ nuntempe, kiam estas pretaj lernantoj, nia E-Asocio estas disponebla por la instruado. Sed oni devas agnoski kiel multe ŝanĝiĝis la sociajn cirkonstancojn tiurilate. Eble neniam antaŭe ekzistis en la mondo tiom da geesperantistoj kiel nuntempe, tamen neniam antaŭe estis malpli da gelernantoj en en la E-kursoj de la esperantistaj asocioj. Tio signifas ke la grupoj jam ne plu estas la loko kie oni bakas novajn E-movadanojn. Interreto ŝanĝis multaj aferojn, kaj ĉio rilate al la Esperanta Movado estis influita de tiuj ŝanĝoj. En la reto oni povas trovi ĉiutipan esperantistan materialon, ankaŭ E-lernilojn: lernolibroj, lego-libroj, ĉiutipaj ttt-paĝoj kaj… kursoj.

Ofte oni trovas samideanojn kies esperantiĝo okazis en neniu ajn esperantista grupo aŭ asocio, sed per Interreto, io tute ne-imagebla en antaŭaj generacioj.
Ĝuste pri iu tia esperantisto ni volas temi hodiaŭ ĉar antaŭ kelkaj monatoj kontaktis kun ni kaj poste vizitis nin, la 4-an de januaro, Pablo Busto, juna asturiano kiu, tamen, ne loĝas en nia regiono. Li apartenas al tiu nov-tipa esperantistaro kiu rilatas nenion kaj neniel kun la organizita E-movado.


Vizitis nin Pablo Busto

Se lia esperantiĝo okazis pere de Interreto, lia E-kontaktado kaj rilatoj okazas per sama medio kaj tra poŝtelefono kaj/aŭ komputilo. Konkrete, pere de softvaro (komputil-programo) nomata **Telegram-Messenger. Telegram** interesas al Pablo Busto ĉar estas multaj esperant-lingvaj forumoj en ĝi. **Telegramo**, en Esperanto, estas senpaga nuba plursistema tuj-mesaĝilo por saĝtelefonoj (Android, iOS, Windows Phone, Ubuntu Touch, Firefox OS) kaj komputiloj (Windows, Linux, OS X). Uzantoj povas sendi mesaĝojn, bildojn, videojn, glumarkojn, voĉmesaĝojn kaj dosierojn de ĉiuj dosiertipoj de maksimume 1,5 GB. Pablo Busto mem estas kunordiganto de forumo: Esperanto en familio. Li estas tre aktiva ankaŭ en **Youtube.com**. Serĉinte lian nomon en **Youtube.com** aperas pluraj filmoj. Kun li estis interparolante, en la menciita dato, dum kelkaj horoj du estraranoj de nia **Astura Esperanta Asocio**. Ni diru ke temis pri konversaciado inter malsamaj generacioj de esperantistoj kun tre diversaj spertoj kaj vidpunktoj pri la realaĵo de la E-movado kaj de la mondo ĝenerale.



Prelego en Mieres

Alia ekstera rilato de la estraro de **AEA** dum la nuna jaro okazis ĝuste duonjaron poste, la 4-an de junio, en la astura urbo Mieres. José Ángel Gayol, prezidanto de la asocio **Amikoj de Mieres**, invitis nin prelegi, en la Kulturdomo de tiu urbo, pri Esperanto kaj la E-movado. En la konferenco, post prezenti kaj ekspliki la kutimajn argumentoj pri la facileco de la lernado de la E-lingvo kaj la neŭtraleco antaŭ la nuntempa lingva imperiismo de la angla, oni emfazis ankaŭ pri la rolo kiun la Internacia Lingvo povas ludi en la klasbatalo mondskale, disvolvante la temon de la rilato inter Esperanto kaj la laborista movado. Agnoskante ke la lingva problemo estas nek la plej grava nek la plej urĝa el la problemoj kiujn nuntempe devas alfronti la homaro, oni asertis ke, tamen, ankaŭ ĝi devas esti atentata, kaj tiorilate oni klarigis ke Esperanto kolizias kun la interesoj de la superregantaj klasoj kaj altiras ĉi ties oponon tial ke ili timas ke tia ilo por universala interkomunikado povas stimuli kaj favori ŝanĝon en la pensmaniero de la amasoj, helpante ĉi ties emancipiĝon el la klasa subpremado. La foto pri tiu akto, kiu aperas ĉi-paĝe, estis publikigita kun raporto pri la akto en la regiona ĵurnalo **La Nueva España** (La Nova Hispanio) de la sekvinta tago.
Por kompletigi la informadon pri la agado de nia E-Asocio restas mencii ĉi tiun numeron de **HELECO**, la 93-an. Laŭlonge de la jardekoj pasintaj ekde la komenciĝo de la publikigo de tiu revuo, ĝi sufiĉe sanĝiĝis en la grando, la formo kaj la temaro de ties enhavo. De antaŭ kelkaj jaroj, ni pritemas sociajn temojn de la nuntempo, sed ĉefe historiajn eventojn en rilato kun ĉi ties datrevenoj. Ĉi-jare estas la Centjaro de la Rusa Revolucio de 1917, do, jen cent-paĝa revuo pri tiu evento, aŭ konekse kun ĝi. Ni ĉiam atentigas pri tio ke la opinioj esprimitaj en nia revuo respegulas nur la ideojn kaj vidpunktojn de la koncernaj aŭtoroj kaj ne poziciiĝon de la Asocio. Tiu atentigo pli estas necesa ĉi-foje ĉar la afero de tiu Revolucio kaj la klasbatalo, kiu estas la ĉeftemo de la revua numero, estas, pro sia propra naturo, kialo de interhoma malakordo. La klasbatalo ekzistas/os dum plue ekzistas/os sociaj klasoj kun kontraŭdiraj interesoj. Por konstati tion sufiĉas tralegi la abundan materialon kiun oni estas publikigante ĉi-jare pri tiu temo: libroj, artikoloj, prelegoj, interretaj paĝoj… Nia esperantlingva materialo pri tiu temo celas nek polemikon nek ies konvinkon, eĉ ne debatadon, sed nur alporti, en la internacia lingvo, iajn konkludojn kiuj, eble, povus utili al esplorantoj pri la socia problemaro kiuj havus sufiĉe da pacienco por tralegi tiel pezan raporton.

# Stumbloj kaj refaloj




Oni supozas, kaj eble estas prava supozo, ke la homaro, la popoloj, la socioj, antaŭenmarŝas al alta destino de superado de ĉiuj limoj kaj malfacilaĵoj kiuj baras aŭ malhelpas sian materian kaj spiritan progreson. Vidate delongperspektive oni povas percepti la faritan progreson. Sed la marŝado ne estas rapida kaj krome ĝi ankaŭ ne estas regula, konstanta, senŝanĝa, harmonia… foje okazas haltoj, retroiroj, stumbloj, faloj kaj refaloj. Kiuj estas la faktoroj kiuj malhelpas la homan progresadon direkte al la idealoj kiujn la homaro celas? Unue estas tiuj malfacilaĵoj kiuj troviĝas en la limoj mem kiujn oni pretendas pretersuperi. Tiajn objektivajn obstaklojn la homo venkas per laboro, persisto, inventemo… Sed la plej obstinaj baroj troviĝas ene de la homo mem, kaj ĉi tiujn oni povas venki nur per bonvolo. Al tiu rango je negativaj homaj ecoj kaj tendencoj apartenas la egoismo, la mem-adoro, la elitismo, la aroganteco, la fanatismo, la rasismo, la ksenofobio… Foje kaj refoje la homaj kolektivoj, la nacioj, falas en tiujn abomenindajn deviojn kaj sentojn kiuj baras sian progresan iradon. Nu, ĝuste nuntempe la homaro troviĝas en etapo de malprogreso kaj involucio. Multaj homaj socioj kaj kolektivoj estas refalante en antikvajn marĉojn el kiuj ili dumlonge penadis eliri kaj malproksimiĝi. Indas ke ni atentu pri kelkaj el ili.

La kapitalismo. Ĝi estas relative nova en la amplekso de la homa historio, proksimume du jarcentojn aĝa. Sed ĝi sekvis kaj anstataŭis aliajn antaŭajn formojn je ekspluatado de homo fare de homo: la sklavismo, la feŭdismo… Ĉiuj-ĉi formoj de socia organizo karakteriĝas pro malegaleco en la interhomaj rilatoj, la posedado kaj ĝuado de la teraj resursoj, la submetado de iuj klasoj al aliaj… kaj la homa instinkto kiu generas tian maljustecon estas la egoismo, la mem-amo. Ĝuste ĉi-jare oni festas aŭ solenas la Centjaron de iu serioza provo pretersuperi la peston de la kapitalismo por mondskale starigi senklasan socion. La Rusa Revolucio de la jaro 1917 vekis la esperon de ampleksaj ekspluatataj amasoj kaj popoloj en la mondo. La sukceso estis relativa, la progreso peniga kaj malrapida. Kaj fine, post iomete pli ol sep-dek jaroj, venis la fiasko. La homaro refalis en la kapitalismon. La maljusteco, malegaleco kaj ekspluatado regas senbare en la tuta mondo. La progreso de la komunista ideo, celita de la menciita revolucio kaj aliaj similaj, enportis ankaŭ la defion konstrui universalan, sennaciecan, socion. Kaj ankaŭ la alvokiĝon meti finon al la rasismo, la masklismo, la religia maltoleremo kaj aliaj negativaj aspektoj de la homa konduto. Gravas indiki ĉi tion ĉar la menciita fiasko de la komunisma progreso signifis ankaŭ la pliintensiĝon kaj ampleksiĝon de tiuj formoj de interhoma misagado. Ni dediĉu ioman atenton al la plej gravaj el ili komencante per la religia maltoleremo aŭ integrismo.

La islama integrismo ne estas la sola el la formoj de religia maltoleremo nuntempe ekzistantaj en la mondo, sed sendube ĝi estas la plej grava kaj plejofte aganta. Antaŭ pluraj monatoj okazis en nia lando, en Barcelono kaj alia kataluna urbo, gravaj teroristaj atencoj far fanatikuloj de tiu movado. Antaŭe jam estis similaj kaj plej gravaj sangaj atencoj en aliaj landoj: Francio, Britio, Belgujo… krom en multaj lokoj de la araba mondo kaj kelkaj afrikaj landoj. La sekvantoj aŭ simpatiantoj de ĉiu religio penas konvinki ke ĉiu tiu celas plibonigi la homon, la homan konduton, kaj pere de ĉi tio la socion. Sed la akra realaĵo montras ke ofte la religioj, same kiel la lingvoj, samtempe ke ili utilas por unuigi la samreligianojn kaj la sam-

ligvanojn, ili efikas ankaŭ por semi la malamon kaj disigon inter la malsamreligianoj kaj la malsamligvanoj. Tiorilate, la Islamo estas nek pli bona nek pli malbona ol la kristanismo aŭ aliaj religioj. Kiel sciate, iam la kristanoj, konkrete la anoj de la RomKatolika Eklezio, organizis krucmilitojn por kontraŭbatali religiajn malamikojn kaj organizis la Inkvizicion por persekuti la disidentojn. Temis pri faloj pri kiuj poste hontas la membroj de la koncerna institucio, kiuj penas prezenti pli allogan bildon pri la religio kiun ili praktikadas. Ĝenerale tiaj evoluo-procezoj estas longdaŭraj kaj estas konstituitaj de la persista teniĝo de kelkaj generacioj. Por la t. n. "Okcidenta Civilizacio" la rompo kun la tradicio de religia maltoleremo, kiu havis altsignifajn eventojn kiaj la "Bartolomea nokto", la kamparanaj militoj kaj la tridekjara milito, interalie, povas esti simboligita per la Franca Revolucio. La ĉiutipaj ŝanĝoj alportitaj de tiu revolucio ne tiel efikis sur la socioj de la islama kulturo, sed eĉ se malfrue ankaŭ ĉi tiuj entreprenis ia evoluado al pli tolerema kunvivado inter la anoj de malsamaj religiaj tendencoj. Ĉi-rilate la nuntema islama integrismo estas alia el la refaloj kiuj distingas nian epokon. La t. n. ISIS (Islama Ŝtato) rekuperis la dekomencan mahometan maltoleremon ne nur kontraŭ la kristanoj sed ankaŭ kontraŭ la anoj de aliaj islamaj formoj.

La faŝismo. Ankaŭ rilate al la faŝimoj oni povas temi pri faloj kaj refaloj de nia socio. La fenomeno estas eĉ pli ĵusa ol tiu de la kapitalismo, kiun ni jam menciis, kaj havas grandan rilaton kun ĝi. La unuaj kaj klasikaj elprovoj de tiu reakciaj movadoj estis la itala faŝismo liderita de Mussolino kaj la germana naziismo gviditaj de Hitlero, ambaŭ inter la du grandaj mondmilitoj. Poste estis aliaj pli malgravaj imitantoj. Ĉiuj ili estis reagoj okaze de danĝero de venko de revoluciaj movadoj de komunista inspiro. La fakto ke la ĉefaj kapitalistaj potencoj, eĉ se ili planis manieron eviti la evoluadon al la socialismon, rifuzis alpreni la faŝistan alternativon, indikas ke ili konsciis pri la graveco de la granda falo aŭ stumblo de la civilizacio kiun signifus tiutipaj reĝimoj en kiuj ne mankis enormaĵoj kiel la rasismo. Se nia socio penis kaj sukcesis skui la faŝistan soci-modelon, kiel eksplikeblas nun la fakton de la reapero de tiutipaj movadoj kun ioma pribalota venko en iuj lokoj, krome konsiderante ke jam ne ekzistas la komunista danĝero kiu iam vekis la faŝistan senton? Nuntempe, kiam la kapitalismo laŭŝajne estas senbare superreganta sistemo kaj metis for ĉiun eblon je socia transformiĝo celanta la socialismon kaj la komunismon, estas kontraŭdiro la renaskiĝo de tiuj faŝistaj movadoj kies alvokiĝo kaj ekzisto-kialo estis, ĝuste, la sindefenda mobilizado kontraŭ tiu ebla evoluo. Tamen, nur ŝajna estas la kontraŭdiro; ja, inter la klasikaj faŝismoj de la epoko inter la du mond-militoj kaj tiuj faŝismaj movadoj nun elŝprucantaj estas iuj komunaj ecoj kiuj karakterigas ĉiujn ilin. Temas pri la rasismo kaj la imperiismo; ni memoru ke ambaŭ elementoj troviĝis en la antikvaj faŝismoj kiujn ni menciis. Estas konate kiom multe gravis la rasismo en la germana naziismo, Nuntempe, pro malsamaj kialoj kaj en malsimilaj cirkonstancoj, en la riĉegaj landoj de la kapitalista mondo reaperas tia kontraŭhoma sento rezulte de la amasa kaj senĉesa enmigrado kiun tiu socio estas ricevante el la mondpartoj kie oni spertas la plej damaĝan efikon de la kapitalista ekspluatado en formoj de forrabado de re-sursoj kaj interimperiismaj ─kvankam lokaj─ militoj (ekzemple tiuj de Sirio, CentrAfiko, Meza Oriento k. a.). Ja, la imperiismo de la nuntempaj kapitalistaj potencoj nur en la formo estas malsimila el tiu de la iamaj faŝistaj potencoj. Esence, rasismo kaj imperiismo estas formoj per kiuj manifestiĝas elitismo. La elitisma sento, la sento sin konsideri super aliaj, la emo posedi aĵojn kaj ĝui rajtojn kiujn oni rifuzas al la ceteraj. Ĉiuj ĝis nun menciitaj homaj devioj: kapitalismo, religia maltoleremo, rasismo, faŝismo havas kiel radiko aŭ bazo tiun elitisman senton de la kolektivoj kiuj sin taksas pli kapablaj kaj meritaj ol la ceteraj kaj celas eltiri profiton el la pretendita supereco kun alies domaĝo. Restas al ni mencii alian el tiuj homaj devioj aŭ faloj kiu nuntempe speciale perceptiĝas en nia medio, en Eŭropa Unio kaj en nia propra lando, kaj en kiu ĉeestas la elitisma sento: la naciismo.

La naciismo estas difinita kiel politika doktrino, kun mistika bazo, laŭ kiu la nacia tradicio estas ĉiam preferinda kaj la naciaj ambicioj ĉiam pravaj kontraŭ tiuj de iu ajn alia nacio. Alia difino estas: doktrina politiko kaj movado kiu depostulas la rajton de iu nacieco je refirmigo de la propra karaktero pere de politika memdetermino. Fine, alia pli ampleksa kaj kompleta difino povas esti: politika ideologio bazita sur la principo ke ĉiu nacio rajtas krei sian propran ŝtaton por realigi la celojn aŭ sociajn aspirojn de iu popolo, ĉefe la atingon de sendependa ŝtato. Ĉi tiu ideologio karakteriĝas ĉefe pro komunec-sento de iu nacio, rezulte de komuna origino, religio, lingvo kaj aŭ interesoj. Temas pri iu pensmaniero kiu defendas iun nacion super ĉio, eĉ la personoj. Tiuj, kiuj celas argumenti favore al la naciisma sento asertas ke ĝi naskiĝis kiel reago kontraŭ la absolutismaj monarkioj de la 19-a jarcento. Serve de la vero kaj la klareco ni devas diri ke la naciismo, esence, estas la neado kaj la rifuzado de la universalismo, de la koncepto de tuthomara frateco aŭ tuthomara familio. Ĉi tiu afero de la naciismoj speciale interesas nun al ni tial ke, kiel dirite, en Eŭropa Unio kaj en Hispanio okazis lastatempe bedaŭrindaj refaloj en tiu homa tendenco

kiu marŝas kontraŭdirekte al la progreso de la homa familio. Ni, la esperantistoj, estas tre sensivaj pri tiu ĉi problemo. Ja, la revo de Doktoro Zamenhof pri komuna lingvo, Esperanto, kaj sendogma religio, Hilelismo, kiu formiĝis en la sama epoko kaj kulturo kie naskiĝis la naciismoj, estas idealo kiu celas, ĝuste, meti solvon al la problemoj propraj de la naciismo. Se la naciismoj estas la plej fatalaj fruktoj de la romantikismo, Esperanto kaj la religia spirito de la Hilelismo estas la plej belaj fruktoj de tiu epoko. Kiu sento venkos fine? Ĉu la idealo de Zamenhof aŭ la naciismaj kaj integrismaj sentoj? Kun bedaŭro ni konstatas la refalojn okzantajn nuntempe. Post mencii la integrismon, la faŝimon kaj la kapitalismon ĝenerale, nun ni atentu pri la naciismoj, ĉefe tiuj de Eŭropo, kaj ni komencu per la BREXIT, t. e. la eliro de Britio el Eŭropa Unio.
Rimarkindas ke Britio mem antaŭe devis alfronti iun naciismon ene de sia propra teritorio. En Skotlando estis referendumo por elekti inter la disiĝo en la brita ŝtato kaj la plurestado en ĝi. Estis laŭdinda rezulto la fakto ke oni decidis konservi la union kaj krome influis en tiu decido la deziro pluresti en Eŭropa Unio. Sed poste, paradokse, estis Britio mem kiu forlasis Eŭropan Union kaj trejnis Skotlandon foren. Estas nenia sekreto la kialoj de tiuj kiuj voĉdonis favore al la eliro; en la balotkampanjo oni emfazis pri la "avantaĝoj" de la BREXIT prezentante la forlason kiel granda ŝanco de elitisma, preskaŭ rasisma vidpunkto. Iu argumento de la poziciantoj favore al la eliro el Eŭropa Unio estis ke kiel ŝtato membro Britujo estus malpli suverena, tial la BREXIT permesus pli grandan kontrolon de la enmigrado, pli bonan britan pozicion por negoci komercajn interakordojn kaj liberiĝon el la burokratara regulado de la Eŭropa komunumo. Estis evidenta la malsolidara kaj reakcia karaktero de la emo rompi la unuiĝon de la eŭropanoj. Fakte, oni perceptis en la kunteksto de la referendumo kaj ties balotkampanjo ian ksenofoban agresemon. Tre multe pliiĝis tiam la rasismaj incidentoj; la atakoj estis faritaj ĉefe kontraŭ muzulmanoj kaj polaj inmigrintoj, kvankam ankaŭ estis iuj el tiaj faroj kontraŭ la hispana plimulto. La agresemo kontraŭ la fremduloj daŭris ankaŭ post la referendumo.
Simila elitisma kaj malsolidara karaktero havas la secesi-cela movado nuntempe aganta en Hispanio. Ne estas hazardo ke la hispanaj regionoj kie furoras la separatismo estas, ĝuste, la plej riĉaj. Nuntempe estas la Kataluna regiono tiu kiu deziras sendependiĝi. La procezo de konflikto kun la centra hispana ŝtato disvolviĝas kiam oni verkas ĉi artikolon kaj eble multe daŭros ankoraŭ, tial malfacilas nun antaŭpensi la kulminon de la afero. La separatisma aŭ secesia sento en tiu regiono havas profundajn radikojn; ĝi estas jam plurajn jarcentojn longdaŭra. Okazis en la historio gravaj interfrontiĝoj, foje eĉ militaj, inter tiu regiono kaj la hispana ŝtato. La situacio de Katalunio ne estas, kaj neniam estis, tiu de submetiĝo simile al de kolonioj rilate al la metropolo, sed ofte la dispozicioj kiujn la centra ŝtato de la lando devis alpreni por sufoki la separatismajn epizodojn generis perforton kaj aliajn turpajn farojn kiel la malpermesigo de la publika uzado de la regiona lingvo. Tiutipa politiko estis speciale grava dum la faŝista diktaturo de F. Franko (1939-1975), sed ĝenerale, kaj ĉefe dum la lastaj kvar-dek jaroj, la sinsekvaj registaroj de Madrido, ĝuste por ne reveki la separatisman senton, tre komplezeme traktis la katalunan regionon kaj konsentis pri ĉiuj politikaj kaj ekonomiaj postuloj de la aŭtoritatoj de tiu aŭtonoma komunumo, Fakte, la kataluna aŭtonomio estis, inter tiuj de ĉiuj hispanaj regionoj, krom la plej riĉa, ankaŭ tiu kiu havis pli da politikaj funkcioj. Post la finiĝo de la frankisma diktaturo oni permesis la liberan publikan uzadon de la kataluna lingvo, sed de tiam la katalun-lingvaj aŭtoritatoj altrudas tiun lingvon al la hispan-parolantoj kiuj loĝas en tiu regiono, kiuj estas preskaŭ duono el la tiea loĝantaro. Resume, ĉiu perforto kaj subpremo far la hispana ŝtato ne sukcesis submeti la sendependisman emon de la katalunoj, sed tute male. Kaj ĉiuj ĝentilaĵoj kaj donoj de la sama ŝtato plenumante la postulojn de la kataluna aŭtoritatoj ne sukcesis kvietigi ĉi ties separatismon sed instigis ilin fari kromajn postulojn. Tial la solvo de la problemo estas malfacila. Alia fakto kiu kontribuas plimalfaciligi la katalunan aferon estas tio ke la secesia sento en tiu regiono ĉeestas en ĉiuj sociaj klasoj kaj en ĉiuj politikaj tendencoj. Ja, la kataluna sendependismo estas tiel elitisma kaj duonrasisma kiel ĉiuj ceteraj naciismoj sed, strange kaj paradokse, tiu reakcia sento enestas ankaŭ en la maldekstrularo de tiu regiono. Alia bedaŭrinda rezulto de tiu konflikto estas ke ĝenerale en la tuta lando, kiel reago kontraŭ la katalunaj troaj depostuloj, revekiĝas ia kontraŭkataluna sento ĉefe inter la faŝistaro, kiu tre potenciiĝas lasttempe. Temas pri refaloj en kronikajn sociajn malsanojn de nia lando.
Estas facile konkludi ke ĉiuj menciitaj sociaj putraĵoj: kapitalismo, religia integrismo, rasismo, elitismo, naciismoj, faŝismo… estas kondamnindaj al la rubujo de la Historio. Sed konsternite ni devas konstati ke tiuj sociaj devioj plenigas la ĝisnunan homan historion, do la tuta historio estas rubejo. Ni komencis ĉi artikolon per la supozo ke, spit' al ĉio, la homaro antaŭenmarŝas al superado de ĝiaj malbonaj emoj kaj tendencoj, sed ni devis agnoski ankaŭ ke nun ni travivas periodon de retroiro, de refalo en la rubujon. Ĉu ni sukcesos iam definive forlasi tiun kotejon? Se jes, nur tiam vere komenciĝos la homa Historio.

# Klasbatalo tra la historio



2017 estas la Centjaro de la Rusa Revolucio. Nia revuo, kiu kutime pritraktas memorindajn historiajn eventojn, ne povus ignori tiun gravan okazintaĵon des pli ke ĉi tiu, krome, havis gravan influon en la mondo dum la jarcento pasinta de tiam. Pri tiu evento oni publikigis/as ĉi jare multajn librojn, artikolojn, revuojn… kaj estis/as ankaŭ konferencoj kaj interreta materalo. Kaj ĉar tiu revolucio estis komenco de kelkdekjara etapo dum kiu oni penis praktikadi la socialistan idealon por atingi la komunistan idealon, kaj la projekto fiaskis, la libroj kaj konferencoj kiuj okupiĝas pri la afero priatentas ankaŭ tiun etapon. Ankaŭ nia revua raporto pritemas la okazintaĵojn de 1917 en Rusujo kaj la sperton de la socialista bloko, sed ne nur tion. La Rusa Revolucio kaj la komunistaj reĝimoj kiuj estiĝis rezulte de ĝi okazis ene de tre ampleksa historia periodo, kiu ankoraŭ ne finiĝis. Ni temas pri la klasbatalo. Estis klasbatalo antaŭ la jaro 1917 kaj persistis post la jaro 1989, kiam kolapsis la komunista bloko. Do ni okupiĝas pri la klasbatalo ĝenerale ekde ĝia apero ĝis la nuntempo, kvankam sufiĉe skeme, kompreneble.

La klasbatalo ekzistas ekde la apero de la sociaj klasoj, kaj ĉi tiuj ne povis ekzisti antaŭ la apero de la privata proprieteco ĉar la esenco de la sociaj klasoj estas la diferencoj en la havaĵo kaj ĉi ties ĝuado. Sed la interhomaj konfliktoj ekzistis jam antaŭ tiu etapo ĉar la homaj kolektivoj, eĉ sen privata proprieto, vivadis el la resursoj de la teritorio (en formoj de ĉasado, fiŝkaptado kaj/aŭ rikoltado) kaj en la circonstancoj de malabundo de tiuj resursoj la homaj triboj devis militi unuj kontraŭ aliaj por la kontrolo de la teritorio. Konsideri aŭ ne tiujn militojn kiel klasbatalo estas konvencia, libervola decido. En nia raporto, ni decidis ne konsideri kiel klasbatalo la interetnajn konfliktojn kaj militojn, kaj ni sekvis tiun kriterion dum la priskribado de la sociaj luktoj de la epokoj de la sklavismo, la feŭdismo kaj la komenca etapo de la kapitalismo. Sed ne plu; alvenis momento en kiu, pro la tutmondiĝo de la kapitalista sistemo, ĉiuj konfliktoj en ĝi generataj havas karakteron de klasbatalo; eĉ militoj inter nacioj kaj mondmilitoj havas nun ian rilaton kun la klasbatalo mondskale.

Kiel dirite, nia raporto estas sufiĉe skema La priskribo de trijarmila periodo per kelkdeko da paĝoj ne povas esti detala. Sed ni pensas ke la afero estas sufiĉe klare prezentata por ke oni komprenu la kaŭzojn kaj funkciad-formojn de la diversaj tipoj je klas-socioj kaj ĉi ties evoluado, samkiel la malfacilaĵojn preter-superi tiun malfeliĉan etapon de la homa historio.

La antikvaj epokoj ne estas bone dokumentataj, tial oni ne multe povas koni pri la disvolviĝo de la klasbatalo en ili. En nia eseo ni dediĉas ian atenton al la egipta epoko kaj iome pli al profetismo de la Regno de Judujo pri kiu ni disponas, almenaŭ, je la biblia materialo. En tiu historia kunteksto kaj ankaŭ en la historio de Romo kaj ĉi ties imperio ni vidas aperi kaj disvolviĝi kulturajn elementojn destinitaj ludi gravan rolon en la Okcidenta socio de ili generitaj kaj pri kiu ni faras pli detalan priskribon. Restis for de nia atento aliaj civilizacioj kiel la antikva de Ĉinio, kaj aliaj, pro ne sufiĉa kono pri ili sed ĉefe pro tio ke ili nenion aŭ preskaŭ nenion influis en la genezon de nia socio.

El la historio de la Romia Imperio ni dediĉis specialan atenton al la apero kaj disvolviĝo de la kristana religio, kiu fine anstataŭis la antikvajn kultojn de la imperio. La intereso de tiu temo por nia pritrakto de la klasbatalo tra la historio konsistas el tio ke en la doktrino de tiu nova religio estis iu elemento, la homamo aŭ altruismo, kiu evidentiĝas nepre necesa por la bona disvolviĝo de ĉiu socia programo de kunvivado. Se konsideri trafa la marksisman teorion ke por la antaŭeniro al pli justa socio estas necesa la kunfluo de objektivaj kaj subjektivaj faktoroj, la altruismo aŭ filantropio kiun ni menciis estas nepra kondiĉo kaj la plej efika subjektiva faktoro por la konstruo de ĉiu ajn stabila sistemo. Ĝia manko estas la venko de la egoismo: milito, perforto, subpremado, rabado, klasbatalo. Tial estas interese vidi en kioma grado tiu elemento intervenis en la procezo de la klasbatalo kaj esplori la kialojn de ĝia ĝisnuna malofta aplikado.

La fruktoj de la nova religio en la plibonigo de la homaj interrilatoj estis magraj, aŭ eble ni esperis el ĝi pli efikan kaj rapidan influon ol tio kio eblas en la evoluo de la homaj aferoj. Kun elreviĝo ni konstatas ke la religia ŝanĝo kiu inaŭguris la novan eraon kaj iĝis distinga signo de la Okcidenta socio restis kiel religio de sanktejo kaj pilgrimado, de kulto kaj dogmaro, de krucmilitoj kaj inkvizicio… anstataŭ la laborado por la starigo, laŭ la plano de Kristo, de la Dia Regno, kiu, interalie, estus senklasa socio. Tamen, la militoj de la post-Krista erao estis tiel ofte kaj kruelaj kiel antaŭe, kaj la klasbatalo ne alvenis, eĉ post du mil jaroj, al feliĉa kulmino. Tial nia raportado de la jarcentoj de Mezepoko kaj Moderna Erao estas teda kaj laciga, atentante pri etaj kaj maloftaj signoj de progreso en la objektivaj kaj subjektivaj kondiĉoj.
La sklavismo kaj la feŭdismo, ankoraŭ ne tute elradikigitaj en la tuta mondo, estis anstataŭitaj de la burĝa kapitalismo en la Okcidenta socio nur ekde antaŭ pluraj jarcentoj. Post la angla revolucio de la 17-a jarcento kaj la Usona Sendependiga Milito de la 18-a jarcento, la plej emblema signo de la socia ŝanĝo, de politika vidpunkto, estis la granda Franca Revolucio. En nia raporto ne estas detala priskribo de tiu grava kaj interesa evento tial ke ni dediĉis al tiu temo iun antaŭan numeron de nia revuo. Nian studon de tiu epoko ni centris en la ŝanĝojn tiam okazantajn en la tereno de la produktado, t. e. la industria revolucio. Vekis nian intereson pri tiu temo la fakto ke la granda kaj konstanta ŝanĝado de la produktad-maniero, kiu karakterigas tiun procezon, alportis egan impulson al la disvolviĝo de la klasbatalo. Ja, tiu procezo kreis novan –subprematan– klason, al kiu la historio, laŭ ies opinio, asignis la taskon roli sekvajn revoluciojn destine al la justa kulmino de la klasbatalo. Ja, la sekvintaj revolucioj, inter ili la Pariza Komunumo, estis proletaj revolucioj. Nia eseo dediĉas al tiu procezo la atenton kiun ĝi meritas. Kaj konekse kun tio, ni devis atenti ankaŭ pri la ideo(logio)j naskiĝintaj aŭ generitaj en la kurso de tiu ŝanĝo-procezo: la anarkiismo kaj la marksismo.
Ĝuste la teorioj de Karlo Markso inspiris la bolŝevistojn, la politika kolektivo kiu gvidis la revolucian procezon en Rusujo. Ne malpli grava ol la revolucia venko mem estis la espero kiun tiu evento vekis en la ampleksaj proletaraj amasoj en multaj industriaj landoj kaj en la popoloj subpremataj de la imperiismo. Multaj postaj okazintaĵoj en la mondo estis rekta rezulto de tiu socipolitika ŝanĝo; oni povas diri ke de tiam la klasbatalo estis la centra afero de la internaciaj rilatoj kaj de la interna politiko de la ĉefaj industriaj landoj. Se tio estis perceptebla jam en la periodo inter la du mondmilitoj, ĝi fariĝis pli evidenta post la dua mondmilito, en la etapo konata kiel “malvarma milito”. Eĉ post la disfalo de la komunistaj reĝimoj de Orienta Eŭropo en 1989, la fantomo de la Komunismo daŭre hantas en la mondo kaj konstituas inkubo-sonĝon por la sociaj strategiistoj de la kapitalismo. Per nia eseo ni priskribas la aranĝojn de la imperiismo por eviti pluajn revoluciajn movadojn.
La Rusan Revolucion ni taksas kiel mejloŝtono en la procezo de la klasbatalo. De nia vidpunkto, la plurjarmila klasbatalo dividiĝas en du etapoj, tre malegalaj rilate al ĝia daŭro: antaŭ kaj post la Rusa Revolucio. Jes; se la daŭro de la postrevolucia etapo estas multe pli malgranda ol la antaŭrevolucia, la instruo kiun alportas al la studo de la klasbatalo la historio de la lasta jarcento estas senkompare pli riĉa ol tiu de la multaj antaŭaj jarcentoj. Per la tri lastaj ĉapitroj de nia eseo, kaj post la raportado pri la Revolucio de 1917 mem, ni intencis esplori la kialojn de la stagniĝo de la socialista revolucio unue kaj de ties fiasko fine. Ni pensas esti alveninte al iuj konkludoj, sed, ĉu pravaj? La kialoj de la ne-ebleco de socialisma venko antaŭ la industria revolucio ŝajnas sufiĉe klaraj, kaj tiele ni eksponis ilin per la ĉapitroj pritemantaj tiujn antikvajn epokojn. Sed por la studado de la nuntempo mankas al ni la necesa perspektivo. Krome la esploro de la kaŭzoj de la fiasko kiun ni bedaŭras postulas formuli alternativon, eblan solvon. Malfacila tasko, sed la centjara jubileo de la Revolucio ŝajnas konvena okazo por ion intenci tiucele.
Kompreneble, la personoj komforte instalitaj en la kapitalista sistemo emas nenian ŝanĝon; neniel ili povus akcepti ke la Komunismo estas la ideala destino de la homaro. Por tiutipaj homoj gravas neniom la malsato de miliardoj da personoj en la mondo, la infanoj sklavigitaj en la malriĉaj terzonoj de la planedo, la dispredado de la riĉfontoj de la malevoluintaj landoj, la porĉiama persisto de sistemo bazita sur la klasa malegaleco… Sed tia ne estas nia kazo; ni konsideras ke la fiasko de la Komunismo estus la fiasko de la homaro, kaj volas pensi ke alia mondo eblas.
Tamen ni estus lerninta nenion el nia studo de la historio se ni daŭre konceptus la klasbatalon kiel kontraŭfrontiĝo, eĉ perforta, de personoj. La socia maljusteco kiun oni pretendas venki kaj malaperigi estas, plimalpligrade, en la interno de ĉiu homo. La ŝanĝo kaj plibonigo de la socio komencendas per la ŝanĝo kaj plibonigo de la konscienco de ĉiu persono. Tial ni konkludas ke la tereno de la klasbatalo estas ne la batalkampoj, nek la urbaj stratoj, nek la fabrikoj, sed la homa menso, la eduksistemo. Espereble, kiam oni festus la duan centjaron de la Revolucio de 1917, la mondo estu pli paca loko ol ĝi estas nuntempe, patrujo de la tuta homaro, kaj la dua jarcento estus pli progresa kaj harmonia ol la unua. Tiel estu!

# Revo senĉese renaskiĝanta... ...kaj ĉiam sekve fiaskanta



Multaj ideoj kaj aferoj havas sian –realan aŭ supozitan– prahistorion. Rilate al la ideo aŭ idealo de la Komunismo, estas konata la koncepto kaj la esprimo “Primitiva Komunismo” aŭ “Praa Komunismo”. Gravaj teoriistoj de la marksismo akceptis tiun koncepton kiel ion reale ekzistintan iam. En la marksisma teorio, ĝi estas difinita kiel etapo de la evoluo de la sociekonomiaj komunumoj, karakterizitaj de malalta disvolviĝo de la produktigaj fortoj, kolektiva aŭ komuna proprieto de iloj de produktado (la tero kaj la iloj por ties prilaborado) kaj egaleca distribuado de la produktaĵoj.

Sed la ideo pri socio sen privata proprieto ekzistis jam antaŭ la apero de la marksismo. Ĝi senĉese aperis en la menso de la homoj kiuj devis suferi la ekspluatadon en ĉiu klasa socio. Ni vidu, ekzemple, jenan paragrafon de la 11-a ĉapitro de la verko **Don Kiĥoto**, en kiu tiu klasika simbolo de ĉiutempaj idealistoj deklamas:

***—Feliĉa la epoko kaj feliĉaj la tempoj, kiujn nomis oraj la antikvuloj, ne pro tio, ke la oro (alte estimata en nia fera epoko) estus facile akirebla, sed pro tio, ke la homoj tiamaj ne konis ankoraŭ la sencon de la vortoj «via» kaj «mia». En tiel glora epoko oni ĉion posedis komune kaj bezonis por manĝi nur levi la manon kaj preni de la branĉoj de fortikaj kaj prodigaj kverkoj ties dolĉan kaj maturan frukton. Klaraj fontoj provizis la homojn per abundego da akvo pura kaj delica. La diligentaj kaj saĝaj abeloj formis sian regnon en la fendoj de la rokoj kaj en la kavoj de la arboj kaj sen ia egoismo proponis al la unua alvenanto la riĉan rikolton de sia dolĉega laboro. La bravaj kork-arboj demetis pro nura ĝentilo sian larĝan kaj leĝeran ŝelon, kiun oni komencis uzi, defende kontraŭ la rigoroj de la ĉielo, por tegmenti la kabanojn konstruitajn sur krude ellaboritaj fostoj. Ĉie regis paco, ĉie amikeco, ĉie konkordo; la peza soko de la kurbaj plugiloj ne kuraĝis ankoraŭ fosi aŭ bori la kompatieman internon de nia unua patrino, kies vasta kaj fekunda sino, sin apertis ĉie, sen ia perforto, por nutri, satigi kaj kontentigi sian idaro…***

La priskribo de la ideala viv-maniero kiun la aŭtoro de **Don Kiĥoto** metas surbuŝe de la kavaliro respegulis la konstantan revon de la homaro pri ia feliĉa origino kiu iam fuŝiĝis. «Ora Erao», «Feliĉa Arkadio»… «Aztlan» en aliaj kulturoj, estas esprimoj kiuj celas referenci tiun pretenditan primitivan idealon. La biblia rakonto de la perdita Edena Paradizo apartenas al la sama tendenco de la homoj meti en la pasintecon la utopion pri kiu ili revas. Decas revi pri tia utopio, sed oni devas meti ĝin en la estontecon kaj labori por ĝin konstrui kaj atingi. Neniam ekzistis la primitiva Paradizo, Arkadio aŭ Ora Erao…

Kaj kion diri pri la Praa Komunismo, pri kiu teoriadis kelkaj klasikuloj de la marksismo? Nu, se ni konsideras ke temas pri etapo de la socia evoluo kiam ankoraŭ ne ekzistis la privata proprieto de la tero, do la homoj ne diferenciĝis inter ili pro la maniero partopreni en la produktado, t. e. ne estis malsamaj klasoj kun kontraŭdiraj interesoj, estas klare ke ni troviĝas antaŭ neklasaj socioj aŭ grupoj, do sen

klasbatalo… Tiutipaj homaj kolektivoj, teknike, povas esti konsiderataj kiel «komunistaj», sed ili tute ne estis paradizaj aŭ idealaj socioj. Ili ne povas esti konsiderataj kiel modelo kiu devas esti restarigata. La fakto ke la fruktoj de la produktado estus distribuataj egalece inter ĉiuj membroj de la komunumo ne signifis konkordajn interhomajn rilatojn. Estis tre malfacile, en la tiama disvolviĝo de la laboriloj, eltiri profiton el la tero. Ne ekzistis privata proprieto de la tero sed la homaj komunumoj devis senti la neceson defendi sian teritorion kontraŭ aliaj homaj grupoj kiuj pretendus okupi ĝin, aŭ serĉi alian teritorion kiam la propra ne sufiĉis por la nutrado de la grupo. Tio neeviteble estis kaŭzo de militado inter la diversaj homaj komunumoj aŭ grupoj, kaj en tiutipaj militoj estis neniu loko por la kompato. La nepra destino de la venkitaj grupoj estis la kompleta ekstermiĝo. La rasismo, ksenofobio, malamo al la fremduloj… tre rimarkindaj ankaŭ nuntempe, havas pli profundajn radikojn ol la klasbatalo.

Ankaŭ interne de la grupoj ne ekzistis perfekta paco. Abundis perforto inter la viroj kiuj celis samajn virinojn, kaj en la kazo de la matriarkecaj komunumoj, inter la virinoj kiuj celis samajn virojn. Krome, ŝajnas ke la evoluo de matriarkecaj al patriarkecaj socioj ne estis paca. La nuntempa masklismo (subpremado kaj perforto de la viroj kontraŭ la virinoj) estas rezulto kaj postrestaĵo de tiu konflikto, neniam tute solvita. Ankaŭ ĝi havas pli profundajn radikojn ol la klasbatalo. Ĉi tiu priskribo de la praaj socioj ne estas nura spekulativado. Ankoraŭ nuntempe ekzistas tie kaj tie restaĵoj de tiutipa homa organizo kiuj povas esti rekte pristudataj. Do, la vera idealo, la komunismo kiun la homaro devas celi, devas meti finon ne nur al la klasbatalo sed ankaŭ al ĉiuj ceteraj homaj konfliktoj, kaj ankaŭ harmoniigi la rilaton de la homo kun la Naturo. Ĉi tiu lasta konflikto ne estas tiel antikva kiel la antaŭe menciitaj. Fakte ĝi nur iom-post-iom iĝis grava ekde la komenciĝo de la industria revolucio, sed lasttempe ĝi estas akirante vere zorgigan aspekton; la homaro estas alfrontante ĝin tiel fuŝe kiel la ceterajn kontraŭdirojn.

Sed tial ke la homaro penas solvi ĉiujn-ĉi konfliktojn kaj kontraŭdirojn, indas ke ni atentu pri ĝia longdaŭra strebado eĉ se la rezulto de ĝiaj provoj ne estis kompleta sukceso: verdire ĝi ankaŭ ne estis kompleta fiasko. Ĉiukaze eblas eltiri instruon tiel el la sukcesoj kiel el la fiaskoj.

Inter la konataj provoj establi senklasan socion, eble la plej antikva estas tiu de la faraono Akenaton' (14-a jarcento a. K.). Notindas ke pri tiu egipta reĝo la historiistoj sciis nenion ĝis meze de la 19-a jarcento, kiam estis malkovrita en la loko nuntempe nomata ***Amarna*** la ruinaĵoj de antikva urbo pri kiu oni sciis nenion ĝis tiam. En tiu loko aperis arkeologia materialo kiu tute mankis en la cetero de la egipta teritorio, t. e. statuoj kaj gravuritaj desegnoj kaj skribaĵoj prirakontantaj la historion de la faraonoj kiuj reĝis ekde tiu loko. Kial la oficiala historio de la Antikva Egiptio dekretis tiun cenzuron aŭ ***Damnatio memoriae*** kontraŭ Akenaton' kaj ĉi ties sukcedinto? Dank' al la arkeologiaj dokumentoj konservitaj en Amarna, nun ni scias ke la antikva nomo de tiu urbo estis «Ajetaton'» kio en la egipta lingvo signifas «Horizonto de Aton'». Aton' estas la nomo de unu el la multaj dioj de la egipta panteono, adorata antaŭ kaj post la reĝado de Akenaton'. La problemo estis ke tiu faraono proskribis la kulton al la ceteraj dioj kaj igis el Aton' la Unusola Dio. La ŝanĝo estis revolucia kaj ne nur de teologia vidpunkto. La afero iome rilatis ankaŭ al la klasbatalo. La rezulto de la religia reformo de la faraono ne estis nura monolatrio (unulatrio) sed vera monoteismo laŭsence ke ĝi kunhavis ne nur kulton sed ankaŭ ian moralan sencon. Ja, la ideo de monoteismo enportas la koncepton de egaleco inter la homoj. En la kazo de la monoteismo de Aton' oni povas vidi per la hieroglifoj de Amarna ke en la preĝo-himnoj al tiu dio –komence asimilita al la suno– formulitaj de Akenaton', oni emfazas pri la egaleco de la homoj kiam oni asertas ke la Atonaj sunradioj egale bonfaras al ĉiu homo. Kaj estas ankaŭ la informo ke tiu faraono abolis la sklavecon kaj admonis al interhoma amo. Sed nek tiam nek nuntempe rezultas facila la socia ŝanĝo celantan interhoman amon ene de senklasa socio. La eksperimento de Akenaton' fiaskis jam komence de la reĝado de lia sukcedinto, kaj ŝajnas ke la socia kaj religia renversiĝo estis perforta interfrontiĝo de la homoj kiuj estis akceptintaj la reformon de Akenaton, sklavoj kaj aliaj malalt-klasuloj, kaj la rifuzintoj de tiu ŝanĝo: politeisma pastraro, aristokrataro, militistaro…

Malfeliĉe, la disponebla informo pri tiu periodo ne permesas al ni ekscii kiamaniere la abolita sklava laboro estis anstataŭita de alitipa produktad-sistemo. Ni ne scias, ankaŭ, kiajn formojn je popola klerigado pretigis la reĝimo de Akenatono por diskonigi ĝian idearon kaj plifirmigi la reformojn. La steleoj montrantaj la faraonajn ceremoniojn honore al Aton', nun troviĝantaj nur en Amarna, ekzistis tiam en tuta Egiptio kaj tio sendube estis propagando de la monoteismaj novaĵoj sed estas dubinde ke la popolaj klasoj kapablus legi la hieroglifajn tekstojn kiuj enportis la idearon de la nova reĝimo. Ĉu oni entreprenis ian programon de popola instruado? Oni scias nenion pri tio. Tamen, jes ja, ni povas eltiri iajn konkludojn, nome, ke la iniciato de la reformoj venis desupre, de la faraona povo, sed ke ĝi ĝuis apogon tiel de kleraj sektoroj de la egipta socio kiel de parto el la subpremitaj amasoj. Ĉio ĉi evidentigas ke la kondiĉoj de tiu kulturo estis maturintaj por evoluo al monoteismo. La plej religia popolo de la tiama mondo estis la alvokito por entrepreni tian reformon. La rezulto ne estis plensukcesa sed ankaŭ ne plenfiasko. Ne estis la sola fojo en la historio en kiu la

popolo aŭ kulturo preta gvidi gravan elpaŝon rifuzas plenumi ĝian taskon kaj ĉi tiu devas esti alprenita de alia malpli preparita aganto. Ĝuste tio okazis kun la egipta monoteismo kaj ties interna ideo de interhoma amo kaj egaleco. La reĝimo de Akenaton' okazis en la pinto de la egipta kulturo. Kun ĝia malapero malaperis ankaŭ la 18-a dinastio kaj de tiam la egipta civilizacio, kiu ne estis kapaba plenumi ĝian rolon, senĉese dekadencis. Tiu dekadenco estis malrapida kaj longdaŭra sed senĉesa, kaj same malrapida kaj longdaŭra estis la maturiĝo kaj disvastiĝo de la monoteismaj ideoj kaj ties progresista enhavo. Sed ĝia reelŝpruco ne okazis en la egipta kulturo mem sed en teritorio historie kontrolita de Egiptio kaj influita de ĉi ties kulturo, nome la tero de la semidaj triboj loĝantaj inter la Sinaja duoninsulo kaj Fenicio.
Dum la 8-a kaj 7-a jarcentoj a. K. okazis ia interesa procezo en la t. n. "Regno de Judujo". Ni konas tiun periodon multe pli bone ol la antaŭe menciita de la faraono Akenaton' ĉar priskribas ĝin la "Libro de la libroj", t. e. la Biblio. Fakte la verkado de plejparto el tiu libro mem estas parto de la procezo kiu altiras nian atenton.
Por ektrakti tiun eksterordinaran dujarcentan periodon ni situiĝu ĝuste en la jaro 621 antaŭ nia erao. Tiam la 26-jara Joŝijo estis reĝante Judujon de antaŭ 18 jaroj. En tiu jaro Joŝijo entreprenis politikon similan al tiu de Akenatono ĝuste 728 antaŭe. Li dekretis monoteisman kulton ligitan al ideoj de sociala justeco. Oni detruis ĉiujn altarojn de la politeisma idolatrio kaj promociis la kulton al la Unusola Dio de la templo de Jerusalemo. Rimarkindas ke tiam la ideo pri Dio jam ne plu estis ligita al iu ajn materia aĵo, kiel la suno de Aton', sed oni konceptis ĝin kiel abstrakta, spirita, eterna, ĉiopova… forto. Sed krom la kulto al tiutipa dieco, oni entreprenis ankaŭ politikon celantan la malaperon de la sklaveco kaj egalecan distribuadon de la propraĵoj.
La teniĝo de la monarĥo ne estis izolita kaj spontana fenomeno subite aperinta. Ĝi okazis ene de kultura medio en kiu estis maturintaj la kondiĉoj por ĝia konkretiĝo. Samtempanoj de la reĝo Joŝijo estis la profetoj Jeremio, Naĥum, Ĥabakuk, Cefanja kaj Jona. Estas en la Biblio libroj kiuj portas la nomon de tiuj profetoj. Sed estis en tiuj jarcentoj multaj profetoj (kaj eĉ profetinoj) pri kiuj oni ne konservas ian ajn skribaĵojn. Por la ideo kiun oni intencas reliefigi pri tiu epoko interesas scii ke la profetismo konstituis veran partion laŭsence ke tiuj homoj estis asocie organizitaj kaj agadis laŭplane. Pli ol unu jarcento antaŭ la epoko de Joŝijo jam ekzistis tiu profeta partio kun figuroj tiel gravaj kiel Jesajo, Hoŝeo, Miĥa kaj Amos. En la libro de Jesajo, ni trovas jenajn vortojn, kiujn li metas sur la buŝo de Dio:

***Ve al la leĝdonantoj, kiuj starigas maljustajn leĝojn, kaj al tiuj, kiuj skribas maljustajn verdiktojn, por forpuŝi malriĉulojn de la leĝo kaj forrabi la justecon de senhavuloj de Mia popolo, por ke la vidvinoj fariĝu lia rabakiro, kaj por prirabi la orfojn! Sed kion vi faros en la tago de puno kaj de pereo, kiu venos de malproksime?***

Tiutipa materialo abundas ankaŭ en la libro de Amos. Interalie, oni trovas en ĝi:

***Atentu nun, riĉuloj; ploregu kaj kriegu pro la mizeroj sur vin alvenontaj. Via riĉo putriĝis, kaj viaj vestoj konsumiĝas de tineoj. Via oro kaj via arĝento rustiĝis; kaj ilia rusto atestos kontraŭ vi, kaj konsumos vian karnon, kiel fajro. En la lastaj tagoj vi kolektadis trezoron. Jen krias la de vi trompe retenata salajro de la laboristoj, kiuj falĉis viajn kampojn; kaj la krioj de la rikoltintoj venis en la orelojn de la Eternulo Cebaot. Vi luksadis sur la tero, kaj diboĉadis; vi nutradis viajn korojn en tago de buĉado. Vi kondamnis, vi mortigis la justulon; li ne kontraŭstaras al vi.***

Sed la fakto ke ni konas la vortojn kaj la ideojn de tiuj profetoj, verkitaj de ili mem en iuj kazoj aŭ de iliaj disĉiploj en aliaj kazoj, signifas ke tiam la skribarto estis fariĝinta sufiĉe popola afero, male ol en la epoko de la faraono Akenatono. La verkado de tiuj profetaj libroj kaj ceteraj bibliaj tekstoj estis grava elpaŝo de la homa progreso. Ni vidu kiel prirakontas la komenciĝon de tiu procezo la Biblio mem. En la t. n. Dua Libro de la Reĝoj, priskribante la reĝadon de la menciita Joŝijo de Judujo, aperas jena teksto:

***Kaj la ĉefpastro Ĥilkijo diris al la skribisto Ŝafano: Libron de la instruo mi trovis en la domo de la Eternulo. Kaj Ĥilkijo donis la libron al Ŝafano, kaj li ĝin legis. Kaj la skribisto Ŝafano venis al la reĝo kaj alportis al la reĝo respondon... …Kaj la skribisto Ŝafano raportis al la reĝo, dirante: Libron donis al mi la pastro Ĥilkijo. Kaj Ŝafano legis ĝin antaŭ la reĝo.***

Nu, per tiuj malmultaj kaj modestaj versikloj, kiuj tre facile povus resti ne-avertitaj de la ne-atentigitaj legantoj, oni priskribas unu el la plej transcendaj okazintaĵoj el la homa historio. Tion oni devas klarigi. Per la transdono, far la pastroj, de la Sankta Skribo de la templo al la manoj de popolanoj, laikoj, oni metis finon al la pastrara monopolo de la religia scio, oni ruinigis la bazon de la kast-socio. En la socioj de kastoj, kia la antikva Hindio, la pastra, bramana kasto, kontrolis kaj monopoligis la sanktajn skribojn kaj estis malpermesate diskonigi ties enhavon inter la popolaj kastoj aŭ klasoj. Tiu skemo, tiam ĝenerala kaj universala, estis rompita en la Judujo de Joŝijo. Sen tiu elpaŝo ne estus poste ekzistinta la judismo, ankaŭ ne la kristanismo, la liberalismo, la marksismo… Ĉio komenciĝis tiam. La religia teksto transdonita de la pastraro eble estis nur la t. n. Libro de la Levidoj kaj iomete pli. Sed de tiam, la

popolo, ĉi ties profeta partio kun ĉi ties skribistoj, pristudis, reinterpretis, reformulis kaj reellaboris la religian leĝaron kun disponoj favoraj al la interesoj de la popolo: ripozo de la sepa tago, sabata jaro, Jubilea Jaro…

Klarigindas ke ni ne atribuas la sabatan ripozon al la Judujo de Joŝijo. Estas indicoj ke tiu koncepto ekzistis en la egipta kaj la babilonia civilizacioj. Sed estis en tiu memorinda okazo kiam ĝi akiris tiun rangon de Dia ordono kaj estis registrita en la Sankta Skribo. Ne hazarde la kono kiun nia kulturo havas pri ĝi venis el tiu biblia tradicio. Sub Joŝijo tiu sabata ripozo de la servutuloj kaj laboristoj fariĝis deviga, sakrala ordono. Kaj plej interese, oni planis tiam iun procezon meti finon al la feŭdalisma sistemo kaj starigi egalecan soci-ordon. Temas pri la t. n. "Jubilea Jaro". La Jubilea Jaro, laŭ la biblia doktrino devus okazi ĉiu 49-a jaro kaj en ĝi oni devus liberigi la sklavojn kaj la kaptitojn, forviŝi la monŝuldojn kaj redoni al la antaŭaj proprietuloj la konfiskitajn aŭ hipotekitajn terenojn. La doktrino pri la Jubilea Jaro enkadriĝas en la biblia leĝaro atribuita al Moseo, mita figuro de la juda tradicio. Tiu leĝaro, same kiel la mito de la Edena Paradizo, la historio de la praaj hebreaj patriarkoj kaj tiu de Moseo mem kaj la Eliro de la hebreoj el Egiptujo destine al la "Promesita Lando", troviĝas en la kvin unuaj bibliaj libroj nomataj "Torao" (Leĝaro) de la judoj kaj "Pentateŭko" de la kristanoj. La tuta historio rakontata de tiu kvinlibra verko estas mitaro, ne estas vere historia materialo. Tiu materialo komencis esti verkata dum la reĝado de Joŝijo far la profeta partio de Jeremio kaj estis finredaktita unu jarcenton poste. La rakonto baziĝis sur antikvaj legendoj kaj la ekzistintaj leĝaroj de la regnoj de Israelo kaj Judujo reformulitaj laŭ la progresista idearo de la profetoj.

Estis kromaj mitaj bibliaj libroj, ekzemple tiu de Josuo, kiu, laŭ la biblia tradicio, estis la gvidanto de la izraelidoj post la morto de Moseo. Se Moseo estis mita figuro kiu verŝajne ne ekzistis historie, Josuo tutcerte estis personulo tute inventita laŭ la politikaj necesoj de la reĝado de Joŝijo. Oni konstatu kiel multe similas la nomoj de Josuo kaj Joŝijo. Laŭ la biblia tradicio tiam ellaborata, Josuo, post la konkero de la Promesita Lando disdonis la teron egalece inter la izraelidaj familioj. Surbaze de tiu legendo, Joŝijo, la nova Josuo, pretendis, pere de la Jubilea Jaro, restarigi tian egalecon rilate al la posedado de la teraj proprietaĵoj. Klare parolante, la Jubilea Jaro estis planita revolucio celante meti finon al la feŭdisma sistemo per la distribuado de la teroj inter la tuta popolo. Tiu plano estis neniam aplikita antaŭe kaj ankaŭ ne poste. Eble Dio inspiris al la profetoj tiun ideon pri instituciigo de la revolucio, sed ne inspiris al ili la konvenan strategion por ĝin realigi. La revolucioj sukcesas nur kiam ili okazas, ne planite, sed laŭ neatenditaj formoj kaj en neatenditaj okazoj.

Kompreneble, la feŭd-sinjoroj de la regno ne rigardis kun simpatio tiun planon de la Jubilea Jaro, kaj ili sukcesis eviti ties aplikadon. Ili konstituis la oficiraron kaj la kavalerion de la reĝo Joŝijo kaj en batalo de la armeo de Judujo kontraŭ la armeo de la faraono Nekao kiu invadis la regnon ili perfidis la reĝon Joŝijon, kiu pereis tiam. La nova reĝo de Judujo estis infano kontrolata de la kortego de tiu feŭdisma aristokrataro. La revolucia plano de la profetoj iĝis nerealigebla en la nova politika situacio. La profeta partio suferis persekutadon, kaj kromanfoje la popolo ne reagis favore al siaj progresemaj intelektuloj. Kromanfoje la amasoj kiuj devas esti la protagonisto de la historio rezignis tiun rolon kaj akceptis la plupersistadon de la sistemo kiu subpremadis ilin. Tiu skemo konstante ripetiĝas en la historio: senĉese renaskiĝas la espero pri realigado de idealo kaj ĉiam poste fiaskas la eksperimento. La popoloj, la generacioj, la kulturoj… kiuj rifuzas plenumi la rolon kiun la Historio asignis al ili devas poste pagi altekoste sian dizerton. La regno de Judujo baldaŭ post la epoko de Joŝijo estis detruita de Babilonio kaj la klerularo de la regno estis kaptita kaj forportita al la babela teritorio. En la lando restis nur la malklera popolo sklavigita. La normala disvolviĝo de tia situacio estus ke la venkita popolo dissolviĝu pro la perdo de sia identeco kaj historia memoro pri si mem. Tiele okazis en similaj cirkonstancoj de aliaj venkitaj popoloj. Sed ne estis tia la destino de la juda popolo; savis ĝian identecon kaj la fidon pri sia destino la Libro, la Skriboj; ĝi estas la popolo de la Libro, kaj ĉi tiu povis plenumi tiun rolon ĉar estis libro de la Popolo. La libro esprimis la popolajn revojn, eĉ se mitaj legendoj, kaj la popolajn esperojn, eĉ se fantaziaj utopioj.

La verkado de la ĉefaj bibliaj skriboj, komenciĝinta en Jerusalemo far la profeta partio de Jeremio estis finplenumita unu jarcenton poste en la ekzilo de Babelo far la skolo de skribistoj de Ezra. La laboro de tiu intelektularo estis duobla: unue eltiri instruon el la okazinta fiasko, kaj due formuli esperon de rekuperiĝo kaj brila estonteco. Rilate al la unua tasko, la definitiva redaktado de la historio (legendo) de Moseo estas la mita rakonto de la Eliro de la izraelidoj el Egiptio kaj ilia tradezerta irado al la Promesita Lando. La okazintaĵoj raportitaj en tiu libro ne estas historio sed tamen estas realaĵo, t. e. ĝi esprimas la skemon de sinsekvaj popolaj teniĝoj kontraŭdiraj oscilante inter entuziasmaj renaskiĝoj de espero kaj hontigaj forlasoj de la celita idealo. La libro de Eliro, post priskribi la emon al liberiĝo de la hebreaj sklavoj forlasante Egiptujon subkomande de Moseo, priraportas kelkajn popolajn ribelojn kontraŭ tiu legenda profeto celante reveni al "la domo de la sklaveco". Per tiu priskribo la libro de la Eliro pretendas simboligi la sobojn kaj la sorojn de la profetisma procezo okazinta en Judujo dum tiuj du jarcentoj

antaŭ la epoko de Joŝijo, kiu kulminis per la definitiva fiasko de la procezo. Legante tiun libron, neevitеble venas al la penso la revolucio entuziasme komenciĝinta en Rusujo ĝuste antaŭ unu jarcento, la evoluo de la socialistaj reĝimoj dum kelkaj jardekoj kaj la fiaska kulmino de tiu procezo en la jaro 1989. Tiu skemo estas klasikaĵo kiu senĉese ripetiĝas en la homa historio.

La dua tasko de la skribistoj de la skolo de Ezra kaj postaj estis la reinterpretado de la libroj de la profetoj eltirante el ili revo-renaskiĝon, esperon pri glora estonteco por la popolo de la Libro, la Mesia epoko, t. e. la anoncon de la restarigo de la gloro de Israelo far ia eksterordinara reĝo (Mesio) sendota de Dio. Tiu espero fortikigis la decidemon de la juda popolo kontraŭ-rezisti, dum la lastaj jarcentoj antaŭ la nuna erao, la militajn kaj kulturajn ofensivojn kontraŭ sia specifa religia identeco, ĉefe tiujn de la helenistaj kaj romia potencoj.

Nun oni devas klarigi kial tiu ideologio elpensita de intelektuloj fariĝis, dum la postekzilaj jarcentoj, intima komponaĵo de la animo de la juda popolo. Kiam la ŝanĝo de la politikaj cirkonstancoj ebligis la revenon de la ekzilitoj el Babilonio al Judujo, ili ĝuis grandan prestiĝon antaŭ la okuloj de la malkleraj popolanoj kiuj estis restintaj en la lando. Surbaze de tia prestiĝo estis relative facile generi liderecon kapablan entrepreni la restarigon de la juda socio, la rekonstruon de la templo kaj reigon de la celebrado de ĉi ties kulto. La sceno de Ezra legante al la popolo la ĵusfinredaktitan religian leĝaron estis, fakte, la fonda aŭ konstitua akto de la juda religio. Sed ĝi enportis ankaŭ la ĝermon de aliaj aferoj nuntempe ekzistantaj: la kristanismo, la islamismo, la socialismo, la cionismo… kaj Esperanto.




Notindas ke dum tiuj postekzilaj jarcentoj, antaŭ nia erao, floris en Judujo potencaj institucioj kapablaj forĝi la popolan animon. Krom la Templo kaj ties pastraro kaj skribistaro, la Sinedrio (Senato konstituita de plutokratoj), estis ankaŭ la novaĵo de la popola asembleo, t. e. la Sinagogo. En ĉiuj vilaĝoj aŭ urbetoj de Judujo ekzistis unu sinagogo, en la pli grandaj urboj estis kelkaj, kaj en Jerusalemo estis multaj. Ĉiu sinagogo estis la asambleejo de iu komunumo. Ene de ĝi oni aranĝis aferojn kiel bonfarado, solvado de konfliktoj… En la sinagogaj lernejoj oni instruis la infanojn pri la religiaj skriboj, kiuj enportis ankaŭ la historion de sia popolo kaj aliajn elementojn de la juda kulturo. Kiam la judoj aĝis 13 jarojn ili jam estis kapablaj legi tiujn skribojn en la sabata kulto de la sinagogo. La instruo estis destinita nur al la viroj, sed la legado en la sinagoga kulto, adresita ankaŭ al la virinoj, prezentadis laŭlonge de ĉiu kvaro da sinsekvaj jaroj la tutan enhavon de la ampleksa biblia libraro, kiu krome estis komentata kaj debatata en la asembleaj sesioj. Tiutipa neelitisma klerigado de la popolo ekzistis tiam en neniu alia socio.

En la sojlo de la nuna erao, kiam Judujo troviĝis sub la superregado de la Romia Imperio, la socia tereno estis denove preta por ia probo de la idealo. Tiam la templo de Jerusalemo, la juda teokratia monoteisma reĝimo, estis eble la plej granda koncentriĝo de religia praktikado iam ekzistinta en konkreta geografia areo kaj epoko. La famo de tiu religio kaj ties espero pri baldaŭa alveno de la reĝo-Mesio estis etendiĝinta foren de la limoj de la juda popolo. La intelektularo de la Romia Imperio kaj de Partiujo, kiu jam ne plu povis akcepti la politeismajn paganajn kultojn, rigardis kun intereso kaj fascino la religian sperton de Judujo kaj multaj fremduloj vizitadis la monoteisman templon de Jerusalemo kaj kelkaj el ili konvertiĝis al la judismo. Tiusence ŝajnis ke tiam oni estis plenumante la profetaĵon kiun Jesajo estis formulinta, antaŭ proksimume okcent jaroj, ke Jerusalemo kaj la religio de Israelo iam estos “lumo por la nacioj”. Oni devas aldoni la ekzistadon de diversaj sektoj kiuj konkuradis en la instruado kaj interpretado de la Skribaĵoj kaj la praktikado de la Torao: la skoloj de Hilel kaj Shamaj nur inter la fariseoj, plus la diversaj sektoj ne fariseaj, kiaj la sadukeoj, la zelotoj, la esenoj…

En tiu kunteksto, la tiam esperata Mesio estis multaj malsamaj aferoj por multaj malsamaj hom-tipoj. Ĉar la superreganta ideologio devis promocii la rekonstruadon de la lando kaj de la religio, tio generis ian senton je patriotismo cionist-tipa. Tial multaj judoj esperis ke la tuj aperonta Mesio estus grava militestro kiu liberigus la popolon el la romia jugo kaj konkerus por la juda popolo grandan imperion, t. e. ia juda versio de personuloj kiaj Julio Cezaro kaj Aleksandro la Granda. Por la atendantoj de tiutipa mesio, la idealo havis naci(ism)an koloron. Estas la problemo de ĉiuj naciistoj: ili ne pretendas plibonigi la situacion aŭ ŝanĝi la sistemon, ili emas nur instaliĝi komforte en la maljusta sociordo. Tiuj cionistoj de la unua jarcento de la nuna erao havis mesiojn el

la tipo kiun ili emis. Eble la plej fama estis iu nomata Judaso de Gamalo, la kreinto de la movado de la zelotoj, kiu en la jaro 6-a ribelis kontraŭ la romianoj, sed li estis venkita de ĉi tiuj. Antaŭ li, aliaj tiutipaj mesioj estis submetitaj de la reĝo Herodo, kliento de la romianoj. Tiutipaj mesioj ne ĝuis la simpation de la supereganta klaso, la pastraro de la Templo, la Sinedrio… Tiu altrangularo de la juda socio esperis kaj deziris nenian mesion, ili instaliĝis en la situacio de kunlaborema submetiĝo al la Romia Imperio kun kiu ili atingis iun sufiĉe favoran akordon aŭ konkordaton surbaze de la influo kaj prestiĝo kiujn ili havis sur la juda popolo.

Aliaj judoj atendadis alitipan mesion: reĝo, profeto, liberiganto, sentema pri la doloro de la subpremitoj kaj malriĉuloj de la popolo… Ankaŭ ĉi tiuj havis sian Mesion. Kurioze, lia nomo, Jesuo, tre similis al tiuj de Josuo kaj Joŝijo. Lian planon li mem nomis “Dia Regno” aŭ “Ĉiela Regno”, regno “kiu ne estas de ĉi tiu mondo”. Certe, ankaŭ lia metodo ne estis de ĉi tiu mondo: li eksplicite rifuzis la militon, la perforton! En mondo kie ĉiu povo, ĉu politika aŭ ne, baziĝis ĉiam sur la forto, li volis starigi sistemon bazitan sur interhoma amo, en kiu la regantoj estu ne sinjoroj sed servantoj de la komunumo. Komence li entuziasmis la popolajn amasojn en situacio sufiĉe ambigua por ke lia rolo povu esti interpretata kiel tiu de la militestraj mesioj. Fakte, en iu okazo la amasoj volis unkti (sankt-olei) lin kiel reĝo. Se li estus akceptinta, li estus devinta militi kiel Judaso de Gamalo, kio ne estis lia plano. La etimologia signifo de la hebrea vorto “Mesio” signifas “unktito, sankt-oleito”, ĉar tiu faro estis ceremonio de la reĝeca konsekrado. Tamen la sola unktado kiun li ricevis estis farita de iu virino, krome prostitutino. Ĉi tio estis klara simbolo de lia karaktero je kontraŭsistemulo. La idearon de Jesuo de Nazareto ni iome pritemos en alia ĉapitro de ĉi tiu raporto, kvankam tiu materialo estas sufiĉe konata ĉar la Evangelioj kiuj pritemas tiun aferon estas esenca parto de la kristana parto de la Biblio. Do, resumante, ni povas diri ke tiu profeto havis ĉiujn atutojn por malsukcesi en sia mesia rolo, kaj fakte lia publika aktivado daŭris malmulte. Baldaŭ la superregantoj de la sistemo komprenis ke ankaŭ ne tiu tipo je mesio konvenis al ili. Laŭ la logiko de la klasbatalo estis kompreneble ke la superregantoj de la sistemo volis elimini lin. Kio ne estas facile komprenebla estas ke la popolo, kromanfoje, agadu kontraŭ siaj propraj interesoj kaj identiĝu kun ties klasa malamiko. En la fama sceno de la juĝo antaŭ la romia prefekto Pilato, la popolamaso, instigita de la agentoj de la Sinedrio, postulis la liberigon de iu ribelinto kaj la krucumadon de Jesuo. Multfoje en la historio, antaŭ kaj post ĉi tiu kazo, la popolaj amasoj reagas tiel paradokse. La psikologiistoj intencas ekspliki al si tiun fenomenon asertante ke la superregantaj klasoj kiuj ĝuas liderecan prestiĝon kapablas allogi la regatan amason kiam la alternativo al ili estas malalt-rangaj, sengravaj uloj. Tiu ekspliko povas esti trafa en kio koncernas al malkleraj amasoj, sed la tiama juda popolo estis la plej klera kaj instruita el la mondo, La Historio estis forĝinte ĝin dum preskaŭ ok jarcentoj por ke ĝi kondutu alimaniere ĝuste en tiu okazo. Ni devas konkludi ke por ke iu popolo, amaso, nacio, grupo, socio… agadu juste, ne sufiĉas ke tiuj kolektivoj estu kleraj, krome estas necese ke ili estu justaj, t. e. ke ili posedu subjektivan volon konduti justece, kun morala senco. Ĝuste la enkonduko de tia morala senco en la homaj rilatoj estis la celo de tiu mesio.

La epilogo de tiu dramo konkretiĝis ĝuste kvar-dek jarojn poste. La juda popolo fine estis allogita de la zelotoj kaj ribelis kontraŭ la romia superregado. Kadre de la ĥaoso kaj la krizo de tiu milito, la sinedria klaso estis masakrita far la amasoj pro ĝia kunlaboremo kun la romianoj. Sed la rezulto de la milito estis malfeliĉega por la juda popolo. Jerusalemo kaj la Templo estis detruitaj. Grandamaso da popolanoj estis sklavigitaj kaj forpuŝitaj el ties lando. Komenciĝis por tiu popolo nova ekzilo multe pli longdaŭra kaj peniga ol tiu de Babilonio.

Sed, kio okazis kun la ideologia kaj kultura heredaĵo de tiu popolo, la ideoj kaj esperoj de la profetoj, la Biblio…? Tio ne perdiĝis, aliaj popoloj heredis ĝin por daŭrigi la taskon. Post ĉiu fiasko, ĉiam denove la revo kaj la espero renaskiĝas. Sub aliaj formoj, en aliaj lokoj, far aliaj roluloj… Kelkfoje okazis ke kiam iu popolo aŭ socio rifuzas plenumi la historian taskon asignitan al ĝi kaj por kiu ĝi estis tute preta, la tasko estas alprenata de alia malpli preta protagonisto, kiu penas realigi ĝin, eĉ se fuŝe. Ĝuste tio okazis tiam. La kultura heredaĵo de la hebreoj fariĝis universala kulturo, sed paradokse, tio realiĝis en kristana formo, t. e. prenante kiel referaĵo la figuron de la juda Mesio kiu fiaskis:

***La ŝtono kiun malŝatis la konstruantoj, fariĝis ŝtono bazangula.***

La figuro de Jesuo fariĝis de tiam objekto de disputo inter la idealistoj kiuj celas la liberigon de la homaro, de la malriĉularo, de la suferintoj… por kiuj li estis simbolo kaj instigilo, kaj tiuj kiuj uzis la prestiĝon de lia nomo kontraŭ tiu celo.

Pasis du mil jaroj, la historio daŭris, okazis multaj aferoj, favoraj kaj malfavoraj, antaŭeniroj kaj retroiroj, de vidpunkto de la klasbatalo. Senĉese renaskiĝis la revo pri realiĝo de la idealo de justa socio-ordo, kaj ankaŭ senĉese la homaro fiaskis. Sed se oni deziras iom fari favore al la atingo de tiel nobla celo, oni devas studi la historion kaj eltiri el ĝi instruon. Sed ne nur el la historio, ankaŭ el la psikologio, sociologio, ekonomio, politiko, religio, antropologio, kaj aliaj sciencoj kiuj iel povas influi sur la homa kaj socia vivo. La tasko, la celo, estas malfacila, sed la malfacilaĵoj ekzistas por ke oni alfrontu ilin.

# Klasbataloj en la romia socio



***La klasbatalo estas la ĉiama konflikto inter la ekspluatantoj kaj la ekspluatatoj, inter tiuj kiuj laboras kaj tiuj kiuj ne laboras, inter tiuj kiuj ne laborante alproprigas al si la frukton de la laboro domaĝe al tiuj kiuj produktis ĝin: sklavoj kontraŭ mastroj, plebanoj kontraŭ patricioj, gleb-servutuloj kontraŭ feŭd-sinjoroj, kamparanoj kontraŭ terposedantoj, malriĉuloj kontraŭ riĉuloj, predatoj kontraŭ predantoj… En la sklavista socio la mastroj posedas ĉion, la produktaĵojn kaj la personon mem de la sklavoj. En feŭdisma sistemo la posedado de la tero garantias al la sinjoroj kompletan superecon sur tiuj kiuj posedas nenion. En la kapitalismo la posedantoj de la produktad-rimedoj povas trudi siajn kondiĉojn al la salajruloj. En ĉiuj ĉi sistemoj la politika regado efektiviĝas far personoj de la posedanta klaso aŭ funkciuloj iliaserve. La ekspluatatoj kaj subpremataj povas inversigi la situacion kaj kontroli la politikan povon nur pere de venkanta revolucio, kiu ne povas esti paca. La politika povo estas la ilo por la klasa subpremado, starigita kaj kontrolata de la ekspluatantoj por sin altrudi al la produktantoj.***

Ĉiuj ĉi konceptoj supre esprimitaj estas politika doktrino sufiĉe konata de marksistoj kaj aliaj interesitoj pri la soci-ekonomia disvolviĝo de la socioj. Sed tiuj difinoj estas tre bazaj kaj skemaj. La realo estas multe pli komplika laŭsence ke foje samaj personoj povas esti, eĉ samtempe, ekspluatatoj kaj ekspluatantoj, subpremantoj kaj subprematoj, predatoj kaj predantoj… Pri tio bone ilustras nin la historio de la antikva romia socio kiun ni sekve pristudos.

Komence ni diru ke kvankam la klasbataloj, inter la multaj formoj kiujn ili povas alpreni estas ankaŭ la milito, tamen ne ĉiuj militoj estas klasbatalo. Ekzemple, la t. n. "punikaj militoj", inter Romio kaj Kartago, okazintaj en la 3-a kaj 2-a jarcentoj antaŭ la nuna erao, tute ne estis klasbatalo sed interimperiismaj militoj. Ambaŭ potencoj celis la kontrolon de la ĉirkaŭmediteranea mondo. Rilate al la antaŭeniro al pli justa soci-ordo, socialismo, komunismo… estis indiferenta ĉu en tiuj militoj venkus la romianoj aŭ la kartaganoj. Sed post la fina venko de unu el ili, ĉi-kaze Romio, la predado kaj sklavigado de la romianoj kontraŭ la venkitoj la afero, ja, enestas en la tereno de la klasbatalo tial ke la preditaj kaj sklavigitaj kartaganoj restis integritaj en la sama klaso kiel la anoj de ĉiuj ceteraj popoloj subpremataj de la romia potenco.

Tion dirinte, oni devas aldoni, krome, ke ne ĉiuj klasbataloj, per si mem, kondukas aŭ celas konduki al la fino de la ekspluatado kaj starigo de pli justa situacio. Ofte la tuja celo de la subprematoj kiuj batalas kontraŭ siaj subpremantoj havas nenian planon pri pli justa sociordo kaj celas nur plibonigi sian situacion ene de la kadro de la maljusta ekzistanta socio. Pri tio ni trovas multajn ekzemplojn en la okazintaĵoj en la romia socio post la fino de la punikaj militoj.

Por ke iu klasbatalo efike kontribuu al la socia ŝanĝo estas necesa la helpo de la t. n. "objektivaj kaj subjektivaj faktoroj" Ni vidu la difinon de tiuj konceptoj:

***La objektivaj kaj la subjektivaj faktoroj estas du tipoj je kondiĉoj de la socia disvolviĝo. Objektivaj faktoroj estas la kondiĉoj kiuj, sendepende de la personoj, determinas la orientiĝon kaj la kadron de ties agado. Tiaj estas, ekzemple, la naturaj kondiĉoj, la atingita produktad-nivelo, la taskoj kaj necesoj de la materia, politika kaj spirita disvolviĝo kiuj atingis historian maturecon. Subjektivaj faktoroj estas la agado de la amasoj, de la klasoj, de la partioj, de la ŝtato kaj de la individuoj, ties konscio, ties volo, ties agadmaniero… La objektivaj faktoroj ĉiam estas decidaj, sed ilia efiko konkretiĝas nur pere de la agado de la subjektivaj faktoroj. Ĉi tiuj povas ludi decidan rolon nur kiam estas pretaj la objektivaj faktoroj. La influo de la subjektivaj faktoroj sur la socia disvolviĝo akcentiĝas***

***kiam oni pasas el iu sociekonomia formacio al alia pli progresa, kaj pliintensiĝas en la socialista socio, kiam unuafoje en la historio de la homaro eblas disvolvi laŭplanite ĉiujn sferojn de la socia vivo, kiam ampleksaj popolamasoj konscie aliĝas al la konstruado de la socialismo kaj la komunismo.***

Ĉi tio klarigas kial tia progreso ne povis okazi en la romia socio. La objektivaj kondiĉoj ŝanĝiĝis absolute neniom dum la tuta daŭro de la romia historio. La materia bazo, la produktad-maniero, la scienc-nivelo… estis la samaj dum tiuj multaj jarcentoj: agrokulturo kaj ioma komercado. Sur tiu bazo, la superregantoj de la sistemo ĉiam baziĝis sur la sklava laboro. Kaj rilate al la subjektivaj faktoroj, estis, jes ja, multaj aktivaj protagonistoj, partioj, organizitaj amasoj… sed la mensa horizonto de ĉiuj ili estis sufiĉe fermita, ĝuste pro la stagnado de la objektiva realo de la socio.

La plej altranga klaso de la romia socio estis la patriciaro, komence konstituita de la plej antikvaj familioj de la urbo Romo. Ĝis la lastaj jarcentoj antaŭ la nuna erao tiu klaso kontrolis kaj preskaŭ monopoligis la Senaton (kaj sekve ankaŭ la konsulaton kaj aliajn regadfunkciojn) ĝis tia grado ke la klaso mem estis nomata ankaŭ "senat-(an)a". Por rajti alceli al la Senato estis necese posedi en Italio difinitan konsiderinde grandan kvanton da kampara tereno. Ene de la patricia klaso estis ia gradiĝo: oni asignis la titolon aŭ rangon de **nobilis** al tiuj senataj familioj inter kies antaŭuloj estis konsuloj. La plej riĉaj inter la patricioj estis nomataj **boni** (bonaj) kaj inter ĉi tiuj estis pli selekta grupo (mem)nomata **optimates** (plej bonaj aŭ ekscelencaj). Sekve de la konkero de Italio far la romanoj, la altranguloj de la konkeritaj provincoj integriĝis, travenkinte malfacilaĵojn, en la patriciaron de Romo, kaj iuj el ili atingis la konsulaton kaj aliajn altrangajn postenojn de la romia povaparato; la unuaj generacioj de tiuj familioj ricevis la nomon de **novi** (novuloj).



Senato de Romo

La duaranga klaso en la romia socio estis tiu de la t. n. **équites** (kavaliroj). La **Ordo Equester** estis la meza klaso sed ĝi ne tute alĝustiĝis al la koncepto kaj stilo de la nuntempa burĝaro. Antikve la rango-ordo de la kavaliroj aŭ rajdantoj estis konstituita de la riĉaj civitanoj kiuj povis subteni la tenadon de du ĉevaloj kaj servi en la kavalerio de la militoj de la romia respubliko. Poste la afero evoluis kaj estis asignitaj al tiu klaso ĉiuj personoj kiuj en la censo de la civitanaro estis registritaj kiel posedantoj de difinita grado de riĉeco, malpli granda ol ties de la patricioj. Post la punikaj militoj la rango-ordo de la kavaliroj estis klaso de entreprenemaj homoj dediĉitaj al la negocoj kaj al la demarŝado de ŝtataj kontraktoj de provizado kaj impostokolektado en la provincoj, taskoj kiuj estis malpermesataj al la senatanoj. Multaj mezklasuloj de la italaj provincoj iompostiom enviciĝis en tiun romian klason. La plej riĉaj inter la kavaliroj ambiciis fariĝi membroj de la Senato kaj la nombro da ili fariĝis pli kaj pli granda en tiu institucio laŭ la pasado de la tempo. Iuj kavaliroj faris negocojn kiel klientoj de la senatanoj, t. e. tial ke la membroj de la senata klaso ne povis dediĉiĝi al iuj tipoj je aferoj, ili faris la investadon pere de la kavaliroj kunhavante la profiton.

Tio postulas klarigi la signifon de tiu rilato de patroneco-klienteco kiu interligis la romiajn civitanojn. La patrono estis kvazaŭ la protektanto de siaj klientoj, kaj ĉi tiuj ŝuldis al li la plenumadon de iuj servoj. Ofte la junaj patricioj kiuj komencis sian politikan karieron sin metis sub la patroneco de unu aŭ pli influaj senatanoj. La klientoj de la gravaj politikistoj konstituis la partion de la patrono-lidero. Tiuj partioj ne havis veran politikan signifon aŭ programon; ili estis nur grupoj da civitanoj kiuj celis eltiri personan profiton el la demarŝado de la publikaj aferoj. Nu, la patricioj riĉaj kaj potencaj havis patriciajn kaj kavalirajn klientojn. Siavice, la influo-povaj kavaliroj havis kiel klientoj aliajn malpli potencajn kavalirojn kaj plebanojn. La plebanoj estis klientoj ankaŭ de la aristokratoj. Unu civitano povis esti kliento de iu patrono pli altranga ol li kaj siavice havi kiel klientojn aliajn malpli potencajn civitanojn. Kompreneble, la klientoj de iu patrono kiu siavice estis kliento de alia pli grava patrono estis ankaŭ klientoj de la plisupera patrono. Tiu reto klientisma konstituis la bazon de la partioj kiuj konkuradis en la balotadoj. Do, ofte la pribalota konkurado estis nura interfrontiĝo de civitanaj klanoj komandataj de patricioj kiuj celis kontroli la ŝtaton siaprofite. Tamen, en socio kun grandaj klasaj diferencoj kaj kontraŭdiroj, neeviteble la politika konkurado prenis formojn de klasbatalo, kiel ni vidos poste. Estis devo de la patronoj defendi siajn klientojn okaze de juĝ-proceso kaj ankaŭ helpi ilin per gajni viv-rimedojn. Dume la klientoj ŝuldis al la patrono lojalecon kaj apogon en ties politika kariero, ekzemple partoprenante en la mitingoj en la Forumo de la patrono aŭ ĉi-ties amikoj kaj patronoj por ilin aplaŭdi.

La plebo estis la plej malalta klaso de la romiaj civitanoj. Komence estis tiuj homoj kies antaŭuloj ne apartenis al la familioj de la fondintoj de Romo, kaj en la unuaj jarcentoj de la Respubliko de Romo ili eĉ ne estis civitanoj. Iompostiom la plebanoj akiris iujn rajtojn: romia civitaneco, rajto je edziĝo, rajto voĉdoni en la asembleoj… Ekde la jaro 494 a. K. la plebanoj havis la rajton elekti du tribunusojn kiuj reprezentadis ilin en la

Senato kaj povis vetoi tie leĝojn ne-konvenajn por la plebo. Grava diferenco inter la plebo kaj la superaj klasoj estis ke la membroj de ĉi lastaj estis instruitaj homoj. La infanoj, kaj eĉ la infaninoj, de la privilegiitaj klasoj ricevadis instruon de legado, skribado, literaturo, simpla matematiko, historio, ĵurio, politik-arto, filozofio… Sed la sola kulturo kiun la plebanoj ricevadis estis tiu kiu povus veni al ili de la teatraj spektakloj, kies temaro, cetere, estis sufiĉe triviala, tute ne komparebla al la tragedioj de la greka teatro. Kvankam ne mankis ia intereso de la plebaj amasoj pri tiuj teatraĵoj, la preferita spektaklo de la romianoj, kaj ne nur de la plebanoj, estis la sangaj luktoj en la cirko, t. e. la bataloj de gladiatoroj. Popolo kiu konstruis la plej grandan imperion de la Antikva Erao pere de militoj kaj perforto ne povis havi pli preferindan spektaklon ol la kruelaj luktoj de homoj batalantaj ĝismorte.
En la lasta jarcento de la Respubliko apartenis al la pleba klaso ankaŭ la ***homines novi*** t.e. la novaj romianoj, tiuj riĉaj altranguloj de la italaj provincoj kiuj estis konkeritaj de la romia potenco. Sed baldaŭ la plej eminentaj el tiuj "nov-uloj" plirangiĝis pere de la negocoj aŭ de la militista kariero ĝis atingi la gradon je kavaliro kaj iuj eĉ pli. Tio indikas ke kvankam la romia socio estis klasisma tamen ĝi ne estis kastisma. La diferenco inter ambaŭ tipoj je klasaj socioj estas ke en la kast-socio la lim-linio inter la klasoj ne estas trairebla. Tio tute ne okazis en la romia socio. Sendube la oftaj plirangiĝoj okazintaj en tiu socio estis rezulto de la klasbataloj sed ĝenerale ĉi tiuj ne kondukis al la pliboniĝo de la socio ĝenerale. La plirangiĝo favoris individuojn kaj grupojn, sed la socio ĉiam konservis la saman klasstrukturon.



**Lukto de gladiatoroj**

Ankaŭ interne de la pleba klaso ekzistis ia gradiĝo. Iuj plebanoj estis kamparanoj kiuj posedis etan terpecon por kultivado. En la lastaj jarcentoj de la Respubliko la nombro da tiuj civitanoj malgrandiĝis tial ke multaj el ili perdis sian posedaĵon pro ne-pagitaj ŝuldoj. La tiama politiko de la Senato favoris tiun evoluon al la formado de latifundioj. Ni memoru ke la mezurilo de la rango kaj riĉeco de la senat-klasanoj estis la kvanto da tero posedata de ili. La eksproprietigitoj de la kamparo aldoniĝis al la urba plebo kiu ne diponis je alia vivrimedo ol la servado en la armeo aŭ kiel klientoj de la patricioj kaj la kavaliroj. Estis ankaŭ alia subklaso de plebanoj kiuj ĝuis relative bonan vivmanieron. Temas pri la profesiuloj de oficoj: masonistoj, ĉarpentistoj, teksistoj… kaj tiuj kiel butikistoj kaj aliaj okupoj kiuj nuntempe estas konsiderataj etburĝaj. Iuj el tiuj plebanoj estis aŭtonomaj laboristoj sed estis ankaŭ multaj kazoj de klientoj de patronoj kiuj helpis ilin lerni oficon aŭ starigi negocojn aŭ vendejojn, ĝenerale kun partopreno en la antigata profito. Fine, estis la tute senhavaj plebanoj kiuj estis nomataj ***proletarii*** (proletoj) tial ke ili havis nur idaron (***prolem***, en la latina lingvo) por la servado en la armeo. Tiuj senhavaj plebanoj ne havis alian manieron atingi vivrimedojn ol aliri ĉiumatene al la pordo de la domo de sia(j) patrono(j) esperante ke oni mendu al ili iun ajn servon kaj oni provizu al ili iomete da mono aŭ nutraĵoj. Ĝenerale tiu interrilatado kun la plebaj klientoj ne estis realigata de la patrono mem –persone li akceptadis nur la plej altrangajn klientojn– sed de la ĉefservisto kaj aliaj sklavoj de la domo.
Kaj tio metas antaŭ ni la plej malsuperan klason de la romia socio: la sklavoj. Ĉi tuj ne estis civitanoj; ili havis nenian rajton, eĉ ne tiu de geedziĝo. Plejparto el la sklavoj estis milit-kaptitoj kaj ĉi ties posteularo. En la lasta jarcento antaŭ nia erao kaj la unua de ĉi tiu erao la nombro da sklavoj en la romia imperio kaj ĉefe en Italio estis enorma. Oni dispoziciis ke la vestaro de la sklavoj estu simila al tiu de la liberaj homoj por ke oni ne perceptu la grandan malekvilibron inter la nombroj da personoj de ambaŭ kolektivoj. En la klaso de la sklavoj estis pli granda gradiĝo ol en la ceteraj klasoj, kio ne estas strange ĉar ĝi estis la plej multenombra. Post la konkero de Grekujo kaj de la helenistikaj landoj far la romianoj, ĉi tiuj akiris altkulturajn sklavojn el la kleraj elitoj de tiu terzono, kiuj ĝuis privilegiitan destinon en la romia socio. Estis grekoj aŭ helenistikoj multaj instruistoj de la gejunuloj de Romo. Ankaŭ la skulptistoj, arkitektoj, kuracistoj… Ili ne restis sklavoj dumlonge; ili baldaŭ estis liberigitaj kaj apartenis al la klaso de la emancipitoj, pri kiuj ni temos poste.
La vivkondiĉoj de la sklavoj variis laŭ la loko kie ili servadis. Tiuj de la metal- kaj ŝton-minejoj suferadis pli severan trakton. La domaj sklavoj ĝuis pli komfortan vivon ol tiuj dediĉitaj al la kamparaj laboraĵoj. En Romo kaj aliaj urboj la vivo estis malpli milda por tiuj sklavoj dediĉitaj al la konstruado ol por tiuj laborantaj en la domoj. La ribeloj de sklavoj okazintaj en la lasta jarcento antaŭ nia erao furoris en la kampara medio, ne en Romo kaj grandaj urboj. Estis sklavoj dediĉitaj de siaj mastroj al oficoj kiel razisto, vendisto, tanisto, tajloro, teksisto k. a. Ili povis tiele pergajni iom da mono per kiu poste povis aĉeti sian liberecon. La liberado de sklavoj povis okazi ankaŭ laŭ aliaj manieroj, ekzemple, iuj mastroj disponis en sia testamento la emancipadon de la tuto aŭ parto el siaj sklavoj.
La emancipitaj sklavoj iĝis liberaj homoj sed ne civitanoj. Ilia situacio estis simila al tiu de la liberaj homoj de la landoj submetitaj al romia imperio, kiuj ne estis civitanoj, sed kun la diferenco ke la emancipitoj restis kiel klientoj de la mastroj al kiuj ili estis apartenintaj.

Tiu situacio de klientoj signifis, kiel dirite, la devon de iuj servoj kaj iuj pagoj al la patrono, sed dume la klientoj ĝuis la apogon de la patrono por pergajni vivrimedojn. Do, la rilato patrono-kliento estis konvena por ambaŭ. La klientoj emancipitaj de riĉaj kaj altrangaj patronoj ĝuis pli grandan profiton kaj favorojn, ekzemple, en la unua jarcento la imperiestroj Klaudio kaj Nerono havis kiel ministrojn eks-sklavojn emancipitajn. La rilato patrono-kliento, laŭ la leĝo ne estis tiel rigida kiel inter la mastroj kaj la sklavoj. La kliento povus, se al li tion interesus, ĉesigi la rilaton kun la patrono, sed tio tre malofte okazadis ĉar, kvankam la leĝo ne estis tre strikta tiurilate, la rompo de tiu rilato estis malbone taksata de la socio, t. e. estis ia socia premo respekti ĝin.

Ni vidis la scenejon kaj la protagonistajn klasojn de la romia socio; nun ni vidos la disvolviĝon de la klasbataloj inter la priskribitaj sociaj klasoj. En la jaro 146 a. K. finiĝis la t. n. punikaj militoj inter Romio kaj Kartago per la detruo de ĉi tiu urbo far la romianoj. De tiam la romia potenco havis liberajn manoj por finkonkeri ties imperion ĉirkaŭ la Mediteranea maro. Sed de tiam ankaŭ eksplodis ĉiuj inter-klasaj kontraŭdiroj de la romia socio. La unua el ili disvolviĝis dum la jaroj 134 al 121 antaŭ nia erao. Estis la tiel nomata periodo de la Grakoj. La fratoj Tiberio kaj Kajo Grako estis tribunusoj de la plebo. Kiel jam dirite, la tribunusoj de la plebo estis magistratoj kiuj reprezentis la plebon de Romo en la Senato kaj havis iujn prerogativojn kiel la rajto vetoi leĝojn malfavorajn por la plebo kaj proponi aliajn favore al la popolaj klasoj de la socio. La ekzistado de tiutipaj magistratoj montras ke, iomgrade, la romia socio estis travivanta situacion de duobla povo, t. e. situacio en kiu la politika povo ne estas klare kontrolata de unu klaso sed kundemarŝata de antagonismaj klasoj. Tiaj situacioj ne estas oftaj en la historio sed ankaŭ ne estas tro raraj. La situacio de duobla povo en la romia socio estis sufiĉe longdaŭra, pli ol unu jarcento kaj duono, sed tute ne estis stabila, t.e. abundis la konfliktoj, la soboj kaj la soroj… En la periodo de la Grakoj tiu duobla povo konkretiĝis, ne unuafoje, en iu grava krizo kiu tre malstabiligis la sistemon. Ĝenerale, la aristokrataro lerte konservadis siajn privilegiojn kontraŭ la postuloj de la popolaj klasoj. Fakte, preskaŭ ĉiuj tribunusoj de la plebo apartenis al la senat-klaso. La fratoj Tiberio kaj Kajo Grako mem estis patricioj, el la fama familio de la Scipionoj kiuj estis ludintaj gravan rolon en la punikaj militoj. Sed en la plenumado de sia tribunusa rolo, Tiberio Grako entreprenis leĝan kampanjon kontraŭ la privilegioj de la **optimates** kaj favore al la urba plebo, la italoj kiuj ne havis romian civitanecon kaj la kavaliroj de la **Ordo Equester**. La celitaj de li leĝoj postulis: disdoni terojn inter la urba plebo kaj la veteranaj soldatoj, establi en la kolonioj malmobilizitajn soldatojn, koncedi romian civitanecon al la latinoj kaj italoj kaj rajtigi la kavalirojn plenumi en la provincoj iujn magistratajn funkciojn ĝis tiam rezervitajn por la senat-klasanoj.


La fratoj Tiberio kaj Kajo Grako, tibunusoj de la plebo.

En la jaro 133 Tiberio igis aprobi la agraran leĝon ***Rogatio Sempronia***, kies aplikado, dum kelkaj jaroj, permesis la restariĝon de la eta kampara propraĵo en Italio kaj la plikreskadon de la loĝantaro kapabla servi en la armeo. La reformo inkludis krome la rajton je civitaneco por la italoj kaj iujn leĝajn ŝanĝojn por ke la kavaliroj havu alirecon al iuj juriaj funkcioj. Tiu lego vekis perfortan kontraŭstaron de la senata aristokrataro kaj la rezultinta klasbatalo baldaŭ eliris el la laŭlegaj formoj kaj alprenis karakteron de politika disputo en kiuj ambaŭj partioj faris elpaŝojn de pridubinda leĝeco kiu fine evoluis al malkaŝa perforto. Kiam Tiberio prezentiĝis por nova mandato kiel tribunuso li estis murdita kune kun kelkcento da siaj partianoj far iu grupo da kolerigitaj senatanoj kaj armitaj homoj.

Sed en la sama jaro 123, Kajo Grako, frato de Tiberio, estis elektita tribunuso de la popolo kaj entreprenis intensan leĝo-faran aktivadon en la sama linio de malfortigo de la oligarkio: limigo de la politikaj funkcioj de la aristokratoj elpostenigitaj de la popolo, punado de la ŝtataj funkciuloj kiuj kondamnis civitanojn sen ebleco je apelacio al la popolo… kaj plibonigo de la sociaj rajtoj de la popolanoj: agrara leĝo por ke la popolaj tribunusoj povu dispozicii distribuon de la publikaj teroj de la provincoj, ekskludi la senat-klasanojn el la juriaj funkcioj. La partio de **optimates** tre perforte reagis kontraŭ la leĝofaraj iniciatoj de la Grakoj. Okazis perfortaj interfrontiĝoj inter la membroj kaj la klientoj de tiu superreganta klaso kaj la partio de la popolanoj. En la jaro 121 la Senato rajtigis la konsulon Lucio Opimio por ke ĉi tiu decidu ĉion necesan por meti finon al la politiko entreprenita de Kajo Grako. Sekve de tio multaj partianoj de Kajo estis murditaj kaj Kajo sin mortigis. Tiaj faroj estis tre gravaj en la historio de Romo ĉar laŭ la tradicio kaj la leĝo, estis sakrilegio ataki tribunuson de la plebo kaj mortigi civitanojn sen ĉi ties apelacio al la popolo. La disvolviĝo kaj rezulto de tiu konflikto malfermis en la romia socio procezon de interklasa malkonfido kiu kulminis post kelkaj jardekoj per krizo en kiu dronis la respublika reĝimo. Notindas ke la postaj imperiestroj alprenis kaj efektivigis plejparton el la politika projekto de la Grakoj.

Sed la interklasaj kontraŭdiroj de la romia socio preterpasis la eblecojn de la reformoj elpensitaj de Tiberio kaj Kajo Grako. Estis kontraŭdiroj ene de la patricia klaso mem; fakte la Grakoj estis patricioj, kaj ankaŭ Cezaro kaj aliaj imperiestroj kiuj entombigis la respublikon de la aristokrataro. Kaj same ene de la

popolaj fortoj, kiujn intencis favorigi la Grakoj, estis neakordigeblaj interesoj, ekzemple inter la plebo kaj la kavaliroj, inter la romanoj kaj italoj… Kaj oni ne forgesu ke la programo de la Grakoj lasis for la interesojn de la loĝantoj de la provincoj kaj de la sklavoj.

Sekva klasbatalo de la romia socio estis ĝuste tiu de la ribelo de la sklavoj, konkrete la sklavoj de Sicilio. Rezulte de la venko de Romo super Kartago, Sicilio-insulo restis sub la povo de la romianoj kaj ĉi tiuj alpropriigis al si plejparton el la kultiveblaj teroj. Grandaj siciliaj latifundioj apartenis de tiam al riĉaj romianoj, ĉefe senatanoj, kaj al ĉi ties siciliaj klientoj. Dum la jardekoj pasintaj ekde la fino de la punikaj militoj ĝis la komenciĝo de la unua jarcento a. K. Sicilio estis la grenejo aŭ tritik-provizanto de Romo. La kultivado de tiuj latifundioj estis efektivigata de grandamaso da sklavoj, mise nutritaj, rezultintaj el la multaj militoj kaj konkeroj de la romia potenco. Jam en la jaroj 135-132 antaŭ nia erao estis okazinta en tiu insulo grava ribelo de sklavoj por kies sufoko estis necesa la interveno de romia armeo konsistanta el 70.000 homoj.

Fiaskinte la planoj de la Grakoj por la distribuo de la kultiveblaj teroj de la provincoj al la veteranoj de la romiaj militoj, la afero en Sicilio restis senŝanĝa kaj okazis nova ribelo de sklavoj dum la jaroj 104 al 100 a. K. Komence la ribelo estis sukcesa kaj dum tiuj kvar jaroj la armeaj trupoj de Romo ne povis kontroli la tutan sicilian teritorion, kaj la sklavoj mastris grand-parton de la insulo. En la ribelo partoprenis, krom la kamparaj sklavoj, ankaŭ tiuj de la urboj, kaj aldoniĝis al la kontraŭromia batalado ankaŭ iuj liberaj homoj de la insulo. Romo ne povis efike alfronti la defion de la sklavoj de Sicilio tial ke tiam tiu potenco havis armeojn dediĉitajn al la kontrolo kaj submetado de aliaj provincoj, kiel la Iberia Duoninsulo (nunaj Hispanio kaj Portugalio). Krome, ĝuste dum tiuj jaroj Romo devis kontraŭfronti la invadon de sia teritorio fare de nordaj popoloj: la cimbroj kaj la teŭtonoj. Fine, kiam la romia potenco estis solvinte siajn problemojn en la nordo ĝi povis okupiĝi pri la afero de Sicilio. Same kiel estis okazinte tri-dek jarojn antaŭe, iu romia armeo de pli ol 50.000 homoj povis, post sanga batalado kaj grandaj perdoj, restarigi la situacion en la insulo.

La historiistoj kaj kronikistoj de la epoko sufiĉe detale priskribas la disvolviĝon de la militaj operacioj de tiu konflikto sed, malfeliĉe, mankas en ilia raportado iu informo kiu tre interesas al ni por nia celo de la studo de la klasbataloj. T. e. al ni tre interesas scii kiamaniere la ribeluloj de Sicilio, sklavoj kaj plebanoj, organizis la aferon de la demarŝado de la produktado dum la tempo kiam ili kontrolis Sicilion. Dum tiu kvar-jara periodo la ribeluloj militantaj kontraŭ la romianoj devis manĝi, kaj la manĝaĵojn oni devis eltiri el la kultivado de la tero. Estas evidente ke ili devis prilabori kiel liberaj homoj tiujn samajn terojn kiujn ili antaŭe prilaboris kiel sklavoj. Sed, kiamaniere ili organizis tiun terkultivadon? La afero estas grava por nia studo. Se la laborado estintus kolektiva, kaj la propraĵo estintus publika, kontrolata de iu ajn aŭtoritato, tio sendube estintus ĝermo de socialismeca sistemo, vera alternativo al tiuepoka supersklavisma socio. Sed se la terojn oni distribuis al unuopulojn por privata kultivado, tio, longatempe, estus solvinte nenion eĉ se la ribeluloj estus venkinte la romianojn. Ja, la privata propraĵo de la teroj enportas la ĝermon de renaskiĝo de la feŭdismo kaj la sklavismo. Laŭ la pasado de la tempo, iuj privataj kamparanoj pliriĉiĝas dum aliaj malpliriĉiĝas, kaj pli malpli frue la kvantaj diferencoj fariĝas kvalitaj diferencoj ĝis la formiĝo de malsamaj, antagonismaj, klasoj. Ĉiu klasa socio baziĝas sur la privata proprieto. Sed, kiel dirite, ni ne konas la produktadmanieron kiun la ribelintoj de Sicilio elpensis kiel alternativo al la sklaveco el kiu ili ĵus liberiĝis. Ĉiukaze dubindas ke ili kapablus ellabori sociekonomian teorion por la konstruo de novtipa socio kiu superus la tie ekzistintan sistemon. La plej kleraj sklavoj ne estis destinitaj al la terkulturo sed al la instruado de la gejunuloj de la riĉaj familioj. Krome, la urĝaj necesoj de la batalado kontraŭ la romianoj ne ebligis al la ribelintoj okupiĝi pri planoj de prisocia organizado.

Kelkajn jarojn post la sufokado de la ribelo de la sklavoj de Sicilio, konkrete dum la jaroj 91 al 88 a. K., estis en la romia socio alia klasa konflikto kiu iĝis vera milito. Ĝi estis nomata de la historiistoj “Itala Milito”, ankaŭ “Sociala Milito” kaj “Milito de la Aliancanoj”. Temis pri milita konflikto inter Romo (urbo kaj ĉi ties italaj kolonioj) kontraŭ la italaj aliancanoj: picenoj, lukanoj, marsoj, samnoj, etruskoj, umbroj…

La afero komenciĝis en la jaro 92 kiam estis elektita kiel tribunuso de la plebo Marko Livio Druso. Ĉi tiu reprenis tiun punkton de la programo de la Grakoj rilate al la postulo de la romia civitaneco por ĉiuj liberaj homoj de Italio. Druso proponis la t. n. ***Leĝo frumentaria*** per kiu li intencis favori la interesojn de la italoj kaj ankaŭ de la plebo de Romo, sed kontraŭis ne nur tiujn de la senat-klasanoj sed ankaŭ tiujn de la kavaliroj. Same kiel estis okazinte al la Grakoj, duonjarcenton antaŭe, Livio Druso havis tragikan finon. La Senato oficiale elpostenigis lin kaj kelkajn tagojn poste li estis murdita en sia hejmo far nekonatuloj.

Sed ĉi-foje estis ia popola reago kvankam ne en Romo mem sed en la italaj provincoj kiuj estis aliancanoj de Romo de antaŭ multe da tempo. Tiuj popoloj unuiĝis por la milito kontraŭ Romo kaj deklaris sin sendependecaj en iu respubliko nomata Italio kies ĉefurbo estis en Korfino. Notindas ke la celo de tiu ribelo ne estis atingi tian sendependiĝon. Tiuj popoloj sin konsideris parton de la romia ŝtato de antaŭ multe da tempo. Tiu unueciĝo kun Romo evidentiĝis dum la punikaj militoj, konkrete dum la kampanjo de Hanibalo en Italio. Ĉi tiu kartaga militestro ne trovis en Italio, por sia militado kontraŭ la romianoj, multajn aliancanojn. Same dum la jam menciita rezist-milito okaze de la invado de la cimbroj kaj la teŭtonoj, la kunlaboro de la italoj estis decida por repuŝi la invadintojn. La italoj volis nur ke oni oficialigu sian apartenon al la romia ŝtato per la koncedo al ili de la romia civitaneco. La mensa blindeco de la aristokrataro de Romo ne permesis al ĉi tiu klaso kompreni ke la postulo de la italoj, krom justa, estis ankaŭ konvena por la romia ŝtato.

Estis, do, tri jaroj da sanga kaj senutila milito, en kiu, krome, komence Romo suferis severajn malvenkojn. De milita vidpunkto la afero por la romianoj pliboniĝis nur kiam prenis la komandadon de la romia armeo Kornelio Sullo kaj poste ankaŭ Kajo Mario, la plej fama generalo de tiu epoko. Sed paradokse, la politika rezulto de la milito estis favora al la italaj aliancanoj. La sufokado de la ribelo eblis nur tial ke iom-post-iom iuj el la aliancanoj retiriĝis el la itala koalicio kiam oni koncedis al ili la postulitajn rajtojn. Fine restis ekskluditaj el tiuj rajtoj nur tiuj popoloj kiuj rezistis batalante ĝisfine. Sed tio estis nur provizora rezulto ĉar en tiu sama unua jarcento a. K. eĉ tiuj popoloj akiris la celitajn rajtojn kadre de la konvulsioj de la romiaj civilmilitoj kiuj signis la krizon de la Respubliko kaj la starigo de la imperia reĝimo. Kiel pli paradoksa epilogo de tiu afero de la romia civitaneco, menciindas ke en la 3-a jarcento de nia erao, iu romia imperiestro aljuĝis la romian civitanecon al ĉiuj liberaj loĝantoj de la imperio. En tiu epoko tia civitaneco signifis nenian politikan privilegion. La dispozicio celis plifortigi la unueciĝon de ĉiuj provincoj kun la imperio kaj pligrandigi la fiskajn enspezojn samtempe ke ampleksigi la nombron da viroj rekruteblaj por la armeo.

La Itala Milito povas esti konsiderata klasbatalo tial ke la postulantoj de la romiaj rajtoj estis parto aŭ klaso de la romia socio. Sed, same kiel en la antaŭe menciitaj sociaj konfliktoj, kaj tiuj kiujn ni poste priskribos, ĝi ne signifis eblon ŝanĝi la klasan strukturon de la socio. La italoj emis, nure, eniri en la strukturojn de la romia potenco reganta la mondon.




Kajo Mario

En la provincoj de tiu ampleksa imperio, la italoj kiuj plenumadis gvidajn rolojn estis nedistingeblaj, pro sia brutaleco kaj avareco, el la pure romaj magistratoj.

Post la fino de la Itala Milito la paco ne regis en Romo dumlonge. Sed kiam ni temas pri "paco" klarigendas ke temas pri interna, socia, paco, t. e. sen klasbatalo, ĉar militojn Romo havis senĉese ekde la fondiĝo de la urbo. Sed en la epoko kiun ni priraportas, tiuj militoj de la ekspansio de la imperio okazadis for de la urbo kaj eĉ de Italio. La Iberia Duoninsulo tiam ankoraŭ ne estis plene konkerita de Romo, kaj la situacio estis malstabila ankaŭ en la Afrika provinco konkerita de Romo post la detruo de Kartago. Kaj ĝuste en la jaro 88 a. K., kiam finiĝis la Itala Milito, Mitridato, reĝo de la Ponto, finkonkeris Anatolion kaj ordonis la mortigon de ĉiuj romiaj civitanoj tie loĝantaj. Do, Romo pretiĝis kromanfoje por alia ekstera milito. Tia situacio estis normala en la romia respubliko. Por komandi la romian armeon en Oriento estis en Romo du gravaj kandidatoj: krom Sullo, kiu estis akirinta famon pro siaj venkoj en la ĵus finiĝinta milito kontraŭ la italoj, aspiris al tiu posteno ankaŭ Mario, sesfoje konsulo, venkinto de Viriato en Iberio, de Jugurto en Numidio kaj de la cimbroj kaj la teŭtonoj dek jarojn antaŭe. Ambaŭ militestroj ambiciis la komandon de la armeo kontraŭ Mitridato, kaj kvankam ĝis tiam ili sin tenis amikece, komenciĝis konkurado en kiu ili mobilizis ĉiujn politikajn influojn por atingi la nomumon el la Senato. Ankaŭ tiaj intrigoj estis normalaj en la romia socio laŭ la maniero kiel funkciadis la respubliko de Romo.

La senato de Romo preferis elekti Kornelion Sullon por tiu grava posteno en Azio. Li, ja, estis patricio el la plej antikvaj familioj de Romo. Mario, kvankam grava militestro kaj tre riĉa homo, estis iu "novulo", t. e, homo kiu famiĝis kaj altrangiĝis dank' al sia militista kariero sed ne apartenanta al la familioj de la fondintoj de la urbo. La konkurado de ambaŭ kandidatoj komencis alpreni karakteron de sociklasa konflikto ĉar se la nobelaro apogadis sian samklasanon –Sullon–, la popolaj klasoj, kavaliroj kaj plebanoj, decidis apogi Marion same kiel estis apoginte lin sesfoje por lia elektado al la konsuleco. Krome, ne mankis al Mario ia apogo inter parto el la italoj venkitaj en la ĵus finiĝinta milito. Do, ambaŭ partioj mobilizis siajn respektivajn klientarojn de ĉiuj sociaj klasoj.



Kornelio Sullo

Krome, en tiu epoko estis en Romo ia homtipo je uloj pretaj interveni en ĉiuj ajn konflikto en kiu ili povus eltiri profiton. Indas ke iomete priskribu tiun ularon, kiu pro ĝia grandnombro povus esti konsiderata kiel aparta klaso aŭ soci-tavolo de la romia socio, kaj por referenci ĝin ni asignas al tiu kolektivo la nomon je "lumpen-aristokrataro". La vort-radiko "lumpen" ne ekzistanta en Esperanto, ekzistas en kelkaj lingvoj, ĝenerale kiel prefikso de la vorto "proletaro". Nu, lumpenproletaro estas difinita en la vortaroj kiel loĝantaro situita sube aŭ marĝene de la proletaro: almozuloj, deliktuloj, prostituist(in)oj… ĉiukaze proletoj sen klaskonscio. Tiurilate ŝajnas ke la esprimo "lumpen-aristokrataro", kiun ni uzas, estas sensencaĵo aŭ paradokso, sed, jes ja, tiu klaso ekzistis en la romia socio de la unua jarcento antaŭ nia erao. Temis pri tiuj uloj kiuj naskiĝis en patriciaj familioj, kaj estis edukitaj kiel aristokratoj, havis politikajn aŭ militistajn ambiciojn kaj alkutikimiĝis bonvivadi kiel riĉuloj, sed tamen, ili ne estis riĉaj ĉar ne ĉiuj filoj de la patricioj povis heredi la familian havaĵon. La destino de tiuj homoj estis pergajni sian vivon per sia rekrutiĝo en la romiaj armeoj batalantaj en la multaj eksteraj militoj de Romo aŭ enviciĝi en la multaj sociaj internaj konfliktoj de Romo. Tiel la partio de Sullo kiel tiu de Mario havis en siaj vicoj multajn el tiuj lumpen-aristokratuloj, ĝiskole enŝulditaj, kiuj volis profiti la socian ĥaoson por havigi al si rangon kaj riĉaĵon.

Sullo, nomumita de la Senato por gvidi la militon kontraŭ Mitridato, foriris el Romo tiudestinen. Dum li estis for, Mario ne respektis la leĝecon kaj pere de siaj influoj li sukcesis ke la tribunuso de la plebo Publio Sulpicio Rufo igu aprobi leĝon plivalorigante la voĉdonon de la novaj italaj civitanoj. Translokiginte grandnombron da ili al Romo, oni faris plebisciton en kiu la popola asembleo aprobis leĝon laŭ kiu Mario estis elektita kiel generalo de la milito kontraŭ Mitridato.
Tiamaniere estiĝis iu leĝa kontraŭdiro. Ambaŭ militestroj, Sullo kaj Mario, estis nomumitaj por la sama posteno. En la kunteksto de duobla politika povo en kiu Romo troviĝis tiuepoke, tiaj kontraŭdiroj ne estis stranga afero, kaj la politikaj decidoj de la regantaro estis submetitaj al la rezultoj de la malekvilibro en la forto-rilatoj de la antagonismaj klasoj. Krome la konstitucio de la respubliko de Romo ne estis skribe fiksita teksto kies aplikado dependus de plejalta kaj juria tribunalo sendependa el la politika povo kiel okazas en la nuntempaj ŝtatoj. La Senato estis la plejalta instanco de ambaŭ povoj, kun la limoj kiuj kapablus oponi al ĝi la popolaj tribunusoj, kaj ĉi tiuj estis neantaŭvidebla faktoro kiu, krome, ne ĉiam sukcesis apliki siajn dispoziciojn. Resume, la respekto al la Senato kaj al la tribunusoj baziĝis, ĉefe, sur la kutimo kaj la tradicio, sed en la procezo de pliakriĝo de la interklasaj kontraŭdiroj, tiu respekto iom-post-iom malgrandiĝis ĝis malapero. Ni jam vidis kiel estis profanita la aŭtoritato de la tribunusoj de la plebo en la kazoj de la Grakoj kaj de Livio Druso ĝis la fizika eliminado de tiuj magistratoj. Kiam tiu respekto malaperas, fine neniu respektas la leĝecon kaj intencas perforte altrudi siajn interesojn ĝis la estiĝo de civil-milito, kia estis la kazo de la italoj.
Nu, simila civilmilito, okazis rezulte de la konflikto inter Mario kaj Sullo. En la degradiĝo de la respekto al la leĝoj kaj la tradicioj, Sullo faris ion kiu neniu generalo de Romo aŭdacis fari antaŭe. Li marŝis komandante kvin romiajn legiojn kontraŭ sia propra urbo, Romo. De tiam multfoje kelkaj diversaj generaloj faris tiun elpaŝon en la civilmiltoj de la romia socio. Mario ne sukcesis aranĝi armeon por alfronti la defion de Sullo kaj devis fuĝi el la urbo kune kun Sulpicio Rufo kaj aliaj partianoj. La tribunuso Rufo kaj aliaj sekvantoj estis kaptitaj de la soldataro de Sullo kaj ekzekutitaj, alia paŝo en la profanado de la konstitucia leĝeco. Mario sukcesis meti sin en savon enŝipiĝante destine al la Afrika provinco.
Profitante sian faktan, eĉ se ne laŭleĝan, povon, Sullo trudis al la Senato novajn leĝojn nuligante la antaŭajn. Sed en la balotado por elekti la konsulojn de la jaro 87 a. K., Sullo ne sukcesis ke oni elektu siajn kandidatojn. La malekvilibro de la situacio de duobla povo persistis kaj havis sian specifan dinamikon. La elektitoj estis Cneo Oktavio, ne tre favora al Sullo, kaj Kornelio Cinno, klara malamiko de la generalo. Sed tial ke la Senato reaprobis lian nomumon por komandi la militadon kontraŭ Mitridato, Sullo denove foriris el Romo por dediĉiĝi al tiu tasko. Sed dum lia foresto, Cinno entreprenis kromajn iniciatojn celante ŝanĝi la politikan forto-rilaton. Redoninte al la italaj civitanoj la voĉdonrajton, li restarigis la povon de la Pleba Asembleo kaj koncedis amnestion al siaj ekzilitaj amikoj. La alia konsulo, Oktavio, kontraŭstaris tiujn dispoziciojn kaj per la helpo de la konservativa plimulto de la Senato li sukcesis forpeli el la urbo la konsulon Cinnon kaj ses tribunusojn de la plebo.
Reiĝis la civilmilito. Cinno komencis organizi armeon de romiaj kaj italaj soldatoj, inkludante ankaŭ sklavojn kaj gladiatorojn, kaj alvokis Marion, kiu troviĝis en insulo proksime al Kartago. Tiujare mem, la 87-an antaŭ nia erao, Mario de norde kaj Cinno de sude marŝis kontraŭ Romo komandante du armeojn. La konsulo Oktavio ne sukcesis defendi la urbon kaj ĉi tiu falis en la manojn de la ribelintoj. Ĉi tiuj daŭrigis la eskaladon de la perfortigo de la leĝeco de la romia Respubliko. La konsulo Oktavio estis ekzekutita kune kun cento da senatanoj el la plej reakcia patriciaro. Mario kaj Cinno proklamis sin mem konsuloj por la jaro 86-a kaj anstataŭis la murditajn senatanojn per simpatiantoj de sia partio. Tiu partio dediĉiĝis al la masakrado de aristokratoj kaj altranguloj de la patriciaj familioj de Romo. Ankaŭ la trupoj de la ribelintaj armeoj dediĉiĝis al la rabado kaj dispredado de la riĉaj domoj de la urbo. Ŝajnas ke tiurilate estis troigo kiu fine naŭzigis eĉ la partianojn de Mario. Sertorio, nevo de Mario kaj estro de unu el ĉi ties legioj, devis dediĉiĝi, plurajn tagojn post la kapto de la urbo, supremadi kaj masakradi taĉmentojn da sklavoj kaj gladiatoroj de sia propra armeo por restarigi la ordon. Verdire, la ŝanĝo de la politika situacio ne multe favoris la interesojn de la malaltaj klasoj de la romia popolo, sed nur tiujn de lumpen-aristokratoj kiel Cinno, Sertorio kaj aliaj kavaliroj kaj novuloj. Sed Mario, kiu tiam estis 71-jaraĝa, mortis 18 tagojn post la komenciĝo de sia sepa konsuleco, kaj Cinno restis kiel sola konsulo por elteni la novan situacion kiun li estis kontribuinta krei.
Sullo atingis en tiu jaro 86-a gravajn venkojn en la milito de la Ponto. La priskribo de tiu milito falas for de la celo de ĉi raporto. De vidpunkto de la klasbatalo, kiu estas nia intereso, estas indiferenta ĉu venkus Romio aŭ la Ponto de Mitridato, ambaŭ estis imperiismaj potencoj. Por nia studo de la disvolviĝo de la klasbatalo en la romia socio gravas noti ke la venkoj de Sullo en tiu milito plifortigis sian politikan kaj militistan situacion rilate al la forto-rilatoj kun siaj malamikoj en Romo. La Senato kontrolata de Cinno sendis al la milita fronto de la Ponto novan armeon kies celo estis interveni en tiu milito kontraŭ Mitridato sed nome de la aŭtoritatoj de Romo, t. e. kuniĝi kun la trupoj komandataj de Sullo sed sen la partopreno de ĉi tiu, kiu devus cedi la komandon. Sed la situacio evoluis favore al Sullo. La trupoj de la nova armeo ribelis kontraŭ la estroj nomumitaj de Cinno kaj sin metis subordone de Sullo, kiu atingis por si la famon de la venko en la milito de la Ponto kaj la kontrolon de potenca armeo.
En Romo, Cinno rolis kiel konsulo, sed fakte diktatorece, ekde la jaro 87-a al la 84-a a. K. Kiam li estis preparante militan ekspedicion por adresiĝi al Azio cele meti finon al la povo de Sullo, li mortis sekve de militista ribelo kontraŭ li. Printempe de la jaro 83-a Sullo

revenis al Romo komandante armeon de 40.000 homoj. Kontraŭfrontis lin armeo komandata de la sukcedintoj de Cinno, inter ili unu filo de Mario. Sangaj bataloj okazis tiujare kaj laŭlonge de la jaro 82-a. Preskaŭ 70.000 romianoj mortis en tiu civilmilito. En la lasta el la tri grandaj bataloj en kiu Sullo venkis, li kaptis 12.000 popolanojn el kiuj li ordonis mortigi 3.000. La filo de Mario sin mortigis post unu el tiuj malvenkoj de sia partio. En diversaj lokoj de Italio la rezisto daŭris ĝis la jaro 79-a. La reĝimo de la popolanoj persistis en Iberio ĝis la jaro 72-a, kiam jam estis mortinta Sullo. Tie gvidis la ribelintojn Sertorio, la nevo de Mario.

Post sia venko en Romo, Sullo regis kiel diktatoro kaj ordonis la mortigon de multaj romiaj civitanoj el ĉiuj sociaj klasoj. La morto de la malamikoj de Sullo kunportis la konfiskadon de iliaj posedaĵoj. La lumpen-aristokratoj kaj lumpen-kavaliroj de la partio de la diktatoro, inter ili Marko Licinio Kraso, riĉiĝis per la denuncado de la malamikoj de la reĝimo de Sullo. Indas klarigi ke la diktaturo estis laŭleĝa politika institucio de la respubliko de Romo. Tiu politika formo, plurfoje alprenita pasintece, estis konceptita por alfronti esceptajn okazojn de danĝero por la ŝtato. Dum la daŭro de la diktaturoj ĉesadis la elektado de la konsuloj, tribunusoj kaj aliaj magistratoj de la Respubliko. Tial ke la diktatoroj devus, por la plenumado de sia funkcio, alpreni severajn dispoziciojn, eĉ kontraŭ la civitanoj se necese, la leĝo konsentis ke ili konservu sian rolon ĝis la fino de ilia vivo por protekti ilin kontraŭ la venĝemo de la ofenditoj. En la kunteksto de la diktaturo de Sullo, la povo de ĉi tiu estis uzata ne por la bono de la ŝtato ĝenerale sed por la restarigo kaj plifortigo de la politika kaj ekonomia povo de la senat-klaso. Neniam antaŭe la povo de la aristokrataro sur la popolaj klasoj estis tiel granda kiel en tiu epoko de la diktatoreco de Sullo. Fakte, ĉi tiu povis rezigni tiun potencan postenon kaj tamen la povo de la patriciaro persistis dum du jardekoj, eĉ post la morto de Sullo, en la jaro 78-a.

Sed tio ne signifis ke tute ĉesis tiam la klasbataloj en la romia socio. La sekva soci-klasa konflikto okazis dek jarojn poste, en 73-a-71-a a. K., kaj ĉi-foje la mobilizitoj estis, kromanfoje, la sklavoj, sed tiam ne tiuj de Sicilio sed en Italio mem. Temis pri la fama ribelo de la sklavoj subgvide de la gladiatoro Spartako. La informo de la historiistoj de la epoko ne estis abunda pri tiu konflikto ĉar ne plaĉis al la romianoj priraporti la malvenkojn kiujn ili suferis batalante kontraŭ sklavoj; krome ili konsideris neinde fieri pri venkoj super tiutipa personaro. La gladiatoroj estis eble la plej malfeliĉa socitavolo ene de la klaso de la sklavoj; ili estis destinitaj ne pluvivi dumlonge. Tre malmultaj sukcesis supervivi la cirkajn batalojn al kiuj ili dediĉiĝis por amuzi la romiajn civitanojn.

En la jaro 73, okazis ribelo de gladiatoroj en luktejo en Kapuo. 74 gladiatoroj komandataj de iu trakiano nomata Spartako fuĝis el la kazerno kie ili estis koncentritaj por lukto-praktikado kaj havigis al si ĉiujn armilojn kiujn ili trovis. Poste ili retiriĝis al la monto Vezubio kaj de tie ili dediĉiĝis disrabi la urbetojn de la ĉirkaŭaĵoj. Komence la lokaj aŭtoritatoj ne taksis gravan tiun aferon, sed baldaŭ poste la sklavoj de proksimaj farmoj unuiĝis al la ribelintoj. Tiam oni sendis ekde Kapuo soldat-brigadon. La sklavoj venkis tiun taĉmenton kaj kaptis ĉi ties armilojn. La romianoj komencis serioze prikonsideri la aferon kaj sendis militistan unuon je 3.000 homoj subgvide de Kajo Klaudio Glabro. Tiu ĉi starigis sian kampadejon piede de la monto, en la loko kie finis la sola vojo el la mont-pinto. Sed, malprudente, li ne igis ĉirkaŭi la tendaron pere de palisaro laŭ la kutimo de la romiaj trupoj. Li pagis altekoste tian subtakson de la kapablo de la sklavoj. Spartako, kvankam sklavo, ŝajne estis sufiĉe klera, krom ruza kaj kuraĝa. Li igis siajn homojn subeniri, pere de ŝnuroj, tra la plej kruta flanko de la vulkano kaj neatendite atakis la romian soldataron. La armea unuo estis detruita kaj ties armilaro restis kaptita de la sklavoj.

La romianojn sendis kontraŭ la ribelintoj du legiojn, elprenitajn el la norda landlimo de Italio, komanditajn de la pretoro Varinio. Ĉi tiu konceptis taktikon por ĉirkaŭi la fortojn de Spartako. Tiucele li dividis siajn trupojn en tri korpusoj. Sed la gladiatoro eltiris profiton el tiu divido de la romia armeo. Li atakis unu post alian ĉiujn tri armeo-partojn, detruis ilin kaj ankaŭ kaptis la kampadejon de la pretoro, kiu devis forfuĝi. Rezulte de tiuj venkoj de la sklavoj, la ribelo etendiĝis tra la tuta sudo de Italio. Miloj da sklavoj alkuris unuiĝi al la fortoj de Spartako. Multaj urboj kaj kamparaj farmoj estis dispreditaj de la kreskanta amaso da sinliberigintaj sklavoj, kaj grandnombro da mastroj kaj ties familioj estis masakritaj. Spartako komprenis ke tia agado rezultus malfavora por la afero de la sklavoj kaj dediĉiĝis organizi regulan, disciplinitan armeon kapablan kontraŭfronti la potencajn legiojn de Romo. Tiamaniere li formis armeon de 70.000 homoj, preparis la faradon de armilaro kaj organizis kavalerion. Ŝajnas ke lia plano estis arigi plejparton el la sklavoj de Italio kaj foriri el tiu teritorio tra la Alpoj. La plano estis malfacile realigebla, sed ĝi estis la sola ebleco ke tiu afero de la sklavoj atingu ian sukceson ĉar la romianoj disponis je sufiĉe da kapablo por sufoki la ribelon devigante la aliancanojn rekruti soldatojn por eviti ke la sklav-ribelo etendiĝu al la tuta mediteranea mondo.

Cele realigi tiun planon, Spartako marŝis norden kun siaj trupoj. La romia regantaro, antaŭ la graveco de la situacio sendis, en la jaro 72-a, la armeojn de la du konsuloj, Lentulo kaj Gelio. Tiam okazis dispartiĝo de la armeo de la ribeluloj. 20.000 homoj apartiĝis el la ceteraj subgvide de iu gaŭlo nomata Kriŝo. Ne estas klare ĉu temis pri problemoj de lidereco aŭ estis malakordo pri la plano forlasi Italion. Eblas ankaŭ ke la divido de la sklavoj celus plifaciligi la nutradon de tiel granda homamaso. Tial ke la akiro de manĝaĵoj por la ribelintoj dependis de la dispredado de la regionoj tra kiuj ili iradis, estus konvena organizi la itinerojn de tiom granda sklav-armeo por pli bone profiti la resursojn de la trairataj teritorioj. Ĉiukaze, de milita vidpunkto, la divido ne rezultis feliĉa por la ribelintoj. La kolono de Kriŝo, kiu ne tiel estis lerta kiel Spartako, estis blokita kaj detruita de la armeo de la konsulo Gelio. Kriŝo mem mortis en la batalo.

Sed Spartako daŭrigis sian marŝadon norden. Lia armeo venkis ambaŭ konsulojn en kelkaj bataloj, kaj krome pliaj sklavoj, el la tuta Italio, alfluis al lia armeo tiel ke ĉi tiu atingis nombron de 120.000 homoj. La romiaj aŭtoritatoj faris lastan provon eviti ke la sklavoj eliru el Italio. Oni koncentris ĉiujn trupojn de la Cisalpa Gaŭlujo en la valo de la Pado-rivero, en la urbo Modeno por bari la vojon al la sklava armeo. Spartako akceptis la batalon kaj venkis la konsulon Kasion Longinon.

Sed anstataŭ transiri la Alpojn, la sklava amaso revenis suden. Kio okazis? Oni ne scias certe; la historiistoj povas nur spekulacii pri la kaŭzo de tiu stranga elpaŝo. Ŝajnas ke la grava venko atingita de la sklavoj entuziasmigis ilin tiel ke ili rifuzis forlasi Italion. Oni povas diri ke ili instaliĝis en la vivmanieron kiun ili estis spertinte dum la lasta jaro: batali, dispredi, mortigi mastrojn kaj liberajn italojn, plu batali, plu disrabi, plu (seks)perforti… De milita vidpunkto, ili estis la homtipo de la perfektaj revoluciuloj: ili riskis perdi nenion krom siajn ĉenojn. Ilia sola zorgo estis la ĉiutaga viv-tenado. Sed mankis al ili kapablo koncepti planon de alternativa socio al la sklavista superreganta sistemo. En ĝia entuziasmo, la sklava amaso deziris kulmini sian venĝon kaptante Romo-urbon. Spartako, kiu ne kunhavis tian entuziasmon, cedis al la premo de la cirkonstancoj kaj entreprenis la iradon suden. Ĉi tiu marŝado, neeviteble, havis similan karakteron kiel la antaŭa: perforto por ŝati la venĝemon de la sklavoj kaj disrabado por ŝati ties bezonojn. Kompreneblas ke tia militad-maniero tute ne povus kontribui pliakcentigi la kontraŭdirojn inter la ceteraj klasoj de la romia socio. Tut-male, ĉiuj aliaj sociaj klasoj sin sentis minacitaj de la sklava ribelo kaj perforto kaj tio mildigis inter ili la rankoron de la du antaŭaj civilmilitoj.

La Senato komisiis la pretoron Marko-Licinio-Krason por alfronti la ofensivon de Spartako kaj asignis al li ĉiujn legiojn tiam disponeblajn en Italio, kiuj ne estis la plej bonaj ĉar la plej potencaj romiaj legioj troviĝis en Hispanio komandataj de Pompeo por batali kontraŭ Sertorio, kaj en la Ponto, subgvide de Lukulo, por daŭrigi la militadon kontraŭ Mitridato. Spartako estis sufiĉe prudenta por ne ataki la bone defenditan Romo-urbon, sed Kraso fiaskis en sia intenco enfermigi la sklavan armeon en la montaran Picenan regionon. Male, en tiu intenco Mummio, unu el la subuloj de la pretoro, estis venkita kiam atakis la trupojn de la ribelintoj. Multaj romiaj soldatoj, kaptitaj de paniko, forlasis siajn armilojn kaj fuĝis. Spartako daŭrigis sian marŝadon suden. Por restarigi la disciplinon en siajn trupojn, Kraso igis dekonigi la fuĝintojn, t. e. mortigi unu el ĉiu deko da ili. Alveninte la armeo de Spartako al la Tireno-maro en Kalabrio, li kontaktis kun la piratoj de Cilicio kun la intenco transporti per ties ŝipoj la ribelintajn trupojn al Sicilio, sed la romianoj sukcesis abortigi la operación. Alveninte Kraso kun siaj trupoj, li profitis la okazon por enfermigi la armeon de la sklavoj en suda duon-insulo de Italio. Tiucele li igis konstrui fortikigitan linion, 65-kilometrojn longan kun profunda fosaĵo kaj alta murego. Spartako sukcesis rompi la fermaĵon en iu punkto kaj la armeo de sklavoj eliris el tiu sieĝo kaj pasis al Lukanio. La Senato de Romo perdis la fidon je Kraso kaj kaptita de paniko timante ke la armeo de Spartako entreprenus trian detruigan marŝadon tra la itala teritorio, ĝi sin turnis al ĉiuj legioj de la imperio. Pompeo devis reveni kun sia armeo el Hispanio kaj Lukulo kun la sia el Makedonio. Entute, la romianoj kunigis 20 legiojn por kontraŭbatali sklavan armeon kiun du jarojn antaŭe ili subestimis.

Sed la grando de la armeo de Spartako, krom ĝia potenco estis ankaŭ ĝia febleco. Estis ne-eble eltiri nutraĵojn el la teritorio kie ĝi troviĝis por tiom granda hom-amaso, ĉefe ĉar tiam, krome, estis tie ankaŭ la romiaj legioj kiuj, ankaŭ ili, bezonis manĝaĵojn. Por la sklavoj estis klara la neceso reiri norden, por povi sin nutri, malproksimiĝi el la romiaj fortoj kaj, sed eble, eskapi el Italio. La disiĝo, kiu tiam okazis, de 30.000 homoj el la armeo de Spartako, gvidataj de la gaŭloj Kasto kaj Ganniko, eble ne temis pri liderec-konkurado sed celis asigni al ambaŭ kolonoj da sklav-amasoj malsamajn itinerojn por la nutrad-cela prirabado. Tamen, la disiĝo malpliigis la defendo-kapablon de la ribelintoj. La 30.000-homa kolono de la gaŭloj estis venkataj de Kraso. Spartako intencis plu norden-marŝi kun la 80.000 homoj kiuj restis al li, sed baris al li la vojon la armeo



**Reprezalioj ordonitaj de Kraso post la sufokado de la ribelo de la sklavoj**

de Lukulo ĵus alveninta el la Ponto. Malantaŭ li estis la legioj de Kraso kaj de Pompeo, ĵus alveninta el Iberio. Spartako troviĝis ĉirkaŭata de ĉiuj legioj de la Romia Imperio, iuj el ili tre bone trejnitaj en la militoj de la provincoj el kie ili venis.

En la jaro 71-a a. K., en Apulio okazis la lasta batalo de la sklava ribelo. La trupoj de Spartako batalis senespere kontraŭ la plej potencaj romiaj legioj. Mortis 60.000 ribelintoj — inter ili eble ankaŭ Spartako kvankam oni ne trovis lian kadavron— kaj nur milo da romianoj. Post la batalo, Kraso decidis la krucumigon de 6.000 milit-kaptitaj sklavoj. Ceteraj ribelintoj disfuĝis por sin savi iel ajn. Pompeo sukcesis detrui trupon de 5.000 homoj kiuj estis adresiĝantaj norden. Kiel rezulto de la ribelo estrita de Spartako, Italio perdis 100.000 sklavojn, kio estis grava bato por la terkultura produktado, ĉar multaj latifundioj estis detruitaj.

Nedudeble, la ribelo de la sklavoj metis en gravan danĝeron la romian potencon, sed ne la sklavistan sistemon. Oni devas klarigi ĉi-tion. Eĉ se Spartako estus venkinte Krason kaj Pompeon, kaj kaptinte Romon, tio tute ne konstituus antaŭenpaŝo por la malapero de la sklaveco. La venkintaj sklavoj fariĝus mastroj kaj sklavigus ĝistiamajn mastrojn kaj liberajn homojn. La objektivaj kaj subjektivaj kondiĉoj de la socio ne ebligus la aperon de alia konceptado pri la produktadmaniero. La terkulturado kaj aliaj laboroj estis konsiderataj, en la ideologio de la epoko kaj far ĉiuj sociaj klasoj, kiel sklava tasko. Do, la produktado, kaj sekve la sklavoj, daŭre sekvus estante necesaj. La venkinta Spartako, aŭ iu el ties sukcedantoj, sin povus deklari imperiestro. La estroj de tia imperio, ne nomiĝus “Cezaroj”, sed io ajn alie tamen, esence, la sistemo estus sama. Ja, la historio montras al ni ke la disfalo de la Romia Imperio kelkajn jarcentojn poste ne alportis esencan ŝanĝon de la produktad-maniero kaj la klasrilatoj.

Post la sufokado de la sklava ribelo, la socia paco ne regis dumlonge en Romo. La sekva konflikto, okazinta 8 jarojn post la morto de Spartako, estis tiu afero konata en la historio kiel “la Komploto de Katilino”. Tiu afero estas iome komplika kaj la historiistoj interpretas ĝin diversmaniere. Ni pensas ke la komploto de Katilino estas ne-komprenebla se oni ne atentas pri tiu stranga soci-klaso, tiam ekzistanta en Romo, kiun ni nomis “Lumpen-aristokrataro”, kies esencon kaj funkciadmanieron ni priskribis: junaj, ambiciaj patricioj, ŝarĝitaj je ŝuldoj, pretaj apogi ĉiun ajn partion kiu povus alporti al ili profiton. Estis lumpen-aristokratoj kaj lumpen-kavaliroj en la civilmilito apogante la partiojn de Mario kaj Sullo, sed ĉiuj ili agadis laŭ la propra persona intereso, ne ĉiam laŭ la intereso de la respektivaj deven-klasoj, t. e. estis patricioj en la popolana partio de Mario, kaj kavaliroj en la nobelara partio de Sullo, kaj ne mankis perfidoj kaj pasadoj de unu partio al la alia laŭ la cirkonstancoj kaj la ebleco atingi personan profiton. Kraso, la venkinto de Spartako, estis riĉiĝinta kiel lumpen-aristokrata kliento de Sullo, kaj Pompeo, la alia venkinto de la sklavoj, apartenis al iu familio de “novuloj”; en la civil-milito li pasis de la popolana partio de Mario kaj Cinno al tiu de Sullo kiam tiu elpaŝo konvenis al sia politika kaj militista kariero. En la jaro 65-a a. K. estis lumpen-aristokratoj, kvankam jam ne tre junaj, Julio Cezaro, kiu poste ludos gravan rolon en la konfliktoj kiuj metis finon al la Respubliko, kaj Lucio Sergio Katilino pri kiu ni devos okupiĝi nun.

Li apartenis al patricia familio, kiu, tamen, ne estis riĉa. Do, jam de komence li estis enkalkulita en tiu ambigua klaso de la romianoj kiuj devis klopodi iel ajn subteni kaj se eble plialtigi iun rangon kiu ne alĝustiĝis al la reala kvanto de siaj posedaĵoj. Lia partopreno en la civilmilito ne konkretiĝis ĝis la reveno Sullo, kaj tiam li plenumis ne gravajn rolojn serve de la afero de la patriciaro. Ŝajnas ke li iome eltiris profiton el la proskripcioj de la diktaturo de Sullo. Oni akuzis lin pri la murdo de kelkaj nobeloj, samkiel tiu de sia propra frato, sed ne estas certeco pri tiuj faroj: povas temi pri akuzoj elpensitaj por damaĝi lian famon. Dum la jaroj 68-a al la 65-a li plenumis, en la administrado de la Afrika provinco, iajn duarangajn rolojn kiuj tute ne kontentigis siajn ambiciojn. Krome, rezulte de la plenumado de tiuj funkcioj li estis akuzita kaj juĝita pro misuzo de aŭtoritato, kvankam fine li estis absolvita. Ĉio tre latŭtipa: la misuzo de la aŭtoritato de la romiaj funkciuloj en la provincoj, la akuzoj kaj juĝoj pro tiuj faroj, la absolvo dank’ al la apogo de influaj amikoj, samklasanoj kaj patronoj… Ĉio ĉi estis tre ofta kaj normala en la tiama politika vivo de la Respubliko de Romo. Tiaj faktoj enestas en la biografioj de preskaŭ ĉiuj romanoj de tiu klaso. Ofte la akuzoj estis pravaj sed oni estus farinte ilin kvankam la deliktoj ne estus okazintaj. Kaj ofte la juĝado finis per absolvo eĉ se la krimoj estus certaj.

La ambicio de Katilino, kaj de plejparto el tiutipaj homoj, estis atingi la rangon de konsulo. Verdire, post la sperto de Sullo, la plej kara revo de ĉiuj nobeloj estis iam atingi la diktatorecan povon kiun tiu ĝuis. Komprenenble, nur du homoj ĉiujare povus atingi la konsulecon, kaj la plej potencaj familioj de la **boni** kaj la **optimates** sufiĉe bone kontroladis la politikajn meĥanismojn de aliro al tiuj postenoj. Tio generis grandan frustracion en tiu ampleksa korporacio de la lumpenaristokrataro. En la jaro 65-a okazis la t. n. “Unua Komploto de Katilino”. Sed ŝajnas ke, kvankam li partoprenis en la afero, li ne troviĝis inter la organizantoj kaj gvidantoj de la konspiro. Sed la oligarkio vetois Katilinon por sekvaj balotoj. En la balotado por la konsuleco de tiu jaro, la kandidatoj Publio Antonio Paeto kaj Publio Kornelio Sullo (nevo de la diktatoro) devis rezigni la kandidatecon tial ke ili estis akuzitaj je amasa subaĉeto. La elektitoj estis Lucio Manlio Torkuato kaj Lucio Aurelio Koto. Katilino partoprenus kun la rifuzitaj kandidatoj en komploto kiu celus mortigi multajn senatanojn kaj la novajn konsulojn en la tago de ilia enposteniĝo. La plano estus nomumi Krason kiel diktatoro, kies anstataŭanto estus Julio Cezaro. Ne estas klare ĉu tiu komplot-plano estis vere preparita, sed la fakto mem ke ofte oni faradis tiaspecajn akuzojn montras kiel multe la politika konkurado iĝis malpura kaj danĝera afero. Menciindas ke en la juĝado al la

akuzitoj rolis kiel defendanto Cicerono. Ĉi tiu prezentiĝis kiel kandidato por la jaro 63-a kaj ĉi-foje oni permesis al Katilino prezenti lian kandidatecon.
Katilino perdis en tiu balotado en kiu, tamen, estis elektita Cicerono kiel konsulo. Paradokse, Katilino, kiu apartenis al tre antikva patricia familio, propagandis en la balotkampanjo defendante la interesojn de la plebanoj, dum Cicerono, kiu estis iu novulo, el iu pleba familio de iu itala provinco, enviciĝis favore al la plej altaj tavoloj de la nobelaro. Tiujare mem, Katilino devis alfronti novan juĝproceson pro akuzoj kiujn oni faris al li en rilato kun faroj de la epoko de la diktaturo de Sullo. Li estis absolvita ĉu pro tio ke li ne estis kulpa aŭ pro tio ke prezidis la tribunalon lia amiko Julio Cezaro.
Katilino denove kandidatiĝis por la konsuleco de la jaro 62-a. Sed li fiaskis denove kaj definitive. Li komprenis ke por li la sola ebleco atingi la politikan povon devus esti eksterleĝa: komploto aŭ revolucio. La elektitaj konsuloj estis Decimo Junio Silano kaj Lucio Licinio Mureno, sed antaŭ ties enposteniĝo, t. e. antaŭ la fino de la jaro 63-a kaj ankoraŭ dun la konsuleco de Cicerono, Katilino decidis agadi. Li komencis organizi partion el tiuj lumpen-aristokratoj kaj lumpen-kavaliroj malkontentaj kun la politiko de la Senato. Sed tial ke li promesis la nuligadon de la ŝuldoj, kuniĝis kun li ankaŭ multaj malriĉuloj de aliaj sociaj klasoj, inter ili ne malmultaj veteranoj de la militoj de Sullo, kaj eĉ kelkaj sklavoj tiam ribelintaj en Kapuo. Laŭ la plano de Katilino, kiun li ellaboris en Romo, la komploto devus komenciĝi samtempe en kelkaj lokoj en Italio. La disturboj inkludus incendiojn kaj mortigojn de senatanoj. Tiam li reŭnuiĝus kun la formita ribelarmeo. La fina akto de tiu revolucio estus kapti Romon, kie la promeso de socia programo altirus al li popolan apogon por sin konstitui konsulo aŭ diktatoro. Por kulmini tiun planon, du sekvantoj de Katilino: Kajo Vornelio kaj Lucio Varguntejo, devus murdi la konsulon Ciceronon frumatene de la 7-a de novembro de la jaro 63-a. Eble Kraso kaj Julio Cezaro konis la planon de tiu komploto, sed ili ne implikiĝis en ties realigado, kaj prudente atendis vidi la disvolviĝon de la afero kaj profiti ĝin kaze de sukceso.
Foje okazas, kiam komploto estas konata de multaj personoj kiuj devos interveni en ĝi, ke iu el la konspirantoj, aŭ iu persono kiun oni intencis allogi por la konspiro, denuncas la aferon. Kaj ĝuste tio okazis tiam: Cicerono ricevis informon pri la plano murdi lin, kaj povis abortigi, se ne la ribelon, almenaŭ ties disvolviĝon en Romo. En la senatejo li denuncis la agadon de Katilino kaj ĉi tiu sukcesis eliri el la urbo antaŭ la konkretiĝo de la dispozicioj de la Senato por alfronti la konspiron en Romo antaŭ ties eksplodo. Cicerono atingis la senatan komision por decidi ĉion necesan por garantii la konstitucian ordon. La 22-an de oktobro Katilino adresiĝis kuniĝi kun sia armeo de ribelintoj dum en Romo la konspirantoj pensis ke ili povus efektivigi sian taskon en la urbo. Sed la konsulo povis aresti ilin antaŭ la realigado de la konspiro, kaj atingis de la Senato la mort-kondamnon de la arestitoj. Cicerono haste aplikis tiun mortpunon spite al la defendo de la akuzitoj kiun Cezaro faris en la senata sesio. Katilino estis deklarita malamiko de Romo kaj proskribito, la 15-an de novembro.
Sed li ne rezignis la realigadon de la cetero el la ribelplano. Tamen, perdinte la avantaĝon de la surprizo, li ne tuj adresiĝis al Romo kun sia armeo sed intencis plifortigi ĉi tiun per kroma varbado kaj tiucele li multfoje klopodis eviti la batalon kun la armitaj fortoj senditaj de la Senato. Sed fine li ne povis eviti batali kontraŭ la armeo komandata de Cajo Antonio Hibrido. Menciindas ke tiu Antonio sendita de Cicerono por sufoki la ribelon de Katilino, komence estis unu el la membroj de tiu konspiro; ĉi tio klare montras la mankon je etiko de tiuj lumpen-aristokratoj, kiuj moviĝis ne pro politikaj konvinkoj sed pro persona profito. La batalo okazis en Pistorio. Katilino kuraĝe batalis komandante tiun armeon kiun li estis rekrutinta. En ĝi estis romianoj el ĉiuj sociaj klasoj: patricioj, kavaliroj, plebanoj, novuloj… eĉ sklavoj. Eble estis iuj sklavoj el la ribelo de Spartako kiuj supervivis la masakron plenumitan, antaŭ kelkaj jaroj, de Kraso kaj Pompeo, kaj kun ili estis ankaŭ veteranoj de la legioj kiuj realigis tiun masakradon. Tiutipajn kontraŭdirojn kapablis generi la kompleksa romia socio. Ĉiuj batalis kuraĝe, ĝismorte. Estis por ili nenia espero kaze de malvenko. Spite al la klasa diverseco de la membraro de tiu armeo, estis inter ili io komuna al ĉiuj: ĉiuj ili estis lumpen-io-ajn, t. e. en la tiama Romo estis nenia deca loko por ili. Ili estis kondamnitaj venki… aŭ morti.
Se la komploto de Katilino havis dubindan karakteron je klasbatalo, la du sekvintaj civilmilitoj, okazintaj en la romia socio antaŭ la fino de tiu unua jarcento antaŭ nia erao, tute ne povas esti konsiderataj klasbataloj. Tial ni ne dediĉos al ili la atenton kiun ni aplikis al la ĝis nun priskribitaj sociaj konfliktoj. Tiuj civilmilitoj estis detale priskribitaj de la kronikistoj de la epoko kaj de la historiistoj de la sekvintaj epokoj. Pri ili ni diru nur ke, fine, la Respubliko de Romo dronis en la ĥaoson de siaj multaj nesolvitaj kontraŭdiroj, kaj ke la politika povo estis alprenita de alitipa aŭtoritato, tiu de la imperiestroj, ankaŭ nomitaj “Cezaroj”. La historio de la imperio de Romo de la sekvintaj jarcentoj havas ian intereson de vidpunkto de la klasbatalo, kaj oni devas priatenti ĝin, sed temas pri afero kiu meritas apartan raporton.


Marko Tulio Cicerono



# Iu nova subjektiva faktoro: la morala konscienco

La multaj konfliktoj okazintaj en la romia socio en la lasta jarcento antaŭ nia erao estis kondamnitaj ne solvi la interklasajn kontraŭdirojn kaj ne generi alitipan socion. La du lastaj civilmilitoj de tiu jarcento generis nur alitipan politikan formon demarŝi la povon de la ŝtato, sed la objektivaj kondiĉoj tute ne ŝanĝiĝis. La produktado de la necesaj aĵoj baziĝis sur la terkulturo kaj manlaboro (ĝenerale sklava) per ne-disvolvigitaj iloj de teknika vidpunkto. La subjektivaj faktoroj povis generi nur ribelojn kaj/aŭ leĝajn projektojn kiuj, sukcesintaj aŭ fiaskintaj, povus ŝanĝi nur la situacion de la protagonistoj sed ne la klasan strukturon de la socio.

Se la romia socio, ekde la unua jarcento de nia erao, meritas ian atenton estas pro tio ke tiam aperis iu nova subjektiva faktoro kiu tute mankis en la konfliktoj de la antaŭaj jarcentoj. Temas pri la t. n. "morala konscienco", aŭ "etiko" se oni preferas asigni al ĝi tiun nomon. Ja, la motivigilo de ĉiuj sociaj movadoj okazintaj dum la lastaj jarcentoj de la Respubliko estis la egoismo aŭ memamo. La malo de la egoismo estas la altruismo, kiun la PIV difinas tiele:

***Etika principo, kiu vidas la celon de la homa agado en la bonfarto kaj bonstato de aliaj homoj; malegoismo, abnegacio, karitato, sinforgeso.***

Aliaj nomoj por tiu sento povas esti: solidareco, filantropio, empatio, frateco… Estas neniu diferenco, eĉ ne nuanca, en la signifo de ĉiuj-ĉi vortoj. Okazas ke ĉiu el ili estas uzata de aparta homa kolektivo, kaj tiele la vortoj akiras konotaciojn, kromnociojn, subsencojn el la kunteksto kie ili estas uzataj. Tiele, la vorto "karitato" estas prefere uzataj en religiaj medioj. Pli laika estas la termino "altruismo". En la politikaj kaj sindikataj medioj, ĉefe tiuj de maldekstraro, oni aludas tiun koncepton per la vorto "solidareco". "Filantropio" estas uzata en aliaj rondoj, kiel la framasonaro. La relative nova termino "empatio" estas uzata kadre de la verkaro pri psikologio kaj sociologio. Sed, esence, ĉiuj tiuj vortoj, kaj eble aliaj, kiel "kamaradeco" rilatas al la sama ideo, kaj en ĉi raporto ni uzos ĉiujn ilin sendistinge.

Nu, ĉiukaze, oni vane serĉus tiun homan konduton en la klasbataloj de la romia socio kiujn ni priskribis per la antaŭa ĉapitro. La Grakoj, Livio Druso, Mario, Sullo, Spartako, Kraso. Pompeo, Katilino, Cezaro… ĉiuj, kiujn ni menciis kaj multaj aliaj kiuj ne aperas en nia raporto, agadis, luktis, pro intereso, persona intereso aŭ klasa intereso, sed ĉiukaze intereso, ne por la bono de la tuta homaro, kaj ne sindoneme. Ne la altruismo, sed la egoismo, estas la natura kaj esenca eco de la homa estaĵo… kaj de ĉiuj ceteraj bestoj. Eĉ kiam hom(in)o aŭ best(in)o sin foroferas celante savi siajn idojn, tio konstituas nur ian formon de egoismo; tian foroferon ili ne farus favore al alies idoj. Ni diru ke la agoj de la plej pura egoismo estas rendimentoj de la reptilia cerbo de la homoj, kaj la sinforofero favore al la idoj estas rendimento de la limbia cerbo, komuna al ĉiuj mamuloj. Sed la karitato aŭ solidareco estas afero de la specife homa parto de la cerbo, kiun oni nomas novkortekso, kiu estas modifebla far la edukado. Sen tia edukado aŭ civilizado, la natura stato de la hom(ar)o estas la sovaĝeco. La biblia rakonto pri la kreado de la homo, laŭ kiu Dio kreis la homon perfekta, bona… estas senbaza legendo. Same erara estas la teorio de Rousseau kiu diras ke la homo estas bona laŭnature kaj ke perversiĝas en la socio. Ĉiam la homaj estaĵoj serĉis kaj celis sian propran profiton eĉ koste de la malfeliĉo kaj damaĝo de aliaj homoj. Se necese, li ne sin detenas antaŭ la praktikado de kanibalismo. Nur la progreso de la civilizacio povas plibonigi la homan konduton, kvankam ne la homan naturon.

La civilizado povas esti materia kaj spirita. Ekde la epoko de la romianoj la materia civilizado tre progresis. Hodiaŭ ni disponas je iloj pri kiuj la homoj de la unua jarcento de nia erao ne povis eĉ revi. La spirita progreso estis pli modesta, sed ankaŭ ĝi ekzistis, kaj ĝuste pri ĝi ni okupiĝos ĉi-ĉapitre. Pri ĝi ni jam iome temis en la unua ĉapitro de ĉi tiu raporto. Krome, se en la kalkulado de la historia tempo oni distingas inter "antikva erao" kaj "nova erao" estas pro tio ke io grava

okazis inter la antikva, ankaŭ nomata ***a. K.*** (antaŭ Kristo), kaj la nova, ankaŭ nomata ***p. K.*** (post Kristo). Kiel sciate, la vorto ***Kristo*** estas la grek-lingva traduko de la hebrea vorto **Mesio**, kies signifon ni jam vidis en la unua ĉapitro.

Nu, se ni volas traesplori la aperon de tiu morala konscienco aŭ altruismo kiu enkondukiĝis en la procezo de la homa civiliziĝo, ni devas rekonduki nian raportadon al la fino de tiu unua ĉapitro. Kiu estis tiu Kristo, sufiĉe grava por ke oni dividu la homan historion en du etapojn: antaŭ kaj post li? En la menciita ĉapitro ni prezentis lin kiel la kulmino de la profeta tradicio de la juda popolo. Kiel juda Mesio li estis sufiĉe misfortuna; li ne estis aceptata de sia popolo sed, strange, li fariĝis referaĵo de nova civilizacio kiu anstataŭis la romian imperion post ĉi ties disfalo. Li faris neniun materian alportaĵon nek inventon al la homa civilizacio. Li gajnis neniun militon, fondis neniun imperion, kaj regis neniuloke. Krome oni ne multe scias pri li: nur iometan informon pri la lastaj du jaroj kaj duono de lia vivo, kiu cetere ne estis tre longa, kaj krome finiĝis ne tre honorind-maniere: krucumita inter du deliktuloj en iu malgrava angulo de la romia imperio. Kaj tamen oni verkis, kaj daŭre oni verkas, pri li pli da libroj ol pri iu ajn alia homo. Ŝajnas ke ĉiuj liaj verkintoj pensas ke ili havas ion gravan diri pri li, kio ne estis dirita de aliaj. Nu, eble tia estas ankaŭ nia kazo. Ni pensas ke oni devas ion diri pri lia grava alportaĵo al la homa civilizacio: la morala konscienco. Lia alportaĵo al la civilizacio estas nur spirita. Li celis regi ne en la kalendaro sed en la homa koro, t. e. en tiu parto de la homa cerbo kiun, ĝenerale, oni konsideras la ejo de la homaj sentoj, aŭ pli ĝuste la ejo de la ideoj ĉar la sentoj estas spontana travivaĵo kiu ne bezonas instigilon.

Jes, ni temos pri la morala konscienco kaj ĝia rolo en la homa historio, en la klasbatalo. Unuavide ŝajnas ke klasbatalo kaj karitato aŭ morala konscienco estas kontraŭdiraj konceptoj, ĉar la klasbataloj kiujn ni priskribis ĝis nun estis sango-verŝado, perforto, malamo… do ĉio male ol karitato, altruismo, sinofero… Jen, ĝuste pro tio estas interesa tiu koncepto kaj la maniero kiel ĝi interagadis/as kun la klasbatalo.

Do, komence, ni vidu la kernajn ideojn de la doktrino sur kiu baziĝis la altruisma alvoko, sed ne nur la ideojn formulitaj de la Majstro Jesuo sed ankaŭ la modelon de vivmaniero kiun li enkarnigis. Kiel sciate, tiun materialon oni eltiras el la libraro nomata Evangelio, kvarlibra kolekto kiu komencis esti verkata kvardek jarojn post la morto de tiu profeto surbaze de memoraĵoj de homoj kiuj konis lin persone. Rilate al lia vivmaniero rimarkindas ke li elektis la plej malaltrangan rolon kiu la socio povas asigni, tiun de ekzekutata deliktulo. Li, ja, estis mortpunita tial ke li kontraŭfrontis la sistemon. La plej grava afero por li estis la resanigo de la malsanuloj, la nutrado de la malriĉuloj, la digno kaj respekto kiun meritas ĉiu homa estaĵo. Lia instruo:

***Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo. Feliĉaj estas la plorantaj, ĉar ili konsoliĝos. Feliĉaj estas la humilaj, ĉar ili heredos la teron. Feliĉaj estas tiuj, kiuj malsatas kaj soifas justecon, ĉar ili satiĝos. Feliĉaj estas la kompatemaj, ĉar ili ricevos kompaton. Feliĉaj estas la kore puraj, ĉar ili vidos Dion. Feliĉaj estas la pacigantoj, ĉar filoj de Dio ili estos nomataj. Feliĉaj estas tiuj, kiuj estas persekutitaj pro justeco, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo. Feliĉaj estas vi, kiam oni vin riproĉos kaj persekutos kaj false vin kalumnios pro mi. Ĝoju kaj raviĝu, ĉar via rekompenco estos granda en la ĉielo; ĉar tiel oni persekutis la profetojn, kiuj estis antaŭ vi.***

***Vi estas la salo de la tero; sed se la salo sengustiĝis, per kio ĝi estos salita? ĝi jam taŭgas por nenio, krom por esti elĵetita kaj piedpremita de homoj. Vi estas la lumo de la mondo. Urbo starigita sur monto ne povas esti kaŝita. Kiam oni bruligas lampon, oni metas ĝin ne sub grenmezurilon, sed sur la lampingon; kaj ĝi lumas sur ĉiujn, kiuj estas en la domo. Tiel same via lumo lumu antaŭ homoj, por ke ili vidu viajn bonajn farojn, kaj gloru vian Patron, kiu estas en la ĉielo...***

***…Vi aŭdis, ke estas dirite: Okulon pro okulo, kaj denton pro dento; sed mi diras al vi: Ne rezistu al malbono; sed al tiu, kiu frapas vian dekstran vangon, turnu ankaŭ la alian. Kaj se iu deziras procesi kontraŭ vi, por forpreni vian tunikon, lasu lin preni ankaŭ vian mantelon. Kaj se iu devigas vin iri unu mejlon, iru kun li du. Donu al tiu, kiu petas de vi; kaj ne deturnu vin de tiu, kiu deziras prunti de vi.***

***Vi aŭdis, ke estas dirite: Amu vian proksimulon, kaj malamu viajn malamikojn; sed mi diras al vi: Amu viajn malamikojn, kaj preĝu por viaj persekutantoj; por ke vi estu filoj de via Patro, kiu estas en la ĉielo; ĉar Li levas Sian sunon sur la malbonulojn kaj bonulojn, kaj sendas pluvon sur la justulojn kaj la maljustulojn. Ĉar se vi amas tiujn, kiuj amas vin, kian rekompencon vi havas? ĉu ne tion saman faras eĉ la impostistoj? Kaj se vi salutas nur sole viajn fratojn, kion ekstran vi faras? ĉu ne tion saman faras eĉ la nacianoj? Estu do perfektaj, kiel ankaŭ via ĉiela Patro estas perfekta...***

Evidentas ke tiuj ordonoj de Jesuo, fakte, signifas rezigni la proprajn rajtojn. Sed klarigendas ke tiu teniĝo ne estas masoĥismo, ankaŭ ne radikaleco de frenezulo situita for de la realeco. Temas pri la formulado de la principo de altruismo aŭ bonfarado kiun oni proponas kiel homa agado kapabla transformi la realecon.

En la supre transkribita evangelia tekst-peco aperas la vorto “nacianoj”. Anstataŭ ĝi, la tradukinto estus povinta meti la vorton “gojoj” ĉar “gojo” estis aceptita de la PIV kun la sama signifo. Laŭ la PIV, ĝia signifo estas “ne-judo”. Se en la menciita teksto oni parolas pri nacianoj aŭ gojoj tria-persone estis pro tio ke tiel la parolanto kiel la aŭskultantoj estis judoj. Tio montras al ni ke Jesuo konsideris siajn sekvantojn kiel interna grupo de la judismo kaj ne kiel aparta religio. Sed en la realo ofte okazas ne-atenditaĵoj. La instruo de tiu profeto ne atingis egan sukceson en la juda mondo –post kelkaj jardekoj la judoj akceptintaj tiun mesaĝon estis forpelitaj el la komunumo de tiu popolo– kaj tamen ĝi iĝis religio kiu tre disvastiĝis, laŭlonge de kelkaj jarcentoj, en la gojaj medioj, en Oriento (Persujo) kaj ĉefe en la Romia Imperio, kie ĝi iam iĝis oficiala religio.

Nu, post tio kion ni vidis ke la instruo de tiu majstro enportis programon de radikala malsama socia modelo ol tiu ĝis tiam ekzistinta, supozeblas ke la progreso kaj disvastiĝo de tiu idearo devus renversigi la socian strukturon kaj konstitui novtipan soci-sistemon. Verdire, tia estis la plano de tiu profeto aŭ Mesio. Sian projekton li nomis "Dia Regno", "Ĉiela Regno", Regno kiu ne apartenas al ĉi tiu mondo, sed kiu devas esti konstruita ĉi-monde por ke la Dia volo fariĝu ĉi-tie samkiel en la ĉielo. Tamen, kromanfoje la idealo fiaskis. Sed ni devas klarigi kial okazis, kaj daŭre okazas, tiu fiasko en socioj kiuj "oficiale" akceptis ĝin kaj sin deklaris "kristanaj".

Por kompreni tiun paradoksan evoluon ni devas trastudi la kelkjarcentan procezon de enkondukado de la nova religio en la romian socion. Jes, "religio", ĉar kvankam Jesuo ne pretendis krei ian religion, sed nur perfektigi la praktikadon de la judismo, la fakto ke lia idearo diskoniĝis en la goja mondo, ne-monoteisma, igis ke oni pli atentis pri la kontraŭdiro inter la religiaj aspektoj de ambaŭ kulturoj. Tiele, en proceso de sinkretismo de la judismo de Jesuo kun aliaj malsamaj religioj formiĝis iu nova religio malsama ol la aliaj. Sed plej grava estis ke en la procezo perdiĝis esencaj ecoj de la evangelia mesaĝo. Tiorilate oni devas atenti pri tio ke multaj "eklezioj" organiziĝis antaŭ la ekkono de la evangeliaj tekstoj je kiuj ni disponas nun. Tiuj unuaj ekleziaj komunumoj estis organizitaj kaj regitaj de la apostolo Paŭlo kies epistoloj estis verkitaj inter la jaroj 49 al 56, kaj la evangeliaj tekstoj, tiaj kiaj ni konas nun, estis verkitaj inter la jaroj 70 al 100. Krome. Paŭlo ne konis persone Jesuon kaj interesiĝis neniom pri la historia figuro de la Majstro. Por li gravis nur la ideo de Jesuo Resurektinto kaj glore reganta en la ĉielo. Do, la Eklezio organiziĝis ne konante la Evangelion kaj sen ia klara ideo pri la maniero kiel oni devus, laŭ Jesuo, praktiki la regadon, uzi la povon kaj la aŭtoritaton. La evangelia instruo pri tiu temo estas:

***Vi scias, ke la regantoj de la nacioj kondutas kiel sinjoroj super ili, kaj iliaj granduloj ekzercas aŭtoritaton super ili. Ne tiel estos inter vi; sed kiu volas esti granda inter vi, tiu estu via servanto.***

Estas konate ke la regado en la Eklezio, kaj ĝenerale en ĉiu sfero de la kristana socio, organiziĝis laŭ la ĉiama modelo kaj ne laŭ la skemo aŭ spirito de Jesuo.

Alia miskompreno eklezia pri la afero de Jesuo estis pri la rolo kaj graveco de la ritaro aŭ ceremonialo en la ekleziaj asembleoj. Paŭlo organizis "domajn ekleziojn", kiuj kunvenadis en domoj kaj funkciadis laŭ la stilo de la romiaj familioj, t. e. la dom-mastro rolas kiel sinjoro kaj estro de la familio laŭ la dispozicio de la romia ĵuro, tute ne kiel servanto laŭ la ideo de Jesuo. Tiele, de tre frue instaliĝis en la Eklezio ia regadmaniero kiu tute ne rilatas kun la Evangelio. En tiuj primitivaj asembleoj la kristanoj de Paŭlo lernis la sinjorecon de Kristo tra la strikta praktikado de la ritaro, t. e. la ceremonioj de baptado kaj de celebrado de la Sankta Manĝo de la Sinjoro, kiuj iĝis sakralaj ritoj praktikataj laŭ strikta ceremonialo kaj en kiuj la virinoj silentas kaj ne povas interveni. Tiele oni reproduktas ne la kunvivadon laŭ la spirito de Jesuo sed la ritismon de la romia religio. Tia deformiĝo daŭre ekzistis ĝis nuntempe.

Jes, jam de tre frue perdiĝis, en la praktikado far la organizaĵoj de la sekvantoj de Jesuo-Kristo, esencaj elementoj de la instruo de tiu Majstro, kiuj, tamen, estis poste registritaj en la Evangeliaj tekstoj. Sed tiu instruo koncerne al la morala konscienco, pri kiu ni atentas nun, estis sufiĉe bone konsiderata kaj sekvata de la unuaj generacioj de kristanoj. Pri tio trafe atestas tiama dokumentaro kiun ni ekzamenos sekve. La Evangeliaj libroj mem, apartenas al tiu materialo ĉar ili estis verkitaj de tiuj unuaj kristanaj generacioj. La Evangelioj ne estas strikte historiaj libroj. Tiuj tekstoj entenas kolekton da memoraĵoj de personoj kiuj konis Jesuon. La kompilado de tiuj memoraĵoj ne sekvas historiajn kriteriojn sed teologiajn celojn. Neeviteble enŝoviĝis en la tekstojn legendoj, troigoj, nekredeblaj mirindaĵoj, sendube ankaŭ interpolaĵoj… sed la afero de la morala konscienco, pri kiu ni interesiĝas, la spirito de la instruo, estas klara. Kaj nun ni travidu ĝin.

En unu el la Evangeliaj tekstoj, konkrete en ***Luko 1, 51-53***, en himno kiu pretendas montri la rolon de la Mesio, oni klare vidas en kiu flanko de la klasbatalo situiĝas li:

***Li montris forton per Sia brako, Li dispelis fierulojn en la penso de ilia koro. Li malaltigis potenculojn de iliaj tronoj, kaj Li altigis humilulojn. Malsatulojn Li plenigis per bonaĵo, kaj riĉulojn Li forsendis malplenaj.***

La minaco kiun la Dia Regno signifus por la riĉuloj kaj ekspluatantoj estus evitebla nur se ĉi tiuj volonte rezignas la superabundecon por alveni al socio de egaleco, sen potenculoj kaj mizeruloj. Tia espero pri la rolo de la Mesio jam estis esprimita sepcent jarojn antaŭe fare de la profeto Cefanja, vidu ***Cefanja 3, 11-13***. Rilate al Jesuo, estas nedudeble ke la intrigo kiu kondutis lin al la morto estis lia teniĝo kontraŭ la riĉeco, la prirabado kaj la subpremado far la potenculoj.

***Kaj la Fariseoj ankaŭ, kiuj estis monavidaj, aŭdis ĉion tion, kaj ili lin mokis. Kaj li diris al ili: Vi estas tiuj, kiuj ŝajnigas sin justaj antaŭ homoj, sed Dio scias viajn korojn; ĉar kio estas altigita inter homoj, tio estas abomenaĵo antaŭ Dio. (Luko 16, 14-15)***

Pri iu riĉulo kiu sentis altiron al li kaj prikonsideris lin sekvi, la Evangelio diras:

***Kaj dum li foriris sur la vojo, unu homo kuris al li kaj genuis antaŭ li, kaj demandis lin: Bona Majstro, kion mi faru, por ke mi heredu eternan vivon? Kaj Jesuo diris al li: Kial vi nomas min bona? neniu estas bona krom Unu, nome Dio. Vi scias la ordonojn: Ne mortigu; Ne adultu; Ne ŝtelu; Ne parolu malveran ateston; Ne rabu; Respektu vian patron kaj vian patrinon. Kaj li responde diris al li: Majstro, ĉion tion mi observis detempe de mia juneco. Kaj Jesuo, rigardante lin, amis lin, kaj diris al li: Unu mankon vi havas; iru, kaj vendu ĉion, kion vi havas, kaj donu al malriĉuloj, kaj vi havos trezoron en la ĉielo; kaj venu, sekvu min. Sed li malgajiĝis ĉe tiu vorto, kaj foriris malĝoja; ĉar li havis multajn posedaĵojn. Kaj Jesuo***

***ĉirkaŭrigardis, kaj diris al siaj disĉiploj: Kiel malfacile tiuj, kiuj havas riĉon, eniros en la regnon de Dio! Kaj la disĉiploj miris pro liaj vortoj. Sed Jesuo, respondante denove, diris al ili: Infanoj, kiel malfacile estas por tiuj, kiuj fidas al la riĉo, eniri en la regnon de Dio! (Marko 10, 17-24)***

Alia diraĵo de tiu Majstro estis:

***Nenia servanto povas servi al du sinjoroj; ĉar aŭ li malamos unu kaj amos la alian, aŭ li aliĝos al unu kaj malestimos la alian. Vi ne povas servi al Dio kaj al Mamono! (Luko 16, 13)***

Ŝajnas ke la interna ideo de tiu evangelia instruo estas ke la mono de la riĉuloj estas maljusta, sed ne temas pri aserto ke la riĉaĵoj estis klare kaj konkrete rabitaj de tiuj kiuj posedas ilin ĉiumomente. La ideo estas ke la ekzistado de privataj riĉaĵoj, la klasisma strukturo de la socio, estas esprimo de maljusta sociordo.

La reago de la unuaj kristanaj komunumoj responde al la postulo de Jesuo rilate al la justeco estis kunposedi la propraĵojn ene de la komunumo.

***Kaj ili persistis en la instruo de la apostoloj kaj en la kunuleco, en la dispecigo de pano kaj en preĝoj… …Kaj ĉiuj kredantoj estis kune, kaj havis ĉion komuna; kaj ili vendis siajn havojn kaj posedaĵojn, kaj dividis ilin al ĉiuj laŭ ĉies aparta bezono. (Agoj de la Apostoloj, 2, 42. 44-45)***

Tia komuneco de posedaĵoj, kiu estis esprimo de kora komuneco, estis nomata de Luko ***«Koinonia»*** (Komunismo). Alia scio pri la praktikado far la unuaj kristanaj komunumoj estis tiu provizita de la t. n. ***Didakeo***, kiu, rilate al la kunposedado, diras :

***Ci kunhavas kun ciaj proksimuloj ĉion, kaj ci ne diros ke io estas cia propraĵo; ĉar se en la nekorupteblaj aferoj vi estas kunposedantoj, kion multe pli en la korupteblaj aĵoj.***

Tiuj unua kristanaj komunumoj estis konstituitaj de judaj sekvantoj de Jesuo. Ŝajnas ke kiam la kristanismo etendiĝis unue al la helena mondo kaj poste al la romia, la komuneco de posedaĵoj iĝis malpli strikta kaj la familioj konservis sian apartan posedaĵon, kvankam oni konservis la kutimon ke la posedantoj helpu la bezonantojn. Kiel regulado tiorilate estas en la dua epistolo de Paŭlo al la korintanoj jena paragrafo :

***Ĉar kie ekzistas la volonteco, ĝi estos akceptita laŭ la havo, ne laŭ la nehavo. Ĉar mi diras tion, ne por ke aliaj estu faciligataj kaj vi premataj, sed laŭ egaleco: via abundo nuntempe fariĝu por ilia manko, por ke ilia abundo fariĝu por via manko, por ke estu egaleco; kiel estas skribite: Tiu, kiu kolektis pli, ne havis superflue, kaj tiu, kiu kolektis malpli, ne havis mankon. (2-a Korintanoj 8, 12-15)***

Sed en la realo la aferoj ne tiel estis idealaj. Paŭlo mem per alia letero al la samaj korintanoj plendas pro tio ke en la celebrado de la Sankta Manĝo de la Sinjoro ĉiu formanĝas siajn proprajn nutraĵojn kaj dum iuj malsatas aliaj ebriiĝas. Ŝajnas ke iom post iom, laŭlonge de la tri unuaj jarcentoj, enkondukiĝis klasaj diskriminacioj en la kristanaj asembleoj. Evidentas ke, spite al la dekomencaj planoj aŭ intencoj de egaleco, la sklaveco ne estis elradikigita en la kristanaj komunumoj. Estas altsignifa la fakto ke Luko konservis en la menciita paragrafo de lia verko ***Agoj de la Apostoloj*** le priskribon de la komuneco de posedaĵoj (kaj de koroj) en la unua komunumo de Jerusalemo. Kiam la situacio de la komunumoj ekde kiuj li verkis estis jam malsimila kaj estis endanĝerigante la persiston de la aŭtenta kristanismo, Luko volis atentigi pri la graveco de la ***«Koinonia»*** kiel esprimo de la frateco kiu devus esti distinga signo de ĉiu kristana kolektivo. Tiutipa iompostioma burĝiĝo estas fenomeno sufiĉe ofta en la degradiĝo de la revoluciaj procezoj ; oni vidis multe el tio en la disfalo de la komunistaj reĝimoj de Orienta Eŭropo fine de la 20-a jarcento, kaj nun estas klare perceptebla en Ĉinio.

Alia fenomeno kiu damaĝas la revoluciajn procezojn estas la nescio kaj egoismo de la ekspluatatoj mem, t. e. la manko je historia memoro de la popoloj kaj ilia malkapablo ĝuste plitaksi la agadon de la revoluciuloj. Ankaŭ ĉi tiu fenomeno estis spertita en la unuaj kristanaj komunumoj. Ĝuantoj de situacio de egaleco kiun oni intencas establi kontribuas fuŝi la eksperimenton per sia malsolidareca kaj egoisma teniĝo. Vidu jenan paragrafon de alia epistolo de Paŭlo:

***Ni ordonas al vi, fratoj, en la nomo de la Sinjoro Jesuo Kristo, ke vi vin apartigu for de ĉiu frato, kiu iradas senorde kaj ne laŭ la tradicio, kiun oni ricevis de ni. Ĉar vi mem scias, kiel vi devas nin imiti; ĉar ni ne kondutis senorde inter vi; nek manĝis panon donace de iu, sed per laboro kaj penado, nokte kaj tage laborante, por ke ni ne fariĝu ŝarĝo por iu el vi; ne kvazaŭ ni ne havus tian rajton, sed por estigi nin ekzemplo antaŭ vi, ke vi nin imitu. Ĉar eĉ kiam ni estis ĉe vi, la jenon ni ordonis al vi: Se iu ne volas labori, tiu ankaŭ ne manĝu. Ĉar ni aŭdas, ke inter vi iradas senorde kelkaj, kiuj tute ne laboras, sed en ĉies aferojn sin enŝovas. Tiajn ni ordonas kaj admonas pro la Sinjoro Jesuo Kristo, ke kviete ili laboru kaj manĝu sian propran panon. Sed vi, fratoj, ne laciĝu en bonfarado. Sed se iu ne obeos al la parolo de ĉi tiu nia epistolo, rimarku tiun, kaj ne estu por li kamaradoj, por ke li hontiĝu. Tamen ne rigardu lin kiel malamikon, sed admonu lin kiel fraton.(Dua letero al la Tesalonikanoj 3, 6-15)***

Se en la homa naturo estas inklinoj kiuj malfavoras la progreson al la komunismo, en kio rilatas al la kristanismo ni devas atenti ankaŭ pri alia faktoro kiu efikis kontraŭ tiu procezo. Temas pri la sistemo mem kiun oni celis ŝanĝi, t.e. la klasa, sklavisma sistemo de la romia socio. La gvidantoj de tiu imperio komprenis ke se ili ne ŝanĝus la kristanan eklezion, ĉi tiu ŝanĝus la romian imperion. La rezulto de plurjarcenta kontraŭfrontiĝo inter tiuj du antagonismaj konceptadoj de la mondo konkretiĝis, en la kvara jarcento de nia erao, en la socian ideologian strukturon kiu pludaŭras ankoraŭ en la nuntempo spite al ĉiuj sociaj ŝanĝoj kaj konvulsioj okazintaj de tiam (kamparanaj ribeloj, Reformacio, Franca kaj Rusa Revolucioj…). Indas pristudi ĉi-ĉiujn okazaĵojn, kaj tion ni faros siamomente, sed unue ni vidu kiamaniere la romiaj imperiestroj sukcesis devojigi la kurson de la kristanaj organizaĵoj.

La ĉefa rezulto de tiu imperiestra operacio estis ke konvertiĝis en religion io kio komence kaj esence estis afero de komunisma kunvivado. Estas sufiĉe konata la fakto ke dum tiuj tri unuaj jarcentoj la kristanoj suferis persekutadon fare de la romia ŝtato. Sed, ĝenerale, ne estas klara ideo pri tiu afero. Oni devas klarigi ke tiu persekutado ne estis konstanta. Kaj kiam ĝi okazis, ĝi ne estis en ĉiuj lokoj, kaj krome ne okazais simile kaj samgrade ĉiuloke. La unua romia persekutado estis tiu okazinta sub la regado de Nerono (jaro 64).

En ĉi punkto ni devas atenti pri iu afero. La romianoj, kvankam tre rigoraj rilate al la konservado de la politika ordo en sia imperio, estis sufiĉe toleremaj koncerne al la religiaj aferoj. En ilia ampleksa imperio oni povis libere praktiki ĉiujn ajn religiojn kaj adori ĉiujn ajn diojn, ec la unusolan Dion de la monoteistaj judoj. Se ili detruis la templon de Jerusalemo en la jaro 69 estis pro tio ke okazis tie politika ribelo kaj armita rezisto en la templa areo. Kial, do, ili jam de tre frue komencis persekuti la kristanojn, kaj pludaŭrigis la persekutadon, kun soboj kaj soroj, dum pli ol du jarcentoj kaj duono? Tiu fenomeno surprizis la historiistojn kiuj okupiĝis pri la afero kaj oni ne alvenis al interkonsento pri la kialo. Eble estis pluraj kialoj. Unue, tial ke la kristanoj ne ĉeestadis religiajn ceremoniojn en la ekzistantaj temploj kaj dume ili havis nenian ajn templon, oni konsideris ilin malpiaj, anti-religiaj. Krome la fakto ke ili kunvenadis en partikularaj domoj kaj ne estis permesata la ĉeesto de ne-adeptaj homoj, igis ilin suspektindaj je konspirado kontraŭ la politika ordo. Fine, kaj eble ĉefe, la fakto ke ili havis esperon pri reveno de triumfanta Mesio kiu renversus la socian ordon kaj havis vivmanieron kontraŭante la ideologiajn valorojn de la socio, timigis la aŭtoritaton pri la efiko kiun tiuj doktrinoj povus havi sur la establitan ordon. La polico de la Cezaroj estis tre efika kaj lerta –male ne eblus al la imperiestra reĝimo kontroli tiel ampleksan imperion– kaj sendube ili trafe pritaksis la egan kapablon de tiuj kristanaj rondoj ŝanĝi la naturon de la romia socio. La oficialaj akuzoj kontraŭ tiuj sektoj estis formulitaj per la titolo "malamikoj de la homa speco". Tiu titolo havis en la tiama epoko la saman signifon kiel la nuntempa epiteto "kontraŭ-sistemuloj", "anti-sistemaj"…

Nu, la persekutado de kristanoj sub la regado de Nerono estas sufiĉe konata eĉ de ne-interesitoj pri historiaj aferoj tial ke iuj famaj filmoj okupiĝis pri la afero, sed ĝi eble estis la plej kurta-tempa kaj malgrava el la romiaj kontraŭ-kristanaj persekutoj. Krome ŝajnas ke ĝi okazis nur en Romo-urbo kaj ne en aliaj partoj de la imperio. Cetere la kristanoj tiam ekzistantaj ne estis multenombraj. La historiisto Suetonio fortraktas la aferon per nur unu aŭ du linioj:

***Li (Nerono) atakis la kristanojn, speco de homoj sinfordonintaj al superstiĉoj kaj sorĉoj.***

Krome, tiu aŭtoro, kiu prezentis unuflanke la laŭdindajn farojn de la imperiestro kaj aliflanke la abomenindajn, inkludis la atakon kontraŭ la kristanoj inter la laŭdindaj faroj. Suetonio verkis sian historion, ***La Dekdu Cezaroj***, tridek jarojn post la regado de Nerono, kiam la imperiestro Domiciano estis ordoninta la duan kontraŭ-kristanan persekuton. En la jaro 115, kiam estis okazante la tria persekutado, en la epoko de la imperiestro Trajano, estis verkita la ***Analoj*** de Tacito, en kiu oni provizas pli ampleksan informon pri la persekuto far Nerono. Post priskribi la incendion kiu detruis pli ol triono el la la urbo Romo kaj la malkontenton de la popolo, kiu atribuis la katastrofon al imperiestra ordono, la teksto de la ***Analoj*** diras:

***Sed nek per homa bonfarado, donacoj kaj malavaraj agoj far la princo, nek per la helpo-peto al la dioj, eblis malaperigi la famon ke la incendio estis provokita. Tial Nerono, por silentigi tiun fifamon kaj senkulpigi sin, akuzis pri ĝi kaj komencis puni per rafinitaj turmentoj iujn homojn malaprecatajn de la popolaĉo pro iliaj ekscesoj, ĝenerale nomataj kristanoj. La origino de tiu nomo estis Kristo, kiu, dum la regado de Tiberio estis mortpunita subordone de Poncio Pilato, prokuroro de Judujo; kaj kvankam tiam oni iome sufokis tiun nocivan superstiĉon, denove komencis reverdiĝi, ne nur en Judujo, devenloko de tiu malbonaĵo, sed ankaŭ en Romo, kien alvenas kaj celebras ĉiuj abomenidaĵoj ekzistantaj en la ceteraj lokoj. Do, komence estis arestataj tiuj kiuj publike praktikadis tiun religion, kaj poste, pro ties denuncoj, grandamaso, ne tiel pro la delikto de la incendio pri oni akuzis ilin, kiel pro tio ke ili malamas la homan specon. Al la justico kiun oni aplikis al ili oni aldonis la mokon kaj ofendon per kiuj ili estis mortigataj. Iujn oni survestis per feloj de sovaĝaj bestoj, tial ke tiamaniere la hundoj dispecigu ilin; aliaj estis krucumataj; aliajn oni metis sur grandajn ligno-stakojn, kiujn oni bruligadis noktiĝe por prilumigi la nokton. Nerono disponigis por tiu spektaklo siajn ĝardenojn, kaj li celebradis la cirkajn festojn; tie, vestita kiel kocero li sin miksis kun la popolaĉo por kundistriĝi kun ĝi, foje li kondukadis sian ĉaron, laŭ sia kutimo. Kaj tiele, kvankam la viktimoj estis kulpaj, ili inspiradis kompaton kaj grandan doloron kiel homoj kiujn oni mortigas tiel mizere, ne por publika profito, sed por kontentigi la kruelecon de unusola persono.***

Iuj nuntempaj historiistoj opinias ke Tacito metis en sian raportadon pri tiu temo elementojn apartenantajn al sia propra epoko kaj ne al la situacio de la epoko de Nerono, duonjarcenton antaŭe. Ja, la cirkaj spektakloj de la turmentado kaj mortpuno de la kristanoj kongruas kun la stilo de Nerono, sed la tiamaj kristanoj ne estis grandnombro kiel Tacito asertas, kaj krome dubindas ke oni konus ilin per la termino "kristanoj" ĉar tiam ili ankoraŭ ne estis facile distingeblaj el la judoj. Krome, la fakto ke la oficiala propagando kaj grandparto el la popolanoj esprimis malaprecon pri la kristanoj, kaj ke, tamen, multaj personoj sentis kompaton pri la kondamnitoj, ŝajnas pli propraj el la epoko de la regado de Trajano, kiam la ***Analoj*** de Tacito estis verkita.

Fakte, Trajano estis perpleksa antaŭ la afero de la kristanoj. Oni konstatas per la konata korespondado de tiu imperiestro kun iu el siaj provincaj guberniestroj, Plinio, ke li estis malkontenta kaj maltrakvila pro la progreso de la kristanismo sed samtempe li multe dubantis pri la efikeco de la persekutoj al la anoj de tiu religio.

Ja, la kristanaj martiroj altiradis simpation de multaj personoj kaj intereson pri sia religio. Tio ne estas strange: la kristanismo kaj aliaj religioj devenintaj de Oriento, kiel la mitraismo kaj iuj egiptaj kultoj, venis plenigi religian vakuon ekzistantan en la romia imperio ĉar la grek-latinan mitologion ne alportis la esperon pri transcendeco kiun la homa estaĵo emas. Sed tiuj aliaj orientaj religioj rezultis, por la imperiaj aŭtoritatoj, pli akcepteblaj ol la kristanismo ĉar ties anoj ne rifuzadis partopreni en la kulto al Romo kaj ĉi-ties imperiestroj. La kristanoj, male, tute ne konsentis plenumi la ceremoniojn de la imperian kulton, kaj tio gajnis al ili famon je anti-patriotismo.

Laŭ la pasado de la tempo pliakriĝis tiu kontraŭdiro. La nombro da kristanoj senĉese kreskadis ĉu estus okazante persekuto aŭ ne, kaj la romiaj aŭtoritatoj pli kaj pli iĝis suspektemaj pri tiu kreskanta parto el la loĝantaro de la imperio kiu malŝatis la sangajn spektaklojn de la cirko, ne sentis inklinon servi en la armeo kaj obstine rifuzadis ĵuri lojalecon al Romo kaj ĉi ties imperiestroj. En la jaro 250, en cirkonstancoj de malfacila situacio por la imperio: ofensivo de la barbaraj popoloj en la imperiaj limoj kaj krizo de aŭtoritato en la interno de la socio, la tiama imperiestro, Decio, entreprenis politikon celantan restarigi la forton de la ŝtato alfrontante la eksteran minacon kaj stimuli la publikan piecon laŭ la tradiciaj kriterioj de la romia socio: la ŝtata religio kaj la antikvaj kultoj. Tiucele la imperiestro Decio promulgis edikton ordonante ke ĉiuj loĝantoj de la imperio faru oferon al la dioj de Romo «por la sekureco de la imperio». Por la kristanoj tiu ceremonio estis tute ne akceptebla ĉar implicis idolecan adoradon. Rezulte de tio komenciĝis, kontraŭ tiu religio, nova persekutado en kiu mortis multaj kristanoj kaj ties episkopoj, inkluzive tiu de Romo. Eble ankaŭ la judoj estis persekutataj tiam pro la sama kialo, sed oni ne disponas je historia informo pri tio. Ĉi tiu kontraŭ-kristana persekuto estis eble pli intensa kaj ĝenerala ol la antaŭaj, kaj plenumata en la tuta imperio, sed ĝi ne estis longdaŭra ĉar en la jaro 251 la imperiestro Decio mortis batalante apud la Danubo kontraŭ la gotoj, kaj lia sukcedinto restarigis la situacion de religia toleremo en la imperio.

Sed simila persekutado kontraŭ la kristanoj estis dekretita sep jarojn poste, en 257, far la imperiestro Valeriano. La krizo de la imperio, pro internaj kaj eksteraj problemoj, estis pliintensiĝinta, kaj en tiaj cirkonstancoj ĉiam oni serĉas kulpulojn. La oficialaj kialoj kaj la disvolviĝo de la persekatado en tute similis al tiuj de la regado de Decio. Estis multaj martiroj en la tuta imperio, ĉefe inter la presbiteroj kaj episkopoj. Du episkopoj de Romo, Stefano kaj Siksto la 2-a, estis mortigataj. Ankaŭ ĉi-foje la daŭro de la persekuto ne estis granda –malpli ol du jaroj– kaj finiĝis similmaniere kiel tiu de Decio: la imperiestro Valeriano, batalante en Persujo, estis kaptita de la malamikoj de la imperio, kaj ties filo kaj sukcedinto, Galieno, metis finon al la kontraŭkristanaj dispozicioj.

De tiam sekvis por la kristanoj la plej longa periodo de religia tolero en la romia imperio: 44 jaroj, ĝis la regado de Diokleciano. Ĉi tiu imperiestro komence ne estis favora al la reigo de tia politiko. Fakte, dum la unuaj dek jaroj de lia regado li dediĉiĝis serioze kaj efike solvi la problemojn (kaj internajn kaj eksterajn) de la imperio, kiuj estis tre gravaj dum tiu periodo kiun la historiistoj nomis «militista anarkio» tial ke multaj generaloj sin proklamis imperiestroj en la provincoj kontrolataj de ili. En la jaro 299 Diokleciano prenis severajn dispoziciojn kontraŭ kristanoj, sed nur kontraŭ la maniĥeanoj, kiuj estis malgranda kristana sekto en la romia imperio. Tiutipaj kristanoj estis pli multenombraj en Persujo; eble la suspektemo pro la fremda origino de tiu sekto estis la kialo de la persekutado dekretita de Diokleciano. Sed kvar jarojn poste, en 303, li etendis la ŝtatan atakon kontraŭ ĉiuj ceteraj kristanoj de la imperio. La historiistoj de la epoko asertas ke por la preno de tiu decido incitis Dioklecianon sia kolego Galerio. Tio devigas nin klarigi ke tiu imperiestro, por la plej efika demarŝado de la administrado kaj la defendo de la imperio nomumis tri kolegojn por kunregadi kun li; tiun sistemon estis nomita tetrarkio (kvarpersona regado). Tiu sistemo bone funkciis dum la regado de Diokleciano, ĉar liaj kolegoj fidele apogis lin, sed poste ĝi krizis en la sekva generacio, kiam la sukcedintoj kaj heredintoj de la imperiestraj kolegoj interbatalis konkurante por la absoluta povo de la imperio. La interesitoj pri tiuj historiaj eventoj kaj cirkonstancoj disponas je abunda informo pri tiuj temoj en la historiaj libroj, Interreto... En la esperanta lingvo estas interesa artikolo de Sergio Pokrovskij, en la revuo ***LA ONDO de Esperanto***, numero 2013-6, kaj en la ret-adreso: http://esperanto-ondo.ru/Diverse/224pokr.htm



Martirigo de kristanoj

Ni okupiĝos pri la temo nur laŭmezure ke ĝi rilatas al la afero kiun ni pritraktas.

Tiu nova persekuto estis same kruela, kaj pli longdaŭra ol la antaŭaj (8 al 9 jaroj) kaj okazis en la tuta imperio samkiel tiuj de Decio kaj Valeriano. Oni devas klarigi ke la nombro da kristanoj estis multe pli granda en la orienta parto de la imperio. En Okcidento, esceptante Romon kaj iujn partojn de norda Afriko, la kristanismo ne estis tre disvastigita. Iu karakteraĵo kiu distingas ĉi tiun persekuton el la antaŭaj estis ke ĉi foje estis multaj apostatoj, t. e. homoj kiuj, pro timo al turmentoj kaj la morto, konsentis plenumi la religian ceremonion de la imperia kulto kiu signifis rezigni sian kristanecon. Eĉ iu episkopo de Romo, Marceleno, kaj eble ankaŭ aliaj kiuj sukcedis lin, falis en tiun kovardecon.

Nuntempaj historiistoj kalkulas ke en tiu epoko la kristanoj nombris, proksimume, 8 procente el la 90 milionoj da loĝantaro de la imperio. Eble tiu pritakso estas ĝusta, sed oni devas fari iujn precizigojn. Unue, tre multaj el la konvertitoj al la kristanismo ne estis ricevinte tiun bapton kiu signifas la formaligon de la aparteno al la nova religio. Kial okazis tiu strangaĵo? La problemo estis la duobla rolo de tiu sakramento. Ĝi estis/as kaj puriga kaj inica rito, t. e. ceremonio per kiu oni forviŝas la pekojn de tiu kiu ricevas ĝin kaj samtempe per ĝi oni efektivigas la eniron de la neofito en la kristanan religion. Kiel inica rito estus sensencaĵo ripeti la baptadon, sed kiel peko-pardona sakramento ĝia ripetado fariĝis necesa ĉar la homoj pekadas ankaŭ post sia ekkristaniĝo; la reptilia cerbo de la personoj daŭre plu funkcias ĉu ili estis baptitaj aŭ ne. Tamen en tiuj unuaj jarcentoj, male ol nuntempe, ne ekzistis alia(j) sakramento(j) por tiu funkcio de pekpardonado. Tial multaj kristanoj prokrastigis sian baptadom ĝis horo tre proksima al sia morto.

Alie, rilate al la 92 procento el la paganoj, t. e. la ne-kristanaj romianoj, multegaj el ili ankaŭ ne sentis malamikecon al tiu religio. Verdire, konsiderinda parto el la loĝantaro de la imperio sentis simpation kaj altiron al la religia afero de tiuj homoj kiuj kondutadis humanece kaj alfrontadis torturadon kaj martirecon. Ne malofte multaj paganoj, en okazoj de neceso, danĝero aŭ simpla devoteco, kiam ili preĝadis al la dioj, ili miksadis la nomon de Kristo kun tiuj de dioj de aliaj religioj. Tiele, eĉ se senkonscie, la popolo jam estis enkondukinta Kriston en la panteonojn de la greklatina, la egipta kaj aliaj religioj. Ekzemple, la maniĥeanoj, kiujn ni difinis supre kiel kristana sekto, reale, estis sinkretismo de kristanismo kun iuj persaj ritoj kiel la zoroastrismo. Tio eksplikas ke ĉi-foje, la persekuto dekretita de la imperiestraj kolegoj ne ĝuis grandan simpation inter la popolaj amasoj. Foje okazis ke la publiko ĉeestanta la cirkan spektaklon de martirigo de kristanoj plendis pro la krueleco de la turmentoj kaj postulis la ĉeson de la punoj. Multaj lokaj aŭtoritatoj en la provincoj de la imperio anstataŭis la mortpunon de la kristanoj per mon-punoj. En urboj kie la nombro da kristanoj estis granda, ili tute ne estis ĝenataj; la lokaj aŭtoritatoj simulis akcepti obei la imperiestrajn ordonojn, kaj Diokleciano kaj Galerio simulis kredi tion. La tagon, kiam Diokleciano publikigis sian dekreton kontraŭ la kristanoj, lia palaco en Nikomedio estis dufoje incendiita. Verŝajne plejparto el la palaca servistaro estis kristana. Estis kristanaj ankaŭ la fratino, la edzino kaj la filino de Diokleciano. Alia signo de la ŝanĝo okazinta en la imperio pri tiu afero de la kristanismo dum tiuj jarcentoj estas la ŝanĝo de la teniĝo de la tiamaj historiistoj kiuj raportis pri la persekutoj. Suetonio kaj Tacito sin tenis malamikece al la kristanoj respegulante la oficialan pozicion kaj la inklinon de la popolaj amasoj de ilia epoko. Tamen, la historiistoj de la komenciĝo de la 4-a jarcento, kiel Laktancio kaj Eusebio de Cesarujo, estis kristanoj kies favora teniĝo al la nova religio respegulis la tiaman teniĝon de la amasoj kaj tiun kiun estis alprenante ankaŭ la aŭtoritatoj.

Diokleciano abdikis en la jaro 308 kaj Galerio sukcedis lin kiel ĉef-imperiestro. Abdikis ankaŭ la aliaj du kolegoj de Okcidento kaj estis anstataŭitaj de iliaj filoj. Galerio kaj sia Cezaro daŭrigis la persekutadon kontraŭ la kristanoj en la orienta parto de la imperio, sed la junaj Cezaroj de Okcidento Konstanteno kaj Maksencio estis favoraj al la nova religio kaj ĉesigis ĝian persekutadon en iliaj teritorioj. Okazis inter la kolegoj (tiam estis ne kvar, sed ses) malakordoj pli gravaj ol la diferencoj pri religiaj aferoj. Okazis inter ili militaj konfliktoj kiujn ni ne priskribos kaj kiuj okazigis ŝanĝojn en la etato de la tetrarkio. En la jaro 310 oni alvenis al ia interakordo, eĉ se provizora, inter kvar el la tiamaj kolegoj: Galerio, Konstanteno, Licinio kaj Maksimeno. En ilia interakordo estis ankaŭ dispozicioj rilate al la kristanoj. Galerio rezignis pri la persekutado kaj subskribis kune kun Konstanteno kaj Licinio la t. n. «Toleredikto de Nikomedio» per kiu oni rajtigis ĉiujn loĝantojn de la imperio libervole praktiki ĉiun ajn religion. Oni invitis Dioklecianon aldoniĝi al tiu toleremo sed la maljuna eksimperiestro volis scii nenion pri tiu aŭ iu alia politika afero. Li mortis la sekvintan jaron (septembro de 311). Maksimeno ne konsentis pri la toleremo al la kristanoj kaj daŭrigis la persekutadon. Galerio ne multe postvivis; li malsaniĝis kaj mortis eĉ kelkajn monatojn antaŭ ol Diokleciano (aprilo de 311). Menciindas ke kiam oni anoncis al la popolo la malsanon de la imperiestro, laŭ la kutimo de la epoko, oni petis ke oni preĝu por lia sano, kaj en la listo de la dioj al kiuj oni petis preĝi, apud la nomo de Asklepio kaj aliaj dioj oni metis ankaŭ la nomon de Kristo. Estas kurioze ke 14 jarojn antaŭ la eklezia Koncilio de Niceo, en kiu oni proklamis la dogmon de la dieco de Jesuo-Kristo (dogmo kiun multaj kristanoj rifuzis akcepti dum kelkaj jarcentoj), iu pagana imperiestro kiu ĝis tiam persekutis la kristanojn, fakte asignis al Kristo


Tetrarkio; la imperiestraj kolegoj

saman diecan rangon kiel aliaj figuroj de la ŝtata panteono de la imperio.
En 313 Konstanteno kaj Licinio per la t. n. «Edikto de Milano» plibonigis la situación de la kristanoj; oni decidis redoni al ili la propraĵojn konfiskitajn dum la pasinta persekutado kaj oni permesis al ili havi proprajn templojn por ilia kulto. Rezulte de la malakordo kaj militaj konfliktoj kiu poste estiĝis inter la kolegoj, dek jarojn poste, en 324, mortigitaj aŭ elpostenitaj la ceteraj Cezaroj, Konstanteno restis kiel sola imperiestro. De tiam li tre favorigis la plifortiĝon de la kristana religio kaj kiam estis malakordo en la Eklezio pri teologiaj aferoj li kunvokis kaj prezidis koncilion por okupiĝi pri la afero. Li implikiĝis en tiaj teologiaj aferoj; la koncilio aprobis dogmon kiun li mem proponis. Kristanaj episkopoj estis nomumitaj de la imperiestro por influaj regadpostenoj; tio stimulis multajn senatanojn kaj aliajn romiajn gravulojn kristaniĝi. Konstanteno estis baptita fine de sia vivo; same okazis kun lia filo kaj sukcedinto Konstanco. Kvankam poste alia imperiestro volis renversi la situacion de kreskiĝo kaj influo de tiu religio, tio rezultis vane. Fakte, en la romia imperio la kristanoj ne suferis aliajn persekutojn krom tiujn kiujn ili mem faris unuj la aliajn pro pridogmaj malakordoj, ekzemple kaze de la arianismo.
En la lasta jardeko de tiu 4-a jarcento, la imperiestro Teodozio deklaris la kristanan religion oficiala de la imperio kaj proskribis la paganajn kultojn. Tiam jam multe estis kreskinta la anaro de la kristana religio. Por la novbakitaj kristanoj la ŝanĝo apenaŭ estis perceptebla. La tiama kulto de la Eklezio ne multe malsimilis al tiu de la ceremonioj de la pagana romia kulto. La Eklezio festas tiun ŝanĝon kiel grava historia venko sed, verdire, estis la imperio, ne la kristanismo, la venkinto de tiu plurjarcenta lukto. Ni vidis ke la religiaj ceremonioj de la kristanoj neniam estis asembleoj de egaluloj. Jam dekomence ili alprenis formon de la romiaj familiaj kunsidoj, sed post la oficialigo de la kristanismo la afero eĉ pli malboniĝis. De tiam la celebrado de la Sankta Manĝo, nun konata kiel "meso", tre similis al la kulto de la antikva pagana religio de la imperio. Unue, tiuj ceremonioj jam ne plu okazis en privataj lokoj kiel antaŭe sed en temploj similaj al la paganaj, ofte en la samaj paganaj temploj akceptitaj por la kristana kulto. Ja, ekde la epoko de Konstanteno, la kristana kulto komencis esti celebrata en bazilikoj. La romia baziliko, de tre antikve, estis ejo de kulto kaj religia kaj civila: la paganaj temploj, la salono de la trono de la imperiestro aŭ de aliaj magistratanoj, la justicaj tribunaloj… Ĉiuj ili havis la bazilikan formon kaj skemon, kaj en ĉiuj ili la loko de la aŭtoritato estis la absido de la baziliko, t. e. la trono de la imperiestro, la altaro de la templo, la katedro de la juĝisto... La kristanoj alprenis por sia kulto tiun bazilikan skemon kaj situigis la altarejon en la absido. Tiu fakto estas grave konsiderinda ĉar ĝi simbolis alian fakton, nome ke samtempe la eklezia institucio organiziĝis hierarkie kaj komencis adori la povon, ĉar la bazilika absido signifas ĝuste tion: la povo, la aŭtoritato, la katedro, la instruorajto, la kapablo dikti normojn kaj apliki punojn... Ankoraŭ nuntempe la kristanaj mesoj tute ne estas asembleoj de egaluloj kie ĉiuj ĉeestantoj povas interveni: ekde la absida altarejo nur la pastro povas konsekri, prediki, admoni... Do, la dediĉo de la baziliko de Laterano por la kristana kulto, okazinta dum la regado de Konstateno, estis grava dato por la eklezia institucio, sed fatala por la kristanismo, por la asembleo de la sekvantoj de Jesuo. Tiu faro signas la komenciĝon de la geedzeco, aŭ pli ĝuste konkubeco, de la Eklezio kun la politika povo. La povo instituciiĝis ankaŭ interne de la eklezia organizaĵo. La ĝermo jam ekzistis dekomence sed ekde la epoko de Konstateno, ĝi fariĝis oficiala kaj esenca elemento de la organizaĵo, kaj de tiam la afero evoluis al la monarkisma formo de la papeco.
Alia deformiĝo de tiu institucio estis la dogmismo. Ni jam menciis ke la dogmo de Niceo ne estis akceptita de multaj kristanoj, kiujn de tiam oni nomis "arianoj". Poste estis aliaj koncilioj, kiuj proklamis aliajn dogmojn, kaj estis pluaj skismoj. De tiam estis pluaj persekutoj al kristanoj sed ili estis faritaj ne de la romia povo sed de la kristanoj mem, kiuj sin persekutis unuj la aliajn pro teologiaj disputoj. Vane oni serĉu en tiu(j) eklezio(j) la karitaton kiu devus esti ilian distingan signon. Alia signo, kiel la komunista vivmaniero, de tiam estis praktikata nur de la "ebionanoj", malgrandaj judkristanaj sektoj kiuj tiam, komence de la kvina jarcento, estis komencante malaperi.
Estas konata la historio de la lastaj 17 jarcentoj. La romia imperio disfalis sed tiu kristana Eklezio heredis ĝin kaj persistis kiel kuratoro de la nova socio kiu naskiĝis por anstataŭi ĝin. La nova socio konservis multajn el la putraĵojn de la romia socio: sklavismo, feŭdismo, malegaleco, interklasa ekspluatado, subpremado, despotismo. Tiel do, kiel ni pritaksu la bilancon de la efiko de la nova religio? Ĉu temas pri kompleta fiasko? La respondo estas: kaj jes, kaj ne. La procezo de progreso de la civilizo daŭre estas malrapida. Sed la nova elemento, la altruismo (morala konscienco, karitato, homaranismo…) estas tie, kiel neinvitita entrudiĝinto en la klasbatalon, kiel neevitebla ingredienco konkurante kun la homa egoismo kaj la krueleco. La historio de la du lastaj jarmiloj estas la interfrontiĝo de ambaŭ antagonismaj homaj sentoj. La batalo inter ambaŭ impulsoj okazadas ĉiunivele en la socio, sed ankaŭ interne de la konscienco de ĉiu homo. Sen la ekzisto de la altruisma sento estus nekomprenebla la apero de egaj sociaj ideologiaj ŝanĝoj okazintaj en la Okcidenta civilizacio: Reformacio, Revolucioj (Angla, Franca, Rusa…). Kaj sen la persisto de la plej bestecaj inklinoj de la homa naturo estus nekompreneblaj la perforto kaj la troigoj okazintaj en la menciitaj sociaj movadoj.
La historio de la lastaj jarmiloj estas la disvolviĝo de la interagado de tiuj kontraŭaj homaj inklinoj. Ĉu fine venkos la morala konscienco? Ni esploros tiun eblecon, sed dume ni ne forgesu ke tiu sento estas nura subjektiva faktoro, kaj ke la procezo de la homa liberiĝo ĉiam estas problema afero se ne kunlaboras la objektivaj faktoroj. Do, nun ni devas atenti ankaŭ pri la maniero kiel evoluis la objektivaj faktoroj (la progreso de la sciencio kaj la tekniko) dum la lastaj du jarmiloj.

# Meza kaj Moderna Epokoj: La lanta treniĝo de la Historio



Ĉirkaŭ la jaro 75 mortis Herono de Aleksandrio. Li estis fama personulo de la fama biblioteko de tiu urbo. Pri li oni scias ke estis grava fizikisto kaj matematikisto. Kiel matematikisto li pristudis fomulojn por la kalkulado de areoj kaj volumenoj. Surbaze de proceduroj elprenitaj el la babilonoj kaj la egiptoj, li disvolvis teknikojn por la kalkulado de kvadrataj radikoj. Kiel fizikisto li verkis multenombrajn traktatojn pri mekaniko, hidraŭliko kaj aŭtomatismo (robotiko), kaj inventis kelkajn ilojn, tre novecajn por tiu epoko: la teodolito, uzata por mezurado de horizontalaj kaj vertikalaj anguloj, la odometro aŭ paŝ-kalkulilo, kaj pli grave, vapormaŝino. Lia apliko de la vapor-forto konkretiĝis en aparatoj aŭtomate moviĝantaj, kiuj restis kiel ludiloj por salonaj spektakloj. La samtempanoj de Herono ne perceptis la gravecon de tiu invento kiu, 18 jarcentojn poste, estus bazo de industria revolucio kiu radikale ŝanĝus la homan labor- kaj viv-manieron. La romia socio ne ĝuste pritaksis la kapablon de tiuj inventoj kaj de la Aleksandria Biblioteko en kies kadro generiĝis tiu scienco kaj tiaj sciencistoj. Romo kaj ties imperio estis kreaĵo de militista forto. La herooj de tiu socio estis homoj kiaj Aleksandro la Granda, Scipiono, Julio Cezaro, Trajano k. s., ne scienculoj kiaj Arkimedo, Herono, Pitagoro… Tio kondamnis tiun socion kaj ties imperion ne prosperi en la teknika tereno kaj resti stagnita civilizacio sen ebleco evolui.

La malapero de tiu imperio, ekde la 5-a jarcento en Okcidento, rezultis eĉ pli fatala por la kulturo. La miljara persisto de la Orienta parto de la imperio solvis nenion tiurilate. La historiisto nomas "Bizanco" tiun orientan romian imperion, kaj la adjektivo "bizanca" estas sinonimo de troa kompleksa administracio kaj burokrateco, ega ceremoniaro, senutila diskutado… Ĉio sugestas ideon de ne-evoluanta, konservema socio. Ja, estis iu bizanca imperiestro kiu ordonis detrui, en la jaro 391, (tria- aŭ kvara-foje en la romia epoko) la Bibliotekon de Aleksandrio. Kelkajn jarojn poste estis masakrita en tiu urbo la sciencistino Hipatia far iu fanatika homamaso verŝajne instigita de la episkopo Cirilo, promocianto de stultecaj dogmoj. Evidentas ke la tiama malamikeco de la kristanismo kontraŭ la scienco estis religia reago kontraŭ la paganismo. Tial ke la ĝis tiam akirita grado je scienca kono estis atingita dum la antaŭkristana epoko, oni ne-saĝe establis rilaton inter la scienco kaj la paganismo. Do, oni pensis ke por certigi la triumfon de la monoteismo oni devus sufoki la sciencon. Tiu mensa skemo persistis dum pluraj jarcentoj kaj manifestiĝis ankaŭ en alia monoteisma religio kiu poste floris en la sud-orienta zono de la Mediteraneo. Ja, la unuaj generacioj de la islamismo tiel estis fervoraj kontraŭsciencaj kiel la kristanaj. En la jaro 642, kiam la muzulmanoj eniris en Aleksandrion, post 14-monata sieĝo, detruis la lastajn restaĵojn de la Biblioteko. Oni devas juste agnoski ke, pasinte la furoro de ilia komenca etapo, ambaŭ religioj aplikiĝis rekuperi, konservi kaj diskonigi la kulturan materialon de la antikva civilizacio.

Se, temante pri la klasbatalo tra la historio, ni tiel multe atentas pri la disvolviĝo de la kulturo kaj la aplikado de la scienca progreso al la produktado estas pro tio ke tiu progreso tre influis, post unu jarmilo kaj duono, en la konkero aŭ atingo de tre gravaj celoj de la subpremitaj klasoj batalantaj por sia liberiĝo. Tamen tiu progreso estis tre malrapida kaj krome ne konkretiĝis en ĉiuj homaj civilizacioj. La scienc-teknika progreso kaj la revolucioj (industria kaj politikaj) kiujn ĝi generis kulminis en la geografia areo de Okcidenta Eŭropo kvankam poste etendiĝis de tie al aliaj terzonoj. Tial ni ĉefe okupiĝos pri la soboj kaj la soroj de la kulturo en tiuj teritorioj de Eŭropo kiuj iam konstituis la Romian Imperion de Okcidento.

Kiel sciate, tiu imperio disfalis dum la Orienta pluvivis ankoraŭ dum jarmilo. La ruino de la Okcidenta Imperio estis rezulto de invado de la t. n. barbaraj popoloj, ĉefe germanaj. Ne estas la celo de ĉi raporto esplori kaj klarigi kiel eblis ke malevoluintaj popoloj sukcesis detrui potencan imperion, kiu krome, estis formiĝinta kaj konserviĝinta dum longa etapo de preskaŭ senĉesa militado. Inter la multaj kialoj kiujn la historiistoj prezentas pri tiu fenomeno eble pli pravas tiuj kiuj atribuas la superecon de la barbaroj al la demografia febleco de la romia socio. Sed, ĉiukaze, por ni gravas nur la fakto ke la socio de la Romia Imperio estis anstataŭita de alitipaj soci-politikaj entoj. Kaj la anstataŭo okazis, jes ja, pere de militado. Sed, ni klarigu ke tiu militado tute ne povas esti konsiderata "klasbatalo"; ne temis pri interklasa, sed pri interetna, batalado. Klasbatalo estas la konfliktoj okazantaj inter la sociaj klasoj de strukturita socio. Sed la interetna batalo temas pri la plej antikva

kontraŭdiro de la homaro, tiu kiu estiĝas inter homaj komunumoj kiuj konkuras por la vivrimedoj (la teritorio kaj ties resursoj). En la kazo de la interfrontiĝo de Romio kun la barbaraj popoloj, kaj de iuj barbaroj kontraŭ aliaj, ĉiuj ili havis siajn proprajn klasojn kaj interklasajn kontraŭdirojn, sed ĉi tiuj ludis nenian rolon en la procezo de disfalo kaj malapero de la romia socio kaj imperio. Sed post la venko de la malnova socio kaj establiĝo de la novaj, kiam la venkintoj rolis kiel superregantoj kaj la venkitoj iĝis subpremitoj, tiam, jes ja, oni povas temi pri klasbatalo kaj pristudi la klasbatalan dinamikon de la novaj socioj. Tion ni faros, ripetante, denove, ke la procezo estis longdaŭra kaj ties progreso malrapida.

La procezo de formiĝo de la novaj nacioj estis lanta ĉar kelkaj faktoroj kontraŭstaris ĝin. Al la fakto ke temis pri tre diversaj etnoj kaj kulturoj kun malsama grado je klereco aldoniĝis ankaŭ la religiaj diferencoj. En Gaŭlujo, poste nomata Francio pro la nomo de franca gento kiu konkeris kaj okupis tiun teritorion, la kristaniĝo de la novaj mastroj de la lando kulminis nur fine de la 5-a jarcento. En Britio, la kristaniĝo de la anglosaksoj kiuj detruis la romian povon en la insulo ne kulminis ĝis la 7-a jarcento, kaj poste la etnia kaj religia asimiliĝo komplikiĝis, en la 9-a jarcento, pro la alveno de nova invadanta popolo: la normanoj. La novaj mastroj de la Iberia duoninsulo estis la visigotoj, kiuj jam estis kristanoj kiam ili alvenis ĉi-tien kaj detruis la romian povon, sed ilia kristanismo estis malsama ol tiu de la hispan-romianoj de la lando ĉar ĉi tiuj estis katolikoj dum la gotoj estis arianoj. La religia unuiĝo en tiu socio ne okazis ĝis la fino de la 6-a jarcento, kaj eĉ tiam ĝi ne estis kompleta. Krome en tiu teritorio persistis dumtempe ioma ĉeesto kaj okupado far bizancaj trupoj ĉar la Romia Imperio de Oriento, post la disfalo de la Okcidenta parto de la Imperio volis rekonstrui la romian povon kaj havis ian sukceson en iuj lokoj: Hispanio, NordAfriko, Italio… En Italio, krom la zonoj kontrolitaj de Bizancoj estis ankaŭ zonoj sub la povo de barbaraj popoloj kiel la gotoj kaj la longobardoj, kiuj krome estis arianoj fronte al la katolikismo de la italoj kaj bizancianoj.

Se la homogeniĝo de la novaj, post-romiaj, socioj estis malfacila kaj malrapida, la procezo plikomplikiĝis, kiel dirite, post la 8-a kaj 9-a jarcentoj pro la okazado de pluaj popolaj migradoj kaj invadoj: normanoj, araboj, madjaroj… Ankaŭ la imperio de Bizancio suferis premon kaj invadojn, de-sude far la araboj kaj de-norde far la slavoj. Estis pluaj jarcentoj de interetnaj, interkulturaj kaj interreligiaj kontraŭfrontiĝoj. La rezulto de la nova homogeniga procezo estis iome paradoksa en kio rilatas al la religiaj diferencoj. La invadintoj kiuj venis de-norde kaj de-easte (normanoj, slavoj kaj madjaroj) estis paganaj, do tre malproksimaj de la kristana religio de la terzonoj kiujn ili invadis. Male, la araboj estis adoptinte, de antaŭ tri jarcentoj, la islamismon, kiu estis monoteisma religio tre proksima al la judismo kaj la kristanismo el kiuj ili inspiriĝis. Do, teorie, la religia asimiliĝo de la muzulmanoj devus esti pli facila kaj rapida ol tiu de la nordaj popoloj, sed, paradokse, okazis ĝuste male. La madjaroj, la slavoj kaj la normanoj facile kaj relative rapide kristaniĝis dum la islamismo de la arabaj kaj aliaj popoloj daŭre persistas ankoraŭ nuntempe kaj ŝajnas radikale neasimilebla por la okcidenta kulturo. Kial okazis/as tiu fenomeno?

Ja, tiu afero ne rekte rilatas kun la temo de la klasbatalo pri kiu ni atentas, sed ĝi iome vekas nian intereson tial ke la scienc-teknika progreso kiu tiom multe kontribuis ŝanĝi la kondiĉojn kaj la rezulton de la klasbatalo disvolviĝis ĝuste en tiu civilizacio kiun la paganaj popoloj bonvolis akcepti dum rifuzis ĝin la islamanoj. Nu, la unuaj akceptis la kristanan religion kaj kulturon tial ke ili perceptis la superecon de la civilizacio kiu formiĝis ĉirkaŭ la Mediteraneo. La kazo de la mahometanoj estis tute alia. Ili, ja, startis de la religia kulturo de la jud-kristana Biblio kaj konsideris ke la aliaj religioj de tiu Libro estis sufiĉe respektindaj, sed, samtempe, ili konsideris sin mem kiel superintoj kaj perfektigintoj de tiuj bibliaj religioj, t. e. ili konsideris/as ke sia islama religio estas ia post-judismo kaj post-kristanismo kiu plibonigis ĝiajn modelojn. Do, laŭ tiu penso la religia evoluo devus sekvi la kurson de alpreno de la religio de la Korano far la tuta mondo, kaj ilia religio, ja, promesis/as al ili tiun venkon. Vidate de la nuntempa situacio de la mondo oni povus taksi ke estis pli trafa la elekto de la nordaj paganaj popoloj kiuj kristaniĝis ol tiu de la akceptintoj de la islamismo. La revolucioj (industria kaj politikaj) kiuj ŝanĝis la mondon okazis ne en la islamaj, nek en la budismaj aŭ aliaj socioj sed en la kadro de la nacioj kiuj heredis la kulturon de la Mediteraneaj civilizacioj kaj de la jud-kristana religia tradicio. Kaj la scienc-teknika progreso kaj materia bonstato estas senkompare pli granda en la landoj de la Okcidenta kulturo ol en tiuj de la islama tradicio eĉ se iuj el ĉi lastaj posedas kaj kontrolas grandkvanton da nafto kaj aliaj riĉfontoj. Sed en la kunteksto de la 9-a kaj 10-a jarcentoj tute ne estis perceptebla tia okcidenta supereco. La Bizanca socio estis stagna, kaj Okcidenta Eŭropo estis travivanta longan etapon de malevoluo. La ĉefaj scienculoj (matematikistoj, filozofoj, kuracistoj…) de tiuj Mezepokaj jarcentoj estis araboj. Ankaŭ estis araboj tiuj kiuj en tiu epoko savis kaj diskonigis la antikvajn verkojn de la romia epoko kaj kiuj alportis el Hindio la decimalan sistemon de nombrado kaj kalkulado sen kiu tute ne eblus la nuna scienco.

Jes, ĝis la 10-a jarcento la socio de Okcidenta Eŭropo tute ne prezentis allogan aspekton. En la 8-a jarcento estis okazinte ia provo revivigi la Romian Imperion de Okcidento. Temis pri la afero de Karolo la Granda, nomata ankaŭ Karlomagno. Komence la afero havis ian sukceson. Karlomagno gajnis gravajn batalojn, konkeris teritoriojn de Germanio kaj Aŭstrio kaj kristanigis ties loĝantaron. La religia aŭtoritato de Okcidento benis kaj apogis tiun politikan operacion. Tiel, dumtempe ekzistis en Okcidenta Eŭropo tiu imitaĵo de la antikva Romia Imperio kiu, tamen, etendiĝis al landoj kiuj neniam estis okupitaj de la romianoj, sed restis for, pro malsamaj kialoj, aliaj landoj kiel Britio kaj Iberio. La angloj, merĝitaj en la specifa problemaro de sia in-

sulo, generis de tiam la izoleman karakteron kiu karakterizas ilin ankoraŭ nuntempe. Kaj en Hispanio, duonokupita de la araboj en tiu epoko, oni estis generante en ties loĝantaro la duonsaracenan karakteron kiu ĉiam distingigis nin. Sed ene aŭ for de la imperio de Karlomagno, la kultura kaj materia situacio de Okcidenta Eŭropo daŭre restis malevoluinta dum pluaj du jarcentoj. Krome la sukcedintoj de Karolo la Granda ne kapablis konservi la imperian reĝimon. Ĉi tiu plifirmiĝis nur en tiuj teritorioj, Germanio kaj Aŭstrio, kiuj neniam antaŭe estis romiaj.

Sed dum la kvin jarcentoj pasintaj ekde la disfalo de la Romia Imperio de Okcidento, kia estis la situacio de la klasbatalo en tiu terzono? En la tiama stato de la ekonomio kaj la politiko ne eblis kompleksaj klasaj strukturoj similaj al tiuj de la antikva romia socio. La bazo de la ekonomio estis la terkulturo; la komercado estis preskaŭ nula. La laborantoj de la agrokulturo estis gleb-servutuloj, speco de duon-sklavaj kamparanoj. Krome tiutipaj subpremitoj estis tre dise lokitaj en la teritorio, t. e. ne estis granda koncentriĝo de tiuj personoj. En tiaj sociaj kondiĉoj la lukto de tiu klaso ne povis esti grava afero. Dum tiuj jarcentoj de la t. n. Alta Mezepoko ne estis gravaj sociaj konfliktoj. Kvankam la verkita historia materialo pri tiu epoko ne estas ampleksa, oni scias ke, ja, iuj kamparanaj disturboj okazis en iuj lokoj, sed tiuj situacioj de malordo ne povas esti konsiderataj kiel revolucioj sed nuraj ribeloj, cetere rapide sufokitaj. Ekzemple, dum la jaroj 841 al 845, en la epoko de la dissolvo de la imperio de Karlomagno, okazis en la saksaj triboj ribeloj de la t. n. "frilingi" kaj "lazzi", la du sociaj tavoloj plej altaj inter la nesklavigitoj de tiu etnio. Ili celis reveni al la pli egaleca socia situacio ekzistinta antaŭ ilia submetiĝo al la Karola imperio. Sed tiu socia mobilizado pasis preskaŭ ne perceptita inter la multaj gravaj eventoj de tiuj jaroj: atakoj de la normanoj, konfliktoj inter la karolidoj (posteuloj de Karlomagno)… Fakte, la kronikistoj de tiu epoko ne multe atentis pri tiuj sociaj konfliktoj de la "frilingi" kaj "lazzi". Kaj same oni povas diri pri ĉiuj kamparanaj ribeloj de tiuj jarcentoj de la Alta Mezepoko. Ni vidos ke la afero multe ŝanĝiĝis post la deka jarcento, kiam komencis flori en Okcidenta Eŭropo iu memstara civilizacio kiu estis destinita superi ĉiujn antaŭe ekzistintajn.


Peza kavalerio

Ja, inter la jaroj 900 kaj 950 komenciĝis reviviĝo de la kulturo en Okcidento. Post kvin jarcentoj de dekadenco kaj subevoluo de Okcidenta Eŭropo, komenciĝis iu ŝanĝo preskaŭ ne perceptebla komence. Unue, ekaperis iu nova maniero kultivi la teron, kio estigis ŝanĝojn en aliaj aferoj kiuj ne rilatis kun la terkulturado. La terkulturo ekzistis de antaŭ miloj da jaroj en regionoj sekaj kie la problemo estis provizi al la tero la necesan akvon por la kultivado. Tial tia agrokulturo disvolviĝis en zonoj proksimaj al grandaj riveroj, kiel la Nilo kaj tiuj de Mezopotamio, kie la provizado de akvo povas esti kontrolata per kanaloj. Sed en la teritorioj de meza kaj norda Eŭropo, kie okazas abunda pluvado, la grundo estas nek seka nek leĝera kiel apud la Mediteraneo. Do, la plugado laŭ la antikva metodo heredita de la romianoj ne estis taŭga por tiuj terenoj. Tio igis ke la rikoltado en tiu terzono estis magra. Sendube la malriĉeco kaj subevoluo de la Alta Mezepoko estis rezulto de tiu povra fruktodona kultivado. La problemo estis kiel dreni la terenon saturitan je akvo kaj la solvo estis uzi plugilon de soko, t. e. kun longa kurba triangula klingo kapabla volvi la grundon kreante profundajn sulkojn por la fluado de la akvo anstataŭ la malnovan plugilon kiu nur skrapadis la teron. Por uzi la novtipan plugilon estis necese ke ĝin trenu paro da bov(in)oj anstataŭ unu sola kiel antaŭe. Tial ke multaj kamparanoj ne disponis je sufiĉe da bestoj por tiu laborado evidentiĝis la neceso je kunlaboro, t. e. kooperativa laboro de kelkaj kamparanoj, kio implicis koncentriĝon de terkultura kamparanaro. Multaj homoj laborante kune kaj kontribuante per siaj teroj kaj bovoj estis la bazo de la feŭdismo kiu disvolviĝis en tiu epoko. La servutuloj laborantaj ĉirkaŭ la kasteloj, krom prilabori individuajn terpecojn ankaŭ povus labori kune por la feŭdsinjoroj. De tiam, kaj pro tio, plipotenciĝis kaj ege disvolviĝis la feŭdsistemo. Alia inventaĵo tiutempa, kiel la jungil-kolumo por la ĉevaloj, igis pli produktiga la terkultivadon car la ĉevaloj estas pli taŭgaj ol la bovoj por priplugado de la tero. Al ĉio-ĉi aldoniĝis la invento de la hufumo por la ĉevaloj, kio plifaciligis la laboron de tiuj bestoj. Tiuj inventoj igis ke la agrokultura produktado senĉese pligrandiĝis, kio okazigis abundo de nutraĵoj por subteni la trupojn. De tiam la centra zono de Eŭropo povis facile provizi nutraĵojn por la kreskanta nombro da profesiaj soldatoj, bone ekipitaj je armiloj. La peza kavalerio iĝis impona kaj efika militmaŝino. Aperis la mezepokaj kavaliroj.


La mezepoka kavalerio estis grava faktoro ne nur por la milito sed ankaŭ por la sociaj ŝanĝoj kiuj distingis la Malaltan Mezepokon de la Alta kiun ni studis ĝis nun. La nova militista forto de la peza kavalerio estis decida faktoro por ke Okcidenta Eŭropo ne plu restu sendefenda antaŭ fremdaj atakoj kiel estis okazinte dum la antaŭaj jarcentoj. La nova maniero militi evidentiĝis tre efika kontraŭ la invado de barbaraj hordoj, ekzemple, okaze de la invado de madjaroj en la jaro 955. Tamen la kavaliroj ne estis fidinda kaj disciplinita kolektivo. La reĝoj dependis de tiuj soldatoj por siaj militoj sed devis pagi altan prezon pro ilia servo. La kavaliroj

pli atentadis pri siaj propraj interesoj ol pri la bonstato kaj la sekureco de la regnoj al kiuj ili apartenis. Ili konstituis novan socian klason kaj zorgis pri siaj klasaj interesoj, ofte batalante inter ili por la akiro de gajno kaj povo.

La okazintaj ŝanĝoj en la terkulturo, la ekonomio kaj la milit-arto generis tiun specifan formon de la feŭdismo de la lastaj jarcentoj de Mezepoko. Iuj elementoj de la feŭdismo ekzistis jam antaŭ la 11-a jarcento kaj aliaj persistis post la 15-a jarcento, sed la periodo inter tiuj jarcentoj prezentas specifajn trajtojn kiuj distingas ĝin de aliaj historiaj epokoj. Ĝi karakteriĝis pro la malcentraliziĝo de la povo. En la pinto de la povstrukturo, kiu samtempe estis klasa strukturo, troviĝis –teorie– la reĝo aŭ imperiestro. Sub li, la loka povo estis demarŝata, kun granda aŭtonomio kaj foje sendependeco, far iu aristokrataro aŭ nobelaro: dukoj, grafoj, markizoj… Malpli rangaj estis la baronoj kaj la kavaliroj, kiujn ni jam menciis, kaj sub ili la komercistoj. Ĉi klaso estis ankoraŭ malgrava, preskaŭ neperceptebla kiel aparta klaso, komence de la 11-a jarcento, sed de tiam ĝi fariĝis pli kaj pli potenca kvankam ne en ĉiuj lokoj egale; ĝi prosperis ĉefe en la apudmaraj zonoj, speciale en Italio kie, post pluraj jarcentoj ĝi fariĝus unuaranga klaso. La menciitaj regantaj klasoj eltiradis siajn vivrimedojn el la metiistoj de la urboj kaj la terkulturistoj de la kamparoj. En la plej malalta ŝtupo de la socia piramido estis, krom la sklavoj, kiuj ne mankis en iuj lokoj, ĉefe la servutuloj, preskaŭ sklavoj; ili devis prilabori terojn ne apartenantajn al ili kaj kiujn ili ne rajtis forlasi. Alia ŝprucanta klaso estis la klerikaro. En la Eklezio ekzistis pastra hierarkio ekde la fino de la 4-a jarcento, ankoraŭ dum la romia imperio, sed nur iom-post-iom ĝi konkretiĝis kiel aparta klaso, aŭ pli ĝuste kiel paralela klas-strukturo apud tiu de la laika socio. La pligraviĝo de la klerikaro dum la kvin jarcentoj pasintaj ekde la disfalo de la romia imperio okazis tial ke en la malevoluinta stato de la socio de la Alta Mezepoko nur la pastroj scipovis legi, skribi, kalkuli… Tiu scio igis ilin kapablaj roli kiel administrantoj de la posedaĵoj de la nobelaro dediĉita al la milito. Ja la nobelaro de tiuj jarcentoj sin trejnis nur pri batal-arto kaj malaprecis la intelektan instruiĝon.


La feŭdisma sistemo establis rilatojn de majstreco kaj dependeco inter la diversaj sociaj klasoj, kiel ni poste vidos, kaj generis konfliktojn kiuj senĉese pligrandiĝis ĝis atingi la formon, plurajn jarcentojn poste, de veraj kamparanaj militoj. Krom la jam menciita rekuperiĝo de la produktado kaj de la ekonomio fine de la 10-a jarcento kaj komence de la 11-a evidentiĝis en Okcidento alia signo de reviviĝo de la civilizacio. Ĝi estis la tiama apreco pri la libroj kaj la antikva kulturo. Grava impulsanto de tiu tendenco estis Gerberto de Aurillac (946-1003), elektita papo en la jaro 999 kun la nomo Silvestro la 2-a. Lia eklezia kariero disvolviĝis paralele al lia politika agado en la kortumo de la germana imperiestro Otono la 3-a (kiu troviĝis en Italio en tiu epoko) kaj kun lia intensa dediĉiĝo al la studado de ĉiuj sciencoj de la epoko, inkludante tiujn de la araba kulturo. Fakte, estis li kiu enkondukis en Francion la uzadon de la decimala numer-sistemo kiun la araboj estis elportinte el Oriento. Tiu papo de la emblema jaro 1000 estis la plej fama kaj eminenta saĝulo de lia epoko, kaj kvankam li interesiĝis ankaŭ pri teologiaj aferoj, ne estis ĉi tiuj la ĉefa celo de lia intereso. Li okupiĝis pli pri filozofio kaj matematiko, temoj kiuj estis forlasitaj de antaŭ kvin jarcentoj. Li studis ĉiujn antikvajn verkojn kaj dediĉiĝis instrui pri ili. Li enkondukis la abakon por la matematika kalkulado kaj interesiĝis ankaŭ pri geometrio. Li konstruis horloĝojn kaj astronomiajn instrumentojn, kaj dediĉiĝis ankaŭ kolekti antikvajn manuskriptojn, kaj stimulis aliajn fari tion. Ĉesis esti kredero, pli malpli oficiala, tio ke la antikva scio estis diabla kaj ke oni devus studi nur piajn verkojn. Aperis libroj, kopiaĵoj de verkoj de antikvaj aŭtoroj kiel Aristotelo, Eŭklido, Tolomeo, Flavio Josefo, Cezaro, Salustio… Sub la influo de Silvestro la 2-a, al la ekonomia disvolviĝo de la epoko aldoniĝis la intelekta, progreso. Estis ia reago de la konservativaj fortoj kiuj malestimis tiujn ŝanĝojn. La papo Gerberto estis akuzita je satana influo pro lia altiro al la antikvaj libroj kaj al la trakto kun la arabaj intelektuloj. Tamen, kvankam lia pap-regado estis mallongdaŭra, lia influo estis decida. Sendube la situacio estis jam matura por tiu ŝanĝo. De tiam kaj ĝis la inventado de la presado, la konventoj kaj monaĥejoj estis lokoj de kopiado kaj tradukado de antikvaj libroj kaj verkado de novaj. Kompreneble, estis definitive perdita grandparto el la enhavo de la iama Biblioteko de Aleksandrio k. a., sed ĉio kio saviĝis estis zorge konservita kaj disvastigita. Oni povas diri ke en tiu laborado en la skribejoj de la konventoj enestis kaj ĝermis la semo de la Renesanco kiu florus plurajn jarcentojn poste.

En ĉiu klasa socio okazas klasbatalo. Ju pli kompleksa estas la socia klas-strukturo, des pli komplika estas la klasbatalo(j) kiu(j)n ĝi generas. Laŭmezure ke la socio de Okcidenta Eŭropo estis atingante, en la 11-a jarcento, similan kompleksecon kiel tiu de la romia socio de la 1-a jarcento antaŭ nia erao, ankaŭ la klasbatalaj



Klas-strukturo de la socio de la Malalta Mezepoko

konfliktoj de ambaŭ socioj fariĝis similaj. Verdire, la klasaj konfliktoj kiujn ni sekve priskribos ne estis afero limigita al tiu 11-a jarcento sed etendiĝis ankaŭ al la sekvintaj kvar jarcentoj, kaj iuj el ili eĉ plu. Ni komencu per la problemaro de la monarkoj. La ĉefaj, preskaŭ la solaj, konfliktoj de la reĝoj de tiu epoko estis kontraŭ aliaj klasoj de la superreganta aparato de la sistemo: Eklezia hierarkio, nobelaroj, kavaliroj… kaj la propra familio de la monarkoj. Ja, sufiĉas tralegi la historion de tiuj jarcentoj por konstati kiel ofte okazis, en Britio, Francio, Hispanio kaj aliaj regnoj, reĝaj uzurpadoj kaj konspiroj celantaj uzurpadon. La ĉefaj malamikoj de la reĝoj estis liaj propraj fratoj, aŭ duonfratoj, aŭ pretendantoj el dinastioj pli malpli parencaj de la reganta dinastio. Ofte, preskaŭ ĉiam, la afero estis demarŝata per civilaj militoj. La reĝoj, kaj la pretendantoj, sin apogis sur la aristokratoj kiuj volis helpi ilin. Kompreneble, tiu apogo ne estis senpaga. Oni devis rekompenci la partianojn per la aljuĝo de feŭdposedaĵoj, ĝenerale konfiskitaj al la partianoj de la konkuranta pretendanto. Se la afero disvolviĝas bone, iu nobelo kiu atingis grandajn posedaĵojn en tiuj civilaj konfliktoj povas aspiri regi ilin sufiĉe sendependece de la reĝo kiu premiis lin. La lojaleco ne estis distinga eco de la aristokratoj de tiu epoko. La vasaloj de la nobelo estis vasaloj de la koncerna reĝo, sed ne-rekte; ilia obeo al la plejsupera povo nepre pasas tra la obeo kaj servo al ilia feŭdsinjoro. La feŭdsinjoroj decidas kiun reĝan partion li apogu, kaj ilia servutaro sekvas ilin kiel infanteriaj soldatoj. Sed la ĉefa milit-forto de la epoko estis la kavalerio, kaj la kavaliroj estis tiel ambiciaj kaj ne-fidindaj kiel siaj sinjoroj. Ili aspiradis al pli alta rango en la skalo de la nobelaro, kaj ilia kavalir-servo estis la kariero por atingi la celitan progreson. La perfidemo aŭ manko de lojaleco en la reĝa parencaro, la nobelaro kaj la kavaliroj estis normala kaj kutima afero kiu surprizis neniun. La monarkoj sciis ke sia reĝa tasko konsistis en baraktado kun tia friponaro. Multaj el ili –aŭ siaj patroj– estis atingintaj la reĝan kronon ĝuste per tiutipaj intrigoj.



Ne mankis intencoj kaj provoj dignigi, indigi, la koncepton de la kavalireco. En iu skribaĵo de Ulrich Lilienfeld, titolita ***Concordantiae Caritatis***, oni legas: ***La virtoj armas la kristanan kavaliron***. Por soleni la akton de la asignado de la rango de kavaliro oni dezajnis iun ceremonion kiu havis karakteron similan al tiu de la religiaj sakramentoj. Fakte, la ceremonio konsistis el rito kun religia simbolismo. La armota kavaliro devis pasigi la antaŭtagon kaj antaŭnokton de la ceremonio gardante la armilojn, prefere en iu preĝejo aŭ kastela kapelo, preĝante surgenue. Poste, en la mateno li ĉeestus meson. La normoj diris ke li devis esti pura je korpo kaj animo. Esenca parto de la rito estis la ĵurado de la kavaliro preti morti por la kristana fido, por lia feŭdsinjoro kaj por lia tero. Fine, la armado mem konsistis en simbola frapo surŝultre pere de glavo far la reĝo aŭ feŭsinjoro kiu oficus la armadon. Por kompletigi la solenadon de la ceremonio poste okazadis bankedo de la ĉeestantaj feŭdsinjoroj kaj kavaliroj kaj ofte povis esti ankaŭ turnir-luktado. Per tiaj solenaĵoj oni volis emfazi la gravecon de la kavalireco kaj asocii tiun rangon kun ĉiuj kristanaj virtoj: lojaleco, nobleco, defendo de la virinoj kaj la senfortuloj… Evidentiĝas ke per tiu doktrino la Eklezio, kaj ĝenerale la ideologia aparato de la sistemo, volis enplanti en la menson de la kavaliroj respekton pri serio da valoroj necesaj por la stabileco de la sistemo kaj la socio. Indas aldoni ke ankaŭ la ceremonio de la kronado, aŭ sankt-oleado, de la reĝoj estis same kvazaŭ-sakramenta akto en kiu ne mankis ĵurado de la reĝo respekti la regatojn, kaj ankaŭ de la regataj feŭdsinjoroj, kavaliroj kaj eĉ la popolamaso respekti kaj obei la reĝon. Per tiuj ceremonioj oni pretendis sakraligi la rolon kaj la figuron de la reĝoj kaj de la kavaliroj por ke ili respektu unuj la aliajn kaj sin mem. Sed fakte, la intima naturo de la reĝoj, la episkopoj, la aristokratoj kaj la kavaliroj ne ŝanĝis pro tio ke oni sakraligus ties funkciojn. Ili senhonte dediĉigis al la prizorgado de siaj personaj kaj klasaj interesoj domaĝe al la interesoj de aliaj personoj kaj klasoj. Daŭre plu la reĝoj kaj potencaj aristokratoj (tro)uzis la sinjorecan rajton je unua-nokto de la nov-edzinoj de la regatoj, kiu tre ofendis kaj humiligis ĉi-tiujn, kaj daŭre plu estis konspiroj, intrigoj, perfidoj, uzurpadoj, civilmilitoj… kaj kontraŭ-frontiĝoj de la laika kaj la religia povo, inter la papoj kaj la monarĥoj, ĉefe la germanaj imperiestroj kaj la reĝoj de Francio.

La konflikto de la papo kun la imperiestro de la Sakrala Romia Germana Imperio komenciĝis en la jaro 1073. Estis la t. n. “Kverelo de la Investituroj”. Ĝi povas esti konsiderata klasbatalo laŭsence ke rilatis al kontraŭ-frontiĝo inter la interesoj de du branĉoj (klasaj) de la aristokrataro: la laika nobelaro kaj la klerikaro. Konkrete, oni estis pridiskutante kiu, ĉu la imperiestro, ĉu la papo, rajtis nomumi episkopojn por la diocezoj de la imperio. La afero estis grava por ambaŭ ĉar en la germana imperio la episkopoj estis ankaŭ princoj guberniestroj de la koncernaj provincoj. Kompreneble, la imperiestro volis nomumi siajn guberniestrojn, kaj ankaŭ kompreneble, la papo volis nomumi siajn episkopojn. Neniu zorgis pri la rajto de la popoloj elekti siajn regantojn kaj laikajn kaj religiajn. La alternativo disigi ambaŭ titolojn trovis la oponon de la klerikaro de ambaŭ partioj, kiuj ambiciis la ĝuon de ambaŭ funkciojn. Tiu stranga milito en la pinto de la superreganta klaso daŭris kelkajn jarcentojn kaj havis spektaklecan momentojn kiel la humiliĝo de la imperiestro Enriko la

4-a antaŭ la papo Gregorio la 7-a en Kanoso en la jaro 1077. Tiu lukto de la investituroj havis sobojn kaj sorojn dum la longa tempo kiun ĝi daŭris. Ankaŭ iuj papoj suferis humiligojn far la reĝoj. Ekzistis inter ambaŭ povoj, la religia kaj la laika, ia ekvilibro, malstabila kiel kutime okazas en la politikaj ekvilibroj. Spite al la armita forto de la reĝoj kaj la imperiestroj, ne estas strange ke foje la papoj rezultis venkantaj. Ties povo ankaŭ estis iome armita, sed ili disponis de alia potenca povo. En tiu Mezepoka socio al la reĝoj estis necesa la eklezia beno por esti respektataj de liaj popoloj. Fakte, ekde la epoko de Karlomagno, estis la papoj kiuj devis kroni la imperiestrojn, kaj foje la papoj sukcesis promocii al la imperiestra trono siajn proprajn kandidatojn. Foje, ankaŭ la imperiestroj apogis antipapojn aŭ sukcesis meti sur la papan seĝon siajn proprajn kandidatojn. Ĝenerale, la regado de la germanaj papoj daŭris mallongtempe; estis en Romo io kio damaĝis ilian sanon, eble la veneno kiun oni manĝigis al ili. Kiel dirite la Kverelo de la Investituroj daŭris kelkajn jarcentojn. Ankoraŭ en la 13-a jarcento ekzistis tiu interfrontiĝo de la papo kaj la germanaj imperiestroj, kaj menciindas ke tiam implikiĝis en la batalo ankaŭ la popolo, aŭ pli ĝuste la burĝaj klas-tavoloj de la loĝantaro, ĉefe tiu de italio. Tiam estis plifortiĝante tiu socia klaso de la komercistoj de la italaj urboj, al kiuj de nun ni devos dediĉi pli kaj pli da atento. Ilia implikiĝo en la konflikto de la altaj povoj de la socio konsistis el ne naturaj sed konjunkturaj aliancoj kiel atestas la fakto ke ofte la alianco de la italaj urboj ŝanĝis de la imperiestro al la papo kaj ree. Krome ne ĉiuj urboj alianciĝis al la sama povo; ili, ja, agadis laŭ siaj partikularaj, prikomercaj, interesoj.

Ankaŭ en la urboj de la ceteraj partoj de Okcidenta Eŭropo estis konflikteco. Abundis en tiuj jarcentoj la perfortaj atakoj de la kristana loĝantaro al la judejoj aŭ judaj urbo-kvartaloj. La agresemo de la atakantoj havis religian kialon aŭ pretekston. Kristana socio kiu sukcesis asimili la anojn de aliaj religioj sentis frustracion konstati ke la muzulmanoj kaj la judoj rifuzis kristaniĝi. La muzulmanoj estis for, malproksime, kaj kontraŭ ili oni aranĝis la krucmilitojn, pri kiuj ni temos poste. Sed la judoj estis dislokiĝintaj en la urboj mem kie loĝadis la kristanoj, kaj estis malplimulto, do febla kolektivo. Krome tiu kolektivo estis relative riĉa; siaj membroj estis metiistoj, komercistoj, kuracistoj…. La agrokulturo, ĉefe la posedado de teroj, estis malpermesata al ili. Iuj el ili dediĉiĝis al iu funkcio aŭ tasko kiu estis religie malpermesata al la kristanoj: la monpruntado kun interezoj. Ŝajnas ke la atakoj kontraŭ la judaj kvartaloj estis instigitaj de la eklezia pastraro, sed ne pro religiaj kialoj. Iuj historiistoj prezentas la aferon alimaniere. Okazis ke la judoj pagadis al la reĝoj dum Mezepoko imposton pli altan ol la kristanoj. Tiamaniere ili akiradis la rajton praktiki sian judan religion en socio majoritate kristana. La reĝoj sin konstituis, do, protektantoj de la judoj. Oni povas diri ke la judoj estis reĝa propraĵo. Do, la atakoj al la judejoj, instigitaj de la pastraro, enkadriĝis en la disputo de la klerikaro kontraŭ la laika povo. Foje la klasbatalo alprenas strangajn formojn kiuj tute ne ŝajnas rilati kun interklasaj kontraŭdiroj. Atestas favore al tiu tezo la fakto ke en la teritorioj regataj de la papo la judoj ĝuis liberecon kaj sekurecon kiun ili ne havis en aliaj lokoj. En tiuj teritorioj la destino de la altaj impostoj de la judoj iris, ja, al la papa mon-ŝranko. En socio kie la kulturo estis preskaŭ monopoligita de la eklezia klerikaro sed kiam iom-post-iom ĝi estis plidisvastiĝanta al la popolo, la juda kolektivo sendube estis pli klera ol la cetero de la popolo. Daŭris inter ili sia tradicia kutimo de la sinagoga lernejo (kvankam nur por la viroj). Ĉiu juda viro scipovis legi kaj skribi en pluraj lingvoj, kio ne okazis inter la gojoj, sed la kultura nivelo de la judoj de Eŭropo estis tre malalta kompare al tiu de iliaj samreligianoj en la araba mondo kaj de la araboj ĝenerale. En la 11-a kaj 12-a jarcentoj la decimala numersistemo por kalkulado, ĝenerale uzata en la araba mondo, nur tre malrapide estis progresanta en Eŭropo.

Ni ne povas meti finon al nia atento pri la 11-a jarcento sen mencii ke je ties fino okazis la unua kruc-milito. Tiuj kelkaj militaj ekspedicioj de la okcidenteŭropaj armeoj al Oriento por kontraŭbatali tre potencajn trupojn de la epoko montras ĝis kioma grado estis altiĝinta la memestimo de la kavaliroj de la feŭdisma sistemo pri ilia milit-kapablo. Laŭlonge de du jarcentoj, preskaŭ deko da tiuj militiroj evidentigis kiom multe estis prosperinta tiu socio en kio rilatas al organizado de militfortoj, aranĝo de ŝipaj flotoj, kreado de novaj ŝtatoj en Mezoriento… Plejparto el tiuj militaj ekspedicioj atakis la muzulmanajn fortojn en tiu zono, sed unu el ili dediĉiĝis ataki kaj disrabi Konstantinopolon mem, la bizancan ĉefurbon. Ne ĉiuj tiuj militaj ekspedicioj estis sukcesaj, kaj fine la latinaj ŝtatoj kreitaj en tiu terzono falis denove en la manojn de la muzulmanoj kaj bizancanoj. Tiurilate ŝajnas ke la ĉefa celo de la krucmilitoj, rekonkeri la sanktajn lokojn de Jerusalemo, estis fiasko. Sed la rezulto estis stranga rigardate de longatempe post la fino de tiuj militoj. Ekde la epoko de la krucmilitoj kaj ties ŝajna malsukceso la progreso de la civilizacio en Okcidento estis spektakulareca. Dume la muzulmanaj potencoj kiuj finvenkis post tiu longa konflikto falis en dekadencon kiu ne ĉesis ĝis la nuna tempo. Ankaŭ Bizanco, kiu sukcesis forpeli la eŭropanojn de la latina regno tie kreita, restis de tiam damaĝita kaj fine subfalis antaŭ la turkoj en 1453. Sed tio ankaŭ ne signifis por la turkoj granda kultura progreso. La sultan-regno kiun ili kreis tie estis tiel bizantinisma, en la plej malbona senco de la termino, kiel la bizanca ŝtato mem kiun ĝi anstataŭis.

La islam-kristana interfrontiĝo de tiuj jarcentoj havis ion el tio kio nuntempe estas nomata “kontraŭfrontiĝo de civilizacioj”. Kaj, nedudeble, estis vera religia fervoro en multaj el la kruckavaliroj kiuj iris al tiuj militoj. Sed al ni interesas esplori la klasbatalajn elementojn kiuj enestis en tiuj eventoj. Ni jam vidis ke la sociala situacio de Eŭropo en la 11-a jarcento estis de kreskanta konfliktado pro la ekzistantaj kontraŭdiroj: civilmilitoj inter la feŭdsinjoroj kaj kavaliroj konkurante por rango kaj posedaĵoj, kontraŭdiroj inter la eklezia aŭtoritato kaj la monarĥoj, malpaco en la urboj pro

sociaj kaj etnaj kontraŭdiroj… En simile malfacilaj cirkonstancoj, du jarmilojn antaŭe, la romia socio alfrontis la problemon eksportante la militojn, t. e. ĵetante sin al eksteraj konkeroj. Ĝuste tion faris la regantaj fortoj de la feŭdeca Eŭropo. La alvoko de la papo Urbano la 2-a al la kristanoj liberigi Jerusalemon celis, antaŭ ĉio, malproksimigi el la teritorio de de Okcidenta Eŭropo la plej ribelemajn amasojn kiuj maltrankviligadis la socion kaj endanĝerigadis la sistemon: ambiciaj feŭdsinjoroj kaj kavaliroj, avidaj je mono kaj povo, almozuloj, rabistoj, neokupitaj dungo-soldatoj… homoj kiuj estis nek kamparanoj, nek metiistoj, nek monaĥoj… La armeoj de la krucmilitiroj estis konstituitaj ĉefe de tiaj homoj. Tiuj hordoj da perfortemaj homoj falis sur la loĝantaro de Palestino, Antioĥio… poste ankaŭ de Konstantinopolo, Egipto, kaj eĉ Algerio, dispredante, mortigante, seksperfortigante… En tiuj lokoj ili lasis amaran memoron pri la kristanismo. Ŝokas pensi ke oni faru tiajn krimojn nome de Kristo. Kaj ne estis nur tio: por kontraŭbatali la religian disidentecon en Eŭropo mem, estis krita la t. n. "Tribunalo de la Inkvizicio". Viktimoj de tiu religia maltoleremo estis la judoj kaj la kataraj aŭ albigensaj sektoj tiam florantaj en iuj lokoj de Germanio kaj en Langvedoko. Malfacile povus la homoj de la 12-a kaj 13-a jarcentoj scii ke tiu konduto ne kongruis kun la instruo de Jesuo-Kristo: ili ne konis tiun instruon. Plejparto el ili ne scipovis legi kaj, ĉiukaze, la malabundaj tekstoj de la Evangelio kaj aliaj bibliaj skribaĵoj ne estis alireblaj por la ordinaraj popolanoj. Nur la pastraro konis la skribojn, kaj la instruo kiun la klerikaro transkomunikadis al la popolo estis la doktrino de la Eklezio, ne la mesaĝo de Jesuo. Tiel, plejparto el la loĝantaro pensis ke la krucmilitoj kaj la Inkvizicio estis sanktaj aferoj, kaj la popola religiemo estis centrita en la celebrado de la kulto, senkonekse kun ia ajn etika vivmaniero.


Inkvizicio

Krome, estis alia faktoro kiu estiĝis ĝuste tiam. Kiam, post la kristana konkero de Jerusalemo kaj formiĝo de la tiea latina regno, multaj kavaliroj revenis al siaj eŭropaj feŭdposedaĵoj, oni vidis la neceson konstitui konstantan armean forton por defendi la konkeraĵon. Tiele naskiĝis la t. n. "ordenoj de monaĥaj kavaliroj": hospitalanaj templanoj, teŭtonanoj… Ili plenumis sian rolon en la latinaj ŝtatoj de Mezoriento sed ankaŭ havis posedaĵojn en Eŭropo. Tio estigis iun problemon kiu pliakriĝis post la fino de la krucmilitoj. Okazis ke, krom ilia specifa tasko en tiuj latinaj ŝtatoj, ili estis armeoj de la papo, kaj krome ne pagadis impostojn al la respektivaj reĝoj de la eŭropaj landoj kie ili havis posedaĵojn. Tiu problemo estis speciale grava en la kazo de la templ-kavaliroj. Se la Kverelo de la Investituroj estis daŭra milito inter la papoj kaj la germanaj imperiestroj, la afero de la templanoj kaj aliaj problemoj, estis dum la 12-a jarcento fonto de malakordo inter la religia povo kaj la reĝo de Francio. La franca reĝo Filipo la 4-a arestis kaj tenis en prizonon la papon Bonifacon la 8-an ĝis ĉi ties morto. Poste li havis sufiĉe da influo en la eklezia pov-aparato por ke estu elektataj papoj favoraj al li kaj lia politiko: Benedikto la 3-a kaj Klemento la 5-a. Ĉi lasta estis la papo kiu konsentis la arestadon de la templanoj kaj la abolon de ties ordeno. De politika vidpunkto tio signis la venko de la laika povo, ĉi-kaze franca, sur la religia povo. Sed alia sekvo de tiu elpaŝo estis ke de tiam tre multe plifortiĝis la povo de la reĝoj ne nur sur la klerikaro sed ankaŭ sur la aristokrataro. Ekis procezo kiu kulminus plurajn jarcentojn poste, en la formiĝo de la absolutismaj monarkioj. Sen la nuligo de la templ-ordeno sendube oni ne estus alveninte al tiu rezulto. La ordeno de la kavaliroj de la Templo, kun aŭ sen ĉi-ties apogo al la papoj, estus konstituinte faktoron de alitipa socia aŭtoritato, t. e. ne la absolutisma monarkio sed iu ajn formo de sinarkio, ĉu religia, ĉŭ laika. Sed ne eblas al ni koncepti kiamaniere tia alternativo de politika reganta povo efikus sur la rezulto de la procezoj de klasbatalo ekzistantaj komence de la 14-a jarcento.

Sendube la klaso kiu de tiam portis la torĉon de la socia transformigo estis la komercista burĝaro. Krom la italaj urboj: Venezio, Pizo, Ĝenevo, Florenco, Palermo k. a. aliaj zonoj de Eŭropo iĝis gravaj komercaj centroj: Flandrio, baltaj urboj kiel Kolonjo, Lubeko, Danzing… Ankaŭ Londono, Lisbono kaj kelkaj zonoj en la atlantika kaj mediteranea marbordoj de Francio, en Katalunio… La komercado de ĉiuj ĉi lokoj kun Oriento kaj Bizanco estis intensa ekde la 13-a al la 15-a jarcentoj. Tiu komercista klaso generis homtipon de aŭdacaj aventuristoj kiel la familio de Marko Polo kiu instaliĝis en Ĉinio por organizi kaj certigi komercadon je silko kaj aliaj ekzotikaj varoj. Ĝenerale, objekto de komercado estis la teksaĵoj, metaloj, armiloj… kaj ankaŭ sklavoj. Tiuj aŭdacaj komercistoj foje, ofte, rolis ankaŭ kiel piratoj; al tia homtipo apartenis, ekzemple, Kristoforo Kolombo antaŭ sia famiĝo kiel malkovrinto de nova kontinento. Menciindas ke tiu emo atingi riĉaĵojn pere de komercado estis, en tiu epoko, la motivigilo de multaj gravaj inventoj, uzo de novaj teknikoj kaj entrepreno de geografiaj malkovrajoj. Jen mallonga kaj nekompleta resumo de tiaj elpaŝoj: en la jaro 1104 komenciĝis la konstruado de la arsenalo de Venezio, en 1126 komenciĝis la aplikado de la teknologio de la arteza puto, en 1180 estis inventitaj la vent-muelejoj kaj la vitraj speguloj, ekde 1190 oni konas la markompason en Eŭropo, en 1200 estis enkondukita la pulvo en Eŭropon, ekde 1202 disvastiĝas en Eŭropo la uzado de la decimala numer-sistemo, en 1244 komenciĝis la uzado de la fiksaj gruoj en la havenoj, en 1260 la mamlukoj uzis la unuan kanonon en la historio, en 1280 oni inventis en Italio la okulvitrojn, tiujare mem mortis la fama alkemiisto Alberto Magno kiu estis farinte grandajn alportaĵojn al kemia scienco, en 1282 oni inventis la

muelilon por paper-farado. En 1326 estis farita en Florenco la unua pafilo, en 1343 en Kastilio oni uzis la artilerion unuafoje en Okcidenta Eŭropo por la sieĝado al iu urbo, en 1450 oni inventis la pres-arton en Germanio, en 1492 estis malkovrita la Amerika kontinento, de 1497 al 1499 la portugalo Vasko-de-Gama vojaĝis unuafoje al Hindio ĉirkaŭnavigante la sudon de la Afrika kontinento. Paralele al tiu teknika progreso estis ankaŭ tiu kiu rilatis kun la kulturo: inter la jaroj 1200 kaj 1400 estis fonditaj en Eŭropo 52 universitatoj. Post la invento de la presado la kultura progreso estis eĉ pli rapida kaj potenca. Poste ni vidos kiom multe la pres-arto kaj la artilerio radikale ŝanĝis la socion en kio rilatas al la klasbatalaj rilatoj.

Tiu progreso de la lastaj mezepokaj jarcentoj sendube estis tre lanta kompare al la rapideco de la evoluo de la scienco kaj la tekniko en nia epoko. Sed, reale, ĝi estis eksterordinara konsiderante ke ekde la mezo de la 13-a, dum la tuta 14-a, kaj eĉ parto de la 15-a jarcento okazis al la socio de Okcidenta Eŭropo serio da katastrofoj kapablaj kolapsigi ĉiun ajn civilizacion. Ni vidu ilin: Fiaskis la lastaj krucmilitoj kaj la muzulmanoj reakiris la perditajn teritoriojn en Mezoriento. Ankaŭ en Hispanio stagnis, dum du jarcentoj, la kristana rekonkerado de la muzulmanaj teritorioj, kaj krome estis civilaj militoj inter kontraŭantaj reĝaj dinastioj. En Francio, de 1210 al 1255 estis religiaj civilmilitoj (la krucmilitoj kontraŭ la albigensoj). Mongola invado: en 1223 la armeo de ĈingisĤano venkas en Kiev, kaj en 1241 ili venkas ankaŭ en Hungario kaj Polujo. Dubindas ĉu eĉ la peza kavalerio de la eŭropanoj estus povinta haltigi tiun hordon; feliĉe post la morto de ĈingisĤano la mongoloj perdis ĉiun intereson pri Eŭropo. De 1315 al 1317 estis granda malsato en Eŭropo rezulte de la komenciĝo de granda klimata ŝanĝo, la t. n. “eta glaci-periodo” kiu daŭris ĝis la jaro 1850 kaj tre efikis kontraŭ la agrokultura produktado. En 1337 komenciĝas la t. n. “Centjara Milito” inter Francio kaj Anglio pro interdinastikaj malakordoj de la reĝoj de tiuj landoj; konekse kun tiu konflikto estis ankaŭ interdinastikaj malakordoj en Hispanio. De 1346 al 1361 Eŭropo suferas la Nigran Peston, kiu mortigis trionon el la loĝantaro, aŭ eble pli. En 1378, post la translokigo de la papa kortumo el Avinjono (kie ĝi estis ekde 1309) al Romo, komenciĝis de la t. n. “Skismo de Okcidento”, pliakriĝo de la ekleziaj kontraŭdiroj kaj fonto de malakordo en la reĝaj kortumoj de Eŭropo ĝis la jaro 1417. En 1453 la turkoj konkeris Konstantinopolon kaj metis finon al la Bizanca Imperio. De tiam kaj dumlonge la turka potenco emis perfortan ekspansion okcidenten. En centra Europo la germana imperio haltigis la turkajn ofensivojn, kaj en la Mediteraneo ludis tiun rolon Hispanio kiu, fine de Mezepoko, sukcesis meti finon al la islama potenco en la Iberia Duoninsulo.



Nu, spite al ĉiuj menciitaj malfavoraj faktoroj la civilizacio en Okcidenta Eŭropo saviĝis kaj eĉ rezultis plifortigita. Sed, kiamaniere tiu procezo influis en la disvolviĝo de la klasbatalo en tiu socio? En kio rilatas al la la feŭdsistemo, t. e. la situacio de la ter-servutuloj kaj la sklavoj, okazis neniu ŝanĝo en la leĝaro, sed por subteni la sistemon oni devis apliki grandan perforton far la aparato de la superregantaj klasoj. Ja, la ribeloj de la kamparanoj kaj servutuloj fariĝis pli oftaj kaj potencaj. De 1323 al 1328 estis gravaj kamparanaj ribeloj en Flandrio, kadre la malfacila situacio kreita de la klimata ŝanĝo komenciĝinta kelkajn jarojn antaŭe. En la jaro 1358, sur la fono de la Centjara Milito kaj de la ega mortado kiun la Nigra Pesto estis okazigante en Eŭropo, okazis en Francio la kamparana ribelo t. n. ***«Jacquerie»***. En 1381 okazis en Anglio la Ribelo de ***Wat Tyler*** kaj tiujare mem komenciĝis en Langedoko la Ribelo de la ***Tuchins*** kiu daŭris ĝis 1384. Ĝenerale, ĉiuj-ĉi ribeloj kaj aliaj popolaj movadoj okazintaj dum tiuj lastaj jarcentoj de Mezepoko havis nenian agadprogramon; temis pri perfortaj koler-eksplodoj kiuj estis tre perforte sufokataj; tre perforte sed ne tre rapide. La feŭdsistemo sendube estis kapabla alfronti tiajn kamparanajn minacojn, sed la fakto ke iuj el tiuj ribeloj daŭris kelkajn jarojn montras ke la afero de la ekspluatado al la terkulturistoj estis grava kaj estis neevitebla ĉi-ties reago. Iome malsimila estis la kazo de la kamparanaj ribeloj en Italio post 1304, kiuj etendiĝis al aliaj terzonoj kiel Katalunio, Grekujo k.a. La periodo pli akra de tiu movado daŭris ĝis la jaro de 1307, sed la repaciĝo neniam estis kompleta; fakte, sporade, la afero pludaŭris ĝis fine de la 15-a jarcento. La ĉefa karakteraĵo de tiu ribel-movado, kiun oni nomis “de la ***fraticelli***”, estis ke ĝi, jes ja, havis ian programon aŭ projekton, eĉ se utopiecan. Tiu ribelo de la ***fraticelli*** kaj la movadoj kiujn ĝi inspiris estis ŝarĝitaj de ideologio, ne estis nura kolerreago. La afero komenciĝis per Francisko el Asizo (1181-1226). Li naskiĝis en la sino de iu burĝa itala familio. Lia patro estis riĉa komercisto sed ne nobelo. Francisko ricevis bonan instruon: li lernis la latinan lingvon en sia junaĝo. Do, li povis koni la evangelian tekston al kiu la ordinaraj popolanoj ne havis alirecon. Li rifuzis sekvi la familian tradicion de dediĉo al la komercado kaj decidis strikte vivadi laŭ la spirito de la Evangelio, malriĉe, komunisme… Plej danĝere por la sistemo estis ke li fondis religiajn ordenojn kun sekvantoj pretaj imiti lin. Komence la eklezia hierarkio malkonsentis la formiĝon de tiutipaj organizaĵoj. Sed fine la klerikaro venis al la konkludo ke estus prefere la ekzistado de franciskana ordeno kontrolata de la Eklezio mem ol ia kontraŭ-

sistema organizaĵo kiel tiu de la albigensoj k. a. kiuj estis florantaj en tiu epoko kaj kiuj sekvis similajn idealojn. Post la morto de Francisko, liaj sekvantoj, la franciskanoj, travivis intensan periodon de polemika disputado, disiĝo kaj fondado de diversaj sektoj pretendantaj enkarnigi la franciskanan idealon. La esenco de tiu problemo estis ke la franciskana ordeno portis dekomence tiun internan kontraŭdiron: ĝi pretendis vivadi la evangelian idealon ene de Eklezio kiu senĉese perfidadis la Evangelion. Iuj franciskanaj grupoj evoluis al pozicioj pli malpli rompemaj kun la Eklezio. Intervenis la Inkvizicio, estis kondamnoj, ekskomuniigoj, punoj… kaj la polemiko saltis al la popolo, ĉefe al la kamparanoj, la plej damaĝita homa kolektivo de la sistemo. Eksplodis perfortaj kamparanaj ribeloj similaj al tiuj de aliaj lokoj. Diversaj grupoj ariĝis sub la franciskana programo kontraŭ la sistemo. La komuna nomo de ĉiuj ili estis ***fraticelli*** (fratetoj) sed estis diversaj kaj malsimilaj: spiritualaj franciskanoj, apostoloj, mikaelistoj, ***begardoj***, dolĉistoj, joakinistoj… Komuna eco al ĉiuj ili estis la perforto de ilia ribelo, kvankam ili pretendis sin sekvantoj de la Evangelio. Tiu estas alia, tre ofta, homa kontraŭdiro: oni reagas kontraŭ la maljustecon sed fine, neeviteble, oni falas en perforton kontraŭ la personoj kiuj praktikadas la maljustaĵon. Ni vidos tiun fenomenon en ĉiuj revoluciaj movadoj okazintaj ĝis nun. Ne estas facile kombini la evangelian idealon de la konstruado de justa socio kun la –ankaŭ ĝi evangelia idealo– de amo al la maljustaj homoj. Utopieca aŭ ne, la movado de la ***fraticelli*** estis perforte sufokita de la fortoj de la sistemo: la feŭd-nobelaro kaj la Eklezio. Kromanfoje fiaskis la eterna revo de la homaro, kaj kromanfoje renaskiĝis la emo realigi ĝin. Sekva revulo estis la ĉeĥo Jan Hus (1370-1415). Ankaŭ li postulis, en Bohemio, socialajn kaj ekleziajn reformojn. La husita movado de liaj sekvantoj furoris ekde la jaro 1408 kaj iĝis perforta movado post la kondamno kaj brul-mortigo de Hus en 1415. Ankaŭ ĉi tiu movado rezistis perforte kontraŭ la feŭdismo kaj ĉi ties eklezia apogo, kaj ankaŭ ĝi estis sufokita de la armitaj fortoj de la sistemo. La feŭdismo evidentiĝis sufiĉe kapabla alfronti tiaspecajn defiojn kaj oni povas diri ke ĉiuj kamparanaj kaj popolanaj movadoj de tiu epoko neniel kontribuis ŝanĝi la esencon de la socio kaj ties klasa strukturo.

Pli sukcesa tiurilate estis la lanta sed efektiva progreso de la burĝklaso. Ĝenerale okazas ke la plej efektivaj procezoj de socia ŝanĝo okazas silente, ne-perceptite. La samtempanoj kaj eĉ la protagonistoj de la procezo mem ne konscias pri la ŝanĝo kiun ili estas ĉeestante kaj okazigante. La ĉefaj faktoroj kiuj, fine, ruinigis la feŭdismon estis kreitaj de la burĝklaso de la 13-a al la 15-a jarcentoj. Malrapide, sed efektive. Kiel dirite, la homoj de tiu klaso ne havis, en tiu epoko, konscian planon por alitipa socio ol la feŭdeca; ili celis nur gajnon, riĉaĵon, lukson… La plej riĉaj kaj sukcesaj inter ili, kiel la familio de la ***Medicis*** de Florencio, estis fascinitaj de la povo de la feŭdeca aristokrataro kaj celis nur atingi tian rangon. Ja, iuj ***Medicis*** iĝis princoj en Florencio, kaj el tiu familio eliris ankaŭ tri papoj kaj du reĝinoj de Francio kies posteularo edziĝ(in)ĝis kun anoj de aliaj reĝaj familioj de Eŭropo. Tiu familio ***Medicis*** kaj aliaj similaj kiel la ***Strozzi***, la ***Visconti, la Fugger***… estis la modeloj kiu inspiradis la ambicion de ĉiuj burĝaj bankieroj kaj komercistoj. Sed klopodante la atingon de tia “nobla” celo, la burĝklaso estigis la kondiĉojn por la ruino de la feŭdisma sistemo kaj eble, estontece, de la burĝa kapitalismo mem. Fine de Mezepoko, la ĉefaj faktoroj de la deklivo de la aristokratara povo estis la pres-arto kaj la artilerio. Pri ili ni devas atenti nun.

La presejo estis inventita en Germanio en la jaro en 1450 (En Ĉinio estis inventita jam en 1041), kaj la artilerio komencis esti uzata en Eŭropo en la 13-a jarcento (la ĉinoj konis la pulvon jam en la unua jarcento antaŭ nia erao). Ambaŭ inventoj havis nenian ŝanĝoefikon en la ĉina socio. Male en Eŭropo ili estis decidaj faktoroj por la ŝango de la klasa strukturo de la socio. Tamen, la efiko kiun ni atribuas al tiuj inventoj en la ruinigo de la feŭdismo ne konkretiĝis tuj post ilia aplikado. Temis pri procezo kiu daŭris kelkajn jarcentojn. Tiu estis la kaŭzo ke la homoj de la epoko ne havis klaran ideon pri tio kio estis okazante. Antaŭ la apero de la presiloj la analfabeteco en la socio estis enorma. Nur la klerikaro kapablis legi kaj skribi. En la esperanta lingvo estas evidenta la parenceco de la vortoj “klera” kaj “kleriko”. En la sojlo de la Moderna Erao, la manuskriptoj ellaboritaj en la monaĥejoj ne sufiĉis por provizi lerno-materialon por la kelkdeko da universitatoj tiam ekzistantaj en Eŭropo. La apero de la presitaj libroj radikale ŝanĝis tian situacion. Malrapide komence, iompostiom kreskadis la nombro da neklerikaj homoj kapablaj legi. Krome la tiama disvolviĝo de la komercado postulis kaj profitis tiun evoluon. Se Lutero, en la jaro 1517, najlis sur la pordon de la katedralo de Wittenberg sian dokumenton kun la famaj 95 tezoj estis pro tio ke tiam jam ekzistis multaj personoj kapablaj legi ĝin. Post pluraj semajnoj tiu dokumento estis diskonigita en tuta Germanio kaj post kelkaj monatoj ĝi estis konata en tuta Eŭropo kaj ne nur de tiuj kiuj scipovis legi. Tial, la popola movado inspirita de Lutero havis plian sukceson ol tiuj de Francisko el Asizo kaj Jan Hus. La protestantismo eltiris profiton el la ekzistado de la presarto kaj la kreskanta popola klerigado, kaj samtempe apogis la klerigad-procezon. Lutero tradukis la Biblion –ĝis tiam sekvestrita de la Eklezio– al lingvo popole parolata, liakaze la germana. Laŭ lia idearo, la kristanoj devas kaj rajtas legi la Biblion, kaj por ke tio povu okazi, la popolo devas esti instruita pri legado. Tio eksplikas ke la batalo kontraŭ la analfabeteco estis pli rapida kaj ampleksa en la centreŭropaj landoj kie prosperis tiu religio. Dume en Italio, Hispanio, Portugalio kaj aliaj katolikaj landoj la analfabeteco daŭre estis granda dum la sekvintaj jarcentoj. Ne estas strange ke la industria revolucio, kiu tiom akcelis la finon de la feŭdismo, naskiĝus kaj disvolviĝus en tiuj landoj kie oni vartis la popolan instruiĝon.

La alia decida faktoro por la ruinigo de la povo de la nobelaro estis, kiel dirite, la artilerio. Kiel sciate, la bazo de la povo, kaj politika kaj ekonomia, de la feŭdsin-

joroj dum la Malalta Mezepoko estis la kontrolo aŭ monopolo, far tiu socia klaso, de la plej efika batalforto de tiu tempo: la peza kavalerio. Tiu favora cirkonstanco por la feŭdecaj kavaliroj ĉesis pro la apero de la pulvo kaj la kanonoj. La nova armilo estis tre multekosta kaj neniu feŭdsinjoro povis subteni forton kun kanonoj. Nur la reĝoj disponis je sufiĉe da monrimedoj por formi armeojn da dung-soldatoj kaj spertaj artilerianoj. Tial, kvankam daŭre estis en la armeoj kavaleriaj eskadronoj, la reĝoj ne plu dependis de la interesita apogo de la aristokratoj: komenciĝis la plifortiĝo de la povo de la absolutismaj monarkioj. La ŝanĝo en la maniero batali estas bone priskribita en la sekva paragrafo elprenita el la 38-a ĉapitro de la verko **Don Kiĥoto**:

***Benatu la tempo, kiam mankis la terura furio de ĉi demonaj maŝinoj, la artilerio, kies inventisto, mi firme kredas, nun ricevas en la infero la rekompencon pro tiel monstra elpensaĵo, kiu permesas al brako kanajla kaj poltrona preni la vivon de brava kavaliro, ĉar li ne konscias kiel aŭ de kie, kiam lia koro plenas de impeto kaj aŭdaco, trafas lin hazarda kuglo (pafita eble de viro ekfuĝinta en teruro pro la flamo kaŭzita de la malŝargo de lia infera maŝino) kaj en unu momento metas finon al la pensoj kaj la ekzisto de persono, kiu meritis jarcentojn da vivo. Kiam mi meditas pri tio, mi inklinas konfesi, ke doloras al mi en la koro, ke mi alprenis la profesion de vaganta kavaliro en ĉi abomeninda epoko nia; ĉar, kvankam nenio min timigas, tamen donas al mi kelkan zorgon la penso, ke pulvo kaj plumbo povas preni de mi la ŝancon gajni sur la tuta konata tero famon kaj renomon per la kuraĝo de mia brako kaj la eĝo de mia glavo. Sed la ĉielo faru laŭvole: se mi atingos la celon, oni min pli alte taksos, ĉar mi alfrontis pli da danĝeroj ol la vagantaj kavaliroj de la pasintaj tempoj.***

La kunteksto kaj la temo de tiu verko de Cervanto estas bone konata: la aŭtoro metas tiun supre transkribitan tekston surbuŝe de frenezulo kiu sin konsideras kavaliro en epoko kiam la kavalireca batalmaniero ne plu estis efika. Sub tiu literatura preteksto Cervanto estis komunikante al la legantoj de sia verko, kiuj kapablus legi interlinie, ke la fakta bazo de la supereco de la nobelaro ne plu ekzistis, ke estas afero de frenezuloj kiaj Don Kiĥoto alte taksi la gravecon de socia klaso kun tiel febla bazo, kaj ke la maniero forbalai tiujn sangosuĉantojn de la popoloj estas promocii la disvolvigon de teknikaj iloj kiaj la artilerio. Tio montras al ni kelkajn faktojn: unue, ke la aŭtoro de **Don Kiĥoto** kapablis percepti tiun socian evoluon; due, ke multaj samtempanoj liaj ne estis komprenintaj la gravecon de tiu eltrovo, pro tio estis necese atentigi ilin pri ĝi; kaj trie, ke Cervanto alte taksis la gravecon de la alia faktoro, la teknika kapablo presi grandkvanton da libroj, ĉar li uzis la literaturon por disvastigi sian penson. La libro-cenzuristoj de la epoko ne kaptis la esencon de la danĝero, por la superreganta klaso, kiu enestis en tiu verko ŝajne komika kaj groteska. Io simile okazis 140 jarojn poste, kiam oni publikigis la Enciklopedion, kiu tiom multe kontribuis elradikigi la obskurantismon kaj preparis la terenon por la Granda Franca Revolucio. Sed la tujaj profitantoj de la defalo de la povo de la feŭdsinjoroj estis ne la popoloj, eĉ ne la burĝaro, sed la reĝoj. Ekde la lastaj jardekoj de la 15-a jarcento la aristokratoj konservis sian privilegian rangon, ne per marĉandado kun- kaj ĉantaĝado al- la reĝoj, sed kiel ĉi ties korteganoj. La monarĥoj de la Moderna Erao povis prave diri: «La ŝtato estas mi». La ministroj kiel la duko de Lerma, la grafo-duko Olivares, la kardinaloj Riĉelieŭ, Mazarino… regadis nur dank' al la konsento de la suverenoj kaj dum ilia servo estis utila al ĉi tiuj; iuj, kiel la kardinalo Cisneros eĉ ne estis aristokratoj sed popoldevenaj. Tiuj, kiuj malprudente preterpasis siajn funkciojn, estis abrupte apartigitaj kaj iukaze ekzekutitaj: Alvaro de Luno en Kastilio en 1453, la kardinalo Thomas Wolsey mortinta en prizono en 1530, en la sama lando Thomas Moro senkapigita en 1535 kaj Thomas Cromwel en 1540, Nikolao Fuketo (***Fouquet***) mortinta en prizono en la jaro 1680 en Francio… La reĝoj elektadis kaj nomumadis ankaŭ la estrojn de la armeoj kaj intervenis en la nomumado de la episkopoj de siaj regnoj. Tiu kvalita politika ŝanĝo estas bone respegulita en la malsama tipo je armeoj, armeanoj, armeestroj kaj armiloj inter la Centjara Milito kaj la Tridekjara Milito. Sed, kiel dirite, la tujaj kaj fakte solaj profitantoj de tiu ŝanĝo estis la monarkoj kaj la institucio kiun ili enkarnigis. La popoloj same trasuferis ambaŭ militojn… kaj ĉiujn sekvintajn ĝis nun.

Alia signo de la ŝanĝo de la politika povo de la socio estis ke, ekzemple, en la Religia Milito de Francio (1562-1567), ankaŭ nomata Milito de la tri Henrikoj, la aristokratoj tute ne povis ludi tiel gravan rolon kiel tiu kiun siaj samklasanoj estis ludantaj en la civilaj militoj de Mezepoko. La apogo kiun ĝuis la reĝaj pretendantoj jam oni ne kalkuladis laŭ la nombro kaj forto de la feŭd-sinjoroj de iliaj partioj. Gravis aliaj faktoroj kiel la helpo de la reĝoj de aliaj landoj, kaj ĉefe, la apogo de la popolanoj, kiu konkretiĝis surbaze de la religiaj preferoj de la loĝantaro inter la katolikismo kaj la hugenotismo.

En la formoj de la klasbatalo en tiu Moderna Erao, oni perceptas, por bono kaj por malbono, la gravecon de la nova povo, tiu de la absolutismaj monarkioj. Kvankam de ekonomia vidpunkto persistis, grandmezure, la superecon de la feŭdeca klaso, la politika povo jam ne plu apertenis al tiuj feŭdsinjoroj sed al la monarkoj. Tio generis strangajn formojn de klasbatalaj konfliktoj ĉar foje la reĝoj estis konjunkturaj aliancanoj de la malsuperaj klasoj de la socio por limigi kaj nuligi la povon de la aristokrataro, foje la nobelaro apogis la reĝojn kontraŭ la socialaj depostuloj de la popolanoj, kaj plej strange, foje ĉiuj klasoj, plebanoj, burĝuloj kaj aristokratoj kune, bataladis kontraŭ la potenco de la monarĥoj. Al ĉi lasta modelo apartenas tiu kiu, eble, estis la unua socia konflikto de la Moderna Erao, tiu de la Komunumoj de Kastilio. De 1520 al 1522 estis en tiu regno ribelo kontraŭ la reĝo Karolo tuj kronota kiel germana imperiestro. Ĝuste por atingi tiun titolon li troŝarĝis per impostoj siajn hispanajn regatojn. La ribelo estis ĝenerala, t. e. ĉiuklasa. Ankaŭ la feŭdecaj aristo-

kratoj aldoniĝis al tiu ribelo kvankam pro malsamaj kialoj ol la popolanoj. Ili volis profiti la okazon malfortigi la politikan povon de la reĝo. Komence la ribelintoj atingis ian sukceson, sed la afero evoluis malfavore por la komunumanoj. La nobeloj komprenis ke al ili ne estus konvena la popola venko; prefere apogi la reĝon, rezigni la politikan povon kondiĉe konservi la ekonomian. Ni vidos ke tiu skemo ripetiĝos en pluaj tiutipaj sociaj konfiktoj dum la sekvintaj jarcentoj.

La sekva el tiuj sociaj konvulsioj estis, de 1524 al 1526, la Kamparana Milito en Germanio. Same kiel en la kazo de la radikalaj franciskanoj kaj la husitoj de la antaŭaj jarcentoj, ĉi tiu ribelo de la kamparanoj havis ideologion de religia inspiro. Ĉi kaze estis la kontraŭstaro de Lutero al la doktrinoj de la Eklezio. Tial ke tradicie la RomanKatolika Eklezio rolis kiel ideologia apogo de la feŭdismo, la kontesto de la eklezia aŭtoritato far Lutero estis interpretita de la kamparanoj kiel krizo de tiu sistemo kiun ili tiel multe abomenis. Kaj komence povis ŝajni ke la afero estis ĝuste tiel: ĉiuj sociaj klasoj, ekde la germanaj princoj al la plej humilaj terkulturistoj de la lando apogis Luteron kontraŭ la povo de la papo kaj la imperiestro. Sed tiu konjunktura ĉiuklasa alianco ne povis daŭri; estis interne de ĝi nesolveblaj kontraŭdiroj. Same kiel estis okazinte du jarojn antaŭe en Kastilio, la germana aristokrataro komprenis ke sia ekonomia intereso estus pli bone protektata kadre de sistemo regata de potenca monarko ol en popole organizita socio. Lutero mem, eble esprimante la senton kaj la intereson de la burĝklaso, al kiu li apartenis, kondamnis la kamparanan ribelon kaj postulis la masakradon de la revoluciuloj. Ja, la Reformitaj Eklezioj iĝis jam dekomence tiel reakciaj (en kio rilatas al la klasbatalo) kaj ideologiaj instrumentoj de la sistemo kiel la tradicia Katolika Eklezio.


Kamparanaj militoj

Estis pluaj kamparanaj militoj. De 1542 al 1550 okazis en la ŭesto de Francio, de la Rochelle al Burdeos, la t. n. Ribelo de la ***Pitauds***. De 1587 al 1589 en Normandio estis la t. n. Ribelo de la ***Gautiers***. Ankaŭ en Francio, en Lemosin, komenciĝis en 1594 la t. n. Ribelo de la ***Crocantes***, kiu daŭris ĝis 1638, jam kadre de la Tridekjara Milito. Ankaŭ kun la fono de tiu milito, en 1639 estis alia kamparana milito en Francio, en Normandio, la t. n. Ribelo de ***Nu-pieds***. Ĝuste post la finiĝo de la Tridekjara Milito komenciĝis en Francio la t. n. Movado de la ***Frondo***. Ĉi-foje la ribelintoj ne estis kamparanoj sed la urbaj plebanoj, ĉefe tiuj de Parizo. Ankaŭ ĉi-foje, komence, la ribelo ĝuis la apogon de la aristokrataro kontraŭ la reĝa povo, kaj ankaŭ ĉi-foje la nobelaro fine alkuris defendi la monarkion. Ĉi tiu reago estas komprenebla, ĝuste dum disvolviĝis en Francio tiu konflikto de la ***Frondo***, en Anglio estis okazante popola ribelo, kaj en 1649 estis senkapigita la reĝo Karolo la 1-a kaj proklamita la Respubliko. Kelkajn jarojn poste la monarkio estis restarigita en tiu lando, sed unuafoje en la moderna historio oni metis ian limon al la absolutisma povo de la reĝo. Eĉ se lantege, la Historio, t. e. la homa progresado, iome antaŭenmarŝas. Rimarkindas ke en tiu 17-a jarcento jam, iompostiom, la sociaj klasoj prenas konscion pri si mem. Eĉ se tiam ne ekzistis la nuna terminaro kiu priskribas tiujn konceptojn: sociaj klasoj, klasaj interesoj, klaskonscio, klasbatalo… la anoj de tiuj klasoj funkciadis laŭ logiko de la klasbatalo. Oni povas diri ke la homoj ne sciis ke ili sciis, sed tamen ili sciis. En kio rilatas al la burĝklaso, konkrete, ni memoru ke meze de tiu jarcento jam oni komencis publikigi la Enciklopedion. Kaj la plej kleraj homoj de tiu klaso tiam estis formante tiujn sekretajn societojn, kiel la Framasonaro, kies alvokiĝo estis koncepti kaj celi alitipan, ne feŭdecan, socion. Pri la matureco de la socio por politikaj ŝanĝoj atestas la granda diferenco ekzistanta inter la temaro kaj la kvanto de la libroj publikigitaj en la 17-a jarcento kaj tiuj publikigitaj en la 18-a. Krome tre estis kreskinta la nombro da personoj kiuj scipovis legi.

En 1662, nova kamparana milito en Francio, la Ribelo de la ***Boulonnais***. En 1664, plua kamparana milito en Francio, en Gaskonio, la t. n. Ribelo de ***Audijos***. En 1670, nova kamparana milito en Francio, en la Vivarais, la t. n. Ribelo de ***Roure***. En 1675 nova ribelo en Francio; temis pri kontraŭ-fiska konflikto. En 1707, ankaŭ en Francio, pluaj movadoj de la ***Jacqueries***, ***Crocantes*** aŭ ***Tard-avisés***. En 1766 okazas en Madrido la Tumultoj de ***Squilache***. En 1775, denove en Francio, pluaj popolaj tumultoj kaj ribeloj, la t. n. Milito de la Faruno. La malsato kreskas en Francio. En 1789 la timo, la tumultoj kaj disraboj pli kaj pli oftas en la lando. Frumatene de la 15-a de julio de tiu jaro oni komunikas al la reĝo Ludoviko la 16-a en Versajlo ke la antaŭan tagon la parizaj popolanoj atakis kaj kaptis la Bastilon. ―***Ĉu nova ribelo?*** demandis la reĝo; ―***Ne, Sinjoro***, oni respondis al li, ―***Estas la Revolucio***.

# La Industria Revolucio

## Ĝiaj sociaj sekvoj



La Granda Franca Revolucio, komenciĝinta en 1789 kaj sen klare difinita fino, estis unu el la politikaj esprimoj de la sociaj ŝanĝoj okazintaj en la eŭropaj landoj dum la dua duono de la 18-a jarcento kaj la 19-a, t. e. la pasado el socio esence agrokultura al alia industria. La Franca Revolucio eblis ĉar la ŝanĝo jam estis okazinta en la menso de la homoj. Ne nur la burĝaro sed ankaŭ la popolaj amasoj estis ĉesintaj kredi je la dia rajto de la absolutismaj reĝoj. Eĉ sen la kapto de la Bastilo, la ekzekutado de Ludoviko la 16-a, la Konvencio, la Teroro… la socipolitikaj ŝanĝoj estus same okazintaj kiel atestas la fakto ke, kvankam poste okazis ia restarigo de la monarkio, jam ne eblis reveni al la antaŭrevolucia situacio. Jam la ekonomio ĉesis baziĝi ĉefe sur la agrokulturo por komenci iĝi industria, tamen la eka elpaŝo de tiu evoluo okazis ne en Francio, sed en Anglio. Ankaŭ la politikaj ŝanĝoj estis komenciĝintaj en Anglio antaŭ ol en Francio, ĝuste 147 jarojn antaŭe. De la jaro 1642 al 1649 la tiulanda burĝaro militis kontraŭ la aristokrataro cele kontroli la politikan povon favore al siaj klasaj interesoj. Iu rezulto de la venko de la anglaj revoluciuloj estis la ekzekutado de la reĝo, same kiel okazus en Francio post unu jarcento kaj duono. Sed estis iu konsiderinda diferenco inter ambaŭ revolucioj, la angla de la 17-a jarcento kaj la franca fine de la 18-a. En la kazo de Anglio, la venkinta burĝaro kaj la venkita aristokrataro alvenis al ia interkonsento, kiu iamaniere ankoraŭ pludaŭras, kaj kiu lasis for de la politikaj aferoj la malaltajn popolajn klasojn, la plebanojn, kamparanojn… La burĝaro havis/as faktan, efektivan povon sed la monarkio estis restarigita kaj la aristokrataro konservis gravajn privilegiojn kaj apartajn politikajn instituciojn kiaj la Ĉambro de la Lordoj. Sed ĉiukaze la potenciiĝo de la burĝaro alportis grandan ŝanĝon en la produktad-procezo.

La ĉefa karakteraĵo de tiu ŝanĝo estis la iompostioma anstataŭigo de la manlaboro per la mekanika produktado, kio ebligas pli grandan produktadon. Kvankam tiu elpaŝo estis/as nomata “revolucio”, reale temis pli relative longdaŭra procezo konstituita de multaj malgrandaj ŝanĝoj kaj inventoj. Iu ŝanĝo, grava, estis la ideo aŭ konceptado kiun la homo havis pri la profesia laboro: oni komencis estimi la materian progreson kaj la ekonomian sukceson. Alia faktoro kiu stimulis la grandskalan produktadon estis la fakto ke la malkovro de novaj teritorioj estis pligrandiginta la eblecon de la merkato. En kio rilatas al Anglio, de politika kaj leĝa vidpunkto tiu lando estis strukturita, rezulte de la supre menciita revolucio, malsame ol la ceteraj eŭropaj landoj. Ekde 1688 oni starigis en tiu lando registaron konstituitan de komercistoj kaj terkulturistoj, ĉiuj ili favoraj al la komercaj interesoj. La mezepoka korporacia sistemo malaperis en Anglio antaŭ ol en aliaj lokoj. La Londona Banko estis kreita jam en la jaro 1694. En 1802 estis kreita la Burso de Londono. En la 18-a jarcento okazis en Anglio profunda transformiĝo de la tekniko, sub la formo de la agrokultura revolucio, tiu de la transportado kaj la Industria Revolucio mem.

Ĉefa trajto de la tiama agrokultura historio de Anglio estas tiu de la “***Enclosure Movement***” (ĉirkaŭbarado de komun(um)aj terenoj), kiu pliintensiĝis ende 1760. La rezulto de tiu movado estis pligrandigi la dominadon de la terposedantoj domaĝe al la kamparanoj kies vivmaniero dependis de la prilaborado de tia publika terspaco, detruante la postrestaĵojn de la angla terkultura komunumo kaj anstataŭante ĝin per iu sistemo de grandaj privataj farmoj mastrataj de kapitalistoj kaj kie la terkulturistoj estis nuraj salajruloj. Tiu ĉirkaŭbarado de agrokulturaj bienoj estis efektivigitaj dank’ al specialaj leĝoj aprobitaj de la Parlamento. La abolo de la komunumaj paŝtejoj estis neriparebla perdo ankaŭ por la etbienuloj ĉar malfortigis ilin en la konkurado kun la grandaj farmoj. Post la jaro 1830 restis malmultaj supervivantoj de tiu socia klaso en Anglio. Sekve de tio, tiu lando estis la sola en Eŭropo kie ekzistis amasa kampara proletaro kaj kie estis pli rigida la distingo inter kultivi kaj posedi la teron. Oni alvenis, do, al koncentriĝo de la tero kontrolata de la grandaj posedantoj, kune kun ia enorma progreso de la agrokultura tekniko kaj la iompostioma ruiniĝo de la antikvaj etbienuloj. Karlo Markso, analizante ĉi tiun movadon, vidis en la senposedigo de la etbienuloj la konstituadon en la urboj de la “rezerv-armeo” de la senlaboruloj, devigitaj akcepti ĉian ajn salajron kaj pretaj provizi malmultekostan labor-forton al la naskiĝanta industrio. Krom la amasa eltiro de agrokulturaj produktoj, la efiko en la unua fazo de la industria procezo estis tiu de la ellaborado de teksaĵoj. Jam en lastaj jardekoj de la 16-a jarcento aperis la unuaj tekso-maŝinoj kiel respondo al la neceso mekanizi la ŝpinadon kaj la teksadon, kaj la aŭtonomaj laboristoj kiuj ĝis tiam uzadis la hejman bobenilon devis iĝi salajruloj, ĉar nur monposedanto povus financi la kompleksajn instalaĵojn. La teksad-industrio naskiĝis en Anglio, kaj rapide pligrandiĝis ĉefe post tio ke, en la jaro 1733, John Kay inventis la harneson aŭ duonaŭtomatan teksilon. En la 6-a jardeko de la

18-a jarcento novaj aŭtomataj ŝpin-maŝinoj preskaŭ tute malaperigis la homan forton kaj lertecon en la teksad-farado; baldaŭ poste, en 1779, venis la hidraŭlika teksilo, kaj la uzado de la vapor-forto en 1785, la mekanika teksilo en 1811.

Grava faktoro por la disvoviĝo de la industrio estis ankaŭ la progreso en la sistemo de transportado. Ĉiu plibonigo en tiu afero okazigas pliamplesiĝon de la merkato, kaj la grando de la merkato estas nepra eco de profundaj ekonomiaj ŝanĝoj. La koloniigado de novaj teritorioj de la 16-a al la 18-a jarcentoj eblis dank' al gravaj inventoj en la arto de la navigado. Krome la movado de industria transformiĝo pliakcentiĝis dank' al plibonigoj en la transport-sistemo, tiel de ŝoseoj kiel per la konstruado de kanaloj kaj la aplikado de la vapor-forto al la navigado kaj la ega disvolviĝo de la fervojoj. Tiu progreso de la transport-sistemo okazis ankaŭ en aliaj lokoj. En la 18-a jarcento estis Francio la lando kie oni konstruis pli da ŝoseoj. La apero de la fervojo okazis kiam Anglio jam estis relative disvolviĝinta industria lando. La konstruado, en Anglio, de la du unuaj fervoj-linioj, en 1825 kaj 1830, okazis en socia medio kie la vapor-forto jam estis uzata en kelkaj branĉoj de la produktad-sistemo; temante pri tiu epoko jam oni plene povas paroli pri Industria Revolucio.

En tiu epoko jam estis pasinta la politika revolucio de Francio kaj la Napoleona Imperio kiu sekvis tiun. La Granda Franca Revolucio havas grandan intereson por la homa historio kaj pri la disvolviĝo de gravaj politikaj ideoj kiuj disvolviĝis kadre de ĝi. Sed en kio rilatas al la venko de la burĝaro kiel superreganta klaso de la socio, la graveco de la Franca Revolucio ne tiel estis decida. Kiel ni jam vidis, en Anglio en tiu epoko la burĝaro jam estis superreganta klaso kaj povis permesi al si kontraŭbatali la francajn revoluciulojn favore al la aristokrataro de Francio. Foje la klasaj interesoj havas tiajn kontraŭdirojn kiam la klasbatalo kruziĝas kun aliaj konfliktoj kiaj la internacia konkurado. Sendube la Revolucio en Francio estis la necesa evento por ke konkretiĝu iu politika ŝanĝo kies antaŭkondiĉoj jam sufiĉe estis maturintaj. La fakto ke la aristokrataro ne perceptis la ŝanĝon de la vento de la Historio igis ke tiu ĝis tiam superreginta klaso devis suferi la perfortan reagon de la popolaj klasoj, la Teroron… Iuj historiistoj asertas ke de 1789 al 1792 la franca burĝaro penis alveni al ia interakordo kun la nobelaro simila al tiu konkretiĝinta en Anglio antaŭ pli ol unu jarcento. La blindeco de la franca nobelaro kaj ties monarĥo igis ke al la burĝaro estis necesa la apogo de la pleba klaso por certigi la politikajn konkeraĵojn de la revolucio kaj tio ebligis, kiel ni poste vidos, la intervenon kaj la influon de la malaltaj kasoj de la popolo en la decidaj momentoj de la revolucia procezo. Tial, la graveco de la Franca Revolucio ne tiel konsistis el la ŝanĝo de la superreganta klaso en Francio kiel el la pretigado kaj diskonigado de ideoj kiuj de tiam ludis gravan rolon en la ruinigo de la idearo sur kiu baziĝis ĝis tiam la povo de la aristokrataro.



Ĉiukaze, kaj pro la malfortiĝo de la nobelaro kaj por la progreso de la industrio, la profitanto de la ŝanĝoj estis la burĝklaso. Ja, en la unuaj etapoj de industria revolucio, la ĉefa viktimo de la burĝa progreso kadre de la industria revolucio estis la proletaro, la granda armeo de la industriaj salajruloj. De nun ni tre devos okupiĝi pri tiu socia klaso. Kvankam la ekzistado de salajruloj tute ne estis nova afero, la ega amplekso de tia homtipo en la industriaj urboj estis nova fenomeno kiu baldaŭ altiris la atenton de homoj kiaj Karlo Marks kaj Federiko Engels, atentaj esplorantoj de la sociaj fenomenoj kaj ties sekvoj.

Ni vidis ke per la florado de la tekstil-industrio, Anglio spertis egan ekspansion; sed sub la surfaco de kreskanta prospero aperis la unuaj indicoj de ia profunda socia krizo. La indigno de la laboristaj amasoj, ĵetitaj al malsato kaj senlaboreco pro la apero de maŝinoj pli kaj pli laborkapablaj, ofte manuzataj de dekjaraj infanoj, devigataj labori 18 horojn tage por malalta salajro, okazigis sinsekvajn perfortajn tumultojn. La nova maŝinaro ebligis ke tekstila produktado por kiu antaŭe estis necesa la laborado de 600.000 homoj povus esti realigata de nur 2.500. Evidentas ke tiuj 2.500 laboristoj ne ricevis la profiton de la riĉeco kiun ili generis anstataŭante la laboron de 600.000. La diferenco akumuliĝis en la manojn de la maŝin-posedantoj sub la formo de kapitalo. Ne estas hazardo ke en tiu medio de la tekstil-fabrikoj naskiĝis la unuaj laboristaj sindikatoj; de tiam la industria disvolviĝo kaj la sociaj konfliktoj marŝadis kune.

Ambaŭ procezoj, la industriigado kaj la organiziĝo de la laborista movado persistis de tiam. Ni jam menciis ke la teknika disvolviĝo baldaŭ etendiĝis al aliaj industrioj krom la tekstila. Fine de la 18-a jarcento la homo komencis profiti la elektron: iu natura forto kiu ĝis tiam tre intrigis lin sed kies gravecon li ne estis kompreninta. La eltrovoj de la usonano Benjameno Frankleno kaj la italo Luigi Galvani ebligis ke Aleksandro Volta, ankaŭ li italo, konstruu en la jaro 1800 la unuan elektran pilon, kio siavice utilis por ke la anglo Humphry Davy inventu la arko-iluminadon. Laŭlonge de la 19-a jarcento la progreso daŭris en tiu tereno; en 1820 la danlandano Hans Christian Orsted malkovris la rilaton inter la elektraj fenomenoj kaj la magnetaj, kaj poste, la franco André-Marie Ampère kaj la brito Michael Faraday, post pli profunda studado de la afero, kontribuis al tio ke ĉirkaŭ la jaro 1840 komenciĝis la industrio de la elektrotekniko. Poste venis la dinamoj kaj la energio generita de ĉi tiuj utilis por ke en la lastaj jardekoj de tiu 19-a jarcento la garandaj urboj havu dumnoktan iluminadon. Fine, per la invento de la inkandeska lampo far la usonano Tomaso Edison eblis apliki la elektron por la domaj loĝejoj.

Sed ankaŭ la uzado de la vapor-forto ne limiĝis al la industrio de la teksaĵ-farado. Ja, la vera simbolo de la industria progreso dum la 19-a jarcento estis la aplikado de la vapor-forto al la aliaj branĉoj de la industrio. Fakte, kelkaj el la novaj industrioj estis kreitaĵoj de tiu forto. Jam en la jaro 1690 la franco Denis Papin elpensis maŝinon en kiu la vaporigita akvo movadis piŝton ene de cilindro. Li mem, 17 jarojn poste prezentis aplikon de tiu invento: ŝipo pelita de aparatoj funkciantaj per vapor-forto. La rudimenta maŝino de Papin estis perfektigita de la anglo Tomaso Newcomen kaj poste de alia anglo, James Watt, kies maŝinoj estis uzataj en minejoj kaj fabrikoj de koton-teksaĵoj. Surbaze de la tekniko de Watt oni aplikis la vapor-forton por la movado de veturiloj kiel la lokomotivo de George Stephenson kiu inaŭguris, jam en 1825 la eraon de la fervojo. Sekvis poste la vapor-ŝipoj, kiuj anstataŭis la antikvajn vel-ŝipojn. Ĉiu nova invento malfermis eblecon fari novajn eltrovojn, perfektigi la antaŭajn kaj konbini la utilon de diversaj inventoj en unu maŝino. En la jaro 1750 aperis la unua turbina reaktoro, tiu de Segner, kiu profitas la forton de la akvo kiel energi-fonto. En 1810 James Francis, kaj en 1822 James Thompson, perfektigis la inventon per la uzado de helicoj. En 1844 Charles Parsons ekpretigis la unuan turbinon funkciantan per vapor-forto destine al la produktado de elektra energio, sed baldaŭ adaptita ankaŭ al la navigado. En la sama 19-a jarcento disvolviĝis alia decida tekniko destinita provoki grandan ŝanĝon en la transportado kaj en la produktadprocezo ĝenerale. Temas pri la nafto kaj ties ĉefa ekstrakto, la petrolo. Ekde 1859 al 1910 la produktado de petrolo ne estis granda, sed post la Unua MondMilito ĝi estis la instigilo de la industrio de la aŭtomobilo kaj la aviado. Sed ĝia efiko en la industrio kaj la sociaj ŝanĝoj apartenas al epoko kiu meritas postan apartan atenton. Nun interesas al ni studi kaj pritrakti kiamaniere la industria revolucio influis en la socia evoluo kaj la klasbatalo en la 18-a kaj 19-a jarcentoj.

La industria revolucio, krom signi kaj certigi la venkon kaj plifortiĝon de la burĝklaso kontraŭ la aristokrataro kaj la anstataŭo de ĉi ties feŭdisma sistemo per la kapitalismo, estis ankaŭ la kadro de la disvolviĝo kaj pligrandiĝo de la klaso de la salajruloj aŭ laboristoj, ankaŭ nomataj proletoj. Ni jam indikis ke tiutipaj homoj ekzistis jam en antaŭaj etapoj de la socia disvolviĝo, sed en la industria revolucio kaj rezulte de la ŝanĝoj kiujn ĉi tiu provokis, la proletaro iĝis la bazo de la produktado same kiel la sklavoj kaj la kamparanoj estis ludintaj tiun rolon en la antaŭaj etapoj.

Ĉi tie indas enkonduki kaj klarigi iun koncepton de la marksisma teorio pri la sociaj klasoj. Temas pri la diferenco inter la tiel nomataj “klasoj en si mem” kaj “klasoj por si mem”. Laŭ la marksisma teorio, la klaskonscio estas difinata kiel la kapablo de la uloj de iu socia klaso esti konsciaj pri la sociaj antagonismaj rilatoj (ekonomiaj, politikaj…), nepre necesa por entrepreni la demarŝadon de siaj interesoj. Homo de subpremata klaso kiu komprenas sian situacion posedas klaskonscion kaj taŭgas por entrepreni sian liberigon. La nescio aŭ nekompreno de la fakto de la klasa subpremiĝo estas nomata, en la menciita teorio, “alieneco”, ekzemple, la situacio de multaj proletoj nekapablaj vidi la kapitalisman ekspluatadon en sia propra vivo. Nu, “klaso en si mem” estas la homoj kiuj konstituas la socian klason, sed “klaso por si mem” estas la homa kolektivo kiu konscias pri sia klasa situacio. Tion dirite, evidentas ke al la superregantaj klasoj interesas ke la

subprematoj ne havu klaskonscion. Ju pli nesciaj estus la opresatoj, des pli bone por la dominantoj. Ĉiam la membroj de la superregantaj klasoj komprenas la esencon kaj la bazon de sia povo. Sed sufiĉe ofte la subprematoj ne konscias pri sia situacio kaj pri la sociaj meĥanismoj pretigitaj por persistigi tian situacion. Oni povas diri ke ĉiu subpremata klaso estis kreata aŭ generata de la subpremantoj: la sklaveco estis kreaĵo de la sklavistaj, imperiistaj, potencoj; la kamparanaj servutuloj estis kreitaĵo de la feŭd-sinjoroj. Nu, la laborista aŭ proleta klaso estis kreita de la burĝa, kapitalista, klaso. Ni jam vidis kiamaniere oni ĵetis al la industriaj urboj amason da kamparanoj kiuj ne posedis teron kaj kiuj restis senlaboraj post la alpropriigo de la komunaj terenoj far la egbienuloj.

La historio de la klasbatalo de la 18-a kaj 19-a jarcentoj estas la senĉesa penado de la ideologia aparato de la kapitalista sistemo de la burĝ-klaso por teni la proletaron kiel alienitan klason, kontraŭstarigata de la intelektuloj, proletaj aŭ ne, kiuj klopodas veki la klaskonscion de la subprematoj. Dum la dujarcenta daŭro de tiu procezo okazis revolucioj, iuj sukcesis kaj aliaj fiaskis. Al ili ni dediĉos la atenton kiun ili meritas. Sed la ĉefa intereso de tiu procezo por ni estas la titana lukto de ambaŭ protagonistoj de la historio: la burĝaro, kiu estas klaso "por si mem", kaj la proletaro, kiu estas klaso "en si mem" kaj malfacile kapablas iĝi konscia de sia rolo, kiun nur ĝi povas realigi, esti entombigisto de la kapitalista sistemo.

Nur la estonteco, kiu estas skribata nenialoke, konfirmos ĉu la proleta klaso kapablos aŭ ne realigi tiun taskon kiun la marksista teorio asignis al ĝi. Sed nun ni devas klarigi ke tiu marksista espero ne startis de nulo. Karlo Markso havis antaŭulojn kiuj jam estis ekmarŝintaj sur tiu vojo antaŭ ol li. Ni ne temas nun pri la komunista idealo kiu jam ekzistis de antaŭe kaj kiun ni pritemis per la antaŭaj ĉapitroj de ĉi raporto: la primitiva kristanismo, la mez- kaj modern-epokaj reformistoj… Tiuj antaŭaj provoj, de ideologia vidpunkto, estis tre ambiguaj en kio rilatas al la protagonistoj de la socia ŝanĝo. Por vidi ian klasan rilaton inter la tasko kaj ties realigonta protagonisto ni devas atendi ĝis la fina etapo de la Franca Revolucio. Ni memoru ke la plej radikalaj faroj en la eventoj de la revoluciaj jaroj 1789 al 1793 eblis nur dank' al la aktivismo de la t. n. "senkulotuloj", t. e. la urbaj malaltklasuloj. La fiasko de la burĝaj delegitoj de la Ĝeneralaj Statoj en Versajlo por interakordi kun la aristokrataro igis necesa la unuiĝo de ĉiuj popolaj fortoj (la t. n. "Tria Stato"). La kapto de la Bastilo senblokigis la situación en Versajlo, kaj tiam tuj la burĝaro volis rekonduki la situacion, senarmigi la plebanojn, interakordi kun la reĝo kaj la nobeloj. Ĉi tiuj persitis rifuzi la neeviteblan ŝanĝojn kaj entreprenis militon, kun fremda apogo, kontraŭ la franca nacio.

Oni devas klarigi ke tiam ĉiuj klasoj: aristokrataro, burĝaro, senkulotuloj, kamparanoj… estis klasoj por si mem, ĉiuj havis klaran konscion pri siaj klasaj interesoj, sed neniu el ili havis difinitan projekton pri la politika formo per kiu ili demarŝu siajn interesojn. Unue, mankis tia klara ideo en la ĝis tiam superreganta klaso. Ja, la revolucio eblis dank' al tio ke estiĝis grava malakordo inter la absolutisma monarkio kaj la nobelaro kiu volis rehavi antikvajn privilegiojn. La masakro de la Marsa Kampo, la 17-an de julio de 1791, atestas pri grava socia kaj politika malakordo ene de la popolaj fortoj kiuj estis ellaborante novan Konstitucion. Same, la perforta nuligo de la ĝirondistoj far la jakobenoj, en la jaro 1793, evidentigas kontraŭdirojn ene de la la revolucia intelektularo de la burĝaro, kaj kolizion de la interesoj de la komercistoj kun ties de la industriistoj. Krom tio, estis gravaj diferencoj inter la interesoj de la urbaj laboristoj kaj metiistoj kaj tiuj de la malriĉaj kamparanoj. Sed la malaltaj klasoj de la popolo, eĉ se ili havis klaran konscion pri la propra socia situacio, ne posedis difinitan planon de polititika kaj ekonomia sistemo en kiu siaj interesoj realiĝu kiel eble plej bone. Ekzemple, la urbaj senkolotuloj, en la epoko de sia plej granda influo de 1792 al 1794, celis kaj atingis nur alĝustiĝon de la prezo de la plej necesaj nutraĵoj al la salajroj. Ili neniam pridubis la legitimecon de la privata propraĵo, kaj krome ne perceptis ke la burĝaj fortoj estis lerte prenante la regantajn postenojn, kaj tiel, post la falo de Robespiero la burĝaro povis efike, kaj definitive, establi sian povon kontraŭ la klasaj interesoj de la malriĉularo. Dum la etapo kiu sekvis al la ekzekutado de Robespiero (julio de 1794) la sociaj diferencoj inter la francoj pligrandiĝis. Dum la burĝaro vivadis luksege kaj senĉese festenadis, la plebaj klasoj dronis en mizero kaj malsato. En tiu kunteksto okazis io kio rezultus tre grava por la disvolviĝo de la socialistaj ideoj. Temis pri la revolucia provo de la ĵurnalisto François Noël Babeuf (kiu prenis la nomon je Gracchus). Li gvidis la t. n. "Konspiro de la Egaluloj", kiu fiaskis. Liaj politikaj ideoj baziĝis en la nuligo de la privata proprieto, la naciigo de la produktado, la socia organizado de la laboro kaj la konceptado de la revolucio kiel "socia milito inter riĉuloj kaj malriĉuloj", t. e. "la klasbatalo". Ja, li estis iu el la plej gravaj pioniroj de la socialismo. Marks agnokskis kiel multe utilis al li la instruo de Babeuf.

Estas sciate ke la Franca Revolucio havis kiel stranga epilogo la dekjaran imperion de Napoleono Bonaparto. Teorie, la fiasko de Napoleono estus la venko de la malamikoj de la revolucio. Sed en la realo la afero ne estis tiel simpla. Neniam la situacio estis restarigita kiel antaŭ la jaro 1789. Nek en Francio, kie okazis la revolucio, nek en la landoj de Eŭropo kie la napoleonaj trupoj estis alportintaj la revoluciajn ideojn, nek eĉ en la amerikaj kolonioj de Hispanio kaj Portugalio kiuj de tiam batalis, kaj ofte sukcesis, en sia nacia liberiĝo.

Ekde 1815 en la eŭropaj landoj kiuj liberiĝis el la napoleona okupado estis restarigitaj la absolutismaj monarkioj, kaj la nobelaro kaj la klerikaro reakiris siajn privilegiojn. Sed en Francio ne eblis reveni al la antaŭrevolucia situacio kvankam la lando denove havis borbonan reĝon. Estis ia povo-ekvilibro inter la aristokrataro reveninta el la ekzilo kaj la burĝaro. Tiaj situacioj estas malstabilaj kaj provizoraj. Dume, krom en Francio ankaŭ en la plej potencaj industriaj landoj: Britio, Germanio… la proletaro laboranta en la fabrikoj, sufer-

ante severajn kondiĉojn de subpremado kaj malriĉeco estis generante fortan klaskonscion. Tamen la mobilizoj de la dua kaj tria jardekoj de tiu 19-a jarcento ne tiel estis adresitaj al la plibonigo de la vivkondiĉoj de la proletaro kiel al la reakiro de la politika libereco por ĉiuj popolaj klasoj: burĝaro, laboristaro, kamparanaro… Inter 1814 kaj 1830 la liberalismo konstituis unusolan movadon kiu havis kiel celon kaj flagon la ideo de la Konstitucio, t. e. leĝo protektanta la rajtojn de la persono kaj limiganta la povon de la reĝoj. La absolutismaj reĝoj persekutadis la liberalistojn: multaj homoj estis paf-mortigitaj, pendumitaj… Okazis ribeloj kaj revolucioj en kelkaj eŭropaj landoj: Hispanio, Italio, Germanio, Aŭstrio… Sendube temis pri klasbatalo sed ĝia karaktero estis sufiĉe ambigua ĉar la neceso kontraŭbatali la feŭdecan povon kunigis klasojn kiuj havis siajn proprajn kontraŭdirojn inter ili. Ne unuafoje, nek lastfoje, la malaltaj klasoj de la socio devis unuiĝi al la burĝaro por kontraŭfronti la povon de la komuna malamiko. En tiu epoko la absolutismaj reĝoj de Eŭropo estis unuiĝintaj per iu interakordo kiu estis nomata "Sankta Alianco". La kristanaj eklezioj kondamnis la liberalismon kaj decide apogis la absolutismajn monarkiojn. La universitatoj estis metitaj sub la kontrolo de la klerikaro. Sed la situacio en Francio estis ne-inversigebla. La monarkio celis reveni al la kondiĉoj de la Malnova Reĝimo, ĉar la burĝaro senĉese pliriĉiĝanta pro la disvolviĝo de la industrio tute ne estis preta konsenti la dominadon de la feŭdeca aristokrataro. La bankieroj, la grandaj komercistoj, la industriaj kapitalistoj, kune kun la intelektuloj kaj la sociaj tavoloj de la mezklaso kaj de la plebo pretiĝis batali por forpuŝi la absolutismon kaj aprobi Konstitucion en kiu la povo de la reĝo estus tre limigita.

En monato julio de 1830 la indigniĝo kontraŭ la despotismo de la reĝo Karolo la 10-a okazigis revolucian eksplodon. La armeo ne sukcesis sufoki la ribelon; fakte, grandparto el la oficiraro simpatiis al la liberalistaj pozicioj, kaj la soldatoj rifuzis pafi kontraŭ la popolo. Estis elektita alia monarko pli respektema pri la demokratiaj liberecoj. Tiu revolucio de 1830 signis la venkon de la liberalismo laŭ la kriterio de la grandaj burĝuloj: politika libero, pres-libero sed laŭ la aprobita konstitucio la voĉdon-rajto ne estis por ĉiuj civitanoj, estis laŭ-censa voĉdon-sistemo, t. e. nur la proprietuloj rajtis voĉdonadi. Same kiel la revolucio de 1789, tiu de 1830 havis grandan influon sur la internacia situacio. En diversaj lokoj la popolaj klasoj ribelis kontraŭ la absolutismo kaj en iuj el ili sukcesis. Oni devas ne forgesi ke ĉi tiu tuta politika kaj socia mobiliziĝo estis iniciato de la burĝklaso. La rolo de la laboristoj kaj aliaj malaltaj klasoj de la socio estis tiu de akompanantaro; ilia klaskonscio limiĝis al la reago pro la malfeliĉa situacio en kiu ili dronis, sed sen klara ideo pri la amplekso de la kaj povo de la klasoj kiuj ekspluatadis ilin, ili ankaŭ ne havis difinitan ideon pri la maniero realigi la efektivigadon kaj demarŝadon de siaj interesoj. La ellaboritaj ideoj kaj planoj de la movado de Gracchus Babeuf en 1796 ne estis konataj de la laboristaj amasoj inter kiuj, cetere, ne abundis la kleraj homoj.

Ĉi tio komencis ŝanĝiĝi iompostiom. La disvolviĝo de la industrio koncentrigis kreskantan nombron da laboristoj en la grandaj urboj kaj ili komencis organiziĝi en sindikatoj por batali favore al siaj sociaj rajtoj. Ekde 1845 la situacio malboniĝis rezulte de iu profunda ekonomia krizo kiu efikis sur tuta Eŭropo. Estis fermo de fabrikoj kaj estiĝis granda malsato. La 21-an de februaro de 1848 okazis en Parizo granda manifestacio de laboristoj, studentoj kaj mez-klasanoj. La policο rifuzis pafi kontraŭ la manifestaciantoj. Du tagojn poste estis proklamita la Respubliko kaj oni konstituis iun provizoran registaron en kiu, unuafoje en la historio, estis du laboristoj. Tiu revolucio de 1848 estis alianco de la proletaro kaj la mezklaso kontraŭ la burĝaro, kaj sekve de ĝi oni establis la universalan voĉdon-rajton. Sed la alianco de la laboristaro kaj la mez-klaso daŭris malmulte. La franca proletaro estis batalante ne nur por la Respubliko kaj por ĉies voĉdon-rajto sed ankaŭ por profundaj sociaj reformoj cele plibonigi sian situacion. La mezklasanoj, antaŭ la laboristaj postuloj, timis ke la privata propraĵo estis subdanĝere kaj denove alianciĝis al la alta burĝaro. Ĉesis esti laboristaj ministroj en la registaro kvankam konserviĝis la faritaj politikaj ŝanĝoj, en la socia tereno oni regadis pli konserveme. Ankaŭ ĉi-foje Francio estis la fokuso de revolucia procezo kiu sekve etendiĝis al tuta Eŭropo. Tiurilate oni diradis ke kiam Francio tusas, tuta Eŭropo kataras. En multaj lokoj okazis revolucioj de laboristoj kaj aliaj malaltklasanoj kune kun la etburĝaro aŭ mez-klaso kontraŭ la alta burĝaro kaj en ĉiu tiuj lokoj oni konkeris politikajn, demokratiajn, rajtojn, sed ankaŭ ĉie estis marĝenitaj la laboristoj kiam oni intencis pasi al la postulado de sociaj rajtoj. Rezulte de tiu sperto, de tiam la laboristoj lernis malkonfidi je tiel necertaj aliancanoj kaj ĉesis partopreni en burĝaj revolucioj; de tiam oni devos temi pri laboristaj revolucioj.


La laboristaro kaj la intelektuloj kiuj identiĝis kun ties kaŭzo devis eklerni ke la industria revolucio signifis la plikreskiĝon de la povo de la burĝklaso kaj la firmiĝon de tiu kapitalismo kiu baziĝas sur la privata proprieteco de la produktad-rimedoj kaj la ekspluatado de la proletaro. La doktrino per kiu oni intencis/as pravigi tiun sistemon estis/as la liberalismo, laŭ kiu la ŝtato devas ne interveni en la ekonomiaj kaj sociaj aferoj sed, male, devus permesi la liberan organizadon de la entreprenoj kaj negocoj. Kompreneble, la nepra rezulto de tia sistemo estas la subpremado de la malriĉuloj far la riĉuloj, la absoluta superregado de la kapitalistoj sur la sendefendaj laboristoj. Nuntempe oni klare vidas tiun aferon, sed ĝis la mezo de la 19-a jarcento la laboristoj de Eŭropo ne sciis reagi. La vekiĝo de la proletaro estis longa kaj malfacila procezo kiu eblis nur dank' al tio ke iuj intelektuloj alprenis la taskon studi kaj diskonigi la instruon. Temas pri la unuaj socialistoj.

La socialista ideologio aperis kiel kontraŭstaro de la kapitalismo, kaj ĉar la kapitalismo baziĝis sur la privata proprieto de malmultaj uloj kaj la neinterveno de la ŝtato, la socialismo celas la publikan kontrolon de la produktad-rimedoj kun la ŝtata interveno favore al la laboristoj. De tiam ŝanĝiĝis la protagonisto de la revolu-

cioj; la laboristoj komprenis ke ili devus demarŝi la konkeradon de siaj sociaj rajtoj konservante la akiritajn liberecojn atingitajn de la revolucioj kiujn ili faris kune kun la burĝaro. Inter la unuaj socialistaj teoriuloj estas menciindaj la brito Robert Owen (1771-1858), la franco Louis Blanc (1811-1882) kaj la famaj germanoj Karl Marx (1818-1883) kaj Friedrich Engels (1820-1895). Marks ellaboris diversajn verkojn kiuj konstituas la teorian bazon de la socialista ideologio. Estas ideo lia tio ke, estante la homa laboro la sola forto kiu kreas riĉecon, ĝi devas resti en la manoj de la laboristoj kiuj ĝin produktas. Li konsideris ke la kapitalismo portas ene de si mem la ĝermon de sia propra detruo kaj ke iu laborista revolucio kondukos al justa kaj libera socio, en kiu ĉiu civitano produktus laŭ sia eblo kaj ricevus laŭ sia neceso.

Inter la ampleksa verkaro de Marks (pri la ekonomio, politiko, historio…) elstaras la fame konata ***«LA KAPITALO, Kritiko de la politika ekonomio»***. Tiu verko estas ĝenerala analiza priskribo de la kapitalista produktad-maniero, ĝiaj bazaj elementoj kaj ĝia artikiĝo kun speciala atento al la fazo de la produktado, kiun Marks konsideras la bazon de la tuta kapitalista sistemo kaj ĝenerala de ĉiu produktad-procezo. Oni povas diri ke la kerna ideo de la argumentado de la aŭtoro estas ke la kapitalo, esence, estas akumulita laboro. La politikaj konkludoj kiujn oni eltiras el tiu fakto estas ke la plusvaloro kiun la kapitalisto-investinto enspezas estas deprenita salajro-parto, io kion oni forrabas el la produktinto. La libro, kiu restis ne-finita kiam Marks mortis, estas sufiĉe malfacile legebla por ne-specialistoj pri ekonomiaj aferoj. Pli alirebla por la kompreno de la laboristaj amasoj estis la t. n. ***«La Komunista Manifesto»***, verkita de Marks kaj Engels en la jaro 1847 kaj publikigita en 1848. La manifesto finas per la fama slogano: **Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu vin!**. Tiun alvokon al la tutmonda proletaro mendis al la aŭtoroj iu londona laborista organizaĵo nomata “Ligo de la Komunistoj”, antaŭe fondita en Parizo sub la nomo “Ligo de la justuloj”. La kernaj ideoj de la Manifesto estas ***ke la politika kaj intelekta historio de ĉiu socio dependas de la produktad-maniero kaj de la sociekonomia formo kiun ĝi generas; ke la apero de la sociaj klasoj estas rezulto de la privata proprieto kaj la ekspluatado, kaj sekve la historio de la socioj estis la historio de la klasbatalo inter la ekspluatantaj kaj la ekspluatatoj; ke en la nuntempa moderna socio la proletaro estas la unika klaso kies emancipiĝo signifos la emancipadon de la tuta homaro pere de la komunista revolucio, la abolo de la burĝa proprieto, de la sociaj klasoj kaj de la ŝtato.*** En nia retpaĝo estas artikolo pri la valideco de la Komunista Manifesto en nia epoko, en la ret-adreso:
http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/hejmo/mce.html

KARLO MARKSO 1818-1883



Ĝis nun la filozofoj dediĉiĝis nur interpreti la mondon diversmaniere, sed la celo devas esti transformi ĝin.

Iam oni demandis al Engels kial oni metis la titolon “Komunista” al la Manifestio anstataŭ “Socialista” kaj li respondis ke la radikala programo esprimita de la Manifesto pli alĝustiĝas al la adjektivo “komunista” ĉar la termino “socialista” komencis esti iome ambigua tial ke ekzistis socialistaj tendencoj kiuj ne aprobus la ideojn de la Manifesto. Ja, meze de la 19-a jarcento estis en la sino de la socialista movado polemikoj kaj kontraŭstaro inter inter grupoj de “utopiaj socialistoj” kaj “sciencaj socialistoj”. Marks kaj Engels enkadriĝas inter ĉi lastaj.

Sed krom la socialismo de tiu epoko ekzistis ankaŭ alia plano de laborista socio sen kapitalisma ekspluatado. Estis tiu de la anarĥismo kies ĉefa teoriulo estis la ruso Miĥail Bakunin. La anarkista teorio asignas nenian rolon al la ŝtato; fakte ĝi agnoskas nenian aŭtoritaton. La laboristaj organizaĵoj inspiritaj en ambaŭ teorioj komence estis persekutataj de la burĝaj registaroj sed spit’ al ĉio ili kapablis plifortiĝi ĝis tioma grado ke la aŭtoritatoj de kelkaj ŝtatoj unue devis toleri kaj poste leĝpermesi ilin. En 1864 okazis en Londono iu renkontiĝo inter grupoj de francaj laboristoj kaj sindikataj organizaĵoj de Britio. El tiu interrilato naskiĝis la **Internacia Asocio de Laboristoj** kiun la historio konas kiel la **Unua Internacio**. Kunlaboris en ĝi Marks, Engels kaj Bakunin. Tiu asocio naskiĝis kun la alvoko disvastigi tra la tuta mondo la bataladon kontraŭ la kapitalismo. Ĉar la kapitalismo estis tutmonda sistemo, ankaŭ la revolucio kiu celus ĝin detrui devus esti tutmonda. Komence la Unua Internacio estis tre sukcesa; aliĝis al ĝi plejparto el la sindikatoj kaj laboristaj rondoj de Francio, Italio, Hispanio, Germanio k. a. Tamen ĉi tiu unua proletara organizaĵo havis mallongan vivo-daŭron ĉar jam dekomence ĝi estis dividita inter la sekvantoj de Marks kaj tiuj de Bakunin. Ambaŭ grupoj havis saman celon: egaleca socio atingata per kontraŭ-kapitalisma revolucio kiu detruus la burĝan ŝtaton kaj la privatan proprieton, sed estis inter ili malakordo rilate al la maniero organiziĝi por atingi tiun celon. Marks konsideris ke la revolucia movado devus organiziĝi en iu partio por la konkero de la ŝtato, kaj ekde ĝi entrepreni la konfiskadon de la havaĵo de la kapitalistoj. Male, Bakunin, kontemplis tujan revolucion kontraŭ ĉiuj ŝtataj institucioj senescepte, ankaŭ la ŝtato kaj ĉia ajn aŭtoritato. Iĝis neevitebla la kverelo inter ambaŭ grupoj kaj ne eblis ia ajn interakordo. Tial la Internacio dissolviĝis en la jaro 1876. Tamen ne malaperis la laborista movado, kvankam ĝi restis dividita en du sektorojn tre malsamajn kaj ofte rivalajn, unuflanke la socialistoj, tre multenombraj en la industriigitaj landoj, aliflanke la anarkiistoj, pli multenombraj en la agraraj terzonoj. Siavice la anarkiismo disdividiĝis en kelkajn grupojn, iuj el ili tre perfortemaj, kiuj evoluis al terorismo, okazigante atencojn kontraŭ patronoj kaj regantoj. Fakte, post la ĉeso de la

Unua Internacio okazis duobla procezo: dum la anarkiismo estis alprenante pli kaj pli radikalajn teniĝojn, la socialistoj iompostiom adoptadis longatempajn strategiojn. Profitante la voĉdon-rajton en la eŭropaj landoj, la socialismo organiziĝis en partioj kaj partoprenis en la balotadoj. Sed en 1871 ambaŭ branĉoj de la laborista movado kunrolis gravan revolucian sperton: la Parizan Komunumon.

Tiu revolucio, aŭ revolucio-provo, kiun oni konas laŭ la nomo "Pariza Komunumo" estis serioza intenco forbalai la burĝan sociordon por anstataŭigi ĝin per socipolitika sistemo mastrata de la proletaro. Tiu evento eblis tial ke okazis grava krizo kaj kontraŭdiro ene de la burĝa socio de Eŭropo: la franc-germana milito de 1870-71. La malvenko de la franca armeo de Napoleono la 3-a antaŭ la germanoj ebligis ke ĉi tiuj alvenis ĝis la pordoj de Parizo kaj sieĝis ĉi tiun ĉefurbon dum kvar monatoj (de la 19-a de septembro de 1870 ĝis la 28-a de januaro de 1871). La revolucio, kiu komenciĝis la 18-an de marto havis anarkiistan kaj socialistan signon, kaj en ĝi ludis gravan rolon iuj figuroj de la Unua Internacio. La popola mobiliziĝo estis spontana eksplodo de kolero, sen ia ajn preparo por la agado kaj sen difinita politika plano krom la ideologia inspiro de tiuj laboristaj movadoj majoritataj en la epoko. Sekve de la milito kaj la sieĝo al Parizo, la malaltaj klasoj de la socio estis suferante grandan mizeron kaj malsaton. La falo de Napoleono la 3-a ebligis la proklamon de la Respubliko, sed ĉi ties provizora registaro, prezidata de Adolphe Thiers, ne povis instaliĝi en Parizo pro la popola ribelo kaj translokiĝis al Versajlo. La povo-manko en Parizo igis ke la Nacia Gvardio alprenus la povon por certigi la kontinuecon de la funkciado de la administracio. Apogis tiun situacion la malkontenta loĝantaro de la ĉefurbo, kiu postulis demokratian –ne burĝan– respublikon. La Nacia Gvardio kunvokis balotadon por la urba konsilantaro kaj atingis majoritatan venkon la radikalaj respublikanoj kaj la socialistoj. Thiers pretiĝis por la sufokado de tiu popola povo pere de la armeo. La urba konsilantaro asignis al si ekzekutivan kaj leĝo-farajn funkciojn kaj alprenis la ruĝan flagon kiel standardo. Dum la 60-taga daŭro de tiu popola povo, ĝi promulgis serion da revoluciaj dekretoj, kiel memmastrumado de la fabrikoj, kreado de infanĝardenoj por la gefiloj de la laboristinoj, malpermesigo de dumnokta laborado, laikeco de la ŝtato, nuligo de luoŝuldoj kaj abolo de la interezo de la ŝuldoj. Por la anarkiistoj tiutipa regado kongruis kun sia ideo pri memmastrumado, kaj la marksistoj identigis ĝin kun la Proletara Diktaturo. Engels mem asertis ke tiu funkciado de la Pariza Komunumo estis la Diktaturo de la Proletaro kiu, en la marksisma teorio, estus transira etapo de la irado el la burĝa socio al la Socialismo kaj la Komunismo. Ne eblis percepti la kontraŭdirojn inter ambaŭ revoluciaj teorioj ĉar la daŭro de la Pariza Komunumo estis tre mallonga. Tiu revolucia provo estis tre perforte sufokita de la burĝaj fortoj. Post unumonata rezisto, okazis en la parizaj stratoj tre perforta batalado de 21-a al la 28-a de majo inter la civitanoj kaj la armeo. La fina bilanco estis 10.000 kaj 20.000 mortintoj pro la batalado kaj pro la postaj reprezalioj, la detruado de pli ol 200 konstruaĵoj kaj historiaj monumentoj, la ekzilo de 8.000 al 10.000 homoj kaj la submetado de Parizo al la milit-leĝo dum kvin jaroj.

La fiasko de la Pariza Komunumo kaj la dissolvo de la Unua Internacio ne metis finon al la laborista movado, sed male, ĉi tiu plifortiĝis kaj en ĉiuj eŭropaj landoj formiĝis socialistaj partioj kun la celo anstataŭi la kapitalistan socion per pli justa sociordo en kiu estus malaperinta la ekspluatado de homo fare de homo. Sed perdis apogon la teorio ke estus necesa la revolucio por efektivigi la ŝanĝon kaj la laborista movado orientiĝis al la partopreno en la pribalotaj procezoj, en kiuj oni sukcesis elekti deputitajn laboristojn por la parlamentoj. Tial ke plejparto el la sindikatoj kaj la laboristaj asocioj kiuj formiĝis en tiuj lastaj jardekoj de la 19-a jarcento havis similan ideologion kaj programon, renaskiĝis la sento je internacia unuiĝo de la laboristaj fortoj. En 1889 estis fondita en Parizo la t. n. Dua Internacio. Estis en ĝi iu grava diferenco rilate al la Unua: ĉiuj aliĝintoj estis socialistoj, la anarkiistoj restis for. Tiu Dua Internacio deklaris la 1-an de majo kiel festo de la laboristoj. La socialistaj partioj notinde kreskis kaj plifortiĝis en la alte industriigitaj landoj. En la jaro 1912 la germana socialista partio havis 110 deputitojn en la parlamento. Notindas ke, se la laboristaro eltiris instruon de la revolucia fiasko de la Pariza Komunumo, ankaŭ la burĝaro lernis ke estas tre danĝere teni la proletaron en la mizera situacio en kiu ĉi tiu troviĝis en la unuaj etapoj de la industriiĝo. Iompostiom pliboniĝis la vivkondiĉoj de la laboristoj. Komence de la 20-a jarcento ekpretiĝis tio kio poste estis konata kiel "Komsum-socio", ***Welfare state***… Kompreneble, en tiu epoko la procezo estis ankoraŭ komenciĝanta kaj en multaj lokoj ĝi estis apenaŭ perceptebla. Sed la signoj de la ŝanĝo estis klaraj: la registaroj komencis agnoski la liberecon de la laboristoj organiziĝi, kunsidi, striki… La nova generacio de socialistaj gvidantoj kaj teoriuloj: la germanoj Eduard Bernstein kaj Karl Kautsky, la franco Jean Jaurès… malkonsentis kun Marks pri la graveco de la revolucio en la kapto de la povo far la laboristaro kaj emfazis pri la taŭgeco kaj ebleco de la pribalota kaj parlamenta vojo. Sed ne mankis marksistoj kiuj malkonsentis kun la nova kurso kiun estis alprenante la socialista movado. Poste ni devos sufiĉe okupiĝi pri la rezultinta teoria kaj politika polemiko ĉar ĝi sufiĉe influis en la karaktero de la 20-a jarcento. Nun ni atentu pri alia aspekto de la tiama reala situacio de la mondo: la imperiismo.

Koloniigado de fremdaj kaj malproksimaj landoj, ĉefe en Ameriko, fare de la eŭropaj potencoj, ekzistis jam ekde la malkovro de tiuj lontanaj teritorioj fine de Mezepoko kaj komenco de la Moderna Erao. Sed la industria revolucio impulsis la duan etapon de la koloniismo. La ĉefaj industriaj landoj konkuris okupi teritoriojn, ĉefe el Afriko kaj Azio, el kiuj oni povus eltiri krudmaterialojn por siaj industrioj. Se iome mildiĝis la labor- kaj viv-kondiĉoj de la eŭropaj laboristoj ekde la komenciĝo de la 20-a jarcento, tute ne okazis same en la koloniigitaj teritorioj. La kapitalismo baziĝas ĉiam

sur ia ekonomia malekvilibro; se ĝia efiko estas malpli akra en iuj lokoj, la premo intensiĝas aliloke. Ni vidu la situacion de Kongo fine de la 19-a kaj komence de la 20-a jarcentoj.

En la jaro 1885, en la t. n. Konferenco de Berlino, Britio kaj Francio, interakordis kun la germana kanceliero Otto von Bismark la distribuon de plejparto el la afrika teritorio por ĝia ekspluatado far tiuj potencoj. En tiu forumo oni decidis asigni al la belga reĝo, Leopoldo la 2-a, ampleksan terzonon meze de la kontinento. Tiu teritorio, kiu estis nomata Kongo, estis de tiam ekspluatata kiel privata propraĵo de la belga monarĥo. Dum pli ol dudeko da jaroj la lando estis senigita je siaj naturaj riĉaĵoj, precipe kaŭĉuko kaj eburo, favore al Leopoldo kaj pere de la sklava laboro de la indiĝena loĝantaro. Por kontroli la kongolanojn, la kolonia administracio starigis reĝimon de teroro, kiu ofte realigis amasan murdadon kaj mutiladon je manoj. Multaj personoj, inter kvin kaj dek milionoj, estis viktimoj de tiutipa subpremado. Estis ia internacia reago kontraŭ tiu politiko kaj ekde la jaro 1908 Kongo jam ne plu estis privata propraĵo de la reĝo sed daŭre restis kiel belga kolonio. La situacio en aliaj kolonioj de eŭropaj landoj ne tiel estis kruelaj kiel tiu de Kongo sed tamen la vivkondiĉoj de la enloĝantoj de la koloniaj teritorioj ĉiam estis, kaj daŭre estas, multe pli malbona ol tiuj de la eŭropanoj. Tiurilate oni povas diri ke la prezo de la Konfort-socio de la malaltaj klasoj de la industriigitaj landoj estas la mizero de la popoloj de la malevoluintaj landoj.

En la 20-a jarcento, la industriigita mondo ne limiĝis al Eŭropo. Jam de tre frue Usono ĝuis de tre favoraj kondiĉoj por rapide antaŭmarŝi en la procezo de industria progresado. Ĝia kolonia spaco estis Centra kaj Sud-Ameriko, kiuj iompostiom liberiĝis el la dependeco de eŭropaj potencoj sed por fali sub la kontrolo de la usona kapitalismo. Menciinda estas ankaŭ la kazo de Japanio. Ĉi tie ne estis liberalisma kaj burĝa revolucio; la reformoj en la ekonomio kaj la politiko estis iniciato de la imperiestra povo; temis pri revolucio farita desupre. Ĉiukaze la japana industria revolucio estis tiel kapitalista kiel tiu de Okcidento, kaj la interklasa malegaleco estis tute simila al tiu de Eŭropo kaj Ameriko.

Aparta atento meritas la kazo de Rusujo. Ankaŭ tie ne estis okazinte la burĝa revolucio, kaj la lando estis, komence de la 20-a jarcento, tre malmulte industriigita spite al la granda ebleco kiun ĝi havis tiurilate. La aŭtokratoj de tiu granda lando ne tiel estis saĝaj kiel tiuj de Japanio. Krome la aristokrataro estis potenca kaj la burĝaro tre malforta. Tiuj cirkonstancoj kaj la fakto ke la ideoj povis libere flui el la eŭropaj landoj, igis ke la ĉefa revolucia teniĝo kiu generiĝis en Rusio estis tiu de la malaltaj klasoj de la socio: la kamparanaro kaj la ne tre granda industria laboristaro. Krom tio, estis iomete da opozicio, liberalism-tipa, inter la negrava burĝaro.

**VLADIMIR ILICH (LENIN) 1870-1924**

La imperiismo ekaperas kiel disvolviĝo kaj rekta daŭro de la bazaj karakteraĵoj de la kapitalismo.



Ĉiukaze fiaskis la intencoj solvi la aferon ene de la sistemo; ne eblis starigi parlamentan politikan reĝimon similan al tiu de okcidenta Eŭropo. En tiu stagna situacio, estis faktoro de malstabiligo la milita konflikto kiun Rusio havis en 1905 kontraŭ Japanio. La rusa mararmeo estis detruita de la japanoj kaj la registaro de la Caro sin vidis devigita subskribi interakordon tre humiligan por la lando. Ĉi tio estis kaŭzo de malkontento kaj popola mobiliziĝo. La 22-a de januaro de 1905 iu granda manifestacio trairis la stratojn de Sankt-Peterburgo kaj adresiĝis al la Vintra Palaco de la Caro Nikolao la 2-a mendante mildigon de la mizera stato de la popolanoj. Antaŭ la palaco, la polico brutale reagis pafante kontraŭ la popol-amaso mortigante preskaŭ milon da personoj Tiu evento estas konata en la historio kiel “la sanga dimanĉo”. Post tio la mobiliziĝo etendiĝis al la ĉefaj urboj de la lando kaj en Odeso la maristoj de la kiras-ŝipo ***Potemkin*** ribelis kaj pik-mortigis la tutan oficiraron. La Caro promesis la kunvokadon de asembleo, **Dumao**, kiu, fakte, estis konstituita en majo de 1906 kun plejmulto el deputitoj de liberalisma ideologio. Sed la eksperimento ne prosperis: sufiĉis ke la asembleo prezentus serion da progrescelaj projektoj por ke la Caro decidu la tujan dissolvon de la Ĉambro. Ĉi-foje ne okazis popola reago kiel tiu de la kapto de la Bastilo en Parizo en 1789, sed ĉiukaze la normala rilato inter la rusa monarĥo kaj sia popolo estis definitive rompita, kaj tio signifis ke la monarkisma institucio ne havis perspektivon de feliĉa estonteco en tiu lando.

Sed la situacio en 1906 estis ke la opozicio estis silentigita kaj la revoluciuloj troviĝis aŭ en malliberejoj aŭ ekzilitaj. Kaj tre grave, post la milita malvenko antaŭ Japanio, Rusio entreprenis intensan procezon de industriiĝo. Oni kreis multajn fabrikojn en la zonoj de Sankt-Peterburgo kaj Moskvo, kaj sekve de tio tre pligrandiĝis ankaŭ la nombro da laboristoj. En tiu socia medio formiĝis grupoj de politikaj aktivuloj. Jam dum la mobiliziĝo de 1905 okazis amasa popola partopreno en asemblea movado kiu en tiu lando estis nomata “sovetismo”. La sovetoj estis revoluciaj konsilioj formitaj de la laboristoj kaj la civitanoj ĝenerale. En ili partoprenis kaj ludis gravan rolon la membroj de la diversaj politikaj pozicioj: anarkistoj, marksistoj, liberalistoj… La aŭtokratisma politiko de la Caro sufokis en 1906 la funkciadon de tiu asemblea movado sed la aktivuloj de la laboristaj organizaĵoj daŭrigis sian agadon eksterleĝe. Notindas ke ene de la marksistaj fortoj de Rusujo jam en 1903 konkretiĝis malakordo inter la reformistoj kiuj postuladis la forlason de la revolucia strategio (menĉevistoj) kaj tiuj kiuj subtenis la neceson je revolucio kaj diktaturo de la proletaro. Ĉi lastaj estis la bolŝevistoj, kies plej elstara lidero estis Lenino. Sovetoj, menĉevistoj, bolŝevistoj, Lenino… Temas pri personoj kaj kolektivoj kiuj ĉefrolos en 1917 la plej decidan proletaran revolucion.

# La Rusa Revolucio



## Historia neatenditaĵo

Marks trafe konjektis ke la industria revolucio estigus objektivajn kondiĉojn de socia ŝanĝo far iu klaso kiu kapablus liberigi la tutan homaron liberigante sin mem. En antaŭaj sociekonomiaj formacioj tute ne eblis tia kvalita ŝanĝo. Tamen la afero disvolviĝis laŭ maniero tute malsama ol Marks estis prognozinte. Laŭ li, la revolucio kiu metus finon al la superregado de la burĝklaso devus okazi en alte industriigita lando. Ĉiuj pensis ke la elektita protagonisto de tiu historia tasko estus la laboristaro de Britio, Francio, Germanio… Sed post la fiasko de la Pariza Komunumo, la proletaro de tiuj landoj kaj ties teoriuloj perdis la fidon pri si mem kaj kontentiĝis per sociala pliboniĝo kaj politikaj atingoj kiuj ne endanĝerigis la klasan dominadon de la burĝaro. Oni povas diri ke en ilia horizonto ili ne kontempladis la malaperon de la kapitalismo kaj ĉi ties anstataŭo per socialista kaj komunista sistemo. Sed ofte okazas ke la plej decidaj eventoj de la homa historio estas tiuj kiuj okazas neatendite. Ĝuste tio okazis en Rusio en la jaro 1917.

Komence de la 20-a jarcento, la rusa imperio tute ne estis spertinta la efikon de la burĝa liberalisma revolucio kiu tiom multe kontribuis transformi la eŭropajn naciojn. Tiam la cara imperio daŭre estis absolutisma kaj aŭtokratisma monarkio. La cara reĝimo kontroladis la landon pere de firma burokrataro, potenca polico kaj ia Ortodoksa Eklezio tre ligita al la politika povo. Dum la regado de la Caro Aleksandro la 2-a oni estis entreprenintе iujn ŝanĝojn: abolo de la feŭdismo en 1861, reformo de la justic-sistemo kaj de la instruado... Tiu caro mortis pro terorista atenco, kaj lia filo, Aleksandro la 3-a (1881-1894) haltigis la reform-procezon. La Caro Nikolao la 2-a persistis subteni la bazon de la aŭtokratisma reĝimo. Tamen dum ĉi ties reĝado oni entreprenis la industriigon de la lando kvankam en la politika tereno la situacio restis senŝanĝa. La industriigo de Rusujo estis farita malfrue kaj malbone; malfrue ĉar ĝi ne komencis ĝis la jaro 1890 kaj pliintensiĝis nur post 1906, kaj malbone ĉar ĝi estis farita pere de eksterlanda investado. Krome ĝi koncentriĝi en malmultaj regionoj: Moskvo, Sant-Paterburgo, Ukrainio, Bakuo kaj Donetz. Sed cetere Rusio daŭre estis plejmulte agrokultura lando. La kamparanoj estis 80 procento el la loĝantaro, krome plejmultaj kamparanoj posedis nenian terpecon; ili estis nuraj kampar-laboristoj dum la nobelaro konservadis siajn grandajn ter-posedaĵojn. Do, ekzistis en la rusa socio granda klasa malegaleco. Estis malplimulto da riĉegaj posedantoj kaj gradamaso da kamparanoj kaj industriaj laboristoj kies vivkondiĉoj estis mizeraj. La mez-klaso, tamen, estis malgranda kaj malforta. Do, la tiama kaj tiea klasbatalo, esence, estis afero inter la popolaj amasoj kaj la privilegiitaj grupoj de la aristokrataro.

Spite al la polica subpremado, en la unuaj jaroj de la 20-a jarcento estis tre aktiva, eksterleĝa, politika opozicio. En 1905 estis konstituita la t. n. **Konstitucia-Demokratia Partio** (**Kadet**) far reformistoj kiuj celis parlamentan politikan reĝimon kun konstitucia monarkio laŭ la okcidenta stilo. Estis ankaŭ iu nomata **Socialista Revolucia Partio** (**SR**, eseristoj), konstituita en la jaro 1901, kiu interesiĝis pri la problemoj de la kamparanaro kaj celis agraran kolektivismon. La rusaj marksistoj grupiĝis en la **Rusa Socialdemokratia Laborista Partio** (**POSDR**) kiu estis fondita en 1898, sed, same kiel okazis al aliaj socialistaj partioj de Eŭropo en tiu epoko, tiu organizaĵo estis dividita ekde 1903 inter la revoluciuloj kaj la reformistoj. La bolŝevistoj, komandataj de Lenino, postuladis fortan kaj centralizitan partion da disciplinitaj aktivistoj pretaj gvidi la laboristklason al la revolucio por starigi la diktaturon de la proletaro. Male, la menĉevistoj, kies lidero estis Martovo, asertadis ke en Rusio ne eblis proletara revolucio sen antaŭa liberalism-burĝa etapo. La kontraŭdiroj inter ambaŭ grupoj konkretiĝis en 1903 en kongreso okazinta en Bruselo kaj Londono, en kiu partoprenis rusaj ekzilitoj, inter kiuj estis plimulto la bolŝevistoj. Ĝuste, en la rusa lingvo la vorto ***bolŝinstvo*** signifas “majoritatano”. Krome estis ankaŭ granda anarkista influo, ĉefe inter la kamparanaro. Ni memoru ke Bakunin estis ruso. Krome ekde 1861 ekzistis iu movado konata kiel **Populismo** kiu celis la finon de la carismo kaj la kapto de la povo far la kamparanoj. Estis iu membro de tiu movado la realiganto de la atenco en kiu mortis la Caro Aleksandro la 2-a. Tiu populista movado komencis dekadenci kaj malfotiĝi laŭlonge de malmultaj jaroj post la apero de la marksistaj organizaĵoj.

Sekve de ekonomia krizo en la jaroj 1902-1903 kaj de la malvenko de la rusa armeo en la milito kontraŭ Japanio en 1904-1905, estiĝis reago de la rusa popolo. La 9-an de januaro de 1905, 100.000 strikantoj gvidataj de iu pastro nomata Gapono pace manifestacie adresiĝis al la cara palaco de Sankt-Peterburgo. Ili celis transdoni al la caro manifeston esprimante la malkontenton de la popolo. La monarko reagis perforte; li ordonis al la kozaka gvardio impeti kontraŭ la popolamaso kaj mortis proksimume milo da personoj. Laŭ iuj versioj, la mortintaj manifestaciantoj estis nur 92. Ĉiukaze, la sekvoj de tiu "sanga dimanĉo" estis tute aliaj ol pretendite. La masakro vekis plend-movadon: la strikoj kaj la manifestacioj etendiĝis al aliaj urboj kaj al la kamparo. Krome en iu jaro 1905 okazis ankaŭ teroristaj atencoj; en unu el ili mortis iu onklo de la caro. Komence de la somero de 1905 la maristoj de la kiras-ŝipo ***Potemkin*** ribelis kontraŭ siaj oficiroj kiam ĉi tiuj devigis ilin manĝi putriĝintan viandon. La ceteraj ŝipoj de la floto de la Nigra Maro ricevis ordonon redukti ilin, sed la koncerna maristaro rifuzis ataki la ribelintojn. Lenino opiniis ke la situacio estis favora por revolucia procezo ĉar parto el la armeo apogus ĝin. Li opiniis ke "***por ke iu sociala revolucio sukcesu estas necesaj, almenaŭ, du kondiĉoj: ia alta disvolviĝo de la produktigaj fortoj kaj iu proletaro preta por ĝin fari***". Tia teorio estas pure marksisma, sed laŭ ĝi la tiama situcio de Rusujo ne tute alĝustiĝis al tiuj kondiĉoj, tial la revolucio kiu sukcesis en tiu lando estis sufiĉe ekstertipa, neatendita. Eble tiu estas la ĉefa kondiĉo por la revolucia sukceso: ke ĝi okazu ne-atendite. En la kazo de la rusa revolucio estis tre decida ankaŭ la fakto ke la ega krizo de la socio igis ke la armitaj fortoj ĉesis konfidi je la cara reĝimo. En la mobiliziĝo de la jaro 1905 oni komencis konstitui **sovetojn**, t. e. asocioj de laboristoj en diversaj urboj kaj kamparaj vilaĝoj cele kontroli la strikojn kaj asigni al ili revolucian enhavon. En oktobro formiĝis la soveto de Sankt-Peterburgo, organizita de Leo Trockij, grava figuro de la menĉevista grupo sed kiu de tiam evoluis al bolŝevistaj pozicioj. Iompostiom disvastiĝis la soveta movado al aliaj urboj, kreante iun faktan povon subombre. Trockj komprenis ke, se pere de la sovetoj, oni kontrolus la urbojn, oni povus efektivigi la dominadon sur la lando.

Antaŭ la caro Nikolao, impresita de tiuj movadoj, estis la alternativo starigi feran diktaturon por sufoki la revolucian movadon aŭ konsenti konstitucion koncedante civilajn rajtojn al la plebo. Li estis pli inklina al la militista diktaturo, sed tial ke mankis al li la apogo de la armeo por tion fari, li adresis al la lando la t. n. ***Manifesto de Oktobro*** per kiu li promesis politikajn reformojn kaj anoncis la elektadon de iu Dumao (Parlamento). Tamen tiu asembleo estis tre limigita ĉar estis elektita per nerekta balotado, ne havis konstituciantajn funkciojn kaj ĝia povo ne estis granda; fakte, ĝi estis nur konsultiĝa. Sed ĝi utilis al la cara reĝimo por altiri la apogon de la liberalistoj kaj la armeo, sufokante la ceterajn tumultojn kaj popolajn mobiliziĝojn, metante finon tiele al la ribelo de 1905. En la balotado por la unua Dumao, en 1906, atingis plimulton da deputitoj la partio **Kadet**, kaj la Asembleo planis limigi la aŭtokratisman esencon de la registaro, preterpasante tion kion la monarko estis preta konsenti. Tial li decidis dissolvi la Asembleon. La dua Dumao, elektita en la jaro 1907, havis socialistajn deputitojn, kiuj ne volis partopreni en la antaŭa balotado. Pro la sama kialo, tiu dua Dumao estis dissolvita de la caro. Tiam oni modifis la pribalotajn normojn por favorigi la altajn klasojn; tiele oni atingis Asembleon kun plimulto de la konservemaj kaj moderaj deputitoj pretaj akcepti la proponojn de la registaro de la caro. La popola rezisto kontraŭ tiuj dispozicioj estis severe sufokita; ne malpli ol 600 personoj estis ekzekutitaj. Krome abundis dum la reĝado de Nikolao la 2-a la pogromoj kontraŭ la judoj. En la politiko, oni denuncadis multajn kazojn de koruptiĝo. Ŝajnas ke la cara familio estis manipulita laŭkaprice de iu viziulo nomata Rasputeno, kiun oni konsideris responsulo de ĉiuj malbonaĵoj de la lando. En 1911 la ĉefministro Stolypin estis murdita en iu atenco okazinta en Kiev en ĉeesto de la caro. Por anstataŭi lin en la registaro oni elektis personojn kiuj estis sub la influo de la intriganto Rasputeno.

Kvalita ŝanĝo en la priskribita situacio de Rusujo estis la partopreno de tiu lando en la Unua Mondmilito. La geopolitikaj interesoj de la rusa imperio metis ĝin flanke de Francio kaj Anglio kontraŭ la centraj imperioj de Eŭropo: Aŭstrio kaj Germanio, spite al tio ke la caro estis kuzo kaj amiko de la germana kajzero. La disvolviĝo de la milito subfosis dum tri jaroj la feblan rusan imperion. Plejparto el la fabrikoj dediĉiĝis labori por la militaj necesoj. Rusio ne povis ricevi dum tiu tempo la industriajn produktaĵojn kiuj estis por ĝi tre necesaj. Pro la manko de nutraĵoj, ĉi ties prezoj tre plialtiĝis kaj tio pli malbonigis la vivkondiĉojn de la salajruloj. Cetere, en la militaj frontoj ĉio funkciadis malbone. La rusaj armeoj ne kapablis elteni la ofensivojn de la germanoj kaj suferis severajn malvenkojn. Funkciadis tre mise ankaŭ la proviantado kaj la sanec-servo de la armeo. Oni kalkulas ke pro la malbona demarŝado de la militaj aferoj far la rusaj generaloj perdis sian vivon du milionoj da rusaj soldatoj. En 1915 la rusa armeo estis retroirante.

Oni estis farinte multajn erarojn en la kondukado de la milito, sed siaflanke la caro Nikolao faris la plen grandan eraron; li elpostenigis el la komandado de la armeo sian kuzon, Nikolaon Nikolaviĉon, kaj alprenis li mem tiun respondecon. Tial li forlasis la kortegon kaj instaliĝis en la armea komandejo; tiamaniere li submetis sian prestiĝon al la rezulto de la militaj operacioj kaj samtempe lasis la regadon al la carino Aleksandra, kiu estis germana kaj ne ĝuis estimon en la lando; kromr ŝi estis tre influita de Rasputeno, kiu intervenadis en la nomumo kaj eloficigo de la ministroj. Tiu stranga duonmonaĥo estis murdita en la jaro 1916 far iuj korteganoj kiuj pretendis savi la reĝimon el la ĥaoso en kiu ĝi estis dronanta.

La situacio de la reĝimo ne plu estis eltenebla ekde februaro de 1917. La afero komenciĝis en Sankt-Peterburgo per iu striko de la laboristoj de iu ferindustria fabriko kaj la laboristinoj de iu tekstila uzino. La 23-a

de tiu monato, laŭ la ortodoksa kalendaro tiam uzata en Rusio, kiu havis 13 tagojn da malfruo rilate al la kalendaro uzata en Okcidento. Okazis en tiu ĉefurbo manifestacio de virinoj postulantaj "panon kaj pacon" kaj kriante "for la aŭtokratio!". Tiutipaj incidentoj tre oftis dum la antaŭaj semajnoj kaj monatoj, sed ĉi-foje la plendado pludaŭris. La mobiliziĝo reiĝis la sekvintan tagon, sed la caro konsideris ĝin negrava afero; li ne konsciis ke kaze de ribelo la trupoj de la ĉefurbo, ĵus varbitaj, ne estis fidindaj. Fakte, eĉ la kozaka gvardio ne estis preta plu defendi la reĝimon. La 27-an de februaro, aŭ 12-an de marto laŭ la kalendaro de Okcidento, parto el la trupoj senditaj por sufoki la manifestaciojn unuiĝis al la plendado. La militistaj estroj estis arestitaj. Sekvinttage, la registaro de la caro demisiis.

Komenciĝis la revolucio. Ĝuste tia komenca momento de ĉiu revolucio estas tre decida por determini la kurson de la procezo. Lenino, kiu estis eltirante —laŭ la marksisma metodo— instruon el la realaj okazintaĵoj, venis al la konkludo ke: "***la problemo de ĉiu revolucio estas la afero de la povo***". Ja, la atingoj de la revolucia ŝanĝo dependas de la klaso kiu prenas la povon kiu falis teren. La soboj kaj la soroj de la Franca Revolucio, de 1789 al 1795 estis la lukto inter la burĝaro kaj la plebo, kiuj konkuris kontroli la povon kiun perdis la nobelaro. En Rusujo en 1917, jam dekomence oni perceptis ke je la krizo de la aŭtokratio estiĝis iu situacio de duobla povo. Unu el ili estis la **Ekzekutiva Komitato de la Dumao**, konstituita de liberalaj aŭ **kadet**-aj deputitoj, kaj la alia estis la "**Soveto de Petrogrado de la Laboristoj kaj la Kamparanoj**", en kiu plimultis la menĉevistoj kaj membroj de la **Revolucia Socialista Partio**. Negocado inter ambaŭ povoj ebligis la formadon, la 2-an de marto, de iu **provizora registaro**. Tiu registaro estis konstituita, ĉefe, de liberalistoj de la **Kadet**-partio kaj prezidita de la Princo Lvov; en ĝi Kerenski estis ministro pri Justico kaj reprezentis la Soveton, kie estis forta plimulto de la menĉevistoj, kiuj apogis la registaron kun la intenco prepari Rusion por iu revolucio burĝ-liberala. Eĉ la bolŝevistoj, kies ĉefaj lideroj estis ekzilitaj, sintenis favore al la provizora registaro. De klasa vidpunkto, la aranĝo estis, aŭ pretendis esti, interakordo de ĉiuj sociaj klasoj, inkluzivante la aristokrataron. La politikaj fortoj de la laboristaro kaj la kamparanaro ŝajnis alĝustiĝi al la teorio fakte akceptata de la koncernaj fortoj de Okcidento: permesi la burĝan dominadon kaj partopreni en la sistemon (kapitalistan) ne diskutante ĝin. Siaflanke, la Caro Nikolao la 2-a, vidante sin sola kaj sen ebleco kontroli la situacion decidis abdiki favore al sia frato la Granda Duko Mikaelo, sed ĉi tiu rifuzis: en Rusio malaperis la monarkio kaj fariĝis Respubliko.

La provizora registaro de la Princo Lvov troviĝis antaŭ kelkaj problemoj. Ĝia ĉefa celo estis starigi okcidenttipan reĝimon. Kaj ĝi pretendis daŭrigi la militon, kaj tio metis ĝin en kontraŭdiron kun la popola deziro meti finon al la rusa interveno en la konflikto. Daŭre estis sociaj konfliktoj tial ke, krome, tiu registaro ne disponis je sociala programo por alfronti la malfacilan situacion de la amasoj. Ĉi tiuj strikadis postulante ok-horan labor-tagon kaj certigon je fiksa labor-loko. La entrepren-mastroj respondis la strikojn per lokaŭtoj (fermo de la fabrikoj). Tio estas, spite al la pretendo de interklasa regad-akordo, la realo sin trudis per la ĉiama klasbatalo inter la ekspluatantoj kaj la ekspluatatoj. Dume, la kamparanoj, dezirantaj aliri al la proprieto de la tero, estis agante spontane. Ili estis alpropriigante al si la provizojn kaj la terojn de la grandaj proprietuloj. En la armeo abundis la dizertado. Estiĝis inter la kamparanaj soldatoj la onidiro ke estos distribuado de teroj, kaj la deziro troviĝi en la vilaĝoj en tiu momento pelis multaj soldatojn forlasi la fronton. Krome la provizora registaro devis alfronti la postulojn je aŭtonomeco aŭ sendependeco de la ne-rusaj popoloj de la imperio.

En tiuj cirkonstancoj okazis la reveno de Vladímir Iliĉ Ulianov (Lenino) el la ekzilo, en aprilo. Kiam komenciĝis la revolucio li troviĝis en Svisio. Kune kun aliaj ekzilitoj li revenis al Rusujo trairante per trajno la germanan teritorion. La germana registaro permesis tion kun la espero ke la agado de tiuj revoluciuloj en Rusio povus esti problemo nur por la aŭtoritatoj de ĉi tiu lando. Alveninte al Petrogrado (nova nomo de Sankt-Peterburgo post la revolucio de februaro), la ĉeflidero de la bolŝevistoj lanĉis sian dokumenton ***Tezoj de aprilo***, per kiu li kritikis la apogon de la sovetoj al la provizora registaro kaj postulis "la tutan povon por la sovetoj". Li konsideris ke la revolucio devus pretersuperi la burĝ-liberalan etapon por iĝi proleta, socialista, revolucio. En mitingoj kaj ĉiutipaj kunvenoj Lenino insistis pri la neceso ke la proletaro faligu la burĝan registaron kaj anstataŭu ĝin per iu proletara povo kiun li identigis kun la sovetoj. Iompostiom la prestiĝo de la provizora registaro malfortiĝadis pro la kampanjoj organizitaj de la bolŝevistoj, kiuj postuladis la finon de la milito kaj la distribuadon de teroj inter la kamparanoj. Okaze de iu nova malvenko antaŭ la germanoj estis en Petrogrado, la 3-an de julio, kolosa manifestacio postulante la pacon. La amasoj, kaj iuj militistaj unuoj kiuj aldoniĝis al ili, alprenante la sloganojn de la bolŝevistoj kaj de la anarki-komunistoj provis, dum tritaga mobiliziĝo, altrudi la ĉeson de la registaro por la transdono de la politika povo al la sovetoj. Ĉar oni postulis "la tutan povon por la sovetoj", la proceduro por la ŝanĝo de la povo kiun oni postulis estus ke la sovetoj akceptu preni la povon kiun la registaro jam ne povis pluteni. Ja, la Princo Lvov demisiis kiel ĉefministro kaj la **kadet**-oj forlasis la registaron. Sed en la soveto de la ĉefurbo estis majoritato la menĉevistoj kaj ĉi tiuj, laŭ sia politika doktrino, ne volis demarŝi proletaran povon; ili preferis apogi la novan burĝan registaron, prezidita de Kerenskij kaj konstituita de menĉevistoj, liberaluloj kaj aliaj moderaj socialistoj. La registaro de Kerenskij pasis al la ofensivo kontraŭ la bolŝevistoj kaj aliaj fortoj de maldekstraro. Lenino estis akuzita estis agento de la germanoj kaj oni dekretis lian arestadon: li devis fuĝi el Petrogrado kaj resti tie kaŝite dum kelkaj monatoj. Li komprenis ke por la realigado de sia revolucia plano asigni la politikan povon al la sovetoj, unue oni devus konkeri la sovetojn mem kaj meti tien plimulton da revoluciuloj pretaj konkeri kaj demarŝi tiun povon.



**La bolŝevistoj, subgvide de Lenino, estis la animo de la Oktobra Revolucio. Sed 90.000-membra kolektivo malfacile estus povinta realigi tiun taskon en lando de 150 milionoj da personoj se ili ne estus enkarniginte la aspirojn kaj la esperojn de plej granda parto el la popolo.**

Dum la monatoj kiam Lenino estis kaŝita en Finlando li dediĉiĝis verki sian faman libron ***La ŝtato kaj la revolucio***. Tiu verko esprimas la ideon kiun Lenino havis pri tio kio devus esti la revolucio kiun li estis preparante. Verdire, lia vidpunkto pri la rezulto de proleta revolucio alĝustiĝis al la marksisma doktrino pri la afero. Li eksplikas la manieron kiel la ŝtato ekaperas el la klasaj kontraŭdiroj, tio estas, el la klasbatalo, por submeti ĉiujn al la interesoj de la superreganta klaso. La burĝfavoraj aŭtoroj argumentas ke "estas ĝuste la ŝtato tiu kiu interakordigas la klasojn". Tamen, la fakto mem voli interakordigi la klasojn kiam estas, en ĉiu socia formacio sub la kapitalista produktadmaniero, iu konflikto de interesoj inter ili, signifas per si mem iun poziciiĝon favore al la superreganta klaso kaj sekve la subpremadon de iu klaso far alia. Ĉi tiu interakordigo de la klasoj estas la baza tasko de la ŝtato: interakordigo de la klasoj, kondiĉe de la submetiĝo al la interesoj de la superreganta klaso. Tiu teksto de Lenino influis la radikalan politikan penson de kelkaj generacioj de homoj konsciaj pri la limoj kaj mankoj de la parlamenta vojo por certigi la popolan partoprenon en la publikaj aferoj. La dediĉo de Lenino al la ellaborado de tiu teoria verko ne igis lin malatenti pri la evoluo de la politika situacio en Petrogrado. Tie la bolŝevistoj estis reakirante la perditan influon post la fiasko de julio. Okazis ke iu carisma generalo, Kornilovo, intencis puĉon kontraŭ la provizora registaro kaj favore al la restarigo de la povo de caro. La registaro de Kerenskij, kiu estis promesinte konvoki balotadon en novembro por iu Konstitucianta Asembleo, bezonis la apogon de la sovetoj kaj de ĉiuj fortoj de maldekstraro, ĉefe la bolŝevistoj, por alfronti la militistan puĉon. Tiu febla situacio de la registaro igis ke ĉi tiu ne plu povis daŭrigi la persekutadon de la bolŝevistoj entreprenita en julio. La popola reago disbatis la puĉo-provon de Kornilovo sed la prestiĝo de la registaro de Kerenskij ruiniĝis dum plialtiĝis tiu de la bolŝevistoj. La provizora registaro, per sia obstino daŭrigi la militon, senĉese perdadis popularecon dum la bolŝevistoj gajnis ĝin diskonigante sian programon: meti finon al la milito, naciigi la industrion, la bankojn kaj la teron. La situacio estis matura por la kapto de la politika povo far la sovetoj ĉar tiam la bolŝevistoj estis plimulto en ili.

La 9-an de oktobro Lenino revenis el sia ekzilo en Finlando kaj instaliĝis en Petrogrado. Kelkajn tagojn poste la Centra Komitato de la Partio akceptis lian proponon konkeri la povon kaj meti finon al la registaro de Kerenskij. Trockij opiniis same. Li estis elektita prezidanto de Soveto de Petrogrado kaj dediĉiĝis organizi la popolajn milicojn de la **ruĝa gvardio**. La operacio estis rapida, en la nokto de la 25-a de oktobro ruĝaj gvardistoj kaj soldatoj afinaj sukcesis preni la kontroon de Petrogrado: Telefona Centro, Poŝto, Fervoja Stacidomo, Nacia Banko, Ministrejoj kaj la Vintra Palaco, sidejo de la registaro, kiun celis ankaŭ la kanonoj de la krozo-ŝipo "Aŭroro". La registaro falis senreziste kaj Kerenskij fuĝis eksterlanden. La bolŝevistoj kaptis la povon en Petrogrado; la revolucio etendiĝis al Moskvo kaj al aliaj industriaj centroj de Rusio. Sed aliaj partoj de la lando restis sub la povo de la antikvaj carismaj aŭtoritatoj. La bolŝevistoj, devus alfronti gravajn problemojn kaj ekonomiajn kaj socialajn, krei novajn instituciojn, atingi la pacon en la Unua MondMilito, kaj, antaŭ ĉio, gajni civilan militon en la interno de la lando kontraŭ tiuj kiuj ne estis favoraj al ilia reĝimo.

La komunismo estis ĵusnaskiĝinta; kun malfruo je 111 jaroj, fine sukcesis la plano de Babeuf; kun malfruo je 46 jaroj, la Pariza Komunumo povis daŭrigis ĝian provon, ne en Parizo sed en loko tute ne atendita. La nova registaro, memnomita **Konsilio de la Komisaroj de la Popolo**, estis prezidata de Lenino kaj konstituita de bolŝevistoj kiuj, ekde tiu momento nomiĝis **komunistoj**. En ĝi estis ankaŭ Trockij kiel Komisaro por Eksteraj Aferoj, kaj Stalino, kiel Komisaro pri Naciecoj. La registaro promulgis la unuajn revoluciajn dekretojn. La dekreto pri la paco per kiu oni invitis la militantojn al tuja paco sen aneksoj nek reparacioj. La dekreto pri la tero per kiu la grandaj agraraj propraĵoj estis abolitaj sen monkompenso, kaj la dekreto pri la industriaj entreprenoj per kiu estis naciigitaj la plej gravaj el ili. Per aliaj dekretoj oni naciigis la bankojn; pri la naciecoj, oni agnoskis al ĉiuj popoloj de la rusa ŝtato la rajton konstituiĝi aŭtonomaj ŝtatoj. Sed, la registaro de Kerenskj estis kunvokinta balotadon por Konstitucianta Asembleo kiu devus okazi en novembro. Lenino ne kuraĝis nuligi tiun balotadon. En januaro de 1918 okazis la malfermo de la Asembleo kiu devus ellabori novan Konstitucion. La situacio estis stranga: la bolŝevistoj havis la faktan povon de la ŝtato, sed la Asembleo, kiu laŭleĝe estus suverena ne estis bolŝevisma. La komunistoj atingis en la balotado nur 20 procentjon el la deputitoj. Plimulto estis la socialrevoluciuloj, t. e. la partio de Kerenskij. En Petrogrado, Moskvo kaj aliaj industriaj centroj, ja, venkis la komunistoj, sed plejparto el la lando estis kamparana loĝantaro, kaj en la ampleksa kamparo de Rusujo la bolŝevista partio ne ekzistis, ne havis kandidatojn. La ne-komunista majoritato de la Asembleo, reale, ne respegulis kamparanan rifuzon al la partio de Lenino kaj ĉi ties ĵusa revolucio; tutsimple, la plejmulto el la kamparanoj voĉdonis favore al la partio kiu, laŭ ilia kompreno, estis plej proksimaj al la bolŝevismo. Sed la kompono de la Asembleo ne respegulis tian situacion. La unuan tagon, la nova Asembleo decidis nuligi la dekretojn de la komunista registaro. Ĝi ne plu povis fari ion; sekvintage la ruĝa gvardio dissolvis la Asembleon. Tio skandaligis la demokratojn, la socialrevoluciulojn kaj eĉ kelkajn bolŝevistojn. Sed por Lenino la afero estis klara: la Asembleo defendis ŝtat-modelon tre malsaman al tiu de la komunistoj; la diktaturo de la proletaro devus malebligi ĉiun ajn eblecon je klasa socio surbaze de la privata proprieteco. Rilate al la fino de la milito kontraŭ Germanio kaj la restarigo de la paco, la afero solviĝis per la subskribo de la traktato de Brest-Litovsk, la 3-an de marto de 1918, kiu altrudis tre durajn kondiĉojn al Rusio: sendependecon de Finlandio, Estonio, Latvio, Litovio kaj Polujo.

Ekde la somero de 1918 la komunista reĝimo devis alfronti civilan militon kaj ĥaosan ekonomian situacion.

Carismaj generaloj reorganizis armeojn, kiujn oni nomis "blankaj" pro la koloro de la militista uniformo de la epoko de la caroj. Ili estis apogitaj de la fremdaj potencoj de la kapitalismo: Anglio, Francio, Japanio kaj Usono, kiuj timis la disvastiĝon de la revolucio kaj, krome, defendadis siajn kapitalojn investitajn en Rusio kaj konfiskitajn de la komunista registaro. Por alfronti tian danĝeran momenton, oni mendis al Trockij organizi la Ruĝan Armeon per rigora disciplino, kun politikaj komisaroj kiuj kontroladis kaj stimuladis la revolucian animstaton. La registaro de Lenino malmoliĝis; ĝi fariĝis pli aŭtoritateca. La ***ĉekao*** aŭ politika polico, kreita en oktobro de 1917, persekutadis la opozicion: monarkiistoj, menĉevistoj, socialdemokratoj… En tiuj cirkonstancoj okazis la mortigo de la Caro Nikolao la 2-a kaj ĉi ties familio, kiuj troviĝis arestitaj ekde la revolucio de februaro de 1917. Pro la necesoj de la armeo, la registaro decidis apliki tion kion oni nomis **milita komunismo**. La tuta ekonomio estis metita sub la kontrolo de la ŝtato; estis ŝtatigita la industrio, la komerco interna kaj ekstera, kaj oni organizis sistemon de rekvizicio en la agrokulturo. Tiu politiko kreis grandan malkontenton inter la kamparanoj ĉar la registaro, pro la manko de provizado al la urboj, dekretis la konfiskadon de la tritiko. La kamparanoj estis devigitaj cedi parton el siaj rikoltoj, t. e. la pluson kiun la kamparanoj povus interŝanĝi kontraŭ aliaj produktaĵoj en la merkato. Frukto de tiu politiko la venko de la Ruĝa Armeo estis jam iu relalaĵo en 1921, kaj la rekonkero de Vladivostoko en la sekvinta jaro signis la finon de la fremdaj atakoj al Rusujo. La fera kontrolo de agrokulturo kaj la industrio helpis gajni la militon sed alportis grandajn ekonomiajn problemojn. Okazis grava malpliiĝo de la produktado, granda plialtiĝo de la prezoj, malsato, malapero de la komercado… kaj krome en la jaro 1921 estis ega pluvo-manko kiu okazigis la morton de du milionoj da personoj.

Post la dissolvo de la Konstitucianta asembleo, Lenin entreprenis la kreadon de nova ŝtato inspirita en la marksisma ideologio. Li kunvokis la t. n**. *Kongreso de la Sovetoj de ĉiuj Rusioj*** por aprobi novan Konstitucion. En ĝi ne aperas la tradicia divido de povoj de la okcidentaj demokratioj. La rajto voĉdoni estis agnoskita nur al tiuj kiuj pergajnis sian vivon laborante kaj ne ekspluatadis alies laboron; do, perdis tiun rajton la komercistoj, la terposedantoj, la monaĥoj kaj pastroj, la burĝuloj, eksfunkciuloj, ekspolicistoj… En la balotoj oni elektus la supreman institucion kiu estis la ***Kongreso de la Sovetoj de la Unio***, kiu elektus iun organon nomatan ***Centra Ekzekutiva Komitato***, kiu, siavice farus la elektadon de la registaro aŭ ***Konsilio de la Komisaroj de la Popolo***. Ĉiukaze, la sistemo restis sub la kontrolo de la Bolŝevista partio kiu, ekde 1921 nomiĝis ***Komunista Partio de Soveta Unio*** (**KPUS**), estante sia gvid-organo iu komitato nomata **Politika buroo**. La komunistoj transformis tion, kio estis la Rusa imperio en iu federacia respubliko, sed ne perdante ian piramidan konceptadon de la povo. En 1922 estis kreita la ***Soveta Unio de Socialistaj Respublikoj*** (Sovetunio) kaj, en 1924 oni aprobis la Konstitucion de la nova soveta ŝtato. En ĝi oni difinis la rolon de la Unio kaj de la 15 federaciaj respublikoj. En la bazo de la sistemo daŭre estis la ***Kongreso de la Sovetoj de la Unio***. Ĉi tiu elektadis iun ***Centran Ekzekutivan Komitaton***, kiu estis la vera parlamento, dividita en du ĉambroj: la ***Konsilio de la Unio***, kie estas reprezentataj la respublikoj laŭ ties loĝantaro, kaj ***Konsilio de la Naciecoj***, kie ĉiu respubliko havas kvin membrojn. La ekzekutiva povo estis la ***Prezidiumo***, konstituita de kelkaj membroj, rolas kiel ŝtat-estreco, kaj la registaro kiu daŭre nomiĝis ***Konsilio de la Komisaroj de la Popolo***. Sed ĉiukaze, la fakta gvidado de la politika vivo daŭre estis kontrolata de la **Rusia Komunista Partio**, estrata de la ***Centra Komitato***, la ***Politika Buroo*** kaj la ***Sekretariato***, kiu kontrolante la tutan aparaton de la partio povas konverti la Ĝeneralan Sekretarion en iu vera diktatoro, kiel evidentiĝis en la kazo de Stalino.

Sekve de la mondmilito kaj de la civilmilito la soveta ekonomio ruiniĝis kaj la urboj restis senprovizitaj. En 1921 la agrara produktado estis triono de tiu de 1913; la industria produktado estis 13 procento de tiu de 1913. La kamparanaj ribeloj reiĝis en 1920-21. Krome en marto de 1921 la maristoj de la haveno de Kronstadt, kiuj tiom multe estis kontribuinte al la venko de la revolucio en oktobro de 1917, ribelis postulante politikan liberecon, presliberon, liberigo de la politikaj prizonuloj… La ribelo de Kronstadt estis sufokita, sed Lenino komprenis ke estis necese ŝanĝi la politikan ekonomion adaptante ĝin al la postmilita situacio. Inter la privata proprieteco de la kapitalismo kaj la ŝtata kolektivismo de la ekonomio oni devus dezajni intermezan staton, kiun li mem nomis **"Ŝtata Kapitalismo"**. Do, naskiĝis la **Nova Ekonomia Politiko** (NEP). Ĝi estis parteca reveno al la ekonomio de la kapitalisma merkato, ia **miksta ekonomio** kun elementoj kapitalistaj kaj socialistaj. Oni anstataŭigis la konfiskadon de agraraj produktaĵoj per iu imposto per naturaĵoj. La kamparanoj transdonadis 10 procenton el la rikolto al la ŝtato kaj la ceteron ili povis vendi ĝin al privataj individuoj aŭ al la ŝtato. Ekde 1923 la imposto per naturaĵoj estis anstataŭita de imposto en kontanta mono. En la industrio oni privatigis la entreprenojn kun malpli ol 21 laboristoj kaj oni permesis la eniron de fremda kapitalo kaj entreprenoj. La ŝtato daŭre konservis bazajn sektorojn de la ekonomio: fervojoj, grandaj entreprenoj, bankoj kaj ekstera komerco. Lenino mortis en januaro de 1924 sed la NEP daŭris ĝis 1928. La rezulto de la NEP estis ke pligrandiĝis la produktado en la agrokulturo kaj la industrio. Sed ĝi okazigis ankaŭ la pliriĉiĝo de iuj sociaj grupoj: agraraj proprietuloj, etaj entreprenistoj kaj komercistoj… aperis novaj riĉuloj, iu nova burĝaro, kio estis detruante la marksisman revon pri senklasa socio. Stalino metis finon al ĉio ĉi aplikante iun sistemon bazitan en la **planado**, kie la ŝtato, centraliz-maniere, fiksadis la celojn de la tuta ekonomia aktivado pere de kvinjaraj planoj. Je la morto de Lenino ne restis solvita la afero de la sukcedado. Tio generis grandan debaton en la Komunista Partio por la estreco de la Partio kaj la Ŝtato inter la figuroj de Trockij kaj Stalino. La unua emis la ***konstantan revolucion***,

disvastigi la revolucion en Eŭropo; li konsideris ke sen tiu disvastiĝo la revolucio estis subdanĝere en Rusio. Stalino, male, defendis la teorion de ***socialismo en unusola lando***, t. e. por li urĝis la starigo de la komunismo en Sovetunio sen atendi la venkon de la tutmonda revolucio. En tiu pov-konkuro Stalino ĝuis la avantaĝon ke li estis la Ĝenerala Sekretario de la Partio. Ne mankas, en la komunista vicoj, la argumentoj favoraj al la ekzistado de la pov-aparato kreita de Lenino por garantii la sufokadon de ĉiu burĝa renaskiĝo, sed tiutipaj aparatoj, post ĝia kreado akiras propran vivon kaj povas funkcii por sufoki ĉian ajn opozicion kaj certigi la senbaran diktatorecon de tiu(j) kiu(j) kontrolas ilin. Ĝuste tio okazis en la Komunista Partio de Sovetunio sub la povo de Stalino. En 1927 Trockij estis forpelita el la Partio kaj sendita unue al Siberio kaj poste al eksterlanda ekzilo. Fine li estis murdita en Meksiko far iu agento serve de Stalino. Cetere ĉi tiu profitis sian personan povon por persekuti kaj elimini ĉiun opozicion interne de la partio. En la politika funkciado de Sovetunio, Stalino starigis diktatorecan povon. Estis ia **totalisma ŝtato** en kiu la Ŝtato kaj la Partio restis kunfanditaj kaj kie oni praktikadis la kulton al la personeco de Stalino, kiel unika lidero. Tiuj, kiuj malkonsentis kun tiu situacio estis deklaritaj malamikoj de la revolu-cio, procesitaj kaj, ĝenerale, kondamnitaj. Laŭlonge de la jardeko de 1930 estis iu ĝenerala subpremado, kon-ata kiel la **grandaj elpurigoj**, komencante kontraŭ la antikvaj gvidantoj de la Partio akuzitaj agadi kontraŭ la Ŝtato kaj la Revolucio. Inter la jaroj 1936 kaj 1938 okazis la tiel nomataj **procesoj de Moskvo** per kiuj oni eliminis plejparton el la antikvaj bolŝevistaj gvidantoj de la revolucio de oktobro de 1917. Alia praktiko de la stalinismo estis la uzo de koncentrejoj por la politikaj, administraciaj kaj militistaj gvidantoj kiuj sin montris kritikaj kun la reĝimo. Oni kalkulas ke dum la grandaj elpurigoj estis ekzekutitaj pli ol 500.000 personoj kaj du milionoj kaj duono estis senditaj al koncentrejoj.

Post 1929, la kvinjaraj planoj celis akceli la industriigon de Sovetunio. La resursoj por financadi tiun industriigon devis eliri el la kolektivigo de la agrokulturo; la kamparanoj devis alporti siajn terojn kaj siajn bred-bestojn de privata proprieto al la kolektivaj farmoj. Estis opono al tiu politiko, ĉefe inter la riĉaj kamparanoj, kaj sekve de tio centmiloj da ili kaj ties familioj mortis aŭ estis senditaj al koncentrejoj en Siberio. La bilanco de la du unuaj kvinjaraj planoj estis pozitivaj por la ekonomio: la industrio kaj la agrara produktado ege kreskis. La tria kvinjara plano (1937-1942) estis interrompita pro la milito kontraŭ Germanio en 1939.

Post la revolucio de oktobro de 1917 multaj burĝuloj vidis en la revolucio iun minacon por la kapitalistaj socioj en kiuj realiĝadis siaj aspiroj. Male, por la viktimoj de la kapitalista sistemo, la laboristaj klasoj, la kapto de la povo en Rusujo far la komunistoj estis la komenco de la fino de la malamata kapitalismo. Ĝis sia morto en 1924, Lenino pensis ke la Rusa revolucio konstituis unu etapon, komencan, de ia tutmonda revolucio. Strikte sekvante la marksismajn ideojn, la rusaj komunistoj fidele praktikadis la internaciismon. Krome, iuj eventoj okazintaj post la fino de la Unua Mondmilito ŝajne pravigis ilian penson. Ekzemple, la spartakista revolucio en Germanio en januaro de la jaro 1919, intencis faligi la socialdemokratan registaron, same kiel Lenino estis faliginte la provizoran registaron de Rusujo en oktobro de 1917. Ankaŭ la provo starigi en Hungario iun sovetan registaron dum kelkaj monatoj en 1919. Lenino kaj la bolŝevistoj rigardis kun kontenteco kaj espero la revoluciajn provojn, konsiderante ke ili estis kvazaŭ paŝo al iu tutmonda revolucio. En la jaro 1919, kiel instrumento serve de tiu monda revolucio, ili kreis en Moskvo, kie okazis ĝia unua kongreso, la **3-a Internacio** aŭ **Komunista Internacio**. En 1920 okazis la dua kongreso en kiu partoprenis reprezentantoj de 37 socialistaj partioj. En ĉi tiu kongreso oni aprobis la programon de ***21 Punktoj***, redaktita de Lenino, kiun devige devus akcepti la socialistaj partioj kiuj volus adheri al la 3-a Internacio. Inter aliaj kondiĉoj, ili devus alpreni la nomon de komunistaj partioj, montri politikan alternativon kontraŭ la socialistaj partioj, kiuj estis konsiderataj "reformistaj" aŭ "socialdemokratiaj", akcepti kiel devigaj la dispozicioj aprobataj en la kongresoj de la Internacio… Do, la kreado de la 3-a Internacio signis la dividon la laboristan socialistan movadon inter partioj socialistaj kaj **partioj komunistaj**, kiuj fondiĝis inter 1920 kaj 1921. Ekzemple, la Komunista Partio de Hispanio estis fondita en la jaro 1921 far socialistoj kiuj decidis forlasi la Socialistan Partion. Sed, verdire, kun aŭ sen la iniciatoj de la Komunista Internacio la dividiĝo de la marksistaj fortoj en Eŭropo estis io klare videbla antaŭ la revolucio de oktobro de 1917. Krom la splitiĝo inter menĉevistoj kaj bolŝevistoj en Rusujo ekde 1903, ankaŭ en Germanio, ekzemple, la Spartakista Ligo (germana versio de la bolŝevismo) fondiĝis jam en aŭgusto de 1914 kiel reago al la aprobo de la socialistoj de tiu lando, kaj aliaj, al la partopreno en la Unua MondMilito. Kaj eĉ post la dissolvo de la 3-a Internacio (la 22-an de majo de majo de 1943) ĉiam restis klara la diferenco inter socialistoj kaj komunistoj. Ĉi tiuj volas ŝanĝi la socion, malaperigi la kapitalisman ekspluatadon, dum la socialistoj kontentiĝas demarŝi tiun socion, kaj en ilia horizonto oni ne kontemplas iaman malaperon de la privata propraĵo kaj la kapitalismo. La polemiko inter Trockj kaj Stalino pri la alternativo "konstanta revolucio"/"socialismo en unusola lando" alportis krizon al la 3-a Internacio. Fakte, la sekvantoj de Trockj fondis apartan organizaĵon je monda nivelo, la t. n. 4-a Internacio, kies vivo kaj influo estis eĉ malpli stabila ol tiuj de la 3-a. En 1935, kiam la faŝismo evidentiĝis kiel grava danĝero, la Komunista Internacio donis novajn instrukciojn al la komunistaj partioj por ke ĉi tiuj eniru en koaliciojn kun socialistaj partioj kaj aliaj progresistaj fortoj cele kontraŭfronti la faŝismon. En Hispanio kaj Francio konkuris en balotadoj en 1936 la tiel nomataj **popolaj frontoj** en kiuj partoprenis komunistoj kun socialistoj kaj aliaj politikaj fortoj. Sed al la okazintaĵoj de tiu epoko kaj la signifo de la faŝismoj ni devas dediĉi apartan atenton.

# La faŝismoj

## Burĝa histeria reago



La disvolviĝo de la klasbatalo inter 1918 kaj 1939, tio estas, inter ambaŭ MondMilitoj, estis influita de du realaĵoj: la ekonomiaj sekvoj de la Unua MondMilito kaj la ekzistado de granda ŝtato kun komunista reĝimo. La ŝanĝoj de la situacio estis speciale percepteblaj en Eŭropo. Britio, Francio kaj Italio, kvankam estis venkintaj en la milito, restis tre damaĝitaj. Britio ĉesis esti la plej potenca ekonomio en la mondo kaj komencis perdi sian kolonian imperion. En tuta Eŭropo la industria kaj agrara produktado tre malpliiĝis, kaj senĉese kreskadis la senlaboreco. Krome tiuj landoj havis grandajn ŝuldojn pro la militaj elspezoj. Tiuj problemoj estis pli gravaj en la venkitaj landoj: Aŭstrio kaj ĉefe Germanio. En 1924 oni aprobis la t. n. ***Plano Dawes***, per kiu Usono renegocis la ŝuldon de Germanio, kaj en 1925 la sama potenco subskribis ankaŭ la ***Interakordon de Lokarno***, per kiu oni renegocis la ŝuldon de Belgio, Ĉeĥoslovakio, Francio, Britio, Italio kaj Polujo.

Ja, tiam Usono estis, rezulte de la milito, la ĉefa ekonomia kaj militista potenco en la mondo. Tial ke tiu lando eniris en la milito lastmomente, ĝi suferis malpli da perdoj kaj eltiris egan profiton el la konflikto. Estis faritaj en Usono grandparto el la armilaro, nutraĵoj kaj industriaj produktaĵoj kiuj estis necesaj al la eŭropaj militantoj. Tio stimulis la usonan ekonomian kreskiĝon; ĝia terkultura kaj industria produktado estis tiam preskaŭ 45 procento el la tutmonda. Tial ke ĉiuj militintaj landoj ŝuldis monon al Usono kaj ke ĉi tiu lando posedis grandan rezervon de oro, la dolaro iĝis la ĉefa valuto en la mondo. Tiu ekonomia progreso ebligis ioman plialtiĝon de la salajroj kaj ĝeneralan pliboniĝon de la vivkondiĉoj de la civitanoj. Sed, kiel ĉiam okazas en la kapitalismo, estis granda malegaleco inter la sociaj klasoj, kaj dum la jardeko 1919-1929 generiĝis iu grava ekonomia krizo, kiun ni ekzamenos siamomente.

Nun ni vidu kiel multe malboniĝis la situacio de la malaltaj klasoj en Eŭropo. Ni jam studis la sekvojn de la mondmilito kaj de la civilmilito en Rusio, kie estis okazinte socialista revolucio en 1917. La NEP, kiu anstataŭis la Militan Komunismon, utilis por plibonigi la ekonomian situacion de la lando sed ne la vivkondiĉojn de la popolo. Nur post la aplikado de la Kvinjaraj Planoj, ekde 1928, estis perceptebla la pliboniĝo de la ĝenerala situacio de la loĝantaro. Ankaŭ en la ceteraj eŭropaj landoj la jardeko post la milito estis plena je malfacilaĵoj, ĉefe por la malriĉularo. La industrio kiu dum la milito estis orientita al la produktado de armilaro devis esti rekonvertita al la normala produktado kaj tiu procezo postulis la fermon de fabrikoj kaj egan senlaborigon, kio generis socian konvulsion kaj laborista mobiliziĝo. La rusa revolucio fariĝis referaĵo por la laboristaj amasoj de la kapitalistaj landoj. En januaro de 1919 Rosa Luxemburgo, Karl Liebknecht kaj Wilhelm Pieck fondis la Germanan Komunistan Partion, kaj tiumonate mem okazis iu komunista ribelo, kiu fiaskis; centoj da personoj, inter ili Rosa Luxemburgo kaj Karl Liebknecht, estis arestitaj, torturitaj kaj fine murditaj. En februaro de tiu jaro, estis murdita, en la germana respubliko de Bavario, far iu ekstrem-dekstrulo, Kurt Eisner, lidero de la tiea socialista partio. Kiel reago de la fortoj de maldekstraro formiĝis en Bavario iu Soveta Respubliko imitaĵo de tiuj de Rusio. Sed post du monatoj iu puĉo organizita de la registaro de Berlino metis perfortan finon al la eksperimento. La klasbatalo furoris ne nur en Germanio. En Francio, iu anarkiisto atencis, sensukcese, kontraŭ la registrar-prezidento Clemenceau, en Barcelono oni deklaris ĝeneralan strikon. En marto, en Italio, la faŝistoj kreis la unuajn batalgrupojn. En Ĉikago estis tumultoj pro la rasa segregacio tiam ekzistanta en Usono; 38 afrikusonanoj estis murditaj de blankuloj. Estis mobilizoj pro tiu kialo ankaŭ en Omaho, kaj en Arkanso kie estis murditaj de 100 al 200 nigruloj. En decembro de tiu jaro 1919 en Usono, la ministro pri Justico, Palmer, ordonis la arestadon de komunistoj kaj anarkiistoj timante ke okazu tumultoj. Kaj ankaŭ ekster la industriigitaj terzonoj de la mondo la burĝaro montriĝis agresema kontraŭ ĉia ajn revolucia signo. En aprilo, en Meksiko estis murdita Emiliano Zapata per iu embusko de la registaro, kaj en Hindio la anglaj koloniaj trupoj sufokis popolan manifestacion mortigante pli ol cento da personoj.

Ni memoru ke ĉio ĉi okazas kun la fono de la civila milito en Rusujo, en kiu intervenis, favore al la carismaj militistoj, la ĉefaj kapitalistaj potencoj de la industriigita mondo. Tiam ankoraŭ estis vivanta Lenino. Li estis tre optimisma pri la ebleco ke la revolucio triumfus en la alte industriigitaj landoj, ĉefe en Germanio. Tre iĝis fama lia aserto ke “***la Komunismo estas la elektro plus la sovetoj***”. Tio estis alia maniero esprimi la marksisman ideon ke por la socia liberiĝo de la sub-

premitoj necesas la objektivaj kondiĉoj plus la subjektivaj. La elektro, t. e. la scienca kaj industria progreso, estas objektiva faktoro, kaj la sovetoj, partioj, sindikatoj, laboristaj asocioj… estas subjektiva faktoro. Tiu marksisma idearo disvastiĝis tiam en la mondo pli ol ĉiam antaŭe. Tial jam de tre frue la burĝklaso de ĉiuj landoj komprenis ke la soveta ekzemplo estus danĝera instigilo kontraŭ la tutmonda kapitalismo. La okazintaĵoj de 1919 en Germanio klare atestis pri tiu realaĵo. Ekde la jaro 1920 kaj dum pluaj malmultaj jaroj kreiĝis komunistaj partioj en multaj landoj. Antaŭ la ĝenerala malkontento de la subpremitaj popolamasoj kaj la timo al laboristaj revolucioj, baldaŭ ekaperis politikaj asocioj de ekstrem-dekstraro por kontraŭfronti la laboristan movadon. Ni jam menciis ke en 1919 aperis la ***fasci di combatimento***, la embrio de la itala Faŝista Partio, kaj en 1920 fondiĝis la Germana Nacia Socialista Partio, pli bone konata kiel Nazi(ism)a Partio. En Italio la Komunista Partio estis oficiale fondita en 1921 de Amadeo Bordiga kaj Antonio Gramsci, sed fakte ĝi jam ekzistis de antaŭe kiel marksisma sektoro de la Socialista Partio. De antaŭe ekzistis en tiu lando ankaŭ iu dekstrara organizaĵo, la Itala Popola Partio, de la burĝaro kaj la katolikoj partoprenantaj la politikon. La programo de tiu partio ne estis reakcia sed iome liberala; ili postuladis la voĉdonrajton de la virinoj kaj ke la senatanoj estu elektataj per popola voĉdonado kaj ne laŭ reĝa dispozicio. Kontraŭ ambaŭ partioj, la komunista kaj la dekstrar-liberala, staris ekde 1919 la ***Fasci italiani di combattimento*** kaj la ***Squadre d´azione*** de Benito Mussolino kiuj tiam ankoraŭ ne estis gravaj sed kiuj komencis famiĝi agante brutale kontraŭ la socialistoj kaj aliaj popolaj organizaĵoj de maldekstraro.

Iuj studintoj de la fenomeno de la itala faŝismo asertas ke en ĉi ties idearo estis kontraŭdiroj, nekongrueco, ekzemple pri la rilato intar la ŝtato kaj la nacio. Ankaŭ estis la fakto ke la faŝisma doktrino enhavis imperiisman emon, inspiritan de la antikva romia imperio, kun socialistaj elementoj; Mussolino, ja, antaŭe estis grava figuro de la Itala Socialista Partio. Sed tia miksaĵo de ideoj tute ne estis malavantaĝo por la progreso de la faŝismo, sed male. La burĝaro, kiu tre timis la venkon de proletara revolucio, taksis ke la kontraŭ-komunismo de la partio de Mussolino estas pli konvena al siaj klasaj interesoj ol la liberala teniĝo de la Popola Partio. Dume la social(ist)a vestaro de la faŝismo utilis por trompi multajn laboristojn por altiri ilin al konservema, ne internaciista, teniĝo. Krome la faŝista partio kanaligis la malkontenton de la postmilito kontraŭ la strikoj kaj manifestacioj de la maldekstruloj. La faŝismo pli kaj pli plifortiĝis; la "nigr-ĉemizuloj", aktivistoj de tiu partio, distingiĝis pro la multenombraj brutalaj perfortaj atakoj, ĉefe kontraŭ socialistoj kaj komunistoj. La registaro, anstataŭ eksterleĝigi la faŝistojn, dissolvis la municipojn regatajn de la socialistoj. Estis klare ke la klasaj interesoj de la burĝaro rolis kontraŭ la demokratio; la burĝa registaro ne punis la dekstrarajn perfortulojn kaj procedis kontraŭ la viktimoj de la faŝista perforto. Ekde 1922 Mussolino ĝuis simpation de la granda kapitalo, la itala industri-mastraro, kiu alportis monon por subvencii la faŝistajn grupojn, kiuj uzas, preskaŭ senkaŝe, materialon de la armeo. La justico montriĝis bonvola kun la perforta agado de la faŝistoj. Plendcele kontraŭ tia situacio oni kunvokis ĝeneralan strikon por la 1-a de aŭgusto de 1922. Mussolino lanĉis ultimaton al la registaro kaj al la strikontoj. La faŝista partio prezentiĝis kiel la garantio de la publika ordo, io kion ne povis garantii la registaro. La brutaleco de la "nigr-ĉemizuloj" kontraŭ la mobilizita laboristaro frakasis la strikon. En septembro la faŝistaj skipoj okupis la municipojn de Ankono, Ĝenovo, Livorno, Parmo, Bolzano kaj Trento. En oktobro la ***Nacia Faŝista Konsilio***, kunvenanta en Napolo, proponis la ***marŝadon sur Romo*** por "konvinki" la reĝon transdoni la povon al Mussolino. Estis la komenciĝo de la «faŝista revolucio», per ĝi ili intencis atingi la povon profitante la konsenton de la plejaltaj sociaj sektoroj de la lando kiuj timis la socialistojn kaj la komunistojn. La 24-an de oktobro Mussolino estis jam en Napolo kun 40.000 "nigr-ĉemizuloj", kiuj tri tagojn poste komencis okupi telefon-centralojn kaj registarajn konstruaĵojn. La registrarprezidento, Luigi Facta, petis al la reĝo Viktoro-Emanuelo la 3-a deklari la sieĝo-staton por ke la armeo bremsu la faŝistojn. Sed la reĝo, ne tre favora al la parlamentismo kaj timema pri la avanco de la maldekstraro, mendis al Mussolino, la 29-an de okobro, formi registaron. Sekvinttage la marŝantoj eniris en Romon; la faŝismo estis kaptinta la ŝtatan povon.

**ROSA LUXEMBURGO 1871-1919**



La amasoj estas la decida elemento, la roko sur kiu oni konstruos la finan venkon de la revolucio.

De tiam Mussolino dediĉiĝis transformi la italan politikan sistemon en diktaturon, kion li efektivigis en du fazoj: de 1922 al 1924 li simulis respekti la parlamentan reĝimon, sed iompostiom li limigis la demokratiajn liberecojn kaj persekutadis la politikajn kontraŭulojn. En 1924 Mussolino aprobis specialan pribalotan leĝon siafavore laŭ kiu la partio kiu atingus 25 procenton el la voĉdonoj ricevus du trionojn el la parlamentaj seĝoj, tiele la opozicio restis malfortigita. La ĝenerala sekretario de la socialista partio kritikis la faŝistan perforton kaj la pribalotan fraŭdon; li estis sekvestrita kaj murdita far la faŝistaj bandoj. Post la venko de sia partio en 1924, Mussolino starigis aŭtoritatecan reĝimon kaj asignis al si mem plenan povon. Oni rifuzis la demokration kaj la marksismon; ĉiuj partioj, escepte la faŝista, estis ekster-leĝigitaj. Ĉio-ĉi estis farite favore al la riĉularo; post la kapto de la povo la unua faro de la faŝistoj estis pagi al la granda kapitalo la ricevitajn favorojn. Tiucele ili nuligis la ŝtatajn kontrolojn sur la ekonomio kiuj restis post la milito; oni eliminis iujn mono-

polojn kaj privatigis industriojn. Tiele oni malpliigis iom la publikan elspezon, sed tamen restis sensolva la problemo de la inflacio.
Al Mussolino ne mankis imitantoj. En la jaro 1923, en Hispanio, iu generalo, Miguel Primo-de-Rivera, faris puĉon, kun la konsento de la monarko, por meti finon al la parlamenta reĝimo kaj starigi diktaturon. Verdire li ne havis tiel fortan socian apogon kiel la itala diktatoro; evidentiĝis ke la situacio ankoraŭ ne estis matura en tiu lando por la enradikiĝo de la faŝismo. Krome la Generalo Primo-de-Rivera ne estis lerta politikisto. Lia reĝimo daŭris nur sep jarojn; ĝi ne sukcesis pretersuperi la sekvojn de la krizo de 1929, kiun ni poste pritemos. Pli sukcesa estis la stariĝo de la faŝisma povo en Germanio, kie ĝi ricevis la nomon je "naziismo". Sed tiu sukceso ne estis tre frua; ĝi okazis unu jardekon post la venko de la itala faŝismo. La ekonomia krizo de 1929 kontribuis al la kapto de la povo far la germana faŝismo. Kontraŭ-proletara perforto ekzistis en tiu lando jam de tre frue post la mondmilito; ni memoru la masakradon de la komunistoj Rosa Luxemburgo kaj Karl Liebknecht. Sed la genezo kaj progreso de la naziismo de Hitlero estis relative longa procezo, kompare al la itala kazo. Paradokse, la ĉeflidero de la germana faŝisma movado, Adolfo Hitlero, ne estis germano sed aŭstro. En la unua mondmilito li estis partopreninte kiel volontulo en la germana armeo. La germanan malvenkon en tiu milito li atribuis al la marksistoj kaj la judoj. Fakte, la bazo de lia politika propagando estus la malamo al ambaŭ kolektivoj. Lia politika aktivado startis per lia kontakto kun iu malgrava partio nomata Germana Laborista Partio, kiu estis kontraŭjudisma kaj celis la unuiĝon de ĉiuj german-lingvaj ŝtatoj. En 1920 li redaktis la 25-punktan programon de tiu partio, per kiu li jam prezentas la tutan nazian ideologion. El la unuiĝo de tiu partio kun aliaj similaj rezultis la Germana Nacia Socialista Partio, mallongige nomata "nazia partio", el kiu Adolfo Hitlero fariĝis lidero ekde 1921. Evidentiĝas ke la modelo kiu inspiris ĉi tiun germanan movadon estis la itala faŝismo, sed ĉi-kaze ŝanĝiĝis la ekstera folkloro, t. e. anstataŭ la simboloj de la antikva romia imperio, kiel faris Mussolino, Hitlero kaj sia maziisma partio prenis la modelon de la antikva, antaŭkristana, teŭtona popolo. Nu, en 1923, en sia imitado de la itala modelo, Hitlero intencis ripeti en Germanio operacion kiel la ***marŝado sur Romo*** de Mussolino. Sed lia operacio, konata kiel la ***puĉo de la bierdrinkejo***, fiaskis, kaj la responsuloj de tiu provo, inter ili Hitlero, estis arestitaj kaj enkarcerigitaj. Dum lia enkarceriĝo ĝis 1924 li verkis la libron ***Mein Kampf*** (Mia Lukto) per kiu li prezentis sian idearon. Post lia elkarceriĝo li daŭrigis la organizadon de sia partio kies liderecon neniu pridiskutis al li. Lia propagando daŭre baziĝis sur la etnismo, laboro por ĉiuj kaj atribuo de la milita malvenko al la demokratuloj, komunistoj kaj judoj. Li elektis kiel simbolo la svastikon, kaj kreis armeecajn grupojn: la SA (alsalt-sekcioj) kaj la SS (protekt-sekcioj). Eble tiu partio neniam estus atinginte la gravecon kiun ĝi poste atingis se ne estus okazinte la krizo de 1929.
La bursa kraŝo de la mardo, la 29-an de oktobro de 1929 en Usono signifis la abruptan finon de la ekonomia prospero en tiu lando. Pro ĝia naturo, la kapitalismo neeviteble generas tiajn krizojn. La produktado estis pli granda ol la konsumado kaj tio igis pligrandiĝi la stokoj kaj fali la prezoj. Multaj entreprenoj bankrotis kaj pligrandiĝis la senlaboreco. Krome, la bursa spekulado generis grandajn esperojn pri gajno kiuj subite frustriĝis kiam la investistoj volis vendi siajn akciojn kaj ne trovis akirantojn. La burso kraŝis kaj centoj da entreprenoj bankrotis en la daŭro de malmultaj horoj. La krizo etendiĝis al la Eŭropaj landoj, sed ne al Sovetunio. Tie jam oni estis aplikante la kvin-jarajn planojn sub ŝtata kontrolo de la ekonomio; krome la ŝtata ekonomia kontrolo ekzistis jam antaŭe, dum la epoko de la NEP. Kaj ĝuste tiun solvon, sed favore al la kapitalista ekonomio, oni devis apliki en Usono kaj Eŭropo por savi la kapitalismon el la damaĝoj kiujn ĝi okazigas al si mem kaj al la socio. En Usono oni aplikis kelkajn solvojn por eliri el la krizo. La ***New Deal***: devigo al la bankoj prunti monon, detruado de stokoj, kreado de publikaj entreprenoj, plano de publikaj laboraĵoj, malgrandigo de la labortago, plialtigo de la salajroj… En Eŭropo oni faris ion similan: ŝtata interveno kun protektismaj dispozicioj, kontrolo de la prezoj, plialtigo de la salajroj por stimuli la konsumadon, publikaj laborofertoj, malgrandigo de la labortago…
En Germanio la sekvoj de la krizo estis speciale gravaj tial ke Usono retiris el tiu lando la monon kiun ĝi estis investinte tie, kio pligrandigis la mizeron kaj la senlaborecon. Hitlero sciis eltiri profiton el tia situacio. La nombro da membroj de lia partio ege kreskis; en 1932 estis jam 1.400.000. La malakordo inter la lideroj de la burĝaj partioj ebligis ke Hitlero, gvidanto de politika forto kiu tiam estis akirante grandan prestiĝon surbaze de ĝia radikala programo, intrigu por ke la maljuna prezidento Hindenburgo mendu al li formi registaron. La titolo de "Socialista" de lia partio estas nur nominala; ĝi utilis por altiri la laboristan amason. Sed plejparto el la partia membraro apartenis al la mez-klaso, kaj nur okaze de la Granda Depresio altiris kelknombron da laboristoj antaŭ la promeso meti finon al la senlaboreco. Same kiel sia itala modelo, Hitlero profitis la kontrolon de la politika povo por meti finon al ĉiuj demokratiaj institucioj kaj starigi totalisman diktaturon. La balotado de la 5-a de marto de 1933, por kies kampanjo la nazia partio ĝuis la financan apogon de riĉaj industriistoj, estis la lasta de la epoko de Hitlero. Krome li pere de dekretoj metis malfacilaĵojn por la mitingoj kaj propagando de la ceteraj partioj. La SA kaj SS agadis publike tiel perforte kiel siaj italaj similuloj. Unu semajnon antaŭ la balotado la Parlamentejo estis bruligita; oni kulpigis la komunistojn pri tiu faro kaj oni arestis 4.000 el ili. Kun tiu preteksto Hitlero prezentis dekreton de alarmo-stato kun provizora ĉesigo de kelkaj demokratiaj rajtoj de la civitanoj. Tio konstituis leĝan bazon por la starigo de fakta diktaturo kiu signifis la finon de la aplikado de la Konstitucio de la Respubliko. La posta baldaŭa morto de la prezidento Hindenburgo permesis al Hitlero alpreni la tutan povon

de la ŝtato laŭ proceduro formale laŭleĝa. En 1934 oni malpesis la ceterajn politikajn partiojn, oni fermis la parlamenton kaj ĉesigis la okazadon de balotoj. De tiam ne estis en Germanio plia leĝo krom la volo de la lidero (***führer***). Oni establis reĝimon de teroro, la SS kaj la Gestapo persekutadis la disidentojn kaj la opozicion, La gvidantoj de la komunista partio estis senditaj al koncentrejoj. La certigo de la absoluta povo de la ***führer*** postulis la purigon de la naziisma partio mem. La 30-an de junio de 1934 okazis la t. n. ***nokto de la longaj tranĉiloj***; en ĝi estis eliminitaj la naziaj gvidantoj de la SA, la sola partia grupo kiu povus alfronti la povon de Hitlero. De tiam li apogis sin sur la sekreta polico (Gestapo), la SS kaj la armeo, ĉiuj ili kontrolitaj de personoj pri kiuj li konfidis.

Kerna elemento de la nazia ideologio estis la supereco de la blanka raso sur ĉiuj ceteraj, kaj ene de ĝi la supereco de la arja germana raso. Laŭ tiu teorio ĉiuj ceteraj rasoj estis malsuperaj, sed inter ili Hitlero malamis kaj abomenis ĉefe la judojn, kaj rezulte de tio li malpermesis la geedziĝon de german(in)oj kun alirasaj personoj. Alia ideo kiu inspiris la politikon de Hitlero estis la imperiismo, la emo konkeri teritoriojn. Laŭ li, la germana nacio estis destinita al la mastrado de granda imperio. Krome li postuladis la unuiĝon al Germanio de ĉiuj teritorioj, eĉ grandaj nacioj kiel Aŭstrio, kun germana lingvo. La naziisma ŝtato estis strukturo tute artikigita ĉirkaŭ la figuro de la ĉefo, ***führer***, al kiu oni devis ĵuri blindan obeon kaj senkondiĉan lojalecon. Ĉiuj aspektoj de la vivo de la civitanoj estis kontrolataj de la partio. Kontraŭ la ideo de laborista internaciismo de la marksistoj, la naziistoj kreis la koncepton de nacia socialismo, demagogia inventaĵo pretendanta montri ke ankaŭ ili defendas la laboristojn. Cele altiri la proletaron, la naziistoj faris iujn kontraŭkapitalistajn deklaraciojn kaj promesojn fini la senlaborecon, promeso kiun ili iomgrade plenumis disvolvigante la milit-industrion.

**DOLORES IBARRURI (PASIONARIA) 1895-1989**

Preferindas stare morti ol surgenue vivadi. Pli bone esti vidvino de heroo ol edzino de malkuraĝulo.



Sed samtempe oni predikadis la malegalecon inter la homoj, emfazante ke ĉiam estis superuloj kaj malsuperuloj. Tiurilate oni kontraŭmetis la virojn al la virinoj; la ino estas malsupera estaĵo kaj, laŭ Hitlero, ŝian rolon oni esprimas per la tri **K**: ***kinder, kirche*** kaj ***küche*** (geinfanoj, preĝejo kaj kuirejo). Laŭ tiu valorskalo, la militistoj estas superaj al la civiluloj, la nazipartianoj estas superaj al la ordinaraj civitanoj kaj la anoj de la blanka raso (la arjoj en la germana kazo) estas superaj al ĉiuj ceteraj homoj. La elitoj aŭ elektitaj malplimultoj estis grave taksataj; ili estis destinitaj regi kaj domini super la amaso kies unika rolo estas obei.

Estis diversaj sociaj grupoj kiuj apogis tiujn faŝistajn movadojn kaj ties ideologio: eksbatalantoj, t. e. uloj sen klaskonscio kiuj post la militfino ne adaptiĝis al la paca vivo kaj eniris en la armeecajn faŝistajn organizaĵojn (***fasci di combatimento***, SA, SS…). Estas ankaŭ la kazo de la junaj naziistoj, multaj junuloj malkontentaj pro la rezulto de la milito kaj elrevigitaj pri la demokratio; ilia perfortema karaktero estis kanaligita far tiuj organizaĵoj por agadi brutale kontraŭ laboristaj manifestacioj, kontraŭ politikaj opoziciantoj… Rimarkindas ankaŭ la apogo kiun la faŝismo trovis en la mezklaso, minacita de la ekonomia krizo kaj kiu vidis en tiuj movadoj promesplenan estontecon. El la laboristklaso estis altiritaj favore al la faŝismaj movadoj multaj senlaboruloj kiuj jam ne vidis solvon en alitipaj organizaĵoj. Kaj ĉefe, estis la apogo de la granda kapitalo; ĝi estis tre grava por financi tiujn movadojn. Multaj industriistoj vidis en ili ian grandan apogon kontraŭ la danĝero de komunista revolucio kaj ne hezitis subvencii ĉiutipan faŝistan agadon. Estis simila la kazo de la grandaj terposedantoj kiuj suferis saman minacon flanke de la kamparanoj inter kiuj disvastiĝis la anarkista propagando.

Krom la socia apogo kiun la faŝismaj movadoj de Italio kaj Germanio trovis kaj ĝuis en siaj respektivaj landoj, precipe gravas ankaŭ la pasivecon kaj/aŭ faktan apogon kiun ili ĝuis far la fremdaj burĝ-kapitalistaj, laŭteorie demokratiaj, potencoj. Ja, kontraste al la rapideco kun kiu ĉi tiuj alkuris helpi la kontraŭkomunistajn fortojn en Rusujo dum la tiulanda civilmilito, la "demokratioj" de la kapitalista mondo rigardis aliflanken dum la sbiroj de Mussolino atakadis maldekstrulojn, puĉis en Romo kaj agresis Etiopion en 1935, kaj kiam la germanaj naziistoj sendadis al koncentrejoj marksistojn kaj judojn. Evidentas ke por la superregantaj klasoj de tiuj kapitalistaj landoj estis interesa la generiĝo kaj disvolviĝo de tiutipaj faŝistaj organizaĵoj kiuj povus utili por bremsi la progreson de la socialismo en ties landoj kaj, evetuale, iam ataki la komunismon en Sovetio. Speciale kondamninda estis la teniĝo de tiuj burĝaj demokratioj okaze de la hispana civilmilito (1936-1939). En tiu lando, en 1931, falis la monarkio kiu estis konsentinta la diktaturon de Primo-de-Rivera. Sed la Respubliko kiu anstataŭis ĝin estis tre febla jam de komence, pro la sekvoj de la krizo de 1929, la elreviĝo kaj frustracio de popolaj sektoroj kiuj esperis drastajn reformojn kaj pro la evoluo de la tradicia dekstraro al faŝismaj pozicioj. En 1934 okazis revolucia movado kiu triumfis nur en pluraj regionoj kaj poste estis perforte sufokita. Post malstabila dujara periodo, venkinte en balotado la t. n. "Popola Fronto" (maldekstraro kaj aliaj progresistaj fortoj), estis armea ribelo kun apogo de la enlandaj kaj fremdaj faŝismoj. La puĉo malsukcesis sed estiĝis milito kiu daŭris preskaŭ tri jarojn. Hitlero kaj Mussolino tre helpis per armilaro kaj militaj taĉmentoj la hispanajn faŝistojn. La Respubliko ricevis apogon nur de Sovetunio. Alkuris al Hispanio, por defendi la tieajn popolajn fortojn, internaciaj brigadistoj el multaj landoj, inter ili Francio, Anglio kaj Usono, sed iliaj respektivaj registaroj pasive, kaj eĉ iome akti-

ve, sin metis flanke de la reakciularo. Estis klara la klasbatala karaktero de tiu milito, tiel land-skale kiel mond-skale. Tiu konflikto lasis por la historio la memoron de gravaj personaj figuroj kiaj la anakiisto Buenaventura Durruti, la socialistoj Indalecio Prieto kaj Francisco Largo Caballero, la komunistoj Dolores Ibarruri (Pasionaria) kaj Enrique Líster, la trockijisto Andrés Nin… kaj multaj aliaj. Same famkonataj estas la ĉefaj figuroj de la hispana dekstraro, inter kiuj elstaras la Generalo F. Franko, kiu poste regis diktatorece la landon ĝis 1975. Pri tiuj hispanaj eventoj ni detale raportis per la 88a numero de ĉi tiu revuo **Heleco**. Oni povas rekte aliri al la ĉapitroj kiuj pritemas la okazintaĵojn kiujn ni mencias. Ekzemple, la sepjara diktaturo de Primo-de-Ribera estas priskribita en la retpaĝo:
http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/88/17-20.pdf
La sekvintan krizon de la monarkio oni povas vidi en:
http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/88/21-23.pdf
Pri la dua hispana Respubliko, vidu la ret-paĝon:
http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/88/24-26.pdf
La hispana revolucio de 1934 estas priskribita:
http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/88/27-29.pdf
La etapo de la "Popola Fronto" estas en la ret-adreso:
http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/88/30-32.pdf
Fine, al la civila milito oni dediĉis la paĝon, adreso:
http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/88/33-38.pdf
Pri tiu hispana milito ni aldonu ke la faŝistaj potencoj estis provante tie la armilaron kiun ili estis farante destine al la militaj operacioj kiujn ili estis planinte. Fakte, Mussolino, jam estis entrepreninte militon en Etiopio plurajn jarojn antaŭe, kaj Hitlero komencis sian militadon malmultajn monatojn post la fino de la hispana civilmilito.

**ANTONIO GRAMSCI 1891-1937**



La enhavo de la presaro estas influita de la ideo de la servo al la dominanta klaso, kio neeviteble konkretiĝas en unu afero: batali kontraŭ la laboristklaso. Fakte, de la unua al lasta linio, la burĝa ĵurnalo adoptas kaj evidentigas tiun zorgon.

Sed li jam unu jaron antaŭe estis entreprenite alian "militon", kiu ĉiam obsedis lin: kontraŭ la judoj. Konkrete la 10-a de novembro de 1938, oni dekretis teruran persekutadon kontraŭ ili; tiam okazis la tiel nomata "***nokto je vitro-disrompo***": centoj da sinagogoj estis bruligitaj kaj miloj da judoj arestitaj kaj senditaj al koncentrejoj. Tiele komenciĝis granda ras-mortigo kiu daŭrus sep jarojn. Sed, ĉu tiu kontraŭjuda teniĝo de la naziuloj iel rilatas kun la klasbatalo? Laŭ nia kriterio, la interetnaj konfliktoj ne estas klasbatalo. Temas pri homaj interfrontiĝoj okazantaj de antaŭ la ekzistado de la sociaj klasoj, ĝuste ekde la estiĝo de malsamaj etnoj. Kiam la naziistoj asertis ke la blankraso, kaj ene de ĝi la arjoj, estas plejsupera homa kolektivo destinita domini la ceterajn, al kiuj oni povas asigni la kondiĉon de "subhomoj", ili, ja, estas prezentante skemon de mondskala klasbatalo (dominantoj/submetitoj). Tamen, kvankam ankaŭ al la judoj ili asignis tiun kondiĉon de subhomoj, evidentiĝas ke estis iu diferenco inter la nazia teniĝo rilate al la judoj kaj tiu rilate al la ceteraj rasuloj. La subhomoj: sklavoj, feŭd-servutuloj laboristoj…, en la mensa skemo de ĉiuj superregantaj klasoj, estas destinitaj labori, esti ekspluatataj profite al la superregantoj. Sed la destino asignita al la judoj en la nazia sistemo estis la ekstermiĝo. Oni ne ekstermas la sklavojn el kiuj oni povas eltiri profiton; oni volas ekstermi, detrui, la konkurantojn, ne la servantojn.

Nu, surbaze de tiu distingo inter klasbatalo kaj konkurado inter egalpotencaj kolektivoj, ĉu la Dua Mond-Milito estis aŭ ne klasbatalo? La respondo estas: jes kaj ne. Se ni konsideras ke ankaŭ en la Dua, same kiel en la Unua MondMilito, interkonkuris imperiismaj potencoj emantaj superregi la mondon: Germanio, Italio, Britio, Francio, Usono, Japanio… tiurilate, ja, ne temis pri klasbatalo. Sed tamen estis iu noveca elemento kiu tre ege rilatis kun la klasbatalo mondskale. Kaj tiorilate indas ke oni analizu la rolon kiun la tutmonda kapitalismo asignis al la faŝismaj movadoj. Ni jam vidis ke la reĝimoj de Mussolino kaj Hitlero, same kiel la faŝista venko en la hispana civil-milito, ĝuis la komplicecon kaj eĉ la apogon de la imperiismaj potencoj de la burĝa sistemo. Ni ne forgesu ankaŭ la pasivecon de tiu kapitalista bloko rilate al la aneksado de Aŭstrio kaj Ĉeĥoslovakio far la hitlerisma Germanio. Oni volis per tiuj operacioj plifortigi Germanion cele ĵeti ĉi tiun potencon kontraŭ la komunista Sovetunio. Sed tiuj kiuj ludas per fajro riskas brulvundiĝi, kaj ĝuste tio okazis al la kapitalistaj landoj batalintaj kontraŭ Germanio en la Unua Mondmilito. La Germanio de Hitlero, ja, estis kontraŭkomunisma, sed ĝi havis ankaŭ frustracion pro sia malvenko en 1918, kaj la sento de la germanoj kontraŭ Anglio, Francio kaj Usono ne estis malpli granda ol sia timo al la komunismo. Tial la disvolviĝo de la Dua MondMilito estis tute alia ol ĝi estis planita de ĝiaj organizintoj. Ni ne prirakontos ĉi tie historion bone dokumentitan kaj konatan. Ni reliefigu nur tion ke spite al ĉio antaŭplanite, kaj post pluraj ŝanĝoj je aliancoj, fine estis kunbatalante kontraŭ la faŝistaj potencoj de Eŭropo, tiel Sovetunio kiel Anglio, Francio kaj Usono. Kaj la venko de ĉi tiu fronto permesis desegni la mondon de la sekvintaj jardekoj. Rimarkinda karakteraĵo de tiu desegnado aŭ planado estis ke ĝi estis ellaborita far potencoj kiuj havis kontraŭdirajn poziciojn pri la grava temo de la klasbatalo, kiel la komunista Sovetio kaj la kapitalistaj aliancanoj. Tiu interkonsento estis aranĝita en la Konferenco de Jalto kaj aliaj. Rezulte de tiu aranĝo la socialista bloko, sub soveta influo, povis esti ampleksigita al kelkaj landoj de Orienta Eŭropo, sed samtempe gravaj komunistaj partioj —kiel tiuj de Grekujo, Francio kaj Italio— restis en tre malfavoraj kondiĉoj en zono de granda kapitalista influo. Kaj, malfeliĉe, Hispanio restis, dum multe da tempo, diktatorece regata de la fiularo kiu estis atinginte la venkon en la civil-milito dank' al la faŝismo kiu poste estis venkita en la MondMilito. Tiuj cirkonstancoj signis la karakteron de la klasbatalo dum la sekvinta etapo.

# Malvarma Milito kaj Komfort-Socio




La dua duono de la 20-a jarcento estis tre speciala etapo de la homa historio de vidpunkto de la klasbatalo, de la scienco kaj de la materia progreso de la homaro. Oni nomis tiun periodon kiel «Malvarma Milito», «Paca Kunekzistado», «Komfort-Socio», «***Welfare State***», en la angla lingvo. Ĉiuj tiuj titoloj havas rilaton kun la klasbatalo je tutmonda skalo, kiel ni vidos. Ja, temis pri milito ĉar interfrontiĝis dum tiu longa etapo du sistemoj kun tre malsamaj poziciiĝoj pri la klas-rilatoj je tutmonda nivelo. Oni nomis ĝin "malvarma" tial ke ne estis simila al la du mondmilitoj okazintaj en tiu 20-a jarcento, sed tamen ne mankis lokaj militaj konfliktoj en kiuj interfrontiĝis la interesoj kaj la politiko de ambaŭ blokoj.

Ni devas klarigi ke preskaŭ ĉio okazante en la mondo dum tiu duonjarcento estis pli malpli en rilato kun tiu tutmonda klasbatalo. Tiu distingo, kiun ni faris ĝis nun inter klasbatalaj kaj interetnaj konfliktoj, malaperas nun ĉar dum la periodo pri kiu ni okupiĝas eĉ tiuj interetnaj militoj (kiel la arab-israelaj konfliktoj) kaj aliaj historiaj aferoj sen interklasaj kontraŭdiroj, tuj akiras tiun klasbatalan karakteron pro la nepra implikiĝo de la potencoj favore al iu kaj alia batalantoj. La samon oni povas diri pri tiuj konfliktoj kiuj, ja, havas klasbatalan karakteron sed nur lok- aŭ land-skale; iliaj enkadriĝo kaj influo en la tutmonda kunteksto asignas al ili rangon je fronto de la internacia klasbatalo. Ĉi tio klarigas kial en la pritemado de ĉi tiu epoko ni devos esti tro detalaj pri ĝiaj okazintaĵoj. En la antaŭaj ĉapitroj de ĉi raporto, pritemantaj pasintajn epokojn, ni povis permesi al ni lasi for gravajn militojn kaj aliajn aferojn kiuj, estante interesaj de historia vidpunkto, tamen, ne rilatis kun la klasbatalo. Sed en la epoko kiu komenciĝis post la fino de la Dua MondMilito, **<u>ĉio</u>** rilatas kun la klasbatalo inter socipolitika sistemo kiu volas persistigi la interhoman ekspluatadon, konkrete en ĝia burĝ-kapitalisma formo, kaj tiu alia sistemo kiu enkarnigas la alvokon pludaŭrigi la mondan revolución ĝis la malapero de la klasa ekspluatado.

La interfrontiĝo de ambaŭ blokoj estis politika, ekonomia, socia, militista, informa, propaganda sciencteknika kaj eĉ sporta. Sed la kialo de la interfrontiĝo estis esence ideologia kaj politika; Sovetio apogis socialistajn revoluciojn kaj registarojn, dum Usono kaj la kapitalista bloko kiun ĝi lideris malkaŝe apogis kaj promociis malstabiligojn kaj puĉojn ĉefe en LatinAmeriko. Ambaŭ superpotencoj klopodis konduki sian regadmodelon en la tutan planedon. La relativa harmonio kiu ekzistis inter ambaŭ sistemoj dum daŭris la milito kontraŭ la naziismo, tuj ĉesis post la venko sur la faŝismo, kaj spite al la konferencoj de Jalto kaj Postdamo oni alvenis al nenia interakordo pri la respektivaj influozonoj en la mondo. La fakta limlinio inter ambaŭ influozonoj baldaŭ estis nomita "fera kurteno". Ene la sovetia influo-sfero estis la orient-eŭropaj landoj: Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Polujo, Rumanio kaj la orienta parto de Germanio. En Berlino estiĝis iu stranga situacio: la kvar potencoj venkintaj en la milito kontrolis partojn el la urbo, sed tiu(j) parto(j) sub okcidenta kontrolo restis kiel insulo ene de la germana zono sub soveta kontrolo. Tio estis fonto de kelkaj incidentoj dum la malvarma milito. Notinda realaĵo de tiu etapo estis ke Usono posedis gravan armilon, la atombombon, kiu jam estis uzita por finvenki Japanion en 1945. Tiu strategia avantaĝo permesis al tiu lando plifirmiĝi kiel unuaranga potenco en la mondo rilate al la ceteraj potencoj de la kapitalista mondo kaj ankaŭ al la socialista bloko. La usona hegemonio evidentiĝis dum tiuj unuaj jaroj post 1945 en la maniero kiel tiu potenco altrudis sian kontraŭkomunistan politikon en landoj kiel Grekujo. Tie la komunistoj kaj aliaj maldekstruloj, kiuj tiom multe estis batalinte kontraŭ la germana okupacio, estis masakritaj de la monarkistaj fortoj apogitaj de Usono. La usona nukle-armila monopolo finiĝis en aŭgusto de 1949 kiam la rusoj faris sian unuan provon de nuklea ekspodo. La ŝanĝo je monda povekvilibro baldaŭ evidentiĝis de tiam; spite al la granda ekonomia helpo de Usono al la ĉinaj naciistoj en la civila milito kontraŭ la komunistoj de Máo-Zédōng, ĉi lastaj kaptis la povon en tiu granda lando en oktobro de tiu jaro 1949. Dume estis okazante la milito de Koreujo (1947-1953) en kiu intervenis –ne povis esti alimaniere– ambaŭ potencoj, kaj kiu finiĝis per iu ekvilibro, unu zono, norda, kontrolita de la komunistoj, kaj alia, suda, kapitalista. Tia ekvilibro estis signo de tio kio estis poste la situacio de la mondo de la sekvintaj jardekoj.

La perdo de la nukle-armila hegemonio far Usono kaj la rezisto kaj plifirmiĝo de la komunistaj pozicioj en la mondo generis en la usona socio iun reakcian senton kiu ricevis la nomon je "ĉasado de sorĉistinoj". Oni persekutadis la tiulandajn komunistojn aŭ simplajn simpatiantojn de la komunista idearo, oni arestis, juĝis

kaj ekzekutis iujn akuzitojn transdoni al la sovetuloj informon utilan por la fabrikado de la atom-bombo… En la eŭropa scenejo, la kapitalista kaj la socialista sistemoj prenis poziciojn en la ekonomia kaj en la militista terenoj. En la ekonomia tereno, oni aprobis kaj entreprenis la t. n. “Marshall-Planon”. Cele eviti ke Okcidenta Eŭropo falu sub komunistan kontrolon, oni desegnis tiun planon de ekonomia helpo por rekonstrui la industrian kapablon de la eŭropaj landoj kiuj estis suferintaj grandan detruadon pro la mondmilito. Per tiu plano oni volis plifirmigi la kapitalistajn ekonomiajn strukturojn kaj la disvolviĝon de la parlamentaj demokratioj bremsante la aliron al la povo fare de la komunistaj partioj, ĉefe tiuj potencaj de Francio kaj Italio. Stalino komprenis ke la usona taktiko pretendis ankaŭ redukti la sovetan kontrolon sur Orienta Europo, kaj ke la plano estis la maniero laŭ kiu Usono “aĉetus” la eŭropajn landojn. Cele kontraŭstari tiun ofensivon, Sovetunio pretigis sian propran planon de ekonomia kunlaborado kun la landoj de sia influo-sfero. En la militista tereno, en la jaro 1949 Usono entreprenis la organizadon de la **NATO**, militista alianco de tiu potenco kun la ĉefaj kapitalistaj landoj de Okcidenta Eŭropo. Germanio restis dividita; la teritorio kontrolita de la okcidentaj potencoj konstituis la t. n. **Federacia**-n **Germana**-n **Respubliko**-n, kiu integriĝis en la **NATO**-n. Dume, la zono sub soveta kontrolo konstituis la t. n. **Demokratia**-n **Germana**-n **Respubliko**-n, kiu integriĝis en la **Varsovia Kontrakto**, militista alianco de la landoj kun komunistaj reĝimoj. En Berlino la Fera Kurteno kavis poste materian esprimon per murego kiu divide staris ekde 1959 inter ambaŭ urbaj sektoroj.

La imperiisma politiko kontraŭ la disvastiĝo kaj progreso de la komunismo ne limiĝis al la interna politiko de Usono kaj al la Eŭropa kontinento. En Azio, Afriko kaj LatinAmeriko, la usona potenco faris ĉion eblan por sufoki kaj malebligi la revoluciajn movadojn, kiuj siavice ĝuis la apogon de Sovetunio kaj/aŭ Ĉinio. En la unuaj jaroj de la jardeko post 1950 Usono organizis militistajn aliancojn kun diversaj aziaj kaj oceaniaj landoj: Japanio, Aŭstralio, Tajlando, Filipinoj…, kaj establis militistajn bazojn en iuj el ili. La mondskala interfrontiĝo inter ambaŭ blokoj generis grandan kreskon de la militistaj budĝetoj, armad-vetkonkurado… Sovetunio havis similtipaj zorgoj rilate al la konservado de sia influo-povo en la bloko kontrolita de ĝi celante ke en tiu terzono ne estiĝu kapitalism-favoraj movadoj, kaj dume klopodadis stimuli kaj apogi kontraŭkapitalistajn movadojn diversloke en la mondo. La rezulto de ĉiuj ĉi penoj de ambaŭ superpotencaj estis relativa, kun sukcesoj kaj fiaskoj. Grava bato kaj damaĝo por la strategio de la socialista bloko estis la disiĝo de la komunista reĝimo de Jugoslavio subgvide de Marŝalo Tito. Ĉi tiu sin deklaris neŭtrala en la mond-skala interfrontiĝo de ambaŭ sistemoj. Ne dubindas pri la sincereco de la neŭtralisma teniĝo de la komunistoj de Jugoslavio; okazas ke ili deziris por sia lando politikan aŭtonomecon kiun ne eblis ĝui en la socialista tendaro subkontrole de Sovetunio. Ĉi tiu potenco kondutis tiurilate, dum la tuta daŭro de la Malvarma Milito, kvazaŭ la landoj de la socialista bloko estus submetitaj al situacio de limigita suvereneco. Ĉi tiu koncepto de “limigita suvereneco” eĉ estis formulita kiel politika doktrino okaze de iu el la konfliktoj kiuj estigis inter Sovetio kaj tiuj socialistaj landoj. Alia lando kun komunista reĝimo kiu disiĝis el la alianco kun Sovetunio estis Ĉinio. Kiam mortis Stalino en 1953, estis ia lukto inter liaj ministroj por la kontrolo de la povo kaj venkis en tiu lukto Nikito Kruŝĉovo. Ĉi tiu entreprenis procezon de kritikado de la stalina politika etapo. Oni emfazis la kondamnon al tio kio estis nomita “kulto al personeco”. Ĉi tiu politika procezo utilis al Máo-Zédōng kiel preteksto por entrepreni apartiĝon el la politiko de Sovetunio kaj certigi al Ĉinio plenan suverenecon. Tamen Ĉinio ne sin deklaris neŭtrala rilate al la kapitalismo, sed kontribuis, ne malpli ol Rusujo, al la apogo de revoluciaj movadoj en la mondo.

Tiam la komunistaj reĝimoj estis tre optimistaj pri la fina venko kiun la marksisma teorio promesis al ili. Ankaŭ la komunistoj de la kapitalistaj landoj estis plenkonvikitaj ke la normala disvolviĝo de la Historio antaŭenmarŝas direkte al la Socialismo kaj la Komunismo. Tamen tiam tute ne estis alloga la bildo kiun la komunistaj reĝimoj prezentadis antaŭ la mondo, ĉefe por la laboristamasoj de la alte industriigitaj landoj, kie estis disvolviĝante ia formo de konfort-socio kaj konsum-socio kiu tute ne eblis en la tiama stato de ekonomia disvolviĝo de la socialista bloko. Kaj dume la popoloj de la socialistaj landoj mise interpretadis la situacion; ili konsideris ke la grado de egaleco kaj sekureco atingita en sia socio estis normala kaj ne renversigebla rezulto de la ŝanĝoj de la tempoj kaj emis pli altan gradon je konsum-kapablo. La kapitalism-favora propagando adresita al tiuj socialistaj landoj tro enfazadis pri la grado de komforto kaj riĉeco de la kapitalistaj landoj kaj atribuis al la komunistaj reĝimoj la respondecon pri la subevoluo de la socialista bloko. Tiu politika propagando, kiu donus siajn fruktojn kelkajn jardekojn poste, estis grava elemento de la klasbatalo kiu mondskale disvolviĝadis dum tiu epoko. La interbloka kontraŭfrontiĝo estis malegaleca lukto; la resursoj de la socialista bloko estis malpli grandaj ol tiuj de la kapitalistaj potencoj. Krome ĉi tiuj eltiradis grandan profiton el la kolonioj kiujn ili kontroladis. Tial, jam dekomence la socialista bloko devis stari defensive: daŭris la diktatoreca interna politiko de la komunistaj reĝimoj kaj la fera kontrolo de la landoj de orienta Eŭropo far Sovetunio, spite al la ŝanĝoj kiujn oni volis enkonduki ene de la procezo de malstalinigo. En la ekstera politiko, la tiama strategio de Rusio kaj Ĉinio estis instigi kaj helpi la popolojn de la kapitalistaj kolonioj batali por ĉi ties sendependiĝo. Dume ankaŭ la imperiismo klopodis kaj sukcesis starigi malakordon kaj konfliktojn en la socialistan mondon. En 1956 estiĝis en Hungario ribelo kontraŭ la komunista regantaro de tiu lando. Ĉi tiu ne sukcesis kontroli la popolan ribelon kaj riskis fali pro ĝi; devis interveni la trupojn de la Varsovia Kontrakto subgvide de la Sovetunio de Kruŝĉovo. La hungara ribelo estis sufokita kaj tio plu kontribuis erodi la prestiĝon de la komunistaj reĝimoj.

Dum la jardeko de 1950 kaj unuaj jaroj de tiu de 1960 okazis granda procezo de sendependiĝo de la ĝis tiam koloniigitaj landoj. En la strategio de la komunistaj fortoj kontraŭ la imperiismo ludis gravan rolon la apogo al tiuj sendependigaj movadoj. Sed rimarkindas ke la ĉefa imperiisma potenco, Usono, ne havis tiutipajn koloniojn. La ĉefaj koloniistaj landoj estis Britio, Francio, Belgio… krom la venkitoj en la Dua MondMilito: Germanio kaj Italio. La dominado de Usono en Latin-Ameriko estis alitipa ol la tradicia koloniismo. La latinamerikaj landoj estis sin liberigintaj el la eŭropaj koloniismo, ofte dank' al usona helpo, en la 19-a jarcento. Ili, ja, havis apartan registaron, kun sia flago, himno kaj aliaj eksteraj signoj de suvereneco, sed en la ekonomia tereno ili estis plensubmetitaj al la usona imperiismo, kaj estis fiaskintaj movadoj, kiel tiu de Francisko Villa kaj Emiliano Zapata en Meksikio, kiuj intencis superi tian situacion. Nu, la eŭropaj koloniistaj landoj komprenis ke ili ne plu povos subteni siajn koloniajn imperiojn kiel ĝis tiam. La rezisto de la koloniigitaj popoloj igis ke al la koloniistaj potencoj ne rezultis rentebla, profitdona, la pluokupado, pere de armeo, de la koloniaj teritorioj. Kaj ĉar la motivigilo de tiu okupado estis ekonomitipa, oni alvenis al la konkludo ke estus prefere aranĝi la aferon simil-maniere kiel estis solvita en LatinAmeriko la antaŭan jarcenton: koncedi formalan sendependecon al tiuj teritorioj sed konservante ĉi ties ekonomian kontrolon. Tiucele oni kreis artefaritajn landojn ene de kies limoj estis enkalkulitaj malsamaj etnoj kaj/aŭ gentoj kun malsama religio kaj lingvo por ke ne manku en ili kialoj de interna malstabileco kaj febleco kiu permesus al la (eks)koloniistaj potencoj mastri la aferojn de la (eks)kolonioj. Krom tio la eks-koloniistaj landoj klopodis krei en tiuj ĵus sendependigitaj landoj privilegian klason au eliton kiu generus kaj provizus lakeajn regantojn kies klasa intereso estus defendi la ekonomiajn interesojn de la koloniista metropolo. Kiam en iu el la novaj landoj, la regantoj ne alĝustiĝis al tiu lakea rolo kiun la imperiismo asignis al ili, kiel okazis kun Patrice Lumumba en Kongolando en 1960, la koncerna koloniista lando, kun la helpo de la usona **CIA**, faris ĉion eblan por restarigi la situacion de imperiista kontrolo kaj ekstermi la revoluciulojn.

Sed por la imperiismo ne ĉio estis sukcesoj en tiu fronto de la popolaj liberigaj movadoj. Komence de la jaro 1959 triumfis en Kubo revolucio subgvide de Fidel Kastro. Ĉi ties registaro iompostiom estis alprenante socialistan karakteron: agrara reformo kaj aliaj dispozicioj kiuj damaĝis la usonajn ekonomiajn interesojn en la insulo, naciigo de ĉiuj entreprenoj, alianco kun Sovetunio… Fiaskis ĉiuj klopodoj de la **CIA** por malstabiligi la situacion en la lando laŭlonge de la jaroj 1959 kaj 1960: teroristaj atakoj, komerca blokado… kaj ankaŭ la invado de la insulo far dungitaj soldatoj kun usona helpo kaj organizo. La usona komerca blokado al Kubo estis apogita kaj sekvita de la landoj de la kapitalista mondo kvankam tio signifis damaĝon ankaŭ por tiuj landoj. Ekzemple, Hispanio volis konservi siajn historiajn kaj komercajn rilatojn kun la insulo kaj la usona marameo atakis hispanan ŝipon portantan varojn al Kubo kaj okazigis hispanajn viktimojn spite al tio ke la hispana faŝista reĝimo de Franko estis aliancano de Usono. Sed Sovetunio kaj la landoj de la socialista bloko intense komercadis kun Kubo kaj helpis la kuban reĝimon. Usono devis toleri tion por ne iniciati mondan militon kun Sovetunio ĉar tiaspeca milito rezultus tre danĝera por ĉiuj pro la uzado de nukleaj bomboj kiujn posedis ambaŭ potencoj. Sed kiam Kruŝĉovo interakordis kun Fidel Kastro la instaladon de 40 misilo-ĵetejoj en Kubo kaj oni komencis konstrui tiujn instalaĵojn, la tiama uson-prezidento J. Kennedy faris ultimaton kiu igis rekonsideri la aferon. Oni alvenis al interakordo inter ambaŭ potencoj ke Rusujo retirus la misiloj kaj Usono kompromisus ne invadi la insulon. Fakte la reĝimo de F. Kastro pluresti dum la tuta daŭro de la Malvarma Milito kaj eĉ poste.

En tiu epoko Sovetunio kaj la socialista bloko ĝenerale ĝuis ankoraŭ je sufiĉe da prestiĝo inter la amasoj de la kapitalistaj landoj. Inter la aferoj pri kiuj ambaŭ blokoj rivalia estis la kosmo-konkurado, t. e. la vet-konkuro en la tereno de la kosmo-esplorado, Sovetunio estis la unua kiu metis en orbiton iun artefaritan sateliton. Poste daŭris tiu konkurado kaj Usono estis la unua –kaj la sola– kiu sendis tripulitajn kosmoŝipojn al la luno. Kompreneble. Krom la scien-teknika intereso de tiu esploro, la vet-konkurado estis batalo celante la akiron de politika prestiĝo. En tiu tereno kaj en aliaj iompostiom evitentiĝis teknikan superecon de la kapitalista superpotenco.

Sed en la jardeko post 1960, kiel dirite, ankoraŭ estis granda la prestiĝo de la socialista kaj komunista tendaro, kaj ĉefe ties idearo. Tio reliefiĝis en la fakto ke la RomKatolika Eklezio kunvokis novan Koncilion por studi la adaptiĝon de tiu religia institucio al "la novaj signoj de la tempoj" laŭ sia propra esprimo. La Dua Vatikana Koncilio okazis inter la jaroj 1962 kaj 1965. Ekde la epoko de la Koncilio de Bazelo (1431), lasta intenco de memreformo de la Eklezio, ĉiuj sekvintaj koncilioj (Florenco, Laterano 5-a, Trento, kaj Vatikano 1-a) havis reakcian karakteron kaj pli kaj pli metis la Eklezion kontraŭ ĉiuj progresistaj ideoj disvolviĝantaj en la mondo. En la 20-a jarcento la situacio de tiu institucio estis neeltenebla, kaj per tiu Koncilio Vatikano 2-a oni intencis prezenti pri ĝi bildon pli akordigeblan kun la socia evoluado. Tamen la afero estis malfrua kaj mise disvolviĝata. La Eklezio ne kuraĝis alfronti siajn ĉefajn problemojn: la dogmaro, la hierarkio kaj la kulto. Pri ĉi lastaj oni faris nur iujn etajn retuŝojn. La ĉefaĵo de la konciliaj ŝanĝoj pli emfazis pri socialaj reformoj; estis deklaroj favore al pli justa distribuado de la produktaĵoj kaj mondaj riĉaĵoj, oni publikigis progresistajn enciklikojn pri tiu temo, sed ĉiam restante klara la rifuzo al la Komunismo kvankam sen la morala kondamno kiu karakterigis la antaŭajn epokojn de la Eklezio. Nu, la oportunismo de tiu eklezia teniĝo evidentiĝis poste, en la fina etapo de la Malvarma Milito, kiam la institucio reprenis sian kontraŭkomunistan karakteron kaj forgesis la spiriton de la 2-a Vatikana Koncilio remetante sin en situacion el kiu ĝi ne scias kiel eliri en la unuaj jardekoj de la 21-a jarcento.

Ene de la Malvarma Milito meritas apartan atenton la periodo inter 1962 kaj 1979; tiu etapo karakteriĝis pro la malstreĉiĝo en la rilatoj inter la socie kontraŭaj blokoj, kontraste al la antaŭa etapo en kiu ne mankis militriskaj situacioj kiel la krizoj de Berlino kaj tiu de la misiloj de Kubo. Krom la menciita eklezia Koncilio okazinta komence de tiu periodo, estis aliaj faktoj kiuj kontribuis al la politika kaj sociala malstreĉiĝo. La superpotencoj devis pretigi novan geopolitikan modelon. Eŭropo kaj Japanio rapide restariĝis el la detruo de la Dua Mond-Milito, kaj ilia porpersona enspezo alproksimiĝis al tiu de Usono. Dume la ekonomio de la socialista bloko, tiam subgvide de Breznevo, eniris en stagn-staton. Multaj landoj, tiuj nomata "de la Tria Mondo" konstituis sendependan blokon aŭ penis tion fari pli malpli sukcese. Ekde 1973 multaj landoj naftoproduktantaj konstituis konsorcion (**OPEL**) por kundemarŝi siajn komunajn interesojn. Kompreneble, tia iomgrada neŭtraleco eblis dank al la pov-ekvilibro, eĉ se relativa, tiam ekzistanta en la mondo inter la du kontraŭaj interkonkurantaj blokoj.
Nun ni iome devas atenti pri la situacio de iu grava protagonisto de la klasbatalo, la proletaro de la alte industriigitaj landoj. La proletaro de la epoko kiun ni pritemas estis parte konstituita de generacio kiu konis la hororojn de la milito kaj tre alte taksis la materian progreson alportitan de la paco, kaj parte de generacio kiu ne trasuferis la militon kaj pensis ke la komforto tiam ĝuata estis normala kaj nerenversigebla situacio. Al la kapitalismo konvenis fari grandajn koncesiojn al la laboristaro de tiuj landoj por ke ĉi tiuj ne emu socian revolucion kiu metus finon al la burĝa dominado. Estis situacio de preskaŭ plenlaboreco, socia, interklasa paco, manko aŭ malofteco de strikoj, konsiderinde alta konsumnivelo, relative altaj salajroj, sufiĉe avantaĝaj labor-kontraktoj, kelk-semajna feriado por la laboristoj, pensioj por la maljunuloj, publikaj servoj de instruado kaj saneco, la ekzistado de ia grado je ŝtata kontrolo de la produktad-procezo kaj iuj potencaj publikaj entreprenoj… Tiu komfort-socio estis rezulto de la klasbatalado de kelkaj generacioj kaj de la pov-ekvilibro tiam ekzistanta en la mondo. Sed, siavice, tiu situacio de popola bonstato endormigis la klas-batalemon de la la generacio de la plenaĝuloj kaj ne generis tiun de la anoj de la novaj generacioj. La popolo, ties malaltaj klasoj, eĉ se relative instruitaj, ne havas historian memoron. La homoj naskiĝintaj post 1945 ne konscias ke la viv-nivelo kaj viv-maniero de la popolaj klastavoloj de la alte industriigitaj landoj estis –kaj iomgrade ankoraŭ estas– rezulto de kelkaj faktoroj: la Industria Revolucio, la Franca Revolucio, la Pariza Komunumo, la Rusa, Ĉina kaj aliaj revolucioj, la scienc-teknika revolucio, la Malvarma Milito, la superekspluatado de la tria Mondo… Kompreneble, la superregantoj de la sistemo bone konas la bazon, la esencon kaj la kondiĉojn de sia povo. Kaj krome ili kontrolas la edukadon kaj la informadon, t. e. ĉiujn ilojn de la ideologia aparato de la sistemo. Resume, la superregantoj, la dominanta klaso de la socio, povas decidi kian mensan, intelektan nutradon oni povizu al la popolo, al la regatoj. Estas klare ke en la ĝenerala instruado destinita al la popolanoj ne elstaras la historio, la politiko, la ekonomio… Ju malpli konus la pleb-klasanoj pri tiuj temoj, des pli bone por la superregantoj de la socio. Tio helpas nin kompreni la elnodiĝon aŭ rezulton de la Malvarma Milito en la lasta jardeko de la 20-a jarcento kaj la iompostioman ruiniĝon kiu okazas al la komfort-socio de tiam kaj daŭras ankoraŭ kiam oni verkas ĉi liniojn.
Sed la superreganta burĝa klaso neniam perdis la kontrolon de la procezo. Dum en la alte industriigitaj landoj oni disvolvis tiun komfortsocion, kaj la malriĉaj ekskoloniaj landoj de la Tria Mondo suferis kolosan ekspluatadon por ebligi tiun konsumsocion de la riĉa mondo, al la landoj de la socialista bloko la imperiismo adresis propagandon kiu emfazis la egan konsumnivelon de la kapitalista mondo. Ankaŭ la popolo de la landoj de Orienta Eŭropo ĝuis plenlaborecon kaj socialan sekurecon, sed en kio rilatis al la konsum-nivelo la koncernaj ŝtatoj ne povis konkuri kun la kapitalista mondo; ĝia etiko kaj valoroj ne permesus al ili ekspluatadi koloniojn kiel faris la burĝa imperiismo. Surbaze de tiu diferenco oni kreadis en tiuj popoloj komplekson de malplivaloreco kaj la ideon ke por solvi tiun problemon oni devus faligi la komunistan reĝimon. La unua frukto de tiu propagand-kampanjo estis la eventoj de la jaro 1968 en Ĉeĥoslovakio. Laŭteorie, temis pri procezo de demokratiigo de la lando, sed la fina celo de la procezo estis pridubi la komunistan politikan kontrolon por establi merkatan ekonomion, klare parolante, la kapitalismon. La afero ne havis longan karieron; Sovetunio, la Varsovia Kontrakto, faris militistan intervenon similan al tiu en Hungario 12 jarojn antaŭe. Simila, sed ne egala; en Ĉeĥoslovakio la militista okupado ne estis sanga ĉar ne estis armita rezisto kiel tiu de Hungario en 1956. Sed la profito por la kapitalista propagando estis la sama. La propagando de la imperiismo emfazis pri la diktatoreca karaktero de la komunistaj reĝimoj, kontraste al la demokratio de la burĝa mondo.
Sed la demokratio kaj la libereco ne brilis en la tuta kapitalista mondo. La esenco de la kapitalismo estas la malegaleco: estis riĉaj kaj malriĉaj landoj, kaj en ĉiuj ili estis riĉaj kaj malriĉaj homoj. Tiu baza kontraŭdiro de la klasbatalo havis elokventajn esprimojn en la periodo kiun ni trastudas. En aprilo de 1965 la usona prezidento Johnson ordonis la deplojon de 42.000 soldatoj en la Dominika Respubliko por okupi la teritorion dum unu jaro cele eviti la konkretiĝo de revolucio simila al tiu de Kubo. Dume –kaj ĝis nun– daŭras la komerca blokado al ĉi lasta lando. En Ĉilio, en la balotado de la jaro 1970 estis elektita prezidento Salvadoro Allende, marksisto. Tiu lando estis iu el la multaj kiuj devis subteni per malmultekostaj resursoj –ĉi-kaze la kupro– la bonstanton de la komfort-socio. La **CIA** organizis en 1973 militistan puĉon kontraŭ la demokratia regantaro estrita de Allende, kaj la rezultinta militista diktaturo ĝuis la apogon de la "demokratia" Usono. Tiu sama superpotenco apogis la diktaturon de Argentino kaj la masakradon kiun la militista reĝimo de tiu lando plenumis kontraŭ ĉiu popolaj oponantoj al la sistemo.

Al ĉio-ĉi oni devas aldoni la usonan intervenon en Hindoĉinio kaj aliaj lokoj por bari la iradon de la koncernaj popoloj al pli justa socio. La popol-amasoj de la riĉegaj landoj rigardadis aliflanken kaj rezignis sian revolucian rolon en la klasbatalo. Klara esprimo de tiu realaĵo estis la naturo kaj disvolviĝo de la parizaj eventoj de Majo de 1968. Per la numero 83-a de ĉi tiu nia revuo ni pritemis tiun nomatan "Revolucio de Majo 1968". Vidu ĝin en la ret-adreso:
http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/83/40.pdf
Oni devas agnoski ke la gejunuloj kiuj mobiliziĝis en Parizo en tiu okazo estis idealistoj kiuj celis kaj postulis la plibonigon de la socio en kiu ili estis vivantaj. Sed iliaj postuloj: pri seks-libereco, seks-egaleco, reformoj en la eduk-sistemo… klare montras ke temas pri problemoj de socio kiu ne havis grandajn socialajn problemojn en mondo en kiu, jes ja, estis grandaj socialaj problemoj. Fakte, ili postulis ankaŭ la respekton de la homaj rajtoj en tiuj terzonoj kie tiam estis okazante grandajn krimojn kontraŭ la homaro, kaj tio honorigas tiujn gestudentojn. Sed la plimulto el la franca loĝantaro, kaj ankaŭ en aliaj landoj de la riĉa mondo, ignoris tiun mobilizadon kaj eĉ reagis kontraŭ ĝi; en la sekvinta politika balotado en Francio atingis grandan sukceson la partioj de la dekstraro. Oni povas diri ke la pleb-amasoj de la riĉa kapitalista mondo kaj tiuj de la ekssocialistaj landoj gajnis per propra penado la burĝan ofensivon kiun ili estas traspertante nun.

Konkretaj faroj de la malstreĉiĝo de tiu epoko estis la vizito de la usona prezidento R. Niksono al Ĉinio kaj lia intervidiĝo kun Máo-Zédōng en 1972. Tiam estis sufiĉe klara la malvenko de Usono en la milito de Vietnamio kaj ceteraj hindoĉiniaj landoj. Usono kaj Sovetunio faris ekde 1972 kelkajn interakordojn por la limigo de produktado de nukleaj armiloj. Tiu armigadlimigo estis tre konvena por ambaŭ potencoj, ĉefe por Sovetunio ĉar la elspezoj destine al la armilaro estis ĝis tiam granda ŝarĝo en la koncernaj landaj budĝetoj. Post la subskribo de tiuj interakordoj, Niksono kaj Breznevo deklaris ke estis komenciĝanta nova erao de «paca kunekzistado». Krome ambaŭ superpotencoj intensigis la komercajn interrilatojn.

Sed tiu malstreĉiĝo en kio rilatas al la danĝero de rekta interfrontiĝo de la superpotencoj ne signifis ke tute estis finiĝinta la Malvarma Milito en kio rilatas al la mondskala kontraŭfrontiĝo de du malsamaj politikaj sistemoj. Pludaŭris la usona komerca blokado al Kubo kaj la ekspluatado de la afrikaj kaj latinamerikaj landoj fare de la grandaj centroj de la imperiismo. Dume malfortiĝis, ĉefe ekde la soveta interveno en Ĉeĥoslovakio, la ligiloj de la komunistaj partioj de la kapitalistaj landoj kun la soveta reĝimo. En Italio kaj Francio la respektivaj kom-partioj alprenis politikon nomatan «eŭrokomunismo» kiu karakteriĝis pro la enfazado de la demokratiaj valoroj, kiuj ne estis respektataj de la komunistaj reĝimoj de Rusujo, Ĉinio kaj Jugoslavio, sed konservante la celon de la antaŭenirado al la Socialismo kaj la Komunismo. En Hispanio, kie post la morto de la diktatoro F. Franko oni entreprenis procezon de demokratiigo, la komunista partio de tiu lando estis leĝe agnoskita kaj ankaŭ ĝi alprenis la eŭrokomunistan doktrinon. Simila estis la pozicio de la kompartio de Japanio kaj Grekujo. La febla kaj malfavora situacio de la socialista bloko en ĉi ties interfrontiĝo kontraŭ la potenca kapitalista sistemo, priakrigis la politikan teniĝon de la sovetaj aŭtoritatoj rilate al la satelitaj landoj kaj la propraj disidentoj kiel Aleksandr Solzhenitsyn kaj Andréi Sájarov. Sed ankaŭ la imperiismo suferis iujn misfortunojn en tiu periodo. En aprilo de 1974, la t. n. "revolucio de la diantoj" metis finon al la duonfaŝista diktaturo de Portugalio. Speciale damaĝa por la interesoj de la imperiismo estis tio ke la posta evoluo de la situacio al ekstrem-maldekstraj pozicioj endanĝerigis la apartenon de tiu lando al la **NATO**. La **CIA** devis apliki sian repertuaron de receptoj por malstabiligo de la lando cele renversi la situacion siafavore. En septembro de la sama jaro 1974, alia revolucio faligis la tradician reĝimon de Etiopio; la ***neguso*** (imperiestro) Hajle Selasie estis detronita. Ankaŭ ĉi tie okazis politika evoluo al ekstrem-maldekstraj pozicioj, konkrete maŭistaj, kaj ankaŭ ĉi tie la agentejoj de la imperiismo devis penadi por rehavi la kontrolon de la terzono. En 1979 okazis en Iranio (Persujo) islama revolucio, subgvide de la klerikulo R. Ĥomejni, kiu detruis la reĝimon de la ŝaho Reza Palevi, aliancano de Usono. Kaj en la sama jaro en Nikaragvo alia aliancano de la imperiismo, la reĝimo de la diktatoro Anastasio Somozo, falis rezulte de la venko de la t. n. «sandinista revolucio». Alia afero kiu enzorgigis la usonan potencon estis la ideologia evoluado de sufiĉe ampleksaj popolamasoj en LatinAmeriko, konkrete, la t. n. «Teologio de Liberigo». Eble la sola konkreta frukto de la Dua Vatikana Koncilio estis la alpreno, far iuj teologoj de tiu terzono, de la evangelia spirito en kio koncernas al la justeco en la sociala tereno, esprimita per la formulo: "prefera poziciiĝo favore al la malriĉularo". La teoriaj ellaboraĵoj de tiuj progresistaj teologoj atingis sufiĉe da popola intereso kaj generiĝis mobilizoj surbaze de tiu idearo. La procezo de disvastiĝo, tra la tuta kontinento, de tiuj ideoj kaj la mobilizoj generitaj de ĝi daŭris kelkajn jarojn, de 1968 al 2004, t. e. jam post la finiĝo de la Malvarma Milito. La maniero kiel estis sufokita tiu movado apartenas al la studo kiun ni faros pri la sekvinta etapo.

Rilate al la etapo de la malstreĉiĝo, ĝi povas esti konsiderata kiel finita ekde la jaro 1979. La etapo de la uson-prezidanto Ronaldo Reagan estis kvazaŭ dua malvarma milito. Tiam en Afganio estis civila milito inter la partianoj de la komunista regantaro kiu estis alpreninte la povon en la antaŭa jaro kaj iu islama movado de tiu lando. La afero komplikiĝis en 1979 per la soveta interveno per la sendo de trupoj por batali favore al la afganaj komunistoj kaj la usona helpo al la islamaj ribelintoj. La rezulto de tiu konflikto estis ke Sovetunio traspertis similan fiaskon kiel Usono en Vietnamio. Sed temis pri la lasta tiutipa aventuro de la Malvarma Milito. Dum la sekvinta jardeko la socialistaj potencoj en la mondo restis defensive antaŭ la ofensivo de la potencaj fortoj de la imperiismo: la Usono de R. Reagan kaj la Britio de Margaret Teacher.

Kontraŭ la komunismo, kiun li difinis kiel “la imperio de la malbono”, Ronald Reagan difinis sian politikan doktrinon laŭ kiu Usono asignis al si la rajton perturbi kaj renversi la ekzistantajn komunistajn registarojn kaj interveni en ĉiu ajn monda angulo kiu rezultus interesa por tiu lando. Tiu politiko implicis planojn por stimuli kaj apogi islamismajn kontraŭkomunistajn fortojn en la respublikoj de Soveta Unio kaj trejni muzulmanojn el la tuta mondo por lanĉi ilin al ***ĝihad*** (religia milito) kontraŭ la socialista potenco. Sed la ĉefa zorgo por la komunistaj reĝimoj estis la militista eskalado de Reagan, pliintensiĝo de la armila vetkonkurado. La elspezoj de Sovetunio por militistaj elspezoj estis 25 procento el la ŝtata budĝeto, koste de konsumebleco de la loĝantaro kaj investado en civilaj sektoroj. Kaj eĉ tiele, la soveta armilaro estis malpli kvalita kaj efika ol tiu de la usona ege disvolvita usona teknologio. Usono entreprenis la disvolvon de nova armilstrategio, la t. n. “milito de la galaksioj”, t. e. fabriki pli potencajn misilojn kaj meti en orbiton satelitojn portante armilojn kaj kun kapablo kontroli la aerspacon ĉirkaŭ la tuta planedo. Sovetunio havis nek ekonomian nek teknikan kapablon alfronti la defion de tiu nova armil-konkurado. Dum la jaro 1983 la administracio de Reagan intervenis en la civila milito en Lebano, invadis Grenad-insulon, bombardis Libion kaj apogis la kontraŭkomunistajn gerilanojn kiuj celis renversi la sandinistan registaron en Nikaragvo. Dume la sovetaj trupoj ne sukcesis kontroli la situacion en Afganio. De tiam pli kaj pli intensiĝis la krizo de la komunista reĝimo en Rusujo.


Fino de la Berlina Murego

Kiam en 1985 Miĥail Gorbaĉov alprenis la liderecon de Sovetunio, la ekonomio de tiu lando estis stagnita kaj senhava je fremdaj valutoj pro la falo de la prezo de la nafto kiu estis la ĉefa rusa eksportaĵo. La situacio estis tre stranga; laŭteorie, temis pri alpreno aŭ transricevo de povo ene de komunista reĝimo, sed Gorbaĉov tute ne estis komunisto, sed socialdemokrato kiel poste evidentiĝis, kaj la komunisteco de la reĝimo kiun li heredis estis almenaŭ pridubinda; abundis en ĝi korupteco kaj malefiko. Okazis ke la personoj kiuj tiam demarŝadis la aferojn de la soveta ŝtato apartenis al generacio kiu ne estis koninta la Revolucion de 1917, ili vivis kaj faris sian politikan karieron en sistemo en kiu ne estis permesataj aliaj partioj krom la komunista. Tio signifas ke ĉiuj personoj dezirantaj agadi en la politika tereno devis alĝustiĝi al tiu sistemo sed la sistemo ne povis kalkuli je ilia lojaleco. En la kriza procezo kiu komenciĝis, aŭ pliintensiĝis, tiam evidentiĝis la manko de lojaleco al la komunista idearo fare de Gorbaĉov kaj ĉi ties amikoj. Li entreprenis reformojn kiuj kontraŭis la teorion kaj la praktikon de socialismo, kiel la permesado de privata ekonomio. Oni permesis ankaŭ la fremdan investadon en Sovetunio, kio povas esti komprenebla se tio estus nura provizora dispozicio, sed la eniro en la novan vojon, al kiu oni asignis la nomon je “Perestrojko”, havis jam dekomence aspekton je neinversigebleco kaj kapitulaco. Saman kapitulacan teniĝon havis Gorbaĉov en la politikaj internaciaj rilatoj. Li intervidiĝis plurfoje kun Reagan kaj la fina rezulto de iliaj interakordoj estis agnoski fare de Sovetunio la militistan superecon de Usono. Sovetunio oficiale deklaris ke ĝi ne plu intervenos en la internajn aferojn de siaj aliancanoj. La sovetaj trupoj retiriĝis el Afganio en februaro de 1989, la berlina murego falis en novembro de tiu jaro, la 3-an de decembro Gorbaĉov kaj la nova usona prezidento George Bush deklaris finiĝinta la Malvarman Militon.

Surprizas la rapideco de la sinsekvo da faroj kiuj signis la disfalon de la socialista bloko. La militista supereco de Usono ne povis esti tiel decida fakto de tiu procezo. Fakte, estis nenia militista agreso al Sovetunio, kaj tra milita vojo estus tro longa, malcila aŭ eĉ neebla la okazigo de tiu ŝanĝo. Estis necesa la interna kompliceco de la rusiaj gvidantoj. La entreprenitaj politikaj ŝanĝoj estis laŭplaĉe de Gorbaĉov kaj ĉi ties socialdemokrata registaro. Tiu soveta regantaro en difinita momento eĉ eksplicitis sian intencon meti finon al la komunista karaktero de la reĝimo de Soveta Unio. Gorbaĉov sin klare deklaris socialdemokrato kaj menciis la eblecon ŝanĝi la nomon de la soveta Komunista Partio. Laŭ li, la historiaj diferencoj inter socialistoj kaj komunistoj estis kadukintaj, kaj la socialismo kaj la merkato ne nur ne estas malkongruaj, sed estas eĉ “nedisigeblaj”. Ne mankis en la partio sinceraj komunistoj kiuj kontestis tian kapitalismfavoran poziciiĝon, sed tio utilis nur por ke ili estu punitaj, paradokse, de la sama diktatoreca povaparato kiu estis kreita ĝuste por defendi la komunismon.

La tiama situacio ebligis ke en 1989 krizu la soveta sistemo de aliancoj. Sen la rusia militista apogo, la komunistaj lideroj de Orienta Eŭropo perdis sian povon. La kontraŭkomunistaj fortoj ĝuis krome la helpon de Usono, Britio kaj aliaj kapitalistaj landoj. Polujo kaj Hungario estis la unuaj kie oni komencis negoci la organizon de balotado en kiu libere povus konkuri ĉiujn ajn politikaj fortoj. En Ĉeĥoslovakio kaj Orienta Germanio la amasaj popolaj mobilizoj faligis la komunistajn reĝimojn. En 1990 efektiviĝis la germana reunuiĝo. Falis ankaŭ la reĝimoj de Bulgario kaj Rumanio; ĉi lasta estis la sola en kiu okazis sango-elversigo. Du jarojn poste falis ankaŭ la komunista reĝimo de Jugoslavio; la imperiismo intrigis ankaŭ tie kaj sukcesis ke la diversaj naciecoj de la lando entreprenu disigon el la jugoslavia ŝtato. Tiam tiu “neŭtrala” lando jam ne utilis al la imperiista strategio kaj povis esti delasita.

Ene de Soveta Unio, la okazintaj politikaj ŝanĝoj metis finon al la ligiloj de la diversaj respublikoj kun Rusio. La interna kriza situacio kaj la intrigoj de la agentejoj de la imperiismo provokis renaskiĝon de la naciaj sentoj; kelkaj respublikoj proklamis aŭtonomecon rilate al la centralisma povo de Moskvo. En februaro de 1990,

la Komunista Partio de Sovetunio devis cedi la centralistan monopolon de la povo. La baltaj respublikoj proklamis sian totalan sendependiĝon. Ĉio-ĉi kaj la fakto ke, krome, la ekonomia situacio ne pliboniĝis, finruinigis la prestiĝon de Gorbaĉov ene de sia propra lando, kvankam, male, en la internacia tereno li ĝuis tre grandan famon; li ricevis Nobel-Premion pri Paco en 1990 kaj aliajn honorajn distingojn kiel la Premio Princo-de-Asturio kiun oni aljuĝas en nia regiono. Sed en Rusujo, la malkontento ekzistanta en la kom-partio kun la politiko de Gorbaĉov konkretiĝis en puĉo-cela komploto, kiun oni entreprenis en aŭgusto de 1991. La intenco estis tro malfrua por savi la oldan komunistan ordon kaj tro frua por establi novan. La puĉo fiaskis; estis ia popola reago kontraŭ la operacio, sed, ĉefe, la armeo ne konsentis apogi ĝin. La reago signifis ke ne nur ne saviĝis la komunista reĝimo sed ankaŭ estis nenia ebleco por la socialdemokratio kiun peris Gorbaĉov. Fakte, de tiam, la politika povo de tiu ulo malaperis kiam la 25-an de decembro de tiu jaro dissolviĝis la Soveta Unio kaj ĉiuj ĝiaj komponaĵoj restis kiel apartaj landoj. En iuj el tiuj respublikoj, kaj ĉefe en Rusio, la povo, kiel dirite, eĉ ne estis socialdemokrata, sed liberala. La ĉefa lidero de la nova situacio estis Jelcin. Por la internacia kapitalismo tiu ulo estis prefera ol Gorbaĉov. La kapitalismo estis restarigita en Rusujo 74 jarojn post la Revolucio liderita de Lenino. Estis nova fiasko de la idealo de la homaro, do fiasko de la homaro mem. Sufiĉas trastudi la 26-jaran etapon pasintan de tiam ĝis hodiaŭ, kion ni faros per la ĉefa ĉapitro, por konstati ke nia malfeliĉa homa specio refalis en sian kutiman senesperan staton de milito, malegaleco, ekspluatado, ambicio, egoismo, perforto…

Notindas ke estis iu diferenco inter la politika ŝanĝo en Rusujo kaj tiu okazinta en la satelitaj landoj kaj en iuj ekssovetaj respublikoj. En ĉi lastaj la falo de la komunistaj reĝimoj signifis ankaŭ la falo, foje ankaŭ la morto aŭ enkarcerigo, de la iamaj komunistaj lideroj. Tamen en Rusio, kvankam ankaŭ ĉi tie estis balotoj libere malfermitaj al ĉiuj partioj, la povaparato restis kontrolita de homoj kiuj jam havis tiun kontrolon dum la soveta epoko. Jelcin kaj lia subulo, Putin, nuntempa reganto, faris sian politikan karieron kiel membroj de la Komunista Partio de Sovetunio. Oni povas diri ke ili neniam perdis, kaj eĉ pligrandigis, sian kontrolon de la povaparato en Rusujo. Sed nuntempe tiutipaj uloj efektivigas sian politikan povon ene de kapitalistaj strukturoj. Por ke tio okazu estis necese ke la komunista partieco de multaj komunistaj partianoj ne estis sincera teniĝo. En jaroj 1990 kaj 1991 multegaj membroj de la Komunista Partio de Sovetunio forlasis la partion por aliĝi al aliaj politikaj fortoj. Kaj ĉefe, la landa loĝantaro, la senpartiaj amasoj, ŝajne ne abomenis pri la entreprenitaj ŝanĝoj kaj ne mankis simpation al tiuj ŝanĝoj inter ampleksaj popolaj sektoroj. En la unua ĉapitro de ĉi raporto ni atentigis pri la simileco de tiu procezo kun tiu priskribita de la biblia libro de la Eliro, kiam la izraelidoj forlasintaj Egiptujon, emis reveni al la “Domo de la Sklaveco” kiam la tradezertaj malfacilaĵoj igis ilin nostalgii la vivkondiĉojn de la servuteco. En tiu teksto ni jam indikis ke kvankam tiu raporto de la biblia Eliro ne rakontas verajn historiajn farojn, tamen ĝi respegulas realan skemon de la homa historio, de la ŝanceliĝanta konduto de la popolaj amasoj inter entuziasmaj, revoluciaj, esprimoj de espero, kaj hontigaj rezignoj de la idealo. Tio estas, ofte la amasoj kiuj devas elekti inter Kristo kaj Barabas, elektas ĉi-lastan.

Se la kulmino de la afero estis iome paradoksa en Sovetunio, la rezulto de la procezo estis multe pli stranga en Ĉinio. Koincide kun la soveta Perestrojko, en Ĉinio la kontraŭkomunistaj fortoj travivis esperon meti finon al la socialista ekonomio por entrepreni kapitalistan vojon. Ĉi-kaze la iniciatoj por la ŝanĝo venis deekstere de la partio, konkrete de grandparto el la studenta junularo. Dum multaj semajnoj en la printempo de 1989 ili manifestiĝis en Pekino, en la fama Placo de ***Tian-An-Men***. En Ĉinio jam oni estis entreprenintе iujn ekonomiajn reformojn en la linio de la iama **NEP** de Sovetio fine de la epoko de Lenino**,** t. e., iomgrada merkat-ekonomio. Tiutipaj reformoj nepre generas inflacion kaj senlaborecon. Ŝajnas ke inter la manifestaciantoj de ***Tian-An-Men*** estis iuj laboristoj malkontentaj kun tiu procezo. Sed plejparte el la malkontentoj estis gestudentoj kiuj taksis nesufiĉaj la entreprenitajn ŝanĝojn kaj emis al pli drastajn paŝojn direkte al la merkata ekonomio. La liturgio de la manifestacioj estis similaj al tiuj de la socialistaj landoj de Eŭropo: oni postuladis liberecon kaj demokration sed la interna ideo de la plendado celis la likvidon de la komunista reĝimo iam starigita de Máo-Zédōng (forpasinta en la jaro 1976). Dum tiuj semajnoj la regantoj de Ĉinio ne sciis kiamaniere reagi antaŭ tio kio estis okazante. Meze de monato majo vizitis Pekinon Gorbaĉov kaj intervidiĝis kun la ĉinaj regantoj. Li konsilis al ĉi tiuj entrepreni procezon similan al tiu kiu tiam estis okazante en iuj socialistaj landoj de Orienta Eŭropo, t. e. interakordi kun prestiĝaj figuroj de la kontest-movado pacajn formulojn de transiro al nekomunista socio. Sed en ***Tian-An-Men*** ne ekzistis tiaj prestiĝaj figuroj. Krom la jam indikitaj kontraŭdiroj inter la manifestaciantoj, al la gestudentoj mankis matureco por entrepreni tian negocadon. Estis inter ili multaj ambiciuloj sed neniu prestiĝa persona figuro kapabla reprezenti plejparton el ili. Krome la ampleksaj amasoj de la ĉina socio restis silentaj antaŭ la spektaklo kaj ne sin flankenmetis apud la kontestantojn kaj ankaŭ ne apud la registaro. Oni povas diri ke dum tiuj tagoj la povo de la lando estis surtere, je la dispono de la aŭdaculoj kiuj kuraĝus preni ĝin. La kom-partiaj regantoj profitis la okazon ke la armeo ankoraŭ obeis ilin kaj entreprenis perfortan sufokadon de la manifestaciantaj studentoj. Okazis masakrado: eble pli ol milo da mortintoj kaj 10-milo da vunditoj. La ĉina loĝantaro restis pasive antaŭ la eventoj; same estus okazinte se la armeo estus decidinte apogi la manifestaciantojn kaj masakri la kompartianojn. La kapitalista mondo unue plendis pro la masakro sed tuj silentis pri la afero kiam oni konstatis ke la komunistaj regantoj entreprenis merkatan ekonomion tiel novliberalan kiel tiu de ĉiuj kapitalistaj landoj, situacio kiu daŭras ĝis nuntempe.



# Ĉu la fino de la historio?

## Eltirante instruon

La homoj de la 20-a jarcento, ĉefe en Europo kaj aliaj terzonoj de la alte industriigita mondo, travivis sensacion de historia optimismo laŭsence ke ili estis certaj ke ĉiu nova generacio ĝuus pli grandan komforton kaj viv-kvaliton ol la antaŭa generacio. Tiele estis okazante ekde antaŭ proksimume unu jarcento. Ebligis tion la materia progreso kiun alportis la industria revolucio. Jes, dum tiu jarcenta periodo ne mankis konfliktoj, perforto, ras-diskriminacio, (civil)militoj, diverstipaj puĉoj, ekspluatado... kaj krome estis la du mond-militoj, kiuj tiom multe damaĝis Eŭropon, sed en kiuj intervenis ankaŭ Usono, Japanio kaj aliaj ne-eŭropaj landoj. Tamen tio ne efikis kontraŭ la menciita historia optimismo kiun la popoloj spertis ĉar la fakto mem ke en tiuj militoj plu kaj plu aperadis novaj armiloj pli kaj pli kapablaj, kaj ke la postmilita rekuperiĝo estis tre rapida, estis klaraj signoj de la senĉesa progresado de la scienco kaj la tekniko, kaj la popoloj bazadis sian optimismon pri la estonteco ĝuste sur tiu scienca kaj teknika progresado. Oni esperis ke, fine, la industria kaj scienca progreso metus finon al ĉiu interhoma konflikto kaj alportos bonstaton por la tuta homaro. En la jardekoj post 1960 kaj 1970 eksplicite esprimis tiun esperon gravaj filozofoj kaj teoriistoj kaj marksistaj kaj ne-marksistaj. Fakte, tiu ideo enestis, eĉ se ne tute konscie, en la gestudentaj revoluciaj movadoj aperinte diversloke en la mondo post ─kaj sekve de─ la eventoj de Majo-1968 en Parizo. Iamaniere, la politika evoluo entreprenita tiujare mem en Ĉeĥoslovakio estis rezulto de la sama kaŭzo: ankaŭ en la socialista bloko la homoj estis influitaj de la penso ke la materia progreso alportita de la ŝanĝoj en la produktad-procezo metus finon al la baza interklasa kontraŭdiro ĝis tiam reginta en la mondo.

Kompreneble, la situacio estis malsama en la malevoluintaj landoj de la tiam nomata Tria Mondo. Sed ankaŭ tie oni perceptadis, ĉefe post la Dua MondMilito, la ŝanĝojn de la tempoj. Okazis la senkoloniigado, kaj la novaj landoj kiuj volis liberiĝi el la premo de la eks-metropoloj ĝuis ioman apogon de Sovetunio, Ĉinio kaj aliaj socialistaj landoj. Krome estis la notinda fakto ke la plibonigo kiun la scienco alportis en la tereno de la sano, la prevento kaj batalo kontraŭ la epidemioj, estis aplikita en tiuj landoj ne malpli ol en la riĉaj terzonoj de la planedo kiel atestas la fakto ke la loĝantaro kreskis simile en ĉiuj terzonoj.

Nu, oni povas diri ke unuafoje en la historio oni kontemplis optimisme la estontecon de la homaro. Kaj, kiel dirite, tio eblis dank' al la progreso de la civilizacio kiun signifis la industria revolucio kaj ties sekvo de la scienc-teknika revolucio. Sen tiu objektiva faktoro la homaj socioj ne estus povintaj eliri el la fermita cirklo de senfrukta kaj senevolua klasbatalado kaj alitipa intermilitado. Sed se nia homa specio komencis vidi lumon fone de la tunelo estis ne nur dank' al tiu objektiva faktoro sed ankaŭ dank' al la subjektiva faktoro kiun konstituis la socialajn revoluciojn okazintaj laŭlonge de la lasta jarcento: la Rusia Revolucio de 1917 kaj ties sekvoj de la Ĉinia Revolucio, la disvastiĝo de la Socialismo al la orient-eŭropaj landoj, la Kuba Revolucio, la socialista venko en Vietnamio… Krom la socialaj ŝanĝoj efektivigitaj en tiuj landoj, estis ankaŭ la efiko de tiuj eventoj sur la landoj de la kapitalista socio. Konkrete, la komfort-socio kiu karakterigis la riĉajn landojn de la t. n. Unua Mondo. Ni jam klarigis ke tiu konfort-socio estis kapitalisma strategio celanta senaktivigi la historian subjekton de la revolucio, la proletaron. Sen la objektiva faktoro de la materia progreso, la subjektivaj fortoj ne kapablus antaŭenmarŝi, kiel pruvis pluraj jarmiloj de la sociala stagniĝo. Sed per la sola materia progreso, sen la subjektiva volo de la ekspluatatoj, ankaŭ ne eblus ĉi ties liberiĝo. Se la unua koncepto estis bona asimilita de la amasoj, la dua, t. e. la graveco de la subjektivaj faktoroj, estis komprenita nur de la superregantaj klasoj, la ekspluatantoj de la popoloj. Tial la ŝanĝoj okazintaj fine de la 20-a jarcento, la faligo de la komunistaj reĝimoj, estis celo kiun longatempe klopodis atingi la ĉefmastroj de la imperiisma sistemo. Al la atingo de tiu celo oni destinis enormajn monrimedojn, grandajn armilar-elspezojn, agentejojn kiel la CIA kaj ĉiutipajn spertulojn pri sociaj sciencoj: propagando, eduk-sistemo, informado... Oni devas agnoski ke la mastroj de la kapitalista povo sciis ruze profiti la objektivan superecon de ĉi tiu sistemo en la ekonomia tereno rilate al la socialista bloko, kaj saĝe kombini ĝin kun politiko de agado sur menso de la amasoj de ambaŭ blokoj. Se la politiko de ruinigado de la socialista sistemo estis tre lerte realigata procezo, ne malpli saĝa estis la maniero laŭ kiu oni konkretigis/as la eltiradon de profito post la disfalo de la socialista bloko. Ni vidos kiamaniere oni estis –kaj estas– realigante tiun procezon de kapitalisma refirmiĝo.

La efika demarŝado de siaj interesoj, fare de la imperiismo, tre kontrastis kun la mallerteco de la komunistaj reĝimoj defendi sin kaj disvastigi la komunistan idearon kadre de la tutmonda klasbatalo dum la Malvarma Milito, precipe dum ĉi ties lastaj jardekoj. Klaraj ekzemploj de fuŝa politiko estis, en Ĉinio, la kampanjoj de la t. n. ***Saltego Antaŭen*** kaj ***Kultura Revolucio***. Ambaŭkaze temis pri politika volontecismo, t. e. intenco anstataŭi la mankon je objektivaj kondiĉoj per senbaza subjektiva entuziasmo. Ankaŭ en la kazo de la komunistaj reĝimoj sub soveta influo, oni povas konkludi ke, same kiel okazis al antaŭaj ĉefroluloj de gravaj historiaj taskoj, ili ne estis pretaj por ties realigado; ili ne estis indaj je la alta misio kontribui al la disvastigo de la Komunismo tra la tuta mondo kaj meti indan finon al la plurmiljara klasbatalo favore al la sklavoj de malsat'. Trastudante la strategion de la kapitalistaj fortoj, la sociekonomian planon por senaktivigi la proletan klason de la burĝa socio, la propagandon adresitan al la popolamasoj de tiu bloko, kaj tiun adresitan al la popoloj de la socialista bloko, oni konstatas ke la afero estis realigata de veraj spertuloj pri sociologio, personoj kiuj bone sciis disvolvi la aferon kiun ili prenis en siajn manojn. Male, la koncernaj spertuloj de la socialista tendaro tre fuŝe plenumadis sian funkcion. Sufiĉas tralegi la materialon de ili verkitan destine al la ideologia edukado de la amasoj de la socialistaj landoj kaj tiun destinitan al la propagando favore al la komunismo en la kapitalista mondo por kompreni ke la teoriistoj verkintaj tiun materialon neniam estis komunistoj aŭ estis ĉesintaj kredi je la komunista idealo. Ni plu trastudos tiun fenomenon en la fina parto de ĉi tiu ĉapitro, kie ni eksponos la instruon eltiritan el la tuta procezo.

Nu, male ol la amasoj, kiujn oni trompis pluafoje en la historio, la mastroj de la sistemo bone komprenis la gravecon de la okazinta elpaŝo. Ili difinis ĝin kiel "**La Fino de la Historio**". Verdire, temis pri la fino de la projekto entreprenita de la proletaro en la jaro 1917. La daŭro de la Pariza Komunumo estis 70 tagoj, kaj tiu de la Rusa Revolucio estis 70 jarojn. La kapitalistoj sendube perceptis kiom multe komplikliĝis la restarigo kaj konservado de sia klasa superregado. Nun ni volas aldoni ke post la disfalo de la komunistaj reĝimoj, kio signis la fiaskon de la revolucia elpaŝo de 1917 kaj malembarasis al la kapitalismo la vojon por la reakiro de la cedita tereno dum la epoko de la malvarma milito, la kapitalisma agad-metodo daŭre estis saĝa kaj oni ne alkuris likvidi la rajtojn koncesiitajn al la laboristklaso kadre de la strategio de la Komfort-Socio. Estas konata la fablo de la bolitaj ranoj, per kiu oni eksplikas ke eblas ke la homoj adaptiĝu al malfavoraj situacioj se oni enkondukas ilin en ĉi tiujn po-grade, paŝeton-post-paŝeton. Se oni metas ranojn en bolantan akvon, ili tuj saltas for, sed se oni metas ilin en malvarman akvon kaj oni varmigas ĉi tiun malrapide ili eltenas la preskaŭ neperceptitan ŝanĝadon kaj restas senmove ĝismorte. Tiun metodon uzis la kapitalismo por meti finon al la laboristaj konkeraĵoj de preskaŭ unu jarcento. Komence oni faris ian, ne grandan, rabaton en la monkompenso kiun oni devis fari al la laboristoj kiuj perdis sian laborlokon. Post kelkaj jaroj oni dekretis novan malaltigon de tiu kompenso kaj laŭlonge de unu generacio, post kelkaj el tiaj kompens-rabatoj oni alvenas al la laŭleĝa libera ekslaborigo. Krome, dume kaj same laŭgrade, oni malgrandigis la skalon de la salajroj. En la tutmonda situacio post la fino de la malvarma milito, iompostiom la laboristaro perdis mobiliz-kapablon kaj la sindikatoj negocad-povon. Rimarkindas ke ankaŭ estis/as malboniĝo rilate al la labor-tago. Multaj laboristoj devas labori pli ol la iam laŭleĝajn ok horojn sen ia ajn kompenso, kaj plejofte la novaj labor-kontraktoj estas eventualaj, sen fiksa daŭro kaj krome plejparte el ili estas po kvar aŭ du horoj ĉiutage. En la ekonomia krizo kiu frapis la kapitalistan mondon dum la lastaj jaroj, multaj laboristoj perdis sian laborpostenon sen ebleco trovi novan, kaj la junuloj kiuj komencas labori devas akcepti la novajn, malfavorajn, kondiĉojn. Jam oni anoncas ke tiuj laboristoj de la novaj generacioj ne ĝuos la ĝistiaman pension de la emerituloj; ili mem devos kontrakti ĉe privataj asekur-agentejoj tiun socialan servon ĉar iompostiom malaperas/os la koncerna interveno de la ŝtato. Evidentas ke multaj el tiuj novaj laborist(in)oj ne povos alfronti tiun kotizadon, ĉu ŝtatan aŭ privatan, ĉar siaj salajroj estas malaltaj kaj eventualaj. Menciindas ankaŭ ke nuntempe oni stimulas, aŭ fakte altrudas al multaj novaj metiistoj ke ili laboru kiel aŭtonomaj profesiuloj, ne kiel dungitaj salajruloj. Temas pri alia elpaŝo de la kapitalistoj en sia klasbatalo kontraŭ la interesoj de la laboristoj. Laŭ tiu skemo, al multaj kapitalistoj ne estas necese dungi laboristojn al kiuj ili devos pagi salajron, asekuri, zorgi pri ilia sano en la laborejo… de nun, anstataŭ krei entreprenejojn kun tiuj laŭleĝaj devoj, ili kreas agentejojn kiuj kontraktas aŭtonomajn metiistojn kaj ĉi tiuj mem devas zorgi pri siaj interesoj je asekurado kaj simile. Kompreneble, la agentejoj libere povas kontrakti por ĉiu konkreta laboraĵo la aŭtonom-laboristojn plej konvenajn al ili, sen ia ajn devo pri la kosto kaj la daŭro de la kontraktata laboro. En tiu kunteksto estas nenia ajn rolo por asocioj kiel la sindikatoj de la laboristoj.

Simila degradiĝo de la socialaj rajtoj de la laboristoj kaj malaltaj klasoj de la socio estiĝis/as/os iompostiom en aliaj terenoj kiel la sanec-servo, la eduk-sistemo kaj la juĝ-sistemo. Oni estas likvidante la ŝtatan sanec-servon favore al la privataj klinikoj kaj hospitaloj. La sociala publika sanec-servo estis alia laborista konkeraĵo de la epoko de la komfort-socio. Tiam ĝi estis necesa al la superreganta klaso por ke ĉi tiu argumentu antaŭ la laboristaro ke tiutipaj socialaj konkeraĵoj eblas ankaŭ en la kapitalista socio kaj ne estas necesaj socialistaj revolucioj por atingi tiajn rajtojn. Sed malaperinte la komunistaj reĝimoj kaj la revolucia danĝero, la venkintoj de la malvarma milito pretiĝis, senhaste sed persiste, eltiri la profiton de tiu venko reakirante la terenon kiun la kapitalista klaso perdis aŭ devis taktike cedi dum la ekzistado de la komunistaj reĝimoj. En la eduksistemo oni faris/as reformojn kiuj kontribuas plimalfaciligi la aliron de la popoldevenaj gestudentoj al la universitataj studoj kaj pligrandigi la diferencon inter tiuj gestudentoj de la malaltaj klasoj de la socio

kaj tiuj de la riĉaj sociklasoj. Sama interklasa diferenco pligrandiĝas ankaŭ en kio rilatas al la juĝsistemo. La plialtiĝo de la kosto de la pled-procesoj igas ke por la homoj de la plebaj klasoj fariĝas malfacile aŭ neeble sin turni al la leĝoj siafavore. Cetere kiam oni aplikas la leĝon kontraŭ ili, ĉi tiu ĉiam estas pli rigora ol kontraŭ la riĉularo. Pri tio estas abundaj ekzemploj en Hispanio. Ĉio dirite pri la evoluo de la situacio post 1990 baziĝas sur tio kion ni spertas en nia lando sed, pli malpli grade, same estis/as okazante en ĉiuj ceteraj landoj de la disvolviĝinta kapitalista mondo. Ĉie la burĝklaso sin dediĉas eltiri la profiton de la venko kiun ĝi atingis sur la proletaro, sed ĉie faras tion lante, senhaste, por ke la ranoj ne tuj eksaltu for, t. e. por ke la amasoj, sen historia memoro, ne perceptu la ŝanĝon kaj reagu.

Ĉie… sed nur en la alte industriiĝintaj landoj, ĉar en la malevoluinta mondo ne estas necesa tia delikateco. La landoj de la Tria Mondo jam dekomence vidis la veran vizaĝon de la venkanta "demokratio" pri kiu emfazas la kapitalismo, kaj spertis la veran naturon de la ŝanĝo de la monda situacio. En la jardeko post 1990 okazis en multaj lokoj en la mondo militoj kun rekta interveno de la imperiismo aŭ kiel sekvo de ĉi ties intrigado:

- 1990-1991: Golfa Milito.
- 1991-2002: Civilmilito en Algerio.
- 1991-2001: Militoj en Jugoslavio.
- 1991-2002: Civilmilito en Sieraleono.
- 1991: Dektaga milito en Slavonio.
- 1991-1995: Kroata Milito de Sendependiĝo.
- 1992-1995: Bosnia Milito.
- 1999: Kosova Milito.
- 1994: Genocido en Ruando.
- 1994-2002: Genocido en Kongolando.
- 1995: Milito de Cenepo (Inter Peruo kaj Ekvatoro).
- 1994-1996: Unua Ĉeĉenia Milito.
- 1996-1997: Unua Milito en Kongolando.
- 1996-2006: Enlanda Milito en Nepalo.
- 1998-2003: Dua Milito en Kongolando.
- 1999-2006: Konflikto de Ituro.
- 1998-2000: Milito inter Etiopio kaj Eritreo.
- 1999-2006: Dua Ĉeĉenia Milito.

La ĝis nun sekvintaj jardekoj ne estis pli pacaj, sed tute male. La militaj konfliktoj iĝis pli kaj pli oftaj, kaj pli kaj pli sangaj. La implikiĝo en ili de Usono kaj aliaj kapitalistaj landoj estis nepra komponaĵo de preskaŭ ĉiuj. Kompreneble, ne mankis lokaj kialoj, interetnaj kontraŭdiroj en la kaŭzoj de la militoj, sed, rekte nerekte, ĉeestis ankaŭ la interesoj de la imperiismaj potencoj, eĉ se nur por la vendado de armiloj al la batalantoj, sed plej ofte en rilato kun riĉfontoj aŭ strategia situo de la lokoj kie oni militis.

Sed ni volas ne forlasi tiun lastan jardekon de la 20-a jarcento sen atenti pri tio kio povas esti konsiderata la epilogo de la krizo de la komunismo en Rusujo: la konstitucia krizo de 1993, tio estas, la eventoj okazintaj en tiu lando ekde la 21-a de septembro kaj la 5-a de oktobro de tiu jaro. Per la antaŭa ĉapitro ni priskribis la ruiniĝon kaj disfalon de la komunista reĝimo, de la soveta ŝtato kaj de la socialista bloko. Konkrete en Rusio, fiaskis la Perestrojko de Gorbaĉovo, kaj tio kio anstataŭis la komunistan regadon en tiu lando ne estis la socialdemokratio celita de tiu ulo sed la liberalismo kies ĉefa politika figuro estis Boris Jelcin. Ĉi tiu estis pli favora ol Gorbaĉovo al politikaj ŝanĝoj kaj priekonomiaj reformoj en la linio de la restarigo de la kapitalismo en Rusio. Jam dekomence oni aplikis dispoziciojn celantajn likvidi la sociekonomiajn strukturojn kreitajn de la komunista reĝimo, oni privatigis la publikajn entreprenojn kaj la novaj mastroj haste volis eltiri kiel eble plej grandan gajnon laŭ la kapitalisma maniero. Dum la riĉaĵoj de la ŝtato konstruitaj kaj akumulitaj dumlonge dank' al la penoj de milionoj da rusoj estis transdonitaj al malmultaj potenculoj, la popolo malsatis, la vivkvalito de la civitanoj, la socialaj servoj de la saneco kaj la edukado ege malboniĝis, la prezoj plialtiĝis tre rapide, aperis kaj kreskis senlaboreco, malabundis la nutraĵoj kaj la hejtaĵoj… Paradokse, tiuj ŝanĝoj rezulte de la kolapso de la socialista sistemo pli perceptiĝis tie, en la geografia areo kie tiu sistemo estis realiĝinta, ol en la kapitalista mondo kie oni saĝe entreprenis politikon de ne tro drasta ŝanĝado. Tio okazigis ke la popola apogo kiun la reformistoj ĝuis komence de la procezo baldaŭ elĉerpiĝis. La popolamasoj de Rusio kaj ceteraj socialistaj landoj estis pensinte ke la sociala sekureco (plenlaboreco, publikaj socialaj servoj…) estis nerenversigeblaj atingaĵoj, kaj ke sufiĉus nur ŝanĝi la politikan regimon por aliri al la konsumkapablo pri kiu emfazis la kapitalista propagando. Laŭlonge de la jaro 1992, kiam la popolo komprenis ke oni trompis ĝin, pliintensiĝis la opozicio al la registaro de Jelcin. La opozicio konkretiĝis en la Parlamento. En tiu asembleo la komunistoj ne havis pli ol 7 elcento el la deputitoj sed kun aliaj fortoj de maldekstraro oni atingis 53 elcento. Tiu parlamenta plimulto sin metis kontraŭ tiuj reformoj faritaj de Jelcin kaj tiuj aliaj kiujn li pretiĝis fari. Plejmulte el la popolo poziciiĝis kun la parlamenta maldekstraro. En septembro de 1993 Jelcin postulis la dissolvon de la parlamento cele lasi al li liberan vojon por pludaŭrigi la ekonomiajn reformojn por rapida transiro al la ekonomio de libera merkato. La Konstitucia Tribunalo sentencis ke oni malobservis la Konstitucion, kaj la parlamento elpostenigis Jelcinon kiel Prezidento. Ĉi tiu daŭrigis sian puĉan teniĝon kaj eloficigis ĉiujn ministrojn kiuj estis poziciiĝintaj favore al la Parlamento. Inter la 21-a kaj la 24-a de septembro okazis popola mobilizo favora al la Parlamento. Estis amasaj manifestacioj en Moskvo, kaj pli ol kvardek-mil el ili plendis kontraŭ Jelcin antaŭ ĉi ties rezidejo. Multaj civitanoj ĉirkaŭis la parlamentejon por ĝin defendi. Diversloke en Rusujo estis strikoj kontraŭ Jelcin. La 28-an de septembro komenciĝis sanga interfrontiĝo de la manifestaciantoj kontraŭ la polico, kiu sin metis favore al la Prezidento. Ankaŭ la armeo sin metis sub la obeo al la puĉisto Jelcin. La 1-an de oktobro oni deplojis trupojn ĉirkaŭ la prezidenta palaco por ĝin ŝirmi kontraŭ la manifestaciantoj. En la parlamenta sidejo proksimume 600 civitanoj enfermiĝis kun la parlamentanoj por kontraŭrezisti la puĉistan forton. La 2-a kaj 3-a de oktobro pliintensiĝis la popola rezisto; oni konstruis ba-

rikadojn en la moskvaj stratoj por bari la vojon al la armitaj fortoj. Pludaŭris la koncentriĝo de la civitanoj antaŭ la parlamentejo spite al la polica deplojo kaj estis kelkaj mortintoj. La 4-an de oktobro Jelcin deklaras la esceptstaton en Moskvo, kaj vespere de tiu tago la manifestaciantoj okupas la urbodomon kaj la centron de de televida elsendo. En la batalo inter la manifestaciantoj kaj la soldatoj mortis kelkcento da personoj. La armeo sukcesis kontroli la situacion en la stratoj kaj entreprenis la alsalton al la parlamentejo. Post bombardi ĉi tiun konstruaĵon, la infanteriaj trupoj eniris en ĝin masakrante ĉi ties okupantojn, kaj parlamentanojn kaj civitanojn; pli ol milo da civitanoj mortis rezulte de tiu operacio, plejmulte el ili ene de la parlamentejo. Por tiu eksterleĝa agado, Jelcin ĝuis la senkondiĉan apogon de Usono kaj ceteraj kapitalistaj landoj. Estis klare ke en tiu konflikto oni estis pridecidante klasbatalajn interesojn. Tiu toleremo, kaj eĉ apogo, de la kapitalismo al la politiko de la registaro de Jelcin tre kontrastas kun la nuntempa teniĝo de tiu kapitalista socio al la regantaro de Venezuelo. Tiu malsama kriterio rilate al la pritakso de la demokratieco de la ŝtatoj estas komprenebla se oni ne forgesas ke la ĉefa kontraŭdiro pri kiu poziciiĝas la burĝaj povoj estas ne la demokratio mem sed la klasbatalo, la ekonomiaj interesoj. La politiko de Jelcin, eĉ se perforta kaj eksterleĝa, tamen ĝi estis favora al la tutmonda kapitalismo, do ĝi estis rigardata kun simpatio far la ekonomiaj potencoj de la mondo. Sed la politiko de la Bolivarista regantaro de Venezuelo, eĉ se ĝi ne estas komparebla al tiu de Jelcin, tamen ĝi estas kontraŭkapitalisma, do, ĝi devas suferi la diplomatiajn, politikan kaj presaran atakojn de la tuta kapitalista mondo.

Nu, estas klare ke, spit' al ĉio, la homa historio pludaŭras post la **Fino de la Historio**. Kaj plu daŭras la klasbatalo tra la historio. Alia fronto kien la imperiismo devis alkuri por restarigi la situacion siafavore estis LatinAmeriko. Malboniĝis la situacio de Kubo tial ke malaperis la soveta helpo same kiel malaperis Sovetunio mem. Sed Usono ne entreprenis militan operación por ŝaĝi la situacion en la insulo siafavore, kiel faris en aliaj lokoj en LatinAmeriko, tial ke oni kalkulis ke tia operacio, pro la preteco de la kubanoj sin defendi, havus koston de ne malpli ol 50.000 usonaj mortintoj, kaj tiu potenco, post sia fiasko en Vjetnamio, ne povus elteni similan rezulton en Ameriko. Sed abundis alitipaj operacioj en la kontinento por plifirmigi la tiean influon de la de la superimperiista potenco. En Nikaragvo oni apogis gerilan agadon por malstabiligi la sandinistan reĝimon kaj fine starigi en tiu lando burĝan regantaron. La usona interveno en la politiko de la latinamerikaj landoj, kiu neniam estis ĉesinta dum la malvarma milito, post 1990 povis esti eĉ pli efika por la interesoj de la imperiismo. Usono komencis apliki en tiu terzono ekonomikan programon de privatigo de publikaj entreprenoj, malreguligo de la merkatoj kaj fleksebligo de la labor-merkato, t. e. saman recepton kiel tiuj aplikita en la alte industriigitaj landoj sed laŭ pli rapida ritmo. Estis ankaŭ murdado de sindikatistoj kaj sociaj aktivistoj en kelkaj iberoamerikaj landoj. En aliaj landoj de tiu kontinento, kiel Argentino kaj Brazilo, la reakciaj fortoj, kun usona apogo, perfortis la demokratian leĝecon por altrudi regantaron favoran al la burĝaro lakea de la imperiismo. Sed ĉar la klasbatalo persistas eĉ post la trumpetata **Fino de la Historio,** ne mankas kontraŭimperiisma rezisto de la popoloj de la regiono. En la jaro 2006, post 16-jara korupta kaj lakea politiko en Nikaragvo, la sandinistoj rehavis la povon en la lando. Ankaŭ en Bolivio kaj Venezuelo estas politikaj reĝimoj kiuj penas, laŭeble kaj en malfacilaj kondiĉoj, kontraŭrezisti la ekonomian premon de la transnacia kapitalismo. La registaroj de tiuj landoj ne estas komunistaj, kaj ne sin deklaras marksistaj kvankam ofte alprenas la titolon je revoluciaj. Verdire, ne ekzistas en tiuj lokoj socialistaj ekonomiaj strukturoj; eble ĉio, kion ili povas fari en la nunaj cirkonstancoj estas sin defendi el la meĥanismoj de la ĉiopova financa internacia kapitalo. La malfacilaĵoj rezultintaj de tiu neegala batalo estas speciale gravaj por la popolo de Venezuelo en la momento kiam oni verkas ĉi-liniojn, en monato aŭgusto-2017. Temante pri popola rezisto en IberoAmeriko post la fino de la malvarma milito, ni devas mencii la ribelon de la meksika regiono de Ĉiapas en 2007.

Ni vidis ke en IberoAmeriko, krom geriloj kaj revoluciaj movadoj de inspiro pli malpli marksisma, dum la malvarma milito estiĝis ankaŭ tiu ideologia movado nomata “Teologio de Liberigo” kiu kontraŭfrontis la kapitalistan ekspluatadon ekde religiaj pozicioj inspiritaj en la Evangelio kaj estiĝintaj subinflue de la 2-a Vatikana Koncilio. Ankaŭ por tiu movado la malapero de la influo de la socialista bloko reazultis fatala. Pliintensiĝis kontraŭ ĝi tiel la agado de la subprema aparato de la imperiismo kiel la atakoj far la Eklezio mem. Memorindas ke jam ekde 1978 gvidis la RomKatolikan Eklezion kiel papo la polo Karolo Vojtilo, sufiĉe reakcia persono. Al la religia kondamno fare de la oficiala gvidantaro de la Eklezio, aldoniĝis la sangaj atencoj fare de sbiroj de la imperiismo kontraŭ elstaraj figuroj kaj aktivuloj de la Teologio de Liberigo.

Alia terzono kie, dum la lastaj jardekoj, okazis grava kontraŭprogresista evoluo de la klasbatalo estis Ĉinio. Tiulande, laŭlonge de kelkaj jardekoj post 1950, oni atingis egan modernigon, potenciigon de la lando je tutmonda skalo, altiĝon de la statuso de la virinoj, plibonigon de la edukado kaj sanstato, universalan loĝadon kaj altigon de la vivespero de la loĝantaro, kies kvanto kreskis el 550 al 900 milionoj. Dum la kampanjo t. n. “Saltego Antaŭen” mortis pro malsato preskaŭ pli ol 60 milionoj da homoj, tamen dubindas ĉu sen tiu riska elpaŝo la rezulto ne estus eĉ pli damaĝa por la senindustria ĉina socio. Ĉiukaze la Komunista Partio de Ĉinio mem taksis kiel fiasko tiun kampanjon kaj entreprenis apartigi el la povo ties responsulon: Máo-Zédōng. Sed ĉi tiu riveliĝis tre lerta intriganto kaj sukcesis aranĝi, en la jaro 1966, puĉon interne de la kompartio, aŭ pli ĝuste mobilizis la junularon por kontraŭbatali, ekde komunistaj poziciojn, la komunistan gvidantaron. Rezulte de tiu movado, nomata “Kultura Revolucio”, Máo reakiris la plejsuperan povon en la

partio kaj en la lando kaj entreprenis procezon de rompado kun la tradicia kulturo de Ĉinio samtempe ke reago kontraŭ la kulturaj skemoj de la burĝa socio kaj ankaŭ tiuj de la soveta reĝimo. Tiutipan novaĵon oni povis subteni nur pere de tre intensa kampanjo de popola endoktrinigado, t. e. vekado de subjektiva sento por anstataŭi la objektivajn kondiĉojn kiuj mankis por la necesa salto antaŭen. En tiutipa kampanjo estis baza elemento la personkulto rilate al Máo. La ruĝa libro de liaj pensoj fariĝis kvazaŭ religia teksto, en kiu oni serĉis respondon por ĉiuj problemoj kaj situacioj. La lerneja kaj universitata instruado estis interrompita dum kvar jaroj dum oni redaktis novan instrumaterialon akorde kun la nova doktrino. En difinita momento, la mobilizitaj amasoj iĝis nekontroleblaj por la iniciatintoj de la movado, kaj Máo devis sin adresi al la armeo por restarigi la ordon. Máo oficiale deklaris finiĝinta la Kulturan Revolucion en 1969, sed ĝia aktiva fazo daŭris ĝis sia morto en 1976. En 1971 li devis alfronti la ribel-intencon de la armea gvidanto Lin Biao, unu el liaj ĉefaj apogintoj. Post la morto de Máo estis arestitaj la ĉefaj figuroj de la Kultura revolucio, la t. n. “Kvaropa Bando”. Fakte, de tiam ĉiuj okazintaj ŝanĝoj en la regado de la lando ne aliigis la politikan volon distanciĝi el la subjektivaj kampanjoj de la maŭismo. Oficiale, la figuro de Máp-Zédōng estas respektata kaj alte konsiderata kiel fondinto de la Ĉinia Popola Respubliko, sed oni faris severajn kritikojn de la eraroj de lia regado. Ni jam menciis ke en 1989, koincidante kun la krizo de la komunistaj reĝimoj de Orienta Eŭropo okazis en Ĉinio, konkrete en Pekino, studenta ribelo kiu tre similis al tiuj de la Kultura Revolucio 23 jarojn antaŭe, sed ĉi-kaze la inspiro de la movado estis klare kapitalism-favora. Paradokse, tiuj gejunuloj de la Placo de ***Tian-An-Men*** postuladis reformojn kiujn la politikaj regantoj de la lando jam estis entreprenintaj, kaj ankaŭ paradokse, tiu retroiro al la kapitalismo daŭre estas realigata senĉese ĝis nun fare de regantaro kiu daŭre sin difinas kiel komunista. Nun, en la jaro 2017, oni povas vidi ke en Ĉinio, same ol en la cetero de la mondo, kreskas la nombro da riĉuloj dum plejparto el la loĝantaro iĝas pli malriĉa. Estas en tiu lando ĉiuj eksteraj signoj de la kapitalismo, klasa malegaleco inter la civitanoj, kaj ne mankas ankaŭ ia, kreskanta, imperiisma ekonomia interveno de tiu lando en aliaj terzonoj de la planedo. Kaj ŝajnas ke ĉi-foje ne temas pri ia provizora politiko, kial la iama **NEP** de Sovetunio, sed definitiva, neinversigebla, enkotiĝo en la plej naŭzigajn aspektojn de la kapitalisma ekspluatado.

Tiu kazo de Ĉinio, kaj ankaŭ aliaj kiel tiu de Nord-Koreujo, kie politikaj reĝimoj kiuj ankoraŭ sin difinas kiel komunistaj ne prezentas bildon de kohereco kun la marksismo kaj la komunista idealo ĝenerale, estas alia esprimo de la fiasko de la komunista revo. Sed, ĉu signifas tio ke finiĝis la klasbatalo, kiel pretendas la teoristoj de la **Fino de la Historio?** Tute ne. Ni vidas ke post la fino de la malvarma milito la fantomo de la Komunismo daŭre hantas en la mondo kiel tekstas la fama Manifesto de Markso kaj Engelso. Se dum la malvarma milito la tuta politika propagando de la kapitalisma sistemo, ĉiutipaj produktaĵoj de ĝia ideologia aparato: presaro, filmoj, prelegoj, literaturaj verkoj, religiaj predikoj… kontribuis disvastigi la ideon de la komunista danĝero, post la fino de tiu periodo kaj, laŭteorie, la malapero de tiu danĝero, tiu sama ideologia aparato ne konsideras finita la kontraŭkomunistan batalon kaj ĝia nuna strebado celas enkonduki en la menson de la amasoj la ideon ke la komunismo estas nerealigebla utopio, ke la natura kaj normala stato de la socio estas la nun superreganta sistemo kun privata proprieteco de la produktad-rimedoj… Ja, la mastroj de la superreganta klaso trafe konscias ke la klasbatalo daŭras kaj ke ĝi devas atente kaj singarde zorgi pri la ideologia kontrolo de la popoloj se ili volas konservi tiun superregadon.

Sed la realo montras ke tiu sistemo ne meritas eterniĝi. La kapitalismo ne estas la solvo sed la problemo. La mizero de iuj terzonoj kontrastas kun la komforto de aliaj. La malegaleco inter la landoj kaj inter iuj klasoj kaj aliaj ene de ĉiu lando estas tre granda kaj eĉ pligrandiĝas senĉese. Krome la konkurado inter la ekonomiaj potencoj por la kontrolo de la nafto kaj aliaj strategiaj resursoj estigis kaj daŭre estigas militajn konfliktojn kiuj povas evolui al ĝenerala monda milito ec pli detrua ol la du antaŭaj. Rimarkendas ke por kaŝi la veran naturon de la interimperiismaj kontraŭdiroj kiuj nepre stariĝas en la internaciaj rilatoj oni estas prezentante ilin kiel “kontraŭfrontiĝo de civilizacioj”. Tre populariĝis tiu esprimo kaj la ideo kiun ĝi enportas, precipe post la 11-a de septembro de 2001 kiam la novjorkaj ĝemelturoj estis detruitaj per terorista atako far 19 araboj de Al-Kaida. Krome okazas ke egaj naftoresursoj en la mondo troviĝas en terzono kie situas la arabaj kaj aliaj muzulmanaj landoj. Tio faciligas la starigon de la alibio ke temas pri kontraŭfrontiĝo de civilizacioj. Tiun alibion profitas ne nur la imperiismaj potencoj por kaŝi siajn verajn celojn elkapti alies resursojn sed ankaŭ la mastroj de la dispreditaj landoj mem eble pro tio ke la koncernaj popoloj pli bone komprenas la naturon de la krucmilitaj agresoj ol tiu de mondskala klasbatalo. Ja, la araba vorto ***ĝiĥad*** elvokas la mezepokajn arabojn kiuj batalis kontraŭ la kruc-kavaliroj. Surbaze de tiu sento kontraŭ la eŭropa kristana civilizacio oni organizis la reziston de la muzulmanaj landoj kontraŭ la imperiismo de Okcidento kaj ankaŭ la projekton de nova Islama Ŝtato (ISIS) kiu celas rekonstrui la antikvan kalif-landon. Tiu politika procezo, kiu daŭras jam kelkajn jarojn, konkretiĝis/as en perfortaj militoj en la terzono kaj sangaj terorismaj atencoj en kelkaj urboj de Okcidento, precipe en Eŭropo.



Sed marksistoj ne povas lasi sin trompi pri la vera naturo de la konflikto. En la nuna tempo, malantaŭ la ekstera aspekto de ĉiu konflikto ni scias vidi la klasbatalan esencon kaj radikon de ĉiu homa interfrontiĝo. Eĉ se la militoj de nia epoko ŝajnas kontraŭfrontiĝo de civilizacioj aŭ interetnaj konfliktoj, la kverelo daŭre estas la ĉiama konflikto inter la ekspluatantoj kaj la ekspluatatoj. Laŭlonge de la historio ŝanĝadis la formoj de tiu kontraŭfrontiĝo sed restis senŝanĝa la esenco de la sistemo: antaŭhieraŭ sklavisma, hieraŭ feŭdisma, hodiaŭ kapitalisma… Sed ni insistas kredi ke tia sistemo ne povas esti konsiderata la natura kaj logika stato de la homaro: ĝi estas nenia **Fino de la Historio**.

Nu, se ni obstinas pensi ke la mondo povas kaj devas esti ŝanĝata direkte al la kompleta emancipiĝo de la homaro, la senklasa socio, la fino de la interhoma ekspluatado, la Komunismo, kian solvon ni proponu al la homaro kiu travivis la fiaskon de ĉiu provo ĝis nun entreprenita? Alvenis la momento eltiri konkludojn kaj instruon de nia longa eseo aŭ raporto per kiu ni penis priskribi la trijarmilan procezon de tiu ĝisnuna homa malsukceso. Krome, ni ŝuldas tiun eksplikon ĉar ni plue proponas solvon (la Komunismo kiel fina celo kaj la marksismo kiel metodo) kiu post sepdekjara praktikado alvenis al ia malsukceso. Ni devas kompreni kaj ekspliki la kialon de la fiasko. Ĉar la marksismo estas, pretendas esti, scienca metodo, tio implicas ke oni devas eltiri instruon el la fiasko por meti la konvenan rimedon. Nu, iu unua instruo kiun ni devas noti el la tuta homa historio estas ke ĉiu ŝanĝo, ĉu revolucia aŭ evolucia, kiu metas finon al iu formo de ekspluatado, malfermas la pordon al la apero de alia nova formo de ekspluatado. Tiele okazis ĝis nun kaj la komunistaj reĝimoj rezultintaj en la rusa revolucio de 1917 ne estis escepto. Kial okazis ĉi tio? Por tion klarigi, ni devas montri tri supozojn sur kiuj baziĝis la espero de la revoluciulo de 1917 kaj kiuj ne rezultis realaj. Jen ili:

- Oni supozis ke la objektivaj faktoroj, kiuj devas akompani la subjektivan volon de la homoj, estus pli favoraj kaj decidaj ol ili reale estis/as.
- Oni pensis ke, ĉar la sociaj klasoj aperis rezulte de la apero de la privata proprieteco, sufiĉus elimini ĉi tiun por ke malaperu la klasoj.
- Oni pensis ke post la malaper(ig)o de la interklasa ekspluatado ne estus necesa la ŝtato kaj malaperus ankaŭ ĝi.

La kombino de la du lastaj eraraj supozoj generis la degeneriĝon de la naturo de la regado de la komunistaj reĝimoj. Ni esploros tiun aferon sed antaŭe ni ekzamenu la unuan el la tri menciitaj supozoj. Kelkfoje laŭlonge de nia historia raporto ni asertis ke iuj provoj ŝanĝi la klasan strukturon de la socio estis nepre destinitaj fiaski tial ke la objektivaj kondiĉoj ne kontribuis al ilia sukceso eĉ se la subjetivaj faktoroj estis tre fortaj, kiel estis la kazo, ekzemple, de la sklav-ribelo de Spartako. Kaj kelkfoje ni esprimis la penson ke la disvolviĝo de la produktad-maniero, la inventoj kaj malkovroj destinitaj plibonigi la agrokulturan produktadon, ĉefe la industria revolucio, estas tre gravaj objektivaj faktoroj en la klasbatalo celanta malaperigi la interhoman ekspluatadon. Tiu supozo konstituas esencan elementon de la maksisma teorio. Konata estas la aserto de Lenino: ***La komunismo estas la sovetoj plus la elektro***. T. e. la sovetoj, samkiel la kompartio, sindikatoj kaj aliaj organizaĵoj, estas subjektivaj faktoroj, kaj la elektro, kune kun aliaj inventoj kaj tenikaĵoj estas la objektivaj faktoroj. Tiu espero aŭ supozo ne estis tute senbaza; estas evidente kiel multe la scienc-teknika progreso kaj la disvoviĝo de la industrio kontribuis plibonigi la homan vivon, plifaciligi la laboron, venki multaj malsanojn, produkti pli grandan kvanton da nutraĵoj… Sed la marksista espero ke tiu objektiva faktoro de la materia progreso plenumu la homan revon de la Mirlando, kie eblus kontentigi ĉiujn necesojn de ĉiuj homoj, ne estis nek estas plenumebla. Sendube la homa inventemo produktos pliajn mirindaĵojn kaj oni atingos pli grandan produkt-kapablon ol la nuntempe ekzistanta, kaj tio plu alportos progreson por la homaro. Sed estas nepreterpaseblaj limoj. La tera kaj mara spaco estas limigitaj, kaj ankaŭ la energifontoj. Cetere la fosilaj karburaĵoj: karbo, nafto… estas elĉerpeblaj kaj baldaŭ elĉerpotaj. Eble unuafoje en la historio, la homoj de la novaj generacioj scias ke ili vivos malpli komforte ol siaj gepatroj. Tio eksplikas la krizo de valoroj kaj de espero de la nuntempa junularo, kaj ankaŭ eble tio estas la kaŭzo ke multaj iamaj komunistoj perdis la fidon pri sia politika projekto. La iama espero de Markso, Engelso, Lenino k. a. pri la baldaŭa plenumo de ĉiuj homaj necesoj dank' al la materia progreso kombine kun la homa subjektiva volo kaj organiz-kapablo rezultis esti pli malfacile realigebla ol supozite. Rezultas ke la homaro daŭre kaj eble por ĉiam estas kondamnita vivi en la regno de la neceso, de la malabundo de la porviva baraktado… Ĉu ankaŭ de la klasbatalo? Nu, almenaŭ la objektiva faktoroj, la industrio, la sciencteknikо, iome povas kontribui solvi la homan kontraŭdiron de la klasbatalo, sed estas nepre necesa ankaŭ pli intensa kontribuo de la subjektivaj faktoroj. Poste ni okupiĝos pri tiu temo.

La dua el la senbazaj supozoj de la revoluciuloj estis ke la malapero de la privata proprieto signifus ankaŭ la malapero de la sociaj klasoj. Per nia trastudo de la historio de la klasbatalo ni vidis ke la sociaj klasoj aperis rezulte de la apero de la privata proprieto, kaj disvolviĝis kaj evoluis laŭ la disvolviĝo kaj evoluo de la formoj de privata proprieto. Tio igis nin pensi ke la malapero de la proprieto signifus ankaŭ la malapero de la sociaj klasoj, do ankaŭ la porĉiama malapero de la klasa ekspluatado, la realigado de la egaleco inter la homoj… Sed tio okazinta post 1917 instruis nin ke la venko de ĉiu ajn revolucia movado kiu metas finon al iu formo de interhoma ekspluatado nepre malfermas la pordon por la alveno de alia formo de ekspluatado. La plej klasika ekzemplo de tiu historia leĝo estis la venko de la burĝaj revolucioj kiuj metis finon al la feŭdismo sed ebligis la kapitalistan ekspluatadon; la burĝaro anstataŭis la aristokrataron kiel superreganta klaso, sed, kio okazis rezulte de la venko de proletara revolucio kiu frakasis la burĝan kapitalistan povon kaj malaperigis la privatan propraĵon de la produktad-rimedoj? Nu,

okazis io kion nek Markso nek Lenino povis antaŭpensi. La regado kaj demarŝado de la socio daŭre devis esti realigata de la ŝtato, same kiel sub la burĝa povo, kaj krome la ŝtato en la socialista sistemo devis alpreni la fukcion de kontrolo de la produktad-rimedoj. La marksistoj, ja, ne falis en la anarkista eraro entrepreni la detruon de la ŝtato. En socio kiu senĉese komplikiĝas ne eblas la anarkiisma utopio de la memmastrumado, ebla nur en malgrandaj kaj simplaj komunumoj. Do la ŝtato iĝis, en la socialista sistemo, eĉ pli grava kaj potenca ol en la burĝa socio. Kaj la povo kaj la roloj de la ŝtato devis esti demarŝataj de iu kolektivo. La proletaro kaptis la povon de la ŝtato sed ĝi ne povis/as rekte demarŝadi la rolojn de la politika povo. Vole ne vole aperis nova reganta klaso, fakte burĝa, aŭ eksburĝa, sed sen rilato kun ia ajn formo de privata propraĵo, kaj plenumante la povajn funciojn nome de la proletaro. Tiun klason oni povas nomi "burokrataro" por ne konfuzi ĝin kun la antaŭa burĝaro. La neatendita novaĵo estis ke unuafoje en la historio aperis tiam iu superreganta klaso kies povo ne estis ligita al la privata posedo de la iloj de produktado, sed tiu povo estis reala, kaj ne temis pri la povo de proletaro eĉ se oni plenumus ĝin nome la proleta klaso. Kompreneble, ĉiam ekzistis personoj kiuj trouzis la politikan povon siaprofite, sed ilia agado en la povaparato de la socio estis kadre de ilia servado al la veraj superregantaj klasoj, kiuj ĉiam estis posedantaj klasoj. Tamen la burokratara klaso de la komunistaj reĝimoj ne agadis serve de superreganta klaso, ili mem konstituis la superregantan klason, kaj klopodis ĉiurimede konservi tiun povon. Eĉ se tiu burokratara regantaro zorgis, dum kelkaj jardekoj, pri la publikaj sociaj servoj de la amasoj, la membroj de tiu klaso ĝuis komforton kaj vivmanieron tute ne alireblaj por la cetero el la socia loĝantaro.

La problemo de tiu realaĵo estis ke tia situacio povus senfine pludaŭri. Tio estas, male ol tio supozite de la marksisma teorio, la malapero de la interklasa ekspluatado ne alportas la nepran malaperon de la ŝtato ĉar ĉi ties rolo ĉiam estas necesa en ĉia ajn socio. Kvankam la marksistoj, kiel dirite, rifuzas la anarkistan teorion de la detruo de la ŝtato, kaj volis uzi ĉi tiun por realigi necesajn sociajn taskon dum periodo, kiun ili supozis provizora kaj kiun ili nomis "diktaturo de la proletaro", la diktaturo far komunist-cela burokrataro estus nek provizora nek proletara, kaj tio perversigas la esencon mem de la socialista sistemo kaj ruinigas la fidon de la amasoj pri ĝi. Cetere, estis tiu burokratara klaso mem kiu fine likvidis la komunistan reĝimon kiam ĝi ĉesis kredi pri la komunista idealo, rifuzante la komunistan titoliĝon, kaze de la soveta reĝimo, aŭ konservante tiun titolon, kaze de Ĉinio. Se ne estus okazinte la kapitalista venko en la malvarma milito, kaj la socialista sistemo, tia kia ĝi estis dum tiu periodo, estus disvastiĝinta al la tuta mondo, tio ne estus la fina venko de la komunista idealo, kaj ankaŭ ne la ĉeso de la klasbatalo. Ĉi tiu devus daŭri por meti finon al la superregado de la burokrataro kaj starigi vere demokratian socion en kiu la demarŝado de la aferoj de la ŝtato estu realigata de nuraj funkciuloj anstataŭ burokratara klaso.

Tial do, ni ripetas la (mem)demandon: Ĉu la homaro estas por ĉiam kondamnita vivi en socio kun nesolveblaj interklasaj kontraŭdiroj? Sendube ne estas la **Fino de la Historio**, sed, ĉu la homaro troviĝas, rilate al la klasbatalo, en senelira vojo? La kapitalismo venkinta en la malvarma milito volas pensi, kaj igi ĉiujn kredi, ke tiel estas. Kaj multaj (eks)komunistoj kaj la amasoj ĝenerale, povas pensi ke tiel estas. Sed ni volas pensi ke, spit' al ĉio, la protagonisto de la historio estas la hom(ar)o, la homa subjekto. Kaj tio devigas nin pli atenti pri la subjektivaj faktoroj de la socia ŝanĝo. La objektivaj faktoroj estas gravaj, tre gravaj, sed solaj ne sufiĉas, ili havas efiko-limon al kiu, ŝajne, oni alvenis. Kaj, ĉu ni povas esperi el la subjektivaj faktoroj ion pli efikan ol tio spertinte ĝis nun en la klasbatalo? Tio ĉi devigas nin esti pli atentaj pri la naturo kaj diverseco de la subjektivaj faktoroj. Laŭlonge de nia raportado pri la klasbatalo tra la historio ni vidis kiom multe la operaciintaj subjektivaj faktoroj apartenis al iu tipo kiun ni povas difini kiel egoisma, ofte ankaŭ perforta. En la tria ĉapitro de nia raporto ni prezentis alitipan subjektivan faktoron, kiun ni esprimis per la terminoj: altruismo, filantropio, etiko, morala konscienco, frateco, karitato, homaranismo, k. a. Krome, ni rilatigis la aperon de tiu sento en la historio de Okcidento kun la figuro de Jesuo-Kristo. Eble en aliaj kulturoj oni povas interligi la altruisman, homaranan, senton kun aliaj figuroj pli malpli en rilato kun la religia afero, sed la historio de la disvolviĝo de la klasbatalo, pri kiu ni atentis, okazis, ĝuste, kadre de la disvolviĝo de la kulturo de tiu Okcidento kiu, pro diversaj kialoj, havis/as kiel referenco la personon kaj la moralan instruon de Jesuo-Kristo. Tiorilate, ni devas konstati ke tiu morala instruo iome efikis en la historia procezo kiun ni priskribis. Tiu historio estus nekomprenebla sen la sociaj alportaĵoj generitaj far la institucioj kaj organizaĵoj de la kristana socio, sen la persona influo de homoj kiuj agadis ene aŭ for de la kristanaj eklezioj institucioj sed inspiritaj, pli- malpli-grade laŭ la spirito de la Evangelio: Francisko el Asizo, Jan Hus, Lutero, Kalvino kaj aliaj reformaciistoj, la movadoj de begardoj, husitoj. k. a. la kamparanaj militoj, la angla revolucio… Eĉ se konfuze, la kristana idealo estis la inspiro de ĉiuj revoluciaj movadoj dum Mezepoko kaj Moderna Erao. Kaj kvankam ne eksplicite, ankaŭ la francaj revoluciuloj de 1789, jakobenoj k. a., trinkis ideologian inspiron el la Evangelio. La konceptoj je libereco, egaleco kaj frateco devenas el la arsenalo de la kristana idearo. La samon oni povas diri pri la apero kaj disvolviĝo de la marksismo kaj aliaj proletaraj ideologioj: Ni vidas en la biografioj de Markso, Bakunino, Lenino, kaj aliaj kiel Zamenhof en aliaj terenoj, ke pelis ilin al la agado, en penigaj cirkonstancoj, iu sento kiu ne povas esti klasifikita kiel egoisma. Resume, la morala sento de la altruismo aŭ homamo iome intervenis en la eventoj de la klasbatalo dum dujarmila tempo-daŭro.

Tamen ni agnosku ke la influo de tiu subjektiva faktoro en la historio estis tre magra, malgranda, kompare al la plej distingiga eco de la homaro: la egoismo, memamo. Kaj tre grave, eĉ kiam la instigilo de la liberiga

agado estis altruismaj ideoj, fine la disvolviĝo de la afero evoluis al la praktikado de perforto. Degeneris en perforton ĉiuj klopodoj plibonigi la socion. La mezepokaj kamparanaj movadoj estis perforte sufokitaj, sed la koncernaj movadanoj ne distingiĝis ĝuste pro sia pacemo. Kaj same oni povas diri pri la kastiliaj komunumanoj kaj la religiaj reformaciistoj de la 16-a jarcento kaj la kamparanaj militoj generitaj de la Reformacio. La anglaj revoluciuloj de la 17-a jarcento estis same perfortemaj kiel la aristokratara povo kiun ili kontraŭbatalis, kaj ili eĉ senkapigis la reĝon de sia lando. Same agadis la francaj revoluciuloj de 1789-1793; estas konate kiel lerte ili manuzis la gilotinon kaj kiom sangajn amasajn masakrojn ili plenumis en la regionoj kiuj kontraŭstaris sian politikon. La revoluciuloj de la Pariza Komunumo fine suferis perfortan masakradon, sed antaŭe ili ne hezitis trakti samperforte siajn klasajn malamikojn. Kaj kion diri pri la revoluciaj procezoj de Rusio, Ĉinio kaj aliaj lokoj, la hispana civilmilito de 1936-39, la militoj por sendependigo kaj ĝenerale ĉiuj revoluciaj movadoj, la nuntempaj konfliktoj? La perforto estas kutima praktiko de la revoluciuloj ne malpli ol de la reakciaj fortoj. Evidentas ke la nova subjektiva faktoro pri kiu ni atentas ne oftis en la homa historio nek nuntempe. Kaj tamen ĝi estis formulita ĝuste por esti aplikata en la procezo de perfektigado de la homa socio, en la interhomaj rilatoj. Do, oni povas diri ke:


**La konstruintoj de ĉiuj ĝisnunaj socioj lasis for la ingrediencon de la interhoma amo**

**La ŝtono kiun la konstruistoj forrifuzis, rezultis esti bazangula ŝtono.**

Ĉi tiu sentenco aperas kelkfoje en la Biblio, kaj Jesuo alprenis kaj aplikis ĝin al si mem en la senco ke lia mesaĝo estas la formulo necesa por la bona funkciado de la homaj aferoj. Ja, la konstruintoj de ĉiuj ĝisnunaj socioj kaj civilizacioj lasis for tiun ingrediencon de la interhoma amo. Multaj el ili konsentis la klasajn diferencojn kaj baziĝis sur ili, kaj uzis la perforton por subteni la interklasan malegalecon, Kaj tiuj, malmultaj, konstruistoj, kiuj elpensis senklasan socion kaj entreprenis ties konstruadon, ne hezitis uzi perforton por atingi sian celon kaj por konservi la atingaĵojn.

Alveninte al tiu ĉi punkto de nia rezonado, neeviteblas la demado: Ĉu oni povas pensi ke iam la homaro entreprenos aplikiĝi al la solvo de sia problemaro per la valoroj de la solidareco, la altruismo, la frateco…? Eble neniam okazos tio, sed tiukaze la konkludo estas klara: neniam malaperos, la interklasa ekspluatado la klasbatalo, la revolucioj —sukcesaj aŭ fiaskaj—, la perforto, la reprezalioj, la milito la interetnaj konfliktoj… Ĉiuj ĝisnunaj civilizacioj, kiuj ne baziĝis sur tiu ŝtono de la homaranismo, fiaskis, malaperis. Kaj la nuna tutmonda civilizacio, kiu persistas en la ĉiamaj eraroj, estas kondamnita al katastrofa fiasko. Ĉi tio ne estas profetaĵo, estas konstato de evidenda fakto. Ĉiuj konfliktoj nun ekzistantaj en la mondo, kiuj, cetere, pli kaj pli graviĝas senĉese, indikas ke nia homa specio trairas eraran vojon. La kapitalista venko en la malvarma milito ne solvis, sed tute male, la sociajn kontraŭdirojn; la kapitalismo povis/as montri de tiam sian veran vizaĝon, kion ĝi ne povis fari en tiu periodo. Sed, ĉu la afero povus esti alimaniere? Ĉu la idealo de la komunismo, senklasa socio, sen perforto estas atingebla? Ni volas pensi ke jes. La batalo por tion atingi oni devas fari en la tereno de la edukado. La edukado estas agado sur tiu parto de la homa cerbo kiu estas modifebla: la novkorteksto. La ceteraj partoj de la homa cerbo ne estas modifeblaj, ili estas bestecaj kaj tiaj devas resti laŭnature. Sed la homa specio disponas je tiu lerno- kaj penso-kapablo kiu permesas al ni pretersuperi la limojn de la besteca horizonto. Dank' al la rendimentoj de tiu speciala cerbo-parto la homaro faris gravajn inventojn kaj atingis mirindajn rezultojn en la tereno de la scienco kaj la tekniko. Estas neniu kialo por ke oni ne atingu similan sukceson en la tereno de la scienco de la kunvivado. Kiam oni verkas ĉi-liniojn estas ĵus pasinte iuj huraganoj en kelkaj zonoj de Centr-Ameriko, Florido, k. a. La raportoj pri la rezulto de tiuj katastrofoj raportas pri perfortaj incidentoj, disrabado… en la lokoj suferintaj detruon. Ion similan oni vidis, antaŭ kelkajn jarojn en Haitio okaze de granda tertremo. Tiuj ekzemploj de homa egoisma, besteca konduto okaze de malfacilaj cirkonstancoj estas kvazaŭ specimeno de la ĝenerala teniĝo de la homaro en la cirkonstancoj de la malabundo de la necesaj aĵoj. Sed estas atentinda alia ekzemplo: kiam okazis ega tertremo en Japanio, sekvita de granda cunamo kaj ankaŭ grava damaĝo en atom-centralo, oni vidis ke la loĝantaro de la domaĝitaj regionoj kondutis pli laŭorde, pli discipline ol en la aliaj menciitaj kazoj. Sendube ili estis mense preparitaj por alfronti tiajn katastrofojn. Tio instruas nin ke per socia edukado oni povas atingi rezultojn de vere homa, nebesteca, kunvivado, sen perforto, sen subpremado. La socia edukado pri la valoroj de la filantropio, la homa solidareco, la frateco… mankas nur tiu subjektiva faktoro por meti pozitivan kulminon al la klasbatalo.



# Kial konvenas al ni studi la Rusan Revolucion?

Konferenco de Josep Fontana en la prezentado de la komisiono de la centjaro de la Rusa revolucio.

**Josep Fontana i Lázaro** estas emerita profesoro de Historio kaj gvidas la Universitatan Instituton de Historio ***Jaume Vicens i Vives de la Universitat Pompeu Fabra*** de Barcelono. Li estis instruisto de kelkaj generacioj de historiistoj kaj sociaj sciencístoj, kaj verkisto de multaj libroj pri la politika historio de la 20-a kaj 21-a jarcentoj. Fontana estis unu el la plej emblemaj figuroj de la demokratia rezistado al la frankismo kaj senlaca aktivulo favore al la afero de la demokratio kaj la socialismo.

Estas kelkaj kialoj kiuj igas necese ke ni studu denove la historion de la rusa revolucio. Unue, estas necese tion fari por doni sencon al la ĝenerala historio de la 20-a jarcento. Historio kiu, laŭ ni povas ĝin ekzameni nun, de la perspektivo de la unuaj jaroj de la 21-a jarcento, montras al ni enigmon malfacile eksplikeblan. Se ni uzas iun indikilon de la socia evoluo kia estas la mezurilo de la malegaleco pri la riĉeco, ni povas vidi ke la 20-a jarcento komenciĝas en la unuaj jardekoj kun socioj tre malegalecaj, kie la riĉeco kaj la enspezoj akumuliĝas en tre malpleksa parto de la loĝantaro. Ĉi tiu situacio komenciĝas ŝanĝiĝi en la jardeko post 1930 kaj tio okazas spektaklece en la jardeko post 1940 kiam komenciĝas epoko en kiu okazas pli egaleca distribuado de la riĉeco kaj la enspezoj. Situacio kiu daŭras stabila ĝis 1980: estis la feliĉa epoko dum kiu disvolviĝis en grandparto el la mondo la komfort-socio, epoko de altaj salajro kaj pliboniĝo de la vivnivelo de la laboristoj, kiam iu usona prezidento eĉ intencas iniciati programon de milito kontraŭ la malriĉeco.
Ĉio-ĉi finiĝis en la jardeko post 1980, ekde kiam denove kreskis la indikiloj de malegaleco, kiuj pretersuperas tiujn de la komenciĝo de la jarcento, ĝis tioma punkto ke ***Credit Suisse*** denuncis antaŭ malmultaj monatoj ke la 70 procento da plej malriĉa loĝantaro el la planedo ne havas entute eĉ 3 procentojn el la tuta riĉeco, dum la 8,6 elcento inter la plej riĉaj akumulas 85 elcentojn.
Kio okazis kio povus ekspliki ĉi-tiun evoluon? Thomas Piketty asertas ke la malegaleco estis ĉiamdaŭra karakteraĵo de la homa historio. Mi legas al vi liajn vortojn: "En ĉiuj socioj kaj en ĉiuj epokoj la plej malriĉa duono el la loĝantaro posedas preskaŭ nenion (ĝenerale apenaŭ 5 elcenon el la tuta havaĵo), la plejsupera dekonparto el la riĉularo posedas klaran plejmulton el la tuto (ĝenerale pli ol 60 procenton el la tuta havaĵo. Kaj foje eĉ 90 elcenton)".
La malegaleco de la havaĵoj, kiu tradukiĝas en malegaleco de la enspezoj, signas, laŭ Piketty, la tutan kurson de la historio, kiam la taksoj de kreskiĝo de la loĝantaro kaj de la produktado ĝenerale ne preterpasis 1 elcenton ĉijare, dum la "pura rendimento" de la kapitalo sin tenis inter 4 kaj 5 elcento. Ĉi tiuj konsideroj kondukas lin al ia interpretado draste formulita: "Dum esenca parto de la homa historio la plej grava fakto estas ke la takso de rendimento de la kapitalo ĉiam estis malpli ol dek- al dudek-oble pli granda ol la takso de kreskiĝo de la produktado kaj de la enspezo. Sur tio baziĝis, ĉefe la fundamento mem de la socio: estis tio kio permesis al iu klaso de posedantoj dediĉiĝi al io pli ol sia propra subtenado". Kio estas kvazaŭ diri ke la civilizacio, la scienco kaj la arto estas filoj de la malegaleco.
Poste estus veninta, en la 20-a jarcento, etapo en kiu la lla reguloj de la ludo ŝajne estis ŝanĝante, ĉefe sekve, li asertas, de la detruo okazigita de la du mondaj militoj kaj la sociaj konvulsioj, kiuj okazigis tiun minimumon de la malegaleco kiu okazis inter 1945 kaj 1980. Sed la normaleco restariĝis ekde la jardeko post 1980, ĝis alveni al la nuntempa ekstrema malegaleco.
El ĉi tiu fakto ekstartas lia antaŭvido ke laŭlonge de la 21-a jarcento, tio estas ĝis la jaro 2100, la kresko de la produktado es-tos apenaŭ 1,5 elcento kaj ni estos en iu situacio en kiu la supereco de la rendimentoj de la kapitalo denove estos kiel antaŭe kaj estus restariĝinte la normaleco. Pro kio li finas per iu pesimisma konkludo: "Ekzistas

nenia natura forto kiu nepre reduktus la gravecon de la kapitalo laŭlonge de la historio". Nu, mi travivis tiun etapon antaŭ 1980 kiam ni estis multaj, mi dirus multaj milionoj en la tuta mondo, kiuj pensis ke la reguloj de la ludo senĉese ŝanĝadis favore al pli justa distribuo de la riĉeco, kaj ke estis konvena penadi por daŭre antaŭenmarŝi tiudirekten. Estas pro tio ke mi rifuzas akcepti ke tio okazinta en ĉi tiu duonjarcento de kolektiva pliboniĝo estis iu simpla akcidento, kaj mi pensas ke oni devas detale ekzameni la eventojn de la etapo inter 1914 kaj 1980, enkondukante en la analizadon la politikajn faktorojn kiuj tute mankas en la libro de Piketty, kie, ekzemple, la vorto "sindikatoj" aperas nur unufoje (en la paĝo 471 de la originala franclingva eldono).

Ĉi tiu alitipa esploro de la evoluo de la malegaleco en la 20-a jarcento, de politika vidpunkto, nepre devas komenci per la granda ŝanĝo kiun signifis la rusa revolucio de 1917. Kial mi diras "granda ŝanĝo"? En 1917 ekzistis ia longdaŭra tradicio de laboristaj luktoj celintaj plibonigi la viv-kondiĉojn de la laboristoj, kaj estis ia ampleksa tradicio de apogo de la "socialismo", kvankam unu sola provo apliki ĝin en la realon sukcesis konkretiĝi, tiu de la Pariza Komunumo de 1871, kiu daŭris malmulte pli ol du monatojn kaj lasis al ni kiel heredaĵo iun himnon, la Internacio, kiu anoncis ke ***"la mond' en fundament' ŝanĝiĝos"***.

Sed, verdire, ekde la fino de la 19-a jarcento, tiel la sindikata batalado kiel la politika agado de la partioj t. n. socialistaj aŭ socialdemokratiaj estis rezignintaj pri la revoluciaj programoj por sin dediĉi al la lukto por la plibonigo de la sociaj rajtoj ene de la ekzistantaj politikaj kadroj, sed por faligi ĉi tiujn. La kazo de la germana SPD, de tiu socialdemokratia kiun oni povus konsideri kiel legitima heredinto de Markso kaj Engelso, estas klara tiurilate. Dum la jaroj antaŭ la komenciĝo de la Unua MondMilito ĝi estis la partio kiu posedis pli da deputitoj en la germana parlamento, ĝi havis pli ol miliono da aliĝintoj kaj centon da ĵurnaloj, sed ĝi ne intencis fari la revolucion, sed aspiris atingi parlamentan triumfon kiu permesus al ĝi reformi kaj demokratiigi la staton. Do, kiam okazis la milit-deklaro, la socialistoj voĉdonis la kreditojn kaj klopodis konservi la socian pacon, konsilante al la laboristoj ke, dum la daŭro de la milito, flankenlasu la strikojn kaj la konfliktojn.

De ĉi perspektivo ne malfacilas kompreni ke tio kio okazis en Rusio laŭlonge de 1917 signifis ian rompon, ian neatenditan antaŭenpaŝon, kiu montris ke iu movado startinta de malsupre, de la ribelo de la laboristoj kaj la soldatoj, povus atingi la kontrolon de la lando kaj igi ĉi tiun funkcii per novaj reguloj. Ĉar la plej novigante en ĉi tiu movado estis tio ke, ekde la unuaj momentoj, ekde februaro –aŭ marto, laŭ nia kalendaro– de 1917 ĝi ne agadis nur per iu parlamento, sed baziĝis sur iu duobla povo, estante esenca parto de unu el ili la konsilioj de laboristoj, soldatoj kaj kamparanoj, kiuj tiam komencis konstrui ian specon je kontraŭ-ŝtato.

Al ĉi tio ni aldonu ke la procezo repide akceliĝis, ĉefe pro la iniciato de Lenino, kiu proponis rezigni pri la programo de iu konstitucia asembleo, tio estas, la burĝa parlamenta sistemo kie ĉio kontribuas, li diris, starigi "iun demokration nur por riĉuloj"- kaj rekte pasi al alia formo je organizo kie la povo devus esti en la manoj de konsilioj elektitaj de malsupre, kun transira etapo de diktaturo de la proletaro –ĉar ne estis verŝajna ke la privilegiuloj akceptus sian senposedigon senreziste– kiu fine kondukus starigi socion sen ŝtato kaj sen klasoj.

Por la milionoj da eŭropanoj kiu en 1917 estis militante en la batalkampoj, kaj kiuj jam estis komprenínte ke tiun militon oni ne estis farante por defendi iliajn interesojn, la bildo de tio kio estis okazante en Rusujo estis tiu de reĝimo kiu estis tuj finonte la militon, kiu estis distribuinta terojn al la kamparanoj, kiu estis asigninte al la laboristoj rajtojn je kontrolo sur la entreprenoj kaj kiu transdonis la povon al elektitaj konsilioj kiuj devus demarŝadi de malsupre al supre.

La nova imperiestro de Aŭstrio-Hungario, Karolo la 1-a, perletere diris al la Kajzero la 14-an de aprilo de 1918: "Nun ni estas batalante kontraŭ iu nova malamiko, pli danĝera ol la potencoj de la Entento: kontraŭ la internacia revolucio". Karolo –kiu, cetere, estis beatigita en 2004 de la papo Wojtilo– estis trafe kompreninta la diferencon kion signifis tio kio estis okazante en Rusio: li estis konstatinta ke tiu estis iu "nova" malamiko, kiun oni ne devus konfuzi kio signifis la ribeloj, manifestacioj kaj strikoj kiuj estis

okazintaj, kaj daŭre estis okazante en tiuj momentoj, en Aŭstrio kaj Germanio.
Ĉar vere estis ke en ambaŭ landoj estis okazante tiom da plend-movadoj ke tio igis naskiĝi ĉe la rusaj bolŝevistoj la iluzio, tute erara, ke la revolucio facile disvastiĝos en Centra Eŭropo. Eĉ ne en Germanio, kie tio ŝajnis pli proksima, okazis revolucio. Sed la timo ke ĝi povus okazi eksplikas tion ke komence de novembro de 1918 la germanaj militistestroj decidis ke oni devus meti finon al la milito por povi destini fortojn por sufoki la revolucion. Estis la militistoj tiuj kiuj, antaŭ la neceso plenumi la postulojn kiujn la usona prezidento Wilson faris por negoci la pacon, elpostenigis la imperiestron kaj decidis aljuĝi la povon al iu registaro konstituita de socialistoj, kun la kondiĉo, antaŭe paktita inter la armeestroj kaj la lidero de la Socialista Partio, Friedrich Ebert, ke "la registaro kunlaboros kun la oficiraro en la nuligo de la bolŝevismo".
La timo de la militistoj ne estis senbazaj, ĉar ŝajnis ke se ie oni povus ripeti la sovetan sperton estis en la Germanio de novembro kaj decembro de 1918, kiam en Bavario kaj Saksujo oni estis proklamante "socialistajn respublikojn", kaj en Berlino kunvenis kongreso de la reprezentantoj de la konsilioj de laboristoj kaj soldatoj de Germanio en kiu, interalie, oni postulis ke la plejsupera aŭtoritato de la armeo pasu al la manoj de la konsilioj de soldatoj kaj ke oni eliminu la rangojn kaj insignojn. La granda venko de Friedrich Ebert estis atingi ke la kongreso de la konsilioj akceptu la tujan elekton de iu konstitucianta parlamento, kio permesis starigi iun registaron de ordo kaj dispelis la minacon de iu revolucia procezo.
Dume la ***Freikorps***, iuj armeecaj korpoj el volontutuloj rekrutitaj de la armeestroj, kiuj estis konstituitaj el malmobilizitaj soldatoj, studentoj kaj kamparanoj, gvidataj de leŭtenantoj kaj kapitanoj, kaj kiuj agadis kun la apogo de la ministro pri Defendo, la socialisto Gustav Noske, faris la malpuran laboron likvidi la revolucion. Ili komencis sufokante per fero kaj sango iun trofruan provon je ribelo kiu okazis en Berlino la 5-an de januaro de 1919, kaj finis per la murdo de Karl Liebknecht kaj Rosa Luxemburgo, kaj sekvis poste perforte dissolvante la konsiliojn de laboristoj kaj soldatoj kaj likvidante la sovetan respublikon de Bavario. Oni ne sufiĉe reliefigas la gravecon de ĉi tiu kontraŭ-revolucia movado kiu disvastiĝis tra Germanio, Aŭstrio, Hungario kaj la baltaj landoj, kun la intima kunlaborado de iuj politikaj gvidantoj kiuj estis impulsitaj de ia obseda terur-sento pri la rusa revolucio. Eble utilas al vi scii ke tiuj korpoj atingis la nombron je 250.000 al 400.000 membroj.
Tiele la revolucio restis izolita en Rusujo, kio ne tro prizorgigis. Angloj kaj francoj baldaŭ laciĝis apogi la blankajn armeojn kiuj bataladis kontraŭ la sovetuloj kaj delasis la aferon, zorgante pri reagoj kiel la ribelo de la maristoj de la floto kiun la francoj estis sendintaj al la Nigra maro. Tio kio reale zorgigis ilin estis la ebleco ke la soveta ekzemplo disvastiĝus al siaj landoj: ili ĉefe timadis la kontaĝon.
La malkontento de la jaroj post la fino de la Granda Milito en Francio, en Anglio (kie en 1926 okazis la unua ĝenerala striko de ĝia historio), en Hispanio (kie de 1918 al 1921 okazis tio kio kutime estas nomata "bolŝevisma trijaro") aŭ en Italio (kun okupado de fabrikoj en 1920) kondukis nenialoken revoluciajn movadojn kiuj aspiris kapti la povon. En Italio, ekzemple, tiel la socialista partio kiel la majoritata sindikato rifuzis apogi agadon celantan preni la povon. Tiamaniere la okupado de la fabrikoj ne povis konduki krom al la atingo de iuj koncedoj el la patronaro. Sed la timo al la revolucio "laŭ la rusa maniero" tre ĉeestis en la menso de la gvidantoj de la burĝa Eŭropo, kaj la sindikatoj rapide lernis uzi ĝin por pli efike negocadi la laborkondiĉojn kaj la salajrojn.
La plibonigo rilate al la malegaleco, kiun oni atingis poste, ekde la jardeko de 1930, ne estus sufiĉe eksplikebla sen la paniko al la soveta fantomo. Kiam la tutmonda krizo kreis situacion de ega senlaboreco kaj malriĉeco, oni sin turnis al du tipoj je solvoj. En landoj kie la minaco ŝajnis pli granda, kiel Italio kaj Germanio, la faŝism-tipaj movadoj komencis perforte dissolvi partiojn kaj sindikatojn de maldekstraro.
En la kazo de Germanio, Hitlero ripetis en 1934 la pakton kun la armeo kiun Ebert estis farinte en novembro de 1918. Antaŭ la minaco kiun reprezentis la trupoj de la SA, kiuj volis la plenumadon de la revoluciaj promesoj de la naziaj programoj, la militistoj avertis Hitleron ke aŭ li haltigu la aferon aŭ faros tion la armeo per si mem. La militistoj

kunlaboris provizante armilojn al la SS por la ekstermado de la SA kiu okazis ekde la nokto de la longaj trančiloj, la 30-an de junio de 1934. Sed eble plej interese estis la pravigo kiun Hitlero faris pri sia agado en tiu okazo, dirante ke li volis eviti ke okazu en Germanio iu nova 1918.

En alia kazo kiam la sekvoj de la krizo estis ekstreme gravaj, kiel estis tiu de Usono, la solvo konsistis establi politikon de helpoj kaj koncedoj en la sociala tereno, ene de la programo de la ***New Deal***. Kutime oni ignoras ke la jaroj de 1931 al 1939 estis epoko en Usono de grandaj strikoj kaj gravaj sociaj perturboj. Okaze de unu el tiuj strikoj, ***Los Angeles Times*** diris: "La situacion (…) oni ne povas priskribi kiel iu ĝenerala striko. Tio ekzistanta estas insurekcio, ribelo organizita de la komunistoj por faligi la registaron. Nur oni povas fari ĉi tion: dispremi la ribelon per ĉiu necesa forto". Krom ĉi tiuj bataloj, la usonaj laboristoj por sin defendi el la krizo uzadis ankaŭ formojn de memorganizado: en Seatlo la sindikato de la fiŝkaptistoj interŝanĝadis fiŝojn kontraŭ fruktoj, legomoj kaj ligno. Estis 21 lokoj, subkontrole de iu komisaro, por fari tiajn interŝanĝojn. Fine de la jaro 1932 estis 330 diversaj organizaĵoj de memhelpado por la tuta lando, kun 300.000 membroj.

Sen tia kunteksto de socialaj bataloj ne eblas trovi racian eksplikon de la ***New Deal*** kaj ties dispozicioj pri helpo, kiel la ***Civil Works Administration***, kiu sukcesis provizi laborpostenon al 4 milionoj da laboristoj, aŭ la ***Civilan Conservation Corps***, kiu varbis junajn fraŭlojn kaj kondukis ilin labori en la arbaroj pagante al ili salajron je unu dolaro po-tage por laboraĵoj de rekuperado aŭ protektado kontraŭ la inundoj. Ĉion ĉi oni faris sub la maltrankvila rigardo de la entreprenistoj, kiuj vidadis ĉie la minacon de la socialismo. Fakte, la timo al la tipo je elturniĝo kiu laŭ ilia ŝajno estis okazante kun Roosevelt generis ian fortan reagon kio eksplikas ke en 1938 oni fondis la kongresan Komitaton pri kontraŭ-Usona agado, kies komisio estis malkovri renversemulojn en la sindikatoj aŭ ene de la organizaĵoj de la ***New Deal***. La makartismo ne estas rezulto de la malvarma milito, sed la daŭrigo de la paniko kontraŭ la ruĝuloj naskiĝinta en la tridekaj jaroj.

Post la fino de la dua mondmilito, en 1945, la timo al la disvastiĝo de la komunismo en Eŭropo ŝajnis pravigita de la fakto ke dum la jaroj 1945 kaj 1946 la komunistoj atingis pli ol 20 elcento de la voĉ-donoj en Ĉeĥoslovakio, en Francio (kie ili estis la plej voĉdonita partio) kaj en Finnlando, kaj tre proksime al 20 elcento en Islando aŭ en Italio. En tiuj kazoj ne estis revoluciaj celoj far la komunistoj, ĉar, paradokse, Stalino mem sin estis turniĝinta al la parlamenta vojo, kaj konsilis al la eŭropaj komunistaj partioj ke ili ne entreprenu revoluciajn aventurojn.

La malvarma milito havis la celon krei ian solidarecon en kiu Usono oferus al siaj aliancanoj protekton kontraŭ la revolucia malamiko, el kiu nur tiu potenco povus savi, dank' al sia milita supereco, plifirmigita per la monopolo de la atombombo. Malantaŭ tiu ofero estis la intenco konstrui mondon laŭ siaj reguloj, en kiu tiu potenco havus ne-diskuteblan militistan hegemonion, sed ankaŭ ekonomian superecon.

Por konservi tiun tutmondan politikan kontrolon, kaj samtempe fari negocon, estis necese subteni tian tim-etoson pri ĝenerala kolizio kontraŭ iu malamiko, la soveta, kiu povus subpremi ĉiun ajn landon kiu ne ĝuus la usonan protekton kaj ĉi ties nuklea forto.

Krom tio, tamen, la neceso alfronti tion kion ili reale timis, kio ne estis la sovetiaj armiloj, sed la ebleco ke la komunistaj ideoj kaj movadoj disvastiĝus al la "okcidentaj" landoj, igis ĉiujn alpreni politikojn favore al pli egaleca distribuo de la profito de la produktado kaj pli ampleksan provizadon de senpagaj kaj universalaj sociaj servoj: estis la jaroj de la komfort-socio, la jaroj kiam ni trovas la plej malgrandan malekvilibron en la socia malegaleco.

Ekde 1968, tamen, videblis ke oni ne devis timi ian ajn tipon je revolucia minaco, ĉar eĉ ne la komunistaj partioj mem ŝajnis celi tion. En la Parizo de majo de 1968, en la pleneŭforio de la gestudenta movado, kiuj estis plenkonvinkitaj ke, en alianco kun la laboristoj, ili povus transformi la mondon, la komunista partio kaj ĉi ties sindikato malebligis ĉiun ajn aliancon kaj kontentiĝis paktante salajran plibonigon kun la patronaro kaj rekomendante al la gestudentoj ke ili iru fari la revolucion en la Universitato. Samtempe, la eventoj de Prago pruvis ke la soveta komunismo ne havis plian aspiron ol sin teni defensive, ne tolerante ŝanĝojn kiuj metus subdanĝere sian stabilecon.

Meze de la jardeko post 1960, ju pli evidentiĝis ke la soveta minaco estis senkonsistenca, des pli la entreprenistaro kiu ĝis tiam estis akceptinta pagi la fakturon de salajraj kostoj kaj altaj impostoj, komencis reagi. La ofensivo komenciĝis en la epoko de Carter, iuflanke malebligante krei iun Oficejon de perado de la konsumantoj, kaj aliflanke ignorante la rajtojn de la sindikatoj, kaj pludaŭris en la epoko de reagan en Usono kaj Sinjorino Teacher en Britio, batalante malkaŝe kontraŭ la sindikatoj. Sekve de tia politiko rekomenciĝis la kurbo de la malegaleco, kiu nutriĝis el la laŭgrada rabato de la salajraj kaj fiskaj kostoj de la entreprenoj.
Ĉu povas esti konsiderata kiel nura koincido ke la plibonigo de la egaleco okazis samtempe kiel la ekspansio de la komunista minaco –aŭ pli ĝuste, la timo al la komunista minaco- kaj ke la ŝanĝo kio okazigis la revenon de la grando de la malegaleco kiun ni travivas nun koincidas kun la malapero de tiu faktoro?
Kaj permesu al mi insisti: mi ne temas pri la minaco de Soveta Unio kiel militista potenco, kiu ekzistis neniam (la diferenco je militista kapablo favore al Usono estis enorma, tial oni kaŝis tion al la publiko, kiu alimaniere eble ne estus milde konsentite la elspezojn kaj la restriktojn kiun okzigis la malvarma milito). Mi temas al la minaco, laŭsence ke oni uzis tiun terminon por plifirmigi tiun timon, de la "internacia komunismo"; la timo al la revolucia renverso.
Permesu al mi citi iun strange lucidan ateston kiu sciis vidi, jam en la jaro 1920, tra kiu vojo povus iri tre  bona la afero. La atesto estas de Karl Kraus, kiu skribis tiam: "Ke la diablo forportu la praktikon de la komunismo, sed, tamen, ke Dio konservu ĝin al ni en ĝia kondiĉo de konstanta minaco sur la kapoj de la riĉ-posedantoj; tiuj kiuj, cele konservi ilin, senkompate sendas aliajn al la frontoj de la malsato kaj la honoro de la patrujo, dum pretendas konsoli ilin dirante kaj ripetante ke la riĉeco ne estas tio plej grava en ĉi tiu vivo. Dio konservu al ni por ĉiam la komunismon por ke tiu fiularo ne iĝu eĉ pli insolenta (…) kaj ke, almenaŭ, kiam ili enlitiĝos, tion faru kun terur-sonĝo.
Ĉar rezultas ke grandparto el tio kion ni nomas socia progreso, ekde la franca revolucio ĝis nun, estas tre ligita al la terur-sonĝo de la riĉaj klasoj, devigitaj cedi pro la timo perdi ĉion permane de la barbaroj. Ekzemple, la abolo de la sklaveco estus nekomprenebla sen la paniko kiun okazigis la masakro de kolonianoj dum la revolucio de 1791 en Haitio. La fakto ke nuntempe ekzistas en la mondo pli da sklavoj ol en 1791 (oni kalkulas ke la nuna kvanto da devigaj laboristoj estas inter 13 kaj 27 milionoj) igas ke oni meditu pri la signifo de tio kion la libroj de historio nomas abolo de la sklaveco.
Neniel komparebla, tamen, kun la paniko kiun vekis jam dekomence la rusa revolucio, kaj kiun oni persistigis tiel en la tereno de la politika propagando kiel en tiu de la historio. Ankoraŭ nuntempe la eventoj de Ukrainio estas profitataj por refari la saman historion de la minaco kontraŭ la libera mondo. En artikolo de iu erudicia revuo pri la historio de la malvarma milito kiu studis la organizaĵojn ***stay behind***, kiujn Usono kaj Britio starigis en Eŭropo cele alfronti eblan komunistan avancon, tiu plej konata estis ***Gladio***, kiu preparadis perfortan reagon en Italio se la komunistoj venkus en balotado, la aŭtoro provis pravigi ke ili persistu eĉ post la malapero de Sovetunio kaj argumentis ke, pro la nuna rusa agrso en Ukrainio, estas logike pluteni "iujn el la samaj elementoj je sekureco· de la malvarma milito. Do, la kontraŭkomunismo pludaŭras eĉ post la morto de la komunismo. Oni nutris nin per la kriminala historio de la komunismo, kiun oni ripetadas al ni ĉiutage, kaj mankis, tamen, la paralela kono de la kriminala historio de la kapitalismo por situi la aferon en pli ekvilibra kunteksto. La studo de la rusa revolucio, kiel vi vidas, estas necesa por kompreni la historion de la 20-a jarcento, kaj la situacion al kiu ĉi tiu historio kondukis nin.
Estas, tamen, pliaj kialoj kiuj igas necesa ĉi tiun studon, pri kiuj mi temos resume pro tempo-manko. Unu el la plej gravaj estas klarigi kial la socia projekto de 1917 fine fiaskis. Kaj mi ne temas pri la fina disfalo de la politika strukturo de Sovetunio post 1989, sed pri la nekapablo konstrui tiun modelon de libera kaj senklasa socio kiun oni proponis je komenco de la revolucio.
Ĉi tiu estas temo kiu devigas nin revizii serion da aferoj, komencante per la krizo de marto de 1921, kiam estis okazante la deka kongreso de la komunista partio, dum la laboristoj de Petrogrado strikadis, kun la apo-

go de la maristoj de la bazo de Kronstadt, ne nur pro ekonomiaj kialoj, sed postulante rajton je partopreno, kaj novan balotadon por la sovetoj, kiuj estis devenintaj, laŭdaŭre de la civil-milito, simpla transmisia ĉeno de la desupraj ordonoj de estroj kiuj ne estis elektitaj.
Poste ni devos esplori kion reale signifis la programo de planado kiun estis ellaborante, ĝis 1928, la homoj laborantaj en la ***Gosplan***, kaj la maniero kiel ilia projekto estis pervertita de Stalino, kiu igis ĝin ilo por iu projekto de deviga industriigo, kiu kunportis politikon de teroro celanta submeti ampleksajn tavolojn de la loĝantaro al iuj laborkondiĉoj de homa ekspluatado.
Aŭ ni devos esplori la kialojn de la fiasko de la projekto de la popolaj demokratioj de 1945, pri kiu temis Manfred Kossok, kiu travivis ĝin, elvokante "tiujn jarojn de la grandaj esperoj, de la revoj, de la utopioj –la fino de la imperiismo post 10 aŭ 20 jaroj, liberigo de ĉiuj popoloj, universala bonstato, eterna paco- iuj jaroj de heroecaj revoj: la reala socialismo kiel la plej bona el la mondoj". Iu projekto pri kiu Edward Thompson diris: "ĉi tiu estis aŭtentika momento, kaj mi ne kredas ke la degeneriĝo kiu sekvis, en kiu estis du aktoroj, la stalinismo kaj okcidento, estus neevitebla. Mi pensas ke oni devas denove okupiĝi pri ĉi tio kaj eksplikis ke ĉi tiu momento ekzistis". Oni devas, ja, studi ĉiujn-ĉi diversajn momentojn kiam la aferoj povis esti malsamaj.
Kaj estas iu centra aspekto de ĉi tiu afero kiun oni devus detale ekzameni. Ĉu estis realigebla la projekto de Lenino krei senklasan socion, kiu implikis aboli ne nur la ŝtataparaton sed ankaŭ la dungitan laboron? Antaŭ ne multe Richard Wolff, emerita profesoro de la Universitato de Ekonomio de Massachusets, restudis diversajn momentojn de la historio de la revolucioj –la abolo de la sklaveco, la fino de la feŭdismo, la socialista revolucio de 1917- kaj montris ke ĉiu el ili alportis bonaĵojn kaj liberecon, sed ke ĉiuj lasis la terenon malfermitan al nova formo de ekspluatado (en la kazo de 1917, tiu de kapitalismo de ŝtato) ĉar ili ne komprenis ke la sola maniero aboli la ekspluatadon estas meti finon al la depreno de la laborpluso el la manoj de ties produktantoj.
Laŭ Wolff tion oni atingas per formoj de kooperativa organizo kaj mencias iun sufiĉe interesan movadon de etaj kooperativoj kiu disvolviĝas nuntempe en Usono. Sed li forgesas iun aspekton pri kiu Lenino sufiĉe atentis: ke cele aboli la ekspluatadon unue estas necese senigi el la politika povo tiujn kiuj estus damaĝitaj pro la ŝanĝo. Pri tio povus utili kiel ekzemplo tio okazinta en Mondragono, kiu multaj, inkludante Wolff mem, prezentis kiel la modelo de alternativo. Oni povas fari ĉion ajn starigante kooperativojn, grandajn aŭ malgrandajn, sed ŝanĝiĝos nenio se dume estas en Madrido ministro kiel Montoro kiu disponas je la tuta povo de la ŝtato por modifi la regulojn laŭ lia konveno.
Alia propono kiu interesus konsideri, sed pri kiu ni ankoraŭ konas tre malmulte, estas tiu de Abdullah Öcalan, la lidero de la kurda PKK, enprizonigita de la turkoj ekde 1999, kiu antaŭ kelkaj jaroj proponis la formulon de demokratia kun-federismo, kiu proponas anstataŭigi la ŝtato-nacion per iu sistemo de lokaj asembleoj aŭ konsilioj kiuj generus aŭtonomion sen krei la aparaton de iu ŝtato. Nuntempe ĉi tiu projekto havas ian unuan konkretiĝon en Rojavo, la norda regiono de Sirio kie stariĝis tio kion iu raportaĵo de la BBC kvalifikas kiel "ia egaleca mini-ŝtato, plur-etna (kiu egalece enkalkulas kurdojn, arabojn kaj kristanojn), regita komunume".
Temas ĝuste pri tiuj kiuj kunbatalas cele rekonkeri la urbon Kobanon. Mi rekomendas al vi vidi tiun raportaĵon de la BBC, kiu titoliĝas "Rojavo: Sekreta revolucio de Sirio".
Kial mi parolas pri ĉi tiuj aferoj, kiuj ŝajnas tre malproksimaj de la revolucio de 1917? Antaŭe mi diris ke ni devus studi ĝin por kompreni nian propran historion; sed evidentas ke tiun studon mi ne kontemplas kiel pura intelekta ekzerco sed praktika aplikado. La utilo kiun ĝi povus havi, kiun ĝi devas havi, estas helpi nin repreni tiujn projektojn kiuj ne sukcesis –pro internaj eraroj kaj pro la malamikeco de ĉiuj fortoj kiuj sin oponis al la sociaj avancoj kiujn ili iniciatis- kio ankoraŭ povas utili al ni por la tasko konstrui pli liberan kaj egalecan socion.
Ĉar ŝajnas al mi nediskutebla ke la celo kiu impulsis la homojn de 1917 estis legitima. Laŭ diris Paul Eluard: "Oni devis kredi, estis necese / kredi que la homo kapablas / iĝi libera kaj plibonigi la destinon kiun oni asignis al li". Kaj mi pensas ke daŭre estas al ni necese kredi tion nuntempe.

# LA MARKSISMO KAJ LA KLASBATALO EN LA 21-A JARCENTO

***ZAIDA ESPINO LA O***
Magistratino pri Filozofio (Plejsupera Instituto de Medicina Scienco)-Santjago de Kubo



ENKONDUKO.

La Marksismo, kiel scienca teorio de la socio en la nuntempo konstituas, des pli prave, la teorion de la klasbataloj, ekde revoluciaj pozicioj. 120 jarojn post la morto de Karlo Markso, la teorio de la klasbatalo kaj de la monda historia revolucia rolo de la proletaro, kiel kreanto de nova socio ne perdis validecon. Nuntempe kun la novliberala tutmondiĝo, akcentiĝas ĝiaj sekvoj en la tuta socio kaj la homa sano konkrete. La agnosko de la luktado en ĉi tiuj landoj kie oni aplikas ĉi tiun novan modelon ne kondukas al la interkonsento pri la ekzistado de la sociaj klasoj, oni prezentas diversecon da interpretoj kiuj celas banaligi ilin en iuj kazoj kaj forgesi ilin en aliaj kazoj.

La disvolviĝo de novaj batal-formoj, kun partopreno de sociaj movadoj ĉu pri genro, pri vivmedio, etniaj, kulturaj ktp ni ne povas forgesi, en la kazo de Kubo, ĉi ties konstantan praktikadon de la marksisma fundamentado en ĉiuj siaj sociaj procezoj, startante de nia propra realo kaj sperto, samkiel de niaj plej progresemaj revoluciaj teoriistoj.

DISVOLVIĜO

"La historio de ĉiuj ĝis nun ekzistintaj socioj, estas la historio de la klasbatalo". Laŭ esprimo de Karlo Markso en sia ĉefverko "La Manifesto de la Komunista Partio" en februaro de 1848, 155 jarojn post ĝia publikigo, estas kvazaŭ Markso estus vivanta nuntempe. "Nia epoko, la epoko de la burĝaro, distingiĝas, tamen, pro tio ke ĝi simpligis la klasajn kontraŭdirojn. La socio dividiĝas, pli kaj pli, en du grandajn malamikajn kampojn, en du klasojn, kiuj rekte interfrontiĝas, la burĝklaso kaj la proletaro". Nia epoko, la epoko kiam la burĝaro denove intencas alpropriigi ĝin al si, kiam penas pliakrigi pli kaj pli la klasajn kontraŭdirojn kaj la socio polariziĝas en du tre difinitajn grupojn, inter riĉuloj kaj malriĉuloj, kiam ĉi tiuj pli kaj pli malriĉiĝas, dum la aliaj pli kaj pli riĉiĝas, ĉi tiu estas la epoko de la Tutmondiĝo kun sia Novliberala modelo, kiam la burĝaro penas savi la sistemon merĝitan en ĝeneralan krizon.

Ni denove iras al la vortoj de Markso, kiam li esprimas ke "Pere de la mondskala ekspluatado, la burĝaro asignis kosmopolitan karakteron al la produktado kaj al la konsumado de ĉiu landoj. Kontraŭ la sento de la reakciuloj, ĝi demetis el la industrio ĉi ties nacian bazon"... "industrio kiu jam ne uzas indiĝenajn krudmaterialojn, sed aliajn venintajn el la plej malproksimaj regionoj de la mondo, kaj kies produktaĵoj estas konsumataj ne nur en la propra lando, sed ĉiuloke en la planedo." "...devigas ĉiujn naciojn, se ili volas supervivi, adopti la burĝan manieron je produktado, trudas al ili la t. n. civilizacion, t. e., iĝi burĝaj. Unuvorte: forĝas mondon laŭ sia bildo kaj simila".

La kapitalismo de ĉi 21-a jarcento, estas, ja, malsama ol tiu ekzistanta en la epoko de Markso kaj Lenino, sed ĝia esenco daŭre estas la sama. Kiu estas la bildo kiun lasas al ni ĉi tiu kapitalismo por ke persistu la klasbatalo en la nuntempa mondo?.

Nuntempe ne estas malaperinta, sed male pliintensiĝis, la ekspluatado de la laboristklaso kaj ĉiuj laboristoj, pliakriĝis la antagonismo inter la kapitalo kaj la laboro, inter la grandaj transnaciaj entreprenoj kaj la grandaj amasoj de la popolo, inter la imperiismo kaj la malevoluintaj landoj. La batalo estas la plej universala formo de ekzistado de ĉio reala, y la kontraŭdiroj la enhavo kie ĉi tiu prezentiĝas, alprenante la plej diversajn manifestaciojn. La mitologio de la novliberala kapitalismo pretendas ignori aŭ kaŝi la novajn enhavon kaj formojn je manifestado de la ĉefa kontraŭdiro kapitalo-laboro kaj tiamaniere forviŝi la signifon de la klasa karaktero aldonita al la bataloj de la diversaj sociaj entoj nuntempe ekzistantaj en la sino de la tutmonda socio.

Nuntempe pliakriĝas, eĉ pli, la interimperiismaj kontraŭdiroj, inter la tri povo-centroj (Usono, Eŭropa Unio, Japanio). Ĉi tiuj kontraŭdiroj iĝas komercaj militoj, batalatante por la vendo-merkatoj, fontoj de riĉmaterialoj kaj energio. Ĉi tiu transnacia koncentriĝo de la politika povo en la manoj de la

ĉefaj centroj de imperiista povo, ĉefe la usona, havas kiel kontraŭparto la sennaciigon de la politika povo en la imperiismaj ŝtatoj plej malfortaj kaj, eĉ pli akr- kaj akcel-maniere, en la malevoluintaj kaj dependaj ŝtatoj.

Temas pri procezo de senvaloriĝo de la ŝtato kaj ties institucioj, ĝi atrofiiĝas pri siaj landaj funkcioj kaj de akiro far la subordigitaj transnaciaj entreprenoj. La imperiistaj ŝtatoj pli malfortaj kaj, ĉefe, la mal-evoluintaj kaj dependaj ŝtatoj iĝas organikaj apendicoj de ia granda imperiisma maŝino de transnacia povo, kiu trudas al ili devigajn normojn kaj konduto-kodojn. Tio ne prezentiĝas kiel unuforma modelo, sed foje ĝi devas alfronti ian reziston.

Lastatempe oni multe spekulativadis pri la malapero de la klasbataloj kaj la apero de aliaj sociaj grupoj, kun bezonoj, interesoj, celoj, motivigiloj kaj formoj malsamaj ol tiuj de la klasbataloj kaj tradiciaj sindikatoj kaj politikaj partioj. La ideologoj de la nuntempa kapitalismo uzas ciferojn, dat-umojn, enketojn kaj tekstojn de la jardeko de 1960 por pravigi ke la diverseco de la evoluintaj socioj provokas malpliiĝon de la intereso pri la materiaj aferoj kaj pliiĝon de la zorgado pri “novaj formoj“ de persona libereco. Tamen, ja veras tio ke nuntempe ekzistas ia nova rilato inter la sociaj luktoj, kiel tiuj de genro, raso, kulturo, religio aŭ laŭaĝa franĝo, kun objektivaj kaj subjektivaj kaŭzoj.

Ekde la 60-aj jaroj kaj unuaj 70-aj jaroj de la 20-a jarcento disvolviĝis sociaj movadoj, kaŭzitaj de la kontraŭdiroj inter la kapitalo kaj la laboro, kvankam ĉiuj ili, senescepte, originiĝis kaj estis kon-diĉigitaj de la kontraŭdiroj propraj de ia historia momento de disvolviĝo de la kapitalista socio.

La movado por la civilaj rajtoj de la nigruloj vekis ne nur la kontraŭrasisman konscion de la afrik-us-onanoj kune kun aliaj naciaj minoritatoj kiel la indianoj, la azi-usonanoj kaj la latinoj, sed ankaŭ de multaj junaj blankrasaj mezklasaj gestudentoj, kiuj marŝadis suden cele apogi la “freedom riders”-n.

La movado kontraŭ la milito de Vietnamio, komence provokita de la rifuzo je la deviga militservo kaj la morto de usonaj soldatoj okazintaj en konfliktoj, kiujn ĉi-momente ripetas la historio per la militoj de la Persa Gulfo kaj Irakio en la familioj de latinaj inmigrintoj en Usono, timas pri la vivo de siaj filoj, kiuj estas rekrutataj por parto-preni en tiuj rasmortigaj armeoj, transformiĝas en opozicion kontraŭ la imperiisma karaktero de tiuj militoj, kaj en lernejon por la solidareco kun la revolucia lukto kaj tiu de nacia liberiĝo en la t. n. Tria Mondo.

La studenta movado kaj la kontraŭ-kultura movado, tre rilata kun la rifuzo de la alieniĝo provokita de la individuismo, la konsumismo, la maltoleremo, la profesia kretenismo kaj aliaj malbonoj propraj de la kapitalista sistemo, atingis nivelojn senprecedencajn de mobilizado. La feminisma movado, kies historio estas tiom longa kiom tiu de la laborista movado, akiras novan dimension per la aldoniĝo de la lukto kontraŭ la seksismo kaj aliaj formoj de seksa subpremado kaj diskriminacio. Al ili aldoniĝas la movado por la defendo de la natur-medio konstituita de mezklasuloj de malevoluintaj landoj de LatinAmeriko.


En la malevoluintaj landoj sub la Novliberala politiko, nuntempe la malkapablo de iliaj burĝaj ŝtatoj okazigas la pliakriĝon de la politika, ekonomia, socia kaj morala krizo de la kapitalista sistemo de produktado mondskale kaj, pli intense, en regionoj de la t. n. Tria Mondo kiel LatinAmeriko. Temas pri la kreado de objektivaj kondiĉoj por la revolucia transformado de la socio, kiuj elbordigas la nivelon de konscienco, organizado, mobilizado kaj politika batalado de la maldekstraro kiu reakiras prestiĝon post la katastrofo de la jaroj post 1990.

Tio igas ke ĉi tuta popola transformiga energio eventuale konkretiĝu en sociaj eksplodoj sen gvido nek politika orientiĝo, kies rezulto, ĝenerale, estas ia renoviĝo de la novliberala sistemo mem, kia estas la ekzemploj de Argentino kaj Ĉilio. Okazis ankaŭ aliaj transformigoj pli radikalaj kaj kun vera politika orientiĝo kiaj estis la kazoj de Venezuelo, Brazilo kaj Ekvatoro.

Per tiuj eventoj ni povas senmitigi la koncepton ke jam ne plu ekzistas la klasbatalo, ke ĝi estas io el la pasinttempo, la klasbatalo daŭre ĉeestas, ĝi iĝis pli kompleksa kaj ampleksiĝis akorde kun la trans-formiĝoj de la klassocia strukturo, esence daŭre sin tenas la marksisma tezo pri la fundamenta rolo de la sociklasoj kaj la batalado inter ekspluatatoj kaj ekspluatantoj kiu alprenas diversajn formojn, kvankam ĝia rolo ne ŝanĝiĝas. Ne eblus ke spite al la multo je formoj ĝia enhavo restus senŝanĝa.

Nuntempe ekzistas problemoj malsamaj pri la grupiĝo kaj disiĝo de movadoj kaj klasoj kiuj neniel indikas ke ĉi tiuj interekskludiĝas. Tute male ĝi rivelas la kombinon de la analizo de la klasbatalo, aŭ de la batalo kontraŭ la ekspluatado, la batalado de la sociaj movadoj, ĉefe, se oni kunligas ilin pli ĝisfund-maniere kun la problemoj de la marĝeniĝo, malriĉul-ekskludo, civilaj sociaj kaj kulturaj

rajtoj, uni pli rilate al la klasoj kaj aliaj al la movadoj, sed kiuj fine kunfluas kontraŭ komuna malamiko: la kapitalismo kaj ĉi ties superreganta klaso.
La teorio asertanta ke la klasbataloj ĉesis ekzisti estas trompo, verdire estas tute male, ili pli koncentriĝis, ni vidu, unuflanke okazis malfortiĝo de la burĝaj sociaj klasoj kiuj suferis iujn modifojn; sed kiuj daŭre ekzistas en ĉiuj siaj dimensioj, tute ne rifuzante sian klasan kondiĉon kaj, do, kun emo konservi kaj pligrandigi siajn privilegiojn. La kapitalista klaso rariĝas, sed ĝia menso-tipo disvastiĝas, kaj kiel kulturo ĝi kontaĝas aron da sociaj sektoroj kiuj ĝiras ĉirkaŭ ĝia egido.
Krome estas antaŭ ni iu redifino de la laborist-klaso, ampleksigita al pli granda sektoro de la laboristoj. Ne nur suben de la laboristklaso, sed ankaŭ flanken kaj supren. Aldoni la amason da salajruloj kaj tiuj kiuj, ne estante manlaboristoj vivadas el la propra laboro, por povi difini ampleksan alternativan socian blokon.
En la nuntempa kapitalista socio oni povas observi kiel la klasika proletaro de la industriaj laboristoj malgrandiĝas laŭ absolutaj ciferoj en la evoluintaj landoj kaj laŭ relativaj ciferoj kiel parto de la tutmonda loĝantaro; sed samtempe enorme pligrandiĝas la nombro da tiuj kies vivo dependas el iu salajro, ankoraŭ ne enkalkulitaj en la nova konceptado de laboristoj, pro kio tiel konceptataj ili ne konstituas plejparton el la homaro, en Usono nur 13 % el la laboristoj estas sindikatanoj kaj alfrontas militon senorganize, milionoj el ili estas inmigrintoj.
Devas resti klare ke tio kio difinas la revolucian rolon kaj la transformigan kapablon de la laboristklaso, ne estas ĝia grandnombro, sed la kvalito de ĝia socia enhavo kaj ĝia konscienco esprimata en la socia projekto kiun ĝi enportas.
Kadre de la proletaro la senlaboruloj fakte jam ne plu estas labora rezervo kaj kadre de la kapitalismo ĉi tiu problemaro estas sensolva, senĉese pliakriĝas, samkiel la koncepto de marĝeniĝo pridubata en la 60-aj jaroj de la 20-a jardeko, akiras nuntempe plenan legitimecon. Ĉi tiuj ŝanĝoj de la Novliberalismo krome malpliigas la proletaron, metamorfozigas grandparton el tio kio restas el ĝi kaj forte impaktas sur la kamparanaro kiel klaso.
La malfavoraj ŝanĝoj en la labor-merkato okazigis, ne nur malbonigon en la situacio kaj vivnivelo de la laboristoj, sed ankaŭ en ĉi ties organiz- kaj batal-formoj. Tio provokis la serĉadon de alternativoj de viv-rimedoj kaj, tial, la kreskado de la eksterregula laboro. Krome ekzistas aliaj vidpunktoj pri klasoj kaj klasbataloj, kiel la lukto por la kultura hegemonio, ĉefe de la nuna kapitalismo, estante ĉi tiu ĉefe ampleksigata de la nuntempa kapitalismo, rilate al ĉiuj aspektoj de la vivo.
En la nunaj kondiĉoj de Kubo, nia lando, kiel parto de ĉi tiuj landoj de la Tria Mondo, kiu troviĝas en situacio de kontraŭdiroj kun la hegemonia mondo de la kapitalismo precipe usona, dum siaj 44 jaroj de Revolucio oni tenis ia senĉesa klas-batalo, gvidata de iu forta laboristklaso kune kun la kamparanaro kaj aliaj sociaj grupoj.
Ekde la jardeko de 1990 ankaŭ ĝia klas-strukturo havis siajn modifojn, pro la ŝanĝoj en la ekonomika strikturo, ĉi tio ne signifas ke la laboristklaso ĉesus ekzisti, male, ĝi plifortiĝas en siaj celoj kiel klaso, diversigas sian ĉeeston en kelkaj sektoroj de la socia produktado, kaj aldoniĝas al ĝi aliaj sociaj grupoj naskiĝintaj el ĝi mem. Rezultas, do, ke ekde ĉi tiu jardeko la klasbatalo en nia lando centriĝas en la «batalo de ideoj» por savi la homaron kaj krei la neprajn naturajn kondiĉojn por ia vivo digna kaj deca en la planedo.
La reala sanec-egaleco kaj pri vera justeco por ĉiuj homaj estaĵoj de ĉiuj nacioj, etnoj, kulturoj kaj religioj, ne povas esti daŭre prokrastigitaj en iu ajn angulo en la Tero. Ne temas pri ideologia afero; estas jam afero pri vivo kaj morto por la homa specio…
…Hodiaŭ samkiel en la epoko de Karlo Markso estas necesa la unueco de ĉiuj laboristoj, la hegemonia politika povo kiun celas pluteni la nordo, estas la organizita perforto de iu klaso por la subpremado de alia.
Ni estas en la momentoj de iu politika, ideologia kaj ekonomia batalo por ia libera disvolviĝo de ĉiu homo kiel kondiĉo de la libera disvolviĝo de ĉiuj. La sociaj movadoj kiel la kazo de Venezuelo, la movado de la ne-posedantoj en Brazilo kaj ĉi ties Forumo de Porto-Alegre, la kontraŭfrontado al ALCA, ĉi tio pruvas al ni ke ni ne estas solaj en la mondo, pro tio ne estus vane ripeti la kri-sloganon de ĉiuj epokoj, por la internacia proletaro kaj la malriĉular' del mondo, ĉar ni perdus nenion, krom niajn ĉenojn, kaj tamen ni povus gajni iun mondon.
"Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu vin!". Por la ekzistado de la Homo.




# De la soveta revolucio al La tutmonda kapitalismo

***Julio Anguita** estis ĉeflidero de la Hispana Komunista Partio ekde la jaro 1982 al 1998. Sed de tiam li neniam ĉesis interesiĝi pri la soci-politikaj aferoj. Fakte, la teksto kiun ni publikigas ĉi tie apartenas ne al la epoko de lia komunista lidereco sed al la nuntempo. Ĉiukaze, ĝi alportas interesan vidpunkton pri la stato de la klasbatalo unu jarcenton post la soveta revolucio.*

Mi pensas ke ĉiu analizo, ĉiu debato kiu ne kondukas al la tuja agado estas, pure kaj nure, ia akademia ekzerco. Mi pensas, do, ke saĝaj studoj kiujn oni devas fari se ili ne havas kunrilaton en la tuja politika agado, ili restas por la bretoj de la librejoj.

Kion mi volas diri? Mi temas pri io kion la genio de Lenino lasis por ĉiam, kion mi intencis traduki ĉi maniere. Por mi estas tri verboj en infinitivo kiuj difinas resum- kaj sintez-maniere –eĉ simplisme– la politikan filozofion de Lenino. La unua estas "designar", tio estas, montri kiu estas la malamiko kiun ni devas venki, io kio nuntempe perdiĝis en multaj lokoj de maldekstraro. Post la elmontrado, venas la dua parto: oni priskribas, oni analizas, oni montradas kiujn partojn, kiujn komponaĵojn… cele ke la popolamaso iompostiom ekkonu ĝin kaj akceptu ke reale, tiu estas la malamiko. La tria verbo estas "difini", kion signifas solvi, konstrui la alternativon. Miaopinie la genio de Lenino tre altegrade taksas ĉi tion, tio estas: montru, priskribu, difinu. Mi diras ĉi tion ĉar nuntempe, se Lenino devus montri kiu estas la malamiko li dirus "tutmondiĝo".

Mi eksplikos kial, kvankam resumite, ĉar ĉi tio postulus kelkajn seminariojn –kiujn estus dezirinde povi fari– laŭlonge de la jaro, tranvile, por la tuta anaro de la Partio. Do mi pritraktos tion skem-maniere ĉar mi ne povas pliprofundigi, sed mi intencos provizi iun bildon. Tio ĉi estas nomata la tekniko de la stencil-reproduktado, sammaniere kiam ni faras truojn sur unu papero kaj surmetas sur ĝin pigmenton, levinte la paperon restas tie iu bildo. Kial la tutmondiĝo estas la malamiko kiun hodiaŭ Lenino estus montrinta, difinta kaj poste li metus la praktikon por kontraŭfronti ĝin, ĉefe en iu baza aspekto: la idelogia aspecto. Mi insistas –kaj mi pensas ke por Lenino tio estis tre klare– ke la batalo estas priekonomia, kompreneble, sed miaopinie la batalo estas ĉefe idelogia: batalo de ideo kontraŭ ideo. Sen tio senutilas ĉio, kiel mi intencos pruvi ĉefe pri la afero de la tutmondiĝo.

Kion mi nomas tutmondiĝo? Oni diras al ni ke ĝi estas, pure kaj nure, la multobligo de la komercado, ke la mondo transfomiĝas en iun tutmondan vilaĝon, ke la varoj iras de loko al loko… prave, sed legante tre mallongan tekston mi simple provizos iujn datumojn: en la jaro 1870 la komerco reprezentis 9 elcento de la Interna Malneta Produktado de la mondo, la 15 elcento en la 70-aj jaroj kaj nunatempe esta 45 elcento. Ja, la ekonomio internaciiĝis, tion ni nomas "mondiĝo" aŭ "supermondiĝo" fakte, iam estis debato en la Partio ĉu nomi ĉition "globaliĝo" aŭ "mondiĝo", mi pensas ke tia debato estas propra je la Universitato de Salamanko pri kiom da anĝeloj povas danci sur la pinto de unu pinglo. Tiu debato okazis en la menciita universitato en la 16-a jarcento. Mi pensas, ja, ke la globaliĝo estas mondiĝo, sed estas iom pli; ni intencos fundesplori ĝin, tiucele mi legos serion da tekstoj kiuj estas kiel la stencil-reproduktado, ili estas la punktoj kiuj atentigos nin kaj enkondukos nin en la difinon.

Ĉi tiuj tekstoj estas jenaj.

Margaret Thatcher per sia fama TINA ***"Ne estas alternativo"*** diris al la anglaj ministoj kaj laboristoj ***"Vi ne havas alternativon"***, ĉi tio gravas ĉar ĝis antaŭ relative malmulte da tempo, ni, la komunistoj kaj la maldekstraro estis satano, la demono, la perversuloj… nun ni estas stultaj. Ĉi tio signifas ke la malamiko perdis al ni la respekton, ĝi kuraĝiĝis ĉar konsideras ke sia filozofio estis progresante en niajn vivojn. Kiam Margaret Thatcher diras ***"Ne estas alternativo"*** tio kion ŝi estas dirante estas ***"Kion vi alportas al la mondo? Kiuj estas viaj valoroj, via praktiko?"*** sed Thatcher, kiun mi taksas grava persono ene de la konservativa mondo kaj de la novliberalismo, diras pli: ***"Ne ekzistas la socio, estas nur viroj, virinoj kaj familioj"*** do nur estas individuaj rajtoj, malaperas la sociaj rajtoj. Hodiaŭ ni prenas ĵurnalon aŭ spektas rondetan debaton kaj oni estas parolante pri la rajtoj de la minoritatoj kaj oni ne parolas pri la kolektivaj rajtoj, kaj tial ni pensas ke ni multe progresis en la tereno de la defendon de la rajtoj, forgesante ĉiujn sociajn rajtojn. Ekzemple: kiam la dekstraro –kaj multaj personoj de la supozita maldekstraro– dediĉiĝas paroli pri la Homaj Rajtoj ili haltas en la 21-a artikolo, la rajtoj de la malplimultoj, la rajtoj pri la egaleco, la sindikatoj, la partioj, la ĵura sekureco…. Sed ekde la 21-a estas la rajto pri laboro, la rajto pri sano, la rajto pri pagita perioda feriado, ke la virinoj monricevu same kiel la viroj kiam ili faras saman laboron… tiuj rajtoj estas forgesataj, ĉar ili estas sociaj rajtoj. Ĉu vi vidas la sagacon de Thatcher? Dirante ke estas nur personoj kaj familioj, ke ne estas socio kaj ke ĝi ne ekzistas, ŝi serĉas la vojon enkapigi al ni ke tio kio gravas estas la individuaj rajtoj kaj ne la kolektivaj. Sed Thatcher –kiu ne estis stulta– di-ras pli: ***"la ekonomio estas la objektiva metodo por ŝanĝi la koron kaj la animon"***. La koro kaj la animo, la alternativaj valoroj kaj vizioj, la ekonomio utilas por ŝanĝi nian tutan penson.

Estas pli da tekstoj.

Antaŭ kvar jarojn mi partoprenis en iu debato en la Fondaĵo Kanalonen Madrido, kun tiu kiu tiam estis la Konsiliano de Ekonomio de la Autonoma Komunumo de Madrido, Percival Manglano, iu altrangulo de la Popola Partio. En iu momento de la debato, li diras al mi: "Sinjoro Anguita, elreviĝu, la demokratio aplikita ĝis ĝiaj lastaj sekvoj nepre kondukas al la populismo kaj la demagogio kaj, do, estas necese ***"korekti ĝin"***, mi demandis al li kiel oni korektas tiujn supozatajn ekscesojn de la demokratio. Ĉu per la Parlamento, la Leĝo, la laboristoj? ***"Ne, ne, ne*** –respondis li– ***per la merkato. La merkato korektas la demokration"***. Kaj estis tie personoj kiuj esprimis aprobon kap-move. Ni estis jam enirantaj en tion kion ni havas hodiaŭ, tio estas, oni estis distilante iajn ideojn kiuj hodiaŭ estas enmense de senmezure granda amaso da personoj, ankaŭ laboristoj, la ideologia dominio. Ni sekvu per aliaj ekzemploj kiuj estas, kiel en la stencil-reproduktado, dezegnante ion kion poste mi intencos ekspliki. Hans Tietmeyer, kiu estis prezidanto de la germana Deutsche Bundesbank, eldiris iutage en 1994 jenon: ***"La politikistoj devas lerni ke ili ne povas kontraŭfronti tion diritan de la merkatoj"***; klara kiel fonta akvo.

La hipotezo estas jena: se la politikistoj ne povas kontraŭfronti tion kion diras la merkatoj Kial estas balotadoj? Estas balotoj tial ke oni devas subteni la ŝajnon ke ili iom utilas. Ĉi tio estas timiga, sed ĝi estas ankaŭ ***pecata minuta*** se ni komparas ĝin kun la sekvaj tekstoj. Ekzemple, kiam iu ĉefministro de Portugalio diras: ***"Ni atingis en la afero de la konkureco la elteneblan limon pri socia bonstato"*** tio estas , la konkureco estas kontraŭdira kun la socia bonstato. Ĉi tiu sama ministro diris en iu asembleo pri la Traktato de Lisbono ke ***"la komfort-socio estas neakordigebla kun la mercato"***. Ĉi tion oni diris kaj oni eksplikis, sed krome, okazas ke tio estas prava. Okazas ke tio estas prava kaj tion diras tiu kiu konsideras sin venkinto, kiel kiam Warren Buffett –la usona multmilionulo– diras ***"La klasbatalo ekzistas, sed mia klaso estas gajnante ĝin"*** tio estas, ili estas agnoskante, kial?

Ĉar ili sin sentas venkantoj. Mi rimarkigas ĉi tion. Estas alia momento, kiam la franca ĉefministro Édouard Balladur mendas al iu komisiono de spertuloj ke ili diru al li la sekvojn rezultontaj de la unika merkato. La informo prezentita tekstis jene: ***"Interesas fabrikadi tie kie tio estas pli malmultekosta kaj vendadi tie kie estas aĉetkapablo. Hodiaŭ ekzistas malakordo inter la intereso de la entreprenejo kaj la intereso de la lando"*** do, la entreprenejo en difinitaj momentoj ene de la koncepto de la tutmondiĝo kontraŭfrontas la nacion. Pro. tio, ni devos pensi ke defendi la nacian suverenecon, estas iu maniero batali kontraŭ la tutmondiĝo –io kio estus objekto de aparta debato– ĉar ili estas dirante tion tre klare: la interesoj de la entrepreno kontraŭstaras tiujn de la nacio. Ni vidu iujn kromajn ekzemplojn. ***"La Eŭropa Socia Karto havus tre negativan efikon sur la konkurenco, la kreskado kaj la laboro"*** en la jaro 1961 oni subskribis la Eŭropan Socian Karton, Hispanio subskribus ĝin multajn jarojn poste, en 1977 kaj ĝi estas devige plenumendan, ĝi havas la saman devigrangon kiel la Tratato de Maastricht. Oni plenumis nenion el ĝi. Tiu Eŭropa Socia Karto estis aktualigata en 1996 kaj nun estas cirkulante iu teksto mendante ke la hispana ŝtato agnosku tiun ampleksigon. Sed atentu, la Eŭropa Socia Karto estas nekongruebla kun la interesoj de la kapitalo, tion diras ili.

Sed estas pli: ***"Hispanio devas ne nur liberaligi sian labor-merkaton sed ankaŭ aldoni sian voĉon al tiu de la landoj kontraŭaj al la menciita Socia Karto"*** dokumento signita far la Hispana Regno. "La reala konverĝo postulas merkatojn multe pli flekseblajn, pli malaltajn impostojn kaj sistemojn de publika protekto malpli malavarajn." kaj jam, unu el la plej grandaj barbaraĵoj –sed kiun ili diras tute sincerece–: ***"La reformo devas signifi ke la ĵursistemo ne intervenu en decidojn strikte entreprenejaj"*** ĉi tio signifas ke la tribunaloj pri la laboraj aferoj devas ne ekzisti, kial? ĉar la konfliktojn solvas la entreprenistoj kaj la laboristoj sen la interveno de la leĝo. Ĉi tio estas simptomo de atako al la t. n. Ĵur-Ŝtato.

Ni daŭrigu: ***"Evidentiĝas nepre necesa ia reformo de la labor-merkato kaj privatigo de la publikaj servoj"*** Rodrigo Rato. ***"Estas necesa iu ekonomia politiko kiu baziĝus sur salajra modero"*** Luis Álvarez Rojo guberniestro de la Banko de Hispanio kaj, fine: ***"Oni devas moderigi la salajrojn"*** de iu nomata José María Aznar.

Per ĉi repertuaro, kvankam ni povus plu daŭrigi, ni vidas ke ni troviĝas antaŭ io kio estas pli ol la supermondiĝo. La forto kiun hodiaŭ havas la tutmondiĝo esprimas iun mond-konceptadon, ĝi estas iu kosmo-konceptado. La Komunista Manifesto, la marksismo, estis kaj estas iu konceptado de la mondo, ĝi havas siajn valorojn, ĝi estas ia historia ekspliko de la klasbatalo, kun iu celo, kun iu subjekto al kiu oni atribuas la socian transformadon kaj la revolucion; sed la tutmondiĝo ĉi-momente, ne estas nur la disvolviĝo de la monda komerco, ĝi estas ia konceptado de la mondo kun siaj valoroj, siaj kontraŭvaloroj, sia filozofio kaj, do, ĝi pretas batali en la ideologia tereno, pretas enkapigi al ni siajn valorojn.

Ni prikonsideros tion, kvankam unue supraĵe. Kiam iu pertelevida inform-programo, okaze de la enkonduko de nova lando en Eŭropa Unio, la informanto asertas: ***"Eniras en la Eŭropan Union tridek milionoj da konsumantoj"*** atentu, li ne diras tridek milionoj da personoj sed tri-dek milionoj da konsumantoj… kaj ni akceptas tion. Sed estas pli, en iuj intervjuoj oni demandis al mi: ***"kaj kion vendas vi"*** al kio mi respondadis ***"atentu, mi vendas nenion, mi eksplikas iun politikan programon"***. Estas sia filozofio, siaj valoroj estas enirante en nin ĉi tie (enkape) ĉar temas pri iu kosmo-konceptado kaj, kiel tia, ĝi havas tri fundamentajn valorojn kiuj estis sin enkondukintaj en nian internon, mi nomas ilin la Sanktega Triunuo de la Tutmoniĝo.

La dio Mercato. La merkato estas tiu kiu decidas kaj kontraŭ ĝi oni ne povas marŝi –Tietmeyer: ***la politikistoj devas lerni obei la ordonojn de la merkatoj***– kaj hodiaŭ ni vidas ke

la televidaj informelsendoj asertas ke la merkatoj ne konsentos tion aŭ tion alian, sed, kio estas la merkatoj? La merkatoj estas ekonomiaj povoj, personoj konataj per sia nomo sed oni uzas tiun vorton por eviti signali ke temas pri personoj konkretaj; ĉi tio nomiĝas perifrazo, kiam mi ne volas mencii iun aferon per ĝia reala nomo mi uzas iun alproksimaĵo; ekzemple, la vorto "faraono" estis iun perifrazon kiu signifis "la granda domo" ĉar la nomon de la faraono oni ne povis prononci. Nu, mi diras "merkato" cele kovri la aferon per iome da mistero kaj eviti diri la multnaciaj entreprenoj, la entreprenistoj aŭ la bankismo ĉar ĉi tio baldaŭ evidentiĝas; nu, al ĉi tiu perifrazo de "merkato" mi atribuas eksterordinarajn povojn, kiujn povojn? Gekunuloj, gekamaradoj, kiam ni alvenas al la tutmondiĝo, kiel estas ĉi tiu difinata? La tutmondiĝo prezentas la ekzistadon de fortoj kiujn neniu povas jam kontroli kaj kiuj estas transformante la mondan sistemon.
Ni iru nun al la Islamo, Islamo signifas "submetiĝo al la Dia volo". Dio estas tiu kiu decidas, kontraŭ liaj decidoj oni povas fari nenion… rezultas ke la tutmondiĝo jam estas dio, la merkato ekfunkciigas povojn kontraŭ kiuj oni ne povas agadi, tio estas, ĝi aplikas al ni la rezignacio kaj kompreneble, ni aŭdas surstrate "okazas ke la ekonomio… ne eblas…" ĉiukaze dependus de kiutipa ekonomio. Se vi iras al la fakultatoj pri ekonomio vi konstatus ke tie oni instruas nur pri unu ekonomio, la novkapitalisma. Ne ekzistas aliaj. Mi memoras ke kiam mi estis studanta Historion de la Ekonomio en la Universitato de Barcelono, oni eksplikis al ni la diversajn rigardojn de la ekonomio, nuntempe oni instruas en la fakultatoj pri ekonomio dirante ke ĝi estas la unika, kiam ĝi vere estas nur unu rigardo pri la ekonomio. Vi jam vidas kiel la tutmondiĝo senĉese altrudas ne siajn interesojn, sed sian filozofion. Ni vidu la duan dion: la konkureco. La konkureco signifas ke oni devas vendi ĉiakoste, sed kompreneble, se ni uzas la plej normalan logikon ni alvenos al iu konkludo: se ĉiuj ni kiuj nun troviĝas ĉi tie volas estis konkur-kapablaj kaj devas eksporti pli ol importi, al kiuj ni vendu? Se ĉiuj ni devas vendi pli ol aĉeti, kiuj aĉetus? Tio estas, ĝi pelas al terura batalo cele konkeri la merkatojn. Kaj kio okazas kiam oni ne povas konkeri tiujn merkatojn pro tio ke aliaj produktas pli bone aŭ havas pli da teknologio, oni vendas pli malmultekoste. Kaj kiel mi vendu pli malmultekoste? Malaltigante la salajrojn. Ĉi tiu estas nun la funkciad-maniero de la maŝino, tio kio signifas ebligi ke ni povu vendi, la salajroj devas malaltiĝi. Krome ene de ilia logiko ili pravas ─tio ne signifas ke mi konsentas─ sed mi ŝatas meti min en la logikon de mia malamiko, kaj mi diras malamiko kaj ne kontraŭulo, kial mi pensas ĉi tion? Ĉar se mi volas ataki kaj alfronti lin, mi devas scii kiu estas la logiko de lia penso. Lenino konsentus kun ĉi tio ĉar temas pri tio kion li proponis dum sia tuta vivo.
La tria dio, estas la senĉesa kreskado.
Oni devas kreski, oni devas kreski… sed, kia stultaĵo estas ĉi tiu, kiel oni devas kreski senĉese? Ĉu la naturo estas senfina? Ĝis kiam ni ekspluatos la naturajn resursojn? kio signifas kreski kaj kreski? Oni povas kreski en edukado, en sano, en kulturo, en socia bonstato… sed sencesa fabikado estas neeble.
Krome la provoj montras ke la ekonomia kreskado ne nepre signifas ke la personoj gajnos pli, la lastaj statistikoj ree montras tion: Hispanio krekis ekonomie sed la malegaleco pli kaj pli grandiĝas. Nu, merkato, konkurenco kaj senĉesa kreskado estas akceptataj de parto el la maldekstraro kaj la ĵurnaloj, ili venas al ni surkape kaj ni, en nia parolmaniero, reproduktas ĝin. Permesu al mi ke mi iomete flankeniĝu por rakonti anekdoton de io okazinta la lastajn tagojn, kio vere iritas min: Trump. Ni jam scias kia li estas, sed la informmedioj diris antaŭ unu semajno: ***"Donald Trump entreprenos la konstruon de murego por separi Usonon el Meksikio".*** Tiu muro estas jam kvindek mil kilometrojn longa, tion faris Bill Clinton. Murego kie mortis kvin-mil personoj. En la Berlina Murego mortis ses-dek perso-

noj dum ĝia ekzistado. Ĉi tiuj aferoj devas esti diritaj, tial mi ŝatus ke ni, en la drinkejo aŭ en la baro, estus provizante informon al la popolanoj por malfermi ĉi ties menson.
Gramsci asertis ion kion hodiaŭ ni vidas klare ─kvankam kiam li verkis tion la afero ne estis tre klara─ li diris ke la povoj dominis pro iu baza kialo, ili havas hegemonion kaj, kio estas hegemonio? La povo, la forto, la leĝoj, la polico, la armeo… sed krome. Ili havas ion kio estas pli grava: la socian kunsenton; tio estas, tiu politika forto, kolektivo aŭ filozofia kiu atingus ke siaj valoroj estu alprenitaj kaj akceptitaj de la socio jam ne bezonas, foje, policon. Kiam mi sukcesas ke mia prizonulo akceptu min kiel prizon-gardisto, mi povas lasi al li la pordon malfermitan ĉar li ne eskapos, tial ke li akceptis ke li devas resti en-prizone. Ĉi tio Gramsci nomis hegemonion kaj ni povus difini ĝin ĉi-maniere: La supereco de iu socia grupo manifestiĝas du-maniere: kiel dominio aŭ kiel intelekta kaj morala gvid-ado; hodiaŭ la tutmondiĝo, siaj proparolantoj, siaj ekonomistoj, siaj ĵurnalistoj, siaj politi-kaj partioj, siaj intelektuloj estas kiuj estas atingantaj la akcepton de la valoroj de la tut-mondiĝo kiel la solaj ekzistantaj. Sed oni submaskas tion prezentante ĝin kiel io interesa: la komuna saĝo.
La komuna saĝo estas dutranĉa armilo, ĉar per ĝi oni apogis la plej grandajn infamiojn barbaraĵojn ekzistintajn; kvankam estas alia "komuna saĝo" kiu ekzistas ankaŭ ĝi en la homoj, la komuna saĝo ke ĉiuj rajtas vivi, rajtas manĝi, havi laborlokon… sed tiu kiu trudiĝis estas tiu ke mi devas esti konkurema, ke mi devas kontraŭfronti la alian, ne dediĉi mi al la politiko, mi devas sukcesi vivi kiel eble plej bone, esti malsolidara… Tio estas falante sur niajn kapojn, tiu komuna saĝo kiu vidas la inmigrinton kvazaŭ li estus iu kiu venas por demeti de ni ian ajn historion, tiu komuna saĝo kiu permesas al ni aplaŭdi la armitajn fortojn ─kaj eĉ ties embleman kaprinon─ anstataŭ pensi ke tiuj armitaj fortoj ludas la rolon kiun ili ludas, tiu komuna saĝo kiu devus utili al ni por iu tre grava afero, kiu estas la tuŝo-ŝtono. De antaŭ multaj jaroj mi ne parolas pri komunismo kaj socialismo ─kvankam mi estas komunisto─ tial ke mi estas en politikaj kaj ideologia batalo, mi volas preni la bazan ilon: nuntempe la plej bona maniero kontraŭfronti la tutmondiĝon estas kontraŭfronti ĝin kun la Homaj Rajtoj; la tutmondiĝo estas nekongruebla kun la Homaj Rajtoj. La tutmondiĝo estas nekongruebla kun la demokratio, ĉar ĝi vivas ĝuste dank' al ĉi ties senĉesa rompado.
Kien iras la tutmondiĝo se ni ne solvas la aferon? Ni estas vidante tion, jam estis iu unua sperto: ĝi nomiĝas Eŭropa Unio; en la jaro 1992 ĉi tiu nia politika forto sin oponis al la Traktato de Maastriĉt, la Eŭropa Unio fine rezultis esti konglomeraĵo de ekonomiaj inte-resoj kiu estas super la registaaroj. Kiam la regantaj politikistoj ─kaj iuj neregantaj─ plenvoĉe parolas pri la popola suvereneco, ili forgesas ke kiam la hispana registaro aprobas la budĝetojn en la Parlamento oni devos aprobi ilin funkciuloj de la Eŭropa Unio. Kiam politikaj fortoj, inter ili la nia, promesas ke se ni regus ni plialtigus la salajrojn kaj cetere, ili forgesas ke tio ne eblas ene de la Eŭro. Ne eblas. Mi volas diri ke tio kion oni estas konstruante en la Eŭropa Unio estas la dominado far la kapitalo, sed ne ia politika dominado, ne temas pri politika unio surbaze de akordo kaj kunsento, ne estas iu eŭropa registaro elirintaa el la popola volo, estas iu "fakta" registaro, ne iu laŭrajta registaro. Nu, la mondo iradas al iu tutmonda registaro ĉar ĉi tiu ekonomio de la tutmondiĝo bezonas iun registaron sed tiu registaro ne estas politika, ĝi ne povas esti tia, ĝi estos iu ekonomia registaro estrita de kvin aŭ ses militaj sinjoroj kiuj, ĉi-kaze, estos sinjoroj de la multnaciaj entreprenoj. La TransAtlantika Traktato de Komerco kaj Investado estas nur la dezajno de tiu nova registaro, ne gvidata de politikistoj ─kaj se estos iuj, ili estos pajlo-homoj─ sed gvidata de tiuj sinjoroj de la ekonomio kiuj multfoje ili finas interalfrontantaj. Tial,

kontraŭfronti la tutmondiĝon ekde la spirito, la kreivo kaj la genio de Lenino signifas, ĉi-momente, ĉi-tie kaj nuntempe, koni nian malamikon y kiamaniere ni kontraŭbatalu lin. Mi pensas ke iu el la unuaj taskoj kiujun ni devus fari estas en la tereno, senforgese de la ekonomia batalo, paroli kun la sindikatoj kaj eksponi al ili: "Sindicatoj, ju pli multe vi estos en la ekonomia batalo, se vi ne atentas pri la politika kaj socia dimensio, vi ade perdos, ĉar vi daŭre retroiras tial ke vi forgesis ke ekzistas iu ideologia dimensio, de la klaso kaj de la klasoj kiuj estas en alianco kun ĝi".

Rezultas. Do ke la batalo de ideoj estas fundamenta kaj malaranĝi tion estas ega pen-laboro… sed oni povas tion fari. Oni devas disponi je la informo, oni devas havi organizo kiu kapablus esti ĉiuloke provizante serion da informoj, oni devas konscii ke al nia popolo oni devas prezenti la aferojn tre klare, ekde la studo, ekde la analizo, oni devas peli ĝin decidi. Atentu, tiele la aferoj ne progresas. Ĉu vi ne konstatis ke ni ekonomie kreskis kaj tamen nia situacio estas pli kaj pli malbona? Ĉu vi ne vidas ke plejparto el la homoj pli kaj pli malriĉiĝas? Ĉu vi ne vidas ke plejmalmulte el la homoj ekonomie progresas? Ĉu vi ne vidas ke kiam oni nomas vin "entreprenemaj" tio estas ia nova proletigita formo de estreprenisto? Oni nomas lin entreprenema, li sin sentas entreprenisto… tamen li estas proleto, ligita al la ĉeno de la pli grandaj entreprenoj; sed li estas "entreprenisto", li estas "entreprenema"… vortoj de la tutmondiĝo, vortoj kiuj kovras la ekspluatadon per vortoj kiuj sonas novaj, kiuj sonas kiel ia interesa afero de la moderneco. Ĉiuj ĉi vortoj, ĉiuj ĉi valoroj, tiu tuta falseco ke oni devas ade kreski, kreski kaj kreski, ke la gestudentoj au tiuj kiuj povas foriri estas ke ili faras "studvojaĝojn"…

Sed estas pli: oni akceptas ĉi-tion. Kaj kio estas okazante? Ke estas retroiro, la personoj enfermiĝas ĉar estas timigitaj kaj, kiam ili enfermiĝas ĉar estas timigitaj, ili timas kiam iu alvenas por iomete ĝeni al ili tiun torporon; sed ni devas tion fari inteligente, ĉar sen la personoj ni povas fari nenion, kiel ni sukcesos ion fari?: Oni devas signali kiu estas la malamiko, ne estas eraro, ne estas dubo. Se ni pensas nur pri balot-aferoj, ni estus perd-intaj la militon kaj ĉiujn batalojn, dum jardekoj ni ne levus la kapon ĉar ni troviĝus je la komenco de iu malvenko, tial ke ni estus perdantaj la ideologian batalon. Mi ne diras ke estas perdante ni, tiuj kiuj troviĝas ĉi tie aŭ la kamaradoj, estas perdante plejparto el la organizitaj laboristoj kiam oni alprenas tiujn valorojn. Oni devas diri al la homoj, tute trankvile, tute dolĉe, ke oni devas vivi alimaniere por ke ĉiuj povu vivi; sed al la mal-riĉuleto kiu gajnas tiujn malmultajn centojn da eŭroj… ne koncernas al ci! Okazas ke foje ili defendas tion, mi aŭdis diri surstrate: "Ne, ne, ne, okazas ke oni volas demeti de ni…" Al ci, kion oni povas demeti? ĉu la malsato? ili akceptas, ili estas solidaraj, kial? tial ke neniu eksplikis al ili la aferojn.

Tiu estas nia batalo. Se ni volas esti fidelaj al tio kio signifis la Revolucio de 1917 kaj al Lenino, oni devas akcepti ĉi tiun batalon. Oni devas kontraŭfronti la tutmondiĝon ekde la tereno de la informado, de la kono, de la didaktiko, de la organizado kaj klare konscii kiu estas la malamiko kiun oni devas kontraŭfronti; sed krome en iu milito kiu havas nek batal-paŭzo nek indulgo; en la ideologia milito ne estas pakto, ne povas esti. Povas esti pakto en la politika milito, en la negocado… en la milito de ideoj, neniam. Aŭ oni estas venkintoj aŭ venkitoj, la Historio montras tion al ni. Tial, mi pensas ke rememori hodiaŭ la Revolucion de 1917 kaj la figuro de Lenino estas akcepti ke ni havas iun potencan mal-amikon kiu superregas kaj kontrolas la inform-mediojn, kiu sin enmetis en parton de niaj kapoj, kiu sin konstituis kosmovizio kun iuj valoroj kaj kiu, kun ĉi tiu realaĵo kiun ni havas, ni kontraŭfrontas ĝin kun klarega ideo ke temas pri la malamiko aŭ ni. Ne estas mez-punkto.



# Filmoj pri la Rusa Revolucio

Dum la jarcento pasinta post la evento, oni faris multajn filmojn pri la Rusa Revolucio, kaj en Sovetunio kaj en Okcidento. Iuj el ili havas kiel fono la okazaĵojn de tiu Revolucio de 1917, aliaj pritemas ties kialojn, originon kaj tujajn sekvojn. Kompreneble, ĉar tiu jarcento estis epoko de intensa kaj senĉesa klasbatalo inter la socia alternativo kiun tiu Revolucio proponis al la mondo kaj la superreganta sistemo, neeviteble la kino iĝis ilo, propaganda armilo, de la interbatalantoj.
El la abunda materialo pri tiu temo ni elektis por nia konciza recenzado nur kelkajn filmojn inter tiuj kiujn ni taksas pli interesaj de vidpunkto de la ideologia batalo inter du modkonceptadoj respegulantaj kontraŭdirajn klasajn interesojn.




## OKTOBRO

Silenta soveta filmo de la jaro 1928, kies direktoro estis Sergéi Eisenstein. Ĝi priskribas la komenciĝon de la soveta revolucio en Petrogrado. La stilo estas dokumenta; la okazaĵoj de Petrogrado estas prezentataj ekde la fino de la monakio en februaro de 1917 ĝis la fino de la provizora registaro kaj la dekretoj pri la paco kaj la tero en novembro de tiu jaro. Lenino revenas en aprilo. En julio, la kontraŭrevoluciuloj sufokis iun spontanan ribelon kaj oni ordonas la arestadon de Lenino. Fine de oktobro, la bolŝevistoj estas pretaj por ataki: dek tagoj skuis la mondon. La filmo prezentas la plej ĥaosajn tagojn ĝis la venko de la bolŝevistoj kontraŭ la menĉevistoj kaj ceteraj partioj partoprenintaj en la defaligo de la Caro.
Akorde kun la marksista filozofio, en la filmo ne estas ĉefroluloj; la agantoj estas la amasoj, la homaj kolektivoj. Multaj partoprenintoj de la revolucio kiel ruĝaj gvardianoj, soldatoj, maristoj aŭ personoj kiel Trockji kaj Lenino aperas en la filmo, kio konstituas bona pruvo de la realaĵo kiun ĝi pretendas respeguli.





## LA KIRAS-ŜIPO POTEMKIN

La okazaĵoj kiujn la filmo prezentas, strikte, ne apartenas al la etapo de la Revolucio, sed ili havas grandan rilaton kun ĝi tial ke la ribelo de maristoj kiun ĝi pritraktas estis signo de la krizo kiu kondukis al la fino de la carisma reĝimo.
La filmo, de la jaro 1925, estas muta. Ĝia direktoro estis Sergéi Eisenstein. Ĝi prezentas la ribelon okazinta en la kiras-ŝipo Potemkin en 1905, kiam la ŝipanaro rifuzis obei la oficirojn de la carista mararmeo. La 26-a de junio de 1905 la maristoj de tiu kiras-ŝipo, ĉagrenitaj pro mistraktado kaj esti devigitaj manĝi nutraĵojn en malbona stato, decidis ribeli. En la filmo la okazaĵoj estas prezentataj emfazante la rolon de la amasoj kaj la gravecon de la kolektivaj mobilizoj. Ĉi-rilate tre gravas en la filmo la ege perforta sceno de la masakrado de civitanoj en la ŝtuparo de Odeso far la carisma soldataro. Evidentas ke ĉio ĉi konstituas propagandon por la ideologia legitimado de la komunista reĝimo, ekzaltante la ordinaran homon, ĉefe la subpremiton kiu decidas rompi siajn ĉenojn.

## RUĜULOJ

***Reds*** (en Esperanto: ***Ruĝuloj***) estas filmo de 1981 reĝisorita, produktita kaj ĉefrolita de Warren Beatty. Ĝi estas bazita sur la vivo de la ĵurnalisto kaj verkisto John Reed, kiu per sia libro ***Dek tagoj kiuj skuis la mondon*** priskribis la Rusan revolucion de 1917. Parto el la filmo estis farita en kelkaj hispanaj urboj: Seviljo, Granado, Guadix kaj Madrido.
John Reed estis iu usona komunisto, aktivulo dum la periodo de la Unua MondMilito. La filmo prezentas lian amrilaton kun la verkistino Louise Bryant, edziniĝinta virino kiu forlasas sian normalan vivon kaj iĝas grava figuro de la feminista movado. Iliaj ideoj kondukas ilin al Rusujo dum la revolucio de oktobro de 1917, kiam la komunistoj kaptis la povon. Poste ambaŭ aktivuloj revenis al Usono kun ideoj por lideri sian propran ribelon…
Rilate al la ideologia enhavo de la filmo, ***Ruĝuloj*** reprezentas la pinton de tio kion oni povus permesi en Hollywood en la epoko de Reagan kaj Teacher. Cetere la filmo estas sufiĉe merita kaj sukcesa de vidpunkto de la kino-arto kaj atingis kelkajn premiojn.




## Doktoro Zivago

Filmo de 1965, reĝisorita de David Lean kaj ĉefrolita de Omar Sharif. Estas bazita en la novelo de la rusa verkisto Boris Pasternak, kiu ricevis pro ĝi la NobelPremion pri Literaturo en 1958.
La temo de la novelo kaj la filmo estas la vivo de rusa kuracisto kaj poeto, kiu, kvankam edziĝinta kun alia, enamiĝas al la edzino de politika aktivisto kaj spertas malfacilecon dum la Unua MondMilito kaj la Oktobro Revolucio. La novelo sur kiu baziĝas la filmo fajne priskribas la vivon de la civitanoj de Sovetio dum la jaroj post la revolucio. Ĝi vekis, je ĝia publikigo en 1957, akran polemikon. Estis la epoko de la malvarma milito; la aŭtoro estis aklamita kiel la unua granda disidenta verkisto de Sovetio. En sia lando la aŭtoro ne estis bone konsiderita kaj li sin vidis devigita rifuzi la NobelPremion, sed reale la enhavo de la verko ne estis kontraŭsovetia. La kerno de la verko kaj la koncerna filmo estas ĝia argumento, sufiĉe drameca, de la homa historio kiun prirakontas, sen politikaj implikoj, kvankam kun la historia intereso de la fono de mondmilito kaj la revolucio.
La filmo atingis grandan sukceson kaj ricevis kelkajn premiojn.




## Nikolao kaj Aleksandra

Historia filmo farita en Hispanio kaj Jugoslavio. Reĝisoris ĝin Franklin Schaffner en 1971. Ĝi pritraktas la vivon de Nikolao la 2a (1868-918), la lasta caro de la dinastio Romanov, kaj lia edzino Aleksandra, dum la jaroj de koruptado, subpremado kaj mizero kiuj kulminis per la bolŝevisma revolucio de oktobro de 1917.
La filmo montras tiun etapon plenan je salono-dancoj, gravaj festoj kaj lukso. Ĝi prezentas la kialojn de la popola defio al la imperio, kaj ankaŭ ka plej humanan flankon de la reĝa familio de Rusujo kaj ĉion kontemplitan de ilia vidpunkto. Kvankam ĉiuj montradis simpation al Nikolao, ne okazis same rilate al Aleksandra kiu estis germandevena. Kiam naskiĝis la carido, la princo Aleksis, la popolo ŝajne akcetis ŝin iome. Pro la malsano de sia hemofilia filo, ŝi metis sian tutan fidon sur Rasputeno. Ĉi tiuj kaj aliaj similaj okazaĵoj estas prezentataj en ĉi tiu historia filmo.
De historia vidpunkto la filmo estas sufiĉe objektiva kvankam ne tre profundigas en la politikaj aspektoj de la revolucio.
La filmo estis premiita per 2 oskaroj kaj aliaj distingoj.






# Libroj pri la Rusa revolucio dum unu jarcento

Kompreneble, pri tiu evento de la Rusa Revolucio de 1917, ties antaŭaĵoj kaj sekvoj, oni multe verkis laŭlonge de tuta jarcento, kaj ĉi-jare, okaze de la centjaro, aldoniĝis/as/os multe pli. Do, nia trarigardo de tiom ampleksa materialo devas esti nepre konciza.

Ni komencu per tio verkita far la protagonistoj mem de la revolucio. La verkaro de Lenino estas vere ampleksa kolekto: libroj, artikoloj, teksto de diskursoj… Nu, ĉio verkita de li en la jaro 1917 kaj multe el la sekvintaj jaroj temas pri la revolucio kaj ties tuja rezulto. Do, la interesitoj pri tiu evento nepre devos komenci per la studo de la penso de la homo kiu dum sia tuta vivo estis sin preparanta por tiu okazo kaj kiu tiel ĉefrole agadis tiam. Ĝuste dum la monatoj antaŭ la revolucio li estis verkanta la libron ***La ŝtato kaj la revolucio***. La legado de tiu verko estas interesa por konstati kiom multe malsimilis la ideoj, planoj kaj esperoj de Lenino el la realo poste estiĝinta. Pli alĝustiĝinta al la realo estis la materialo de li verkita post la revolucio, sed tiam jam ne temis pli ampleksaj libroj aŭ priteoriaj eseoj sed notoj, malampleksaj programoj kaj dispozicioj centritaj en la urĝaj kaj konkretaj taskoj truditaj de la demarŝado de la ŝtato kaj ĉi ties problemaro.





Similan karakteron havis la verkaro de alia protagonisto de la la revolucio: Leo Trockij. Ankaŭ li havas ampleksan verkaron, faritan inter la jaroj 1903 kaj 1942. Grandparto el tiu materialo post la revolucio estis pri aferoj en rilato kun la civilmilito kaj la organizado de la ruĝa armeo en kiu li partoprenis. Pri la revolucio, en kiu li decidige intervenis, li verkis sufiĉe da materialo, ni menciu ***Lecionoj de Oktobro***, verkita en 1924. En 1939, jam ekzilita el Sovetunio, li verkis ***Tri konceptadoj pri la rusa revolucio***. Sed antaŭe en 1932, li estis fininta sian monumentan duvoluman verkon: ***Historio de la Rusa Revolucio***. Postaj studantoj kaj verkantoj pri tiu temo nepre devis/as aliri al tiu materialo por dokumentado.

Samtempa de la revolucio kvankam ne partopreninta en ĝi estis Rosa Luxemburgo, la germana socialista liderino. ***La Rusa Revolucio***, kiun ŝi verkis dum sia restado en la malliberejo de Breslau estas pripenso rilate al la unuaj dispozicioj de la bolŝevista regantaro. Per la verko, Rosa esprimis sian solidarecon kun la rusa revolucio samtempe ke ŝi faris ardan defendon pri la demokratio. La teksto rezultis polemika ene de la komunistaj vicoj kie neniam estis solvita la kontraŭdiro inter politika libereco kaj socia egaleco.


Alia samtempano de la revolucio, kaj rekta atestanto pri ĝi estis la usonano John Reed, kiu verkis: ***Dek tagoj kiuj skuis la mondon***, kiu estis la bazo de la filmo ***Ruĝuloj*** (Reds). Alia rekta atestanto de la eventoj de 1917 estis Jacques Sadoul, franca diplomato kiu havis dum tiuj tagoj konversadon kaj negocadon kun Lenino kaj Trockij. Lia verko titoliĝas: ***Leteroj ekde la bolŝevisma revolucio***. Gravaj spektantoj de la soveta revolucio estis ankaŭ du hispanoj: la ĵurnalisto kaj romanisto Manuel Chaves Nogales kaj la socialista politikisto kaj profesoro Fernando de los Ríos. Ambaŭ vizitis Rusion tiuepoke pro profesiaj kialoj. La unua verkis novelon respegulante tiun etoson, ***La majstro Johano Martínez kiu estis tie***; la dua prezentis siajn politikajn impresojn en la verko: ***Mia vojaĝo al la sovetisma Rusujo*** per kiu li esprimis sian elreviĝon pri revolucio kiu evoluis al sanga diktaturo.

Post la revolucio, kaj fakte dum la tuta daŭro de la soveta reĝimo, oni eldonis en Sovetunio multajn verkojn ne nur pri la Rusa Revolucio sed pri marksismo ĝenerale kaj aliaj kiuj estis, esence, politika propagando de la reĝimo. Ekde la jaro 1931 ekzistis tie la tiel nomata “Eldonejo Progreso” kiu dediĉiĝis al la distribuado al la tuta mondo de la marksista-leninista literaturo po malalta prezo tradukita al la diversaj lingvoj. Dume, kaj ĉefe dum la malvarma milito, la eldonaĵoj de tiutipa materialo ne abundis en Okcidento. Pri la rusa revolucio konkrete, menciindas tiuj verkitaj de la britoj Orlando Figes, James Harris, Neil Faulkner, Edward Hallett Carr, Christopher Hill kaj Hellen Rappaport, la usonanoj Rex Arvin Wade kaj Sean McMeekin, la pola-usonano Richard Pipes, la hispanoj José María Faraldo Jarillo, José Eslava Galán, Francisco Fernández Buey, Miguel del Rey kaj Carlos Canales, la jugoslavino Mira Milosevich, la rusoj Moshe Lewin kaj Catherine Merridale…

En kelkaj el la libroj de tiuj aŭtoroj, krom la revolucio oni pritraktas ankaŭ la politikan reĝimon kiun ĝi generis. La verkoj de tiuj historiistoj estis sufiĉe gravaj por esti tradukitaj al aliaj diversaj lingvoj ol tiuj de la aŭtoroj. Ilia politika teniĝo rilate al la revolucio kaj la komunismo ĝenerale estas diversa, ekde la plej entuziasmaj simpatiantoj ĝis la radikale malamike rifuzantoj.




Ĉi-jare, pro la centjaro de la revolucio, aperis novaj verkoj. Ekzemple, la libro titolita 1917 ***La rusa Revolucio cent jarojn poste***, de la hispanoj Juan Andrade kaj Fernando Hernández Sánchez. Laŭ ili, la rusa Revolucio estis la plej transcendenta evento de la 20-a jarcento. La alsalto al la Vintra Palaco de Petrogrado en oktobro de 1917 estis travivata kiel la neesperita konkretiĝo de utopio longatempe celita: la kapto de la povo fare de la proletaro kaj la konstruado de iu nova senklasa socio. La okazintaĵo vekis konsciencojn, ampleksigis la horizonto de la espero de la popolaj klasoj kaj inspiris revoluciojn kaj politikajn reĝimojn tra la tuta mondo. Ĝi provokis ankaŭ la panikon kaj la virulentan reagon de ĝiaj eblaj domaĝitoj, kaj la malamikecon de tiuj kiuj, eĉ simpatiante kun ĝia komenciĝo, ne konsentis kun ĝia evoluado. La celo de la verko estas ĝisfunde esplori tiun grandan eventon kaj ties sekvojn: politikajn, sociajn kaj kulturajn, la evoluadon de la mondo generita de ĝi kaj la miton kaj la memoron de la revolucio en la nuna tempo.




Alia ĉi-jara eldono pri la temo estas la libro titolita: ***La Revolucio de Oktobro*** cent jarojn poste, de la egiptano Samir Amin. Ĉi tiu libro ne pretendas adresi nostalgian rigardon al iu historia momento, la revolucio de Oktobro, kiu naskis enorman esperon en la popolaj klasoj de la tuta mondo. Tute male: ĝi celas identigi la erarojn kaj feblojn de la origina konstruado kaj la provoj ĝin reformi. La fiasko de tiuj provoj kondukis al devojiĝoj kiuj kulminis en sovaĝan restarigon de la kapitalismo, metante finon al la unua granda ondo de avancoj de la homaro direkte al la socialismo. Ĉi tiu verko registras la agadon de la sinsekvaj sovetaj lideroj antaŭ la defioj de la realo, proponas pristudon de la formado de la socioj de la imperiisma centro kapabla ekspliki la adheron de la popoloj al konservativa ideologio, kaj provizas elementojn por kompreni la naturon de la kapitalismo kaj mezuri la diversgradajn kapablojn de la diversaj nacioj por avanci tra la longa vojo al la socialismo.

Krom tiuj historiaj verkoj pri la revolucio kaj ties sekvoj estas ankaŭ la noveloj aŭ romanoj aŭ poemoj kies prirakontata intrigo disvolviĝas sur la fono de la revolucio. Al tiu tipo je literaturo apartenas la verkoj de la ruso Maksim Gorki: ***La maljunulino Izerguil***, ***La kanto de la falko***, ***La kanto de la petrelo***, ***Neoportunaj pensoj…*** La teniĝo de Gorki pri la revolucio kaj ties reĝimo estis kontraŭdira kaj ŝanĝiĝanta. Male, alia rusa verkisto, Miĥaíl Bulgákov, ĉiam rifuzis la socialismon; multaj el liaj verkoj, plenaj je malapreco pri la nova realaĵo, estis cenzuritaj. Bulgákov prezentas siajn akrajn impresojn pri la plej duraj momentoj de la revolucio per sia unua novelo, ***La blanka gvardio*** (1924), altgrade membiografia. Li priskribas sian naskiĝurbon Kiev, okupita dum la civilmilito. La ĉefroluloj de la novelo estas soldatoj de la Blanka Armeo, apartenantaj al klaso kiu volis konservi sian antikvan vivstilon klaso al kiu apartenis la aŭtoro mem.

Alia menciinda novelo estas ***La plaĉa dono***, de Mijaíl Shólojov. Li estis la sola verkisto kiu ricevis la NobelPremion kun la oficiala permeso de la soveta registaro. Shólojov aprobis la sovetan reĝimon kaj kredis je ĝia "brila estonteco", sed poste li perdis la esperon kaj komencis silenti kaj forlasis la literaturan aktivadon. Nepre menciinda estas ankaŭ la verko ***Doktoro Zhivago***, de Boris Pasternak. Al li ne permesis la soveta reĝimo ricevi la Nobel-Premion kaj la libro estis malpermesata en Sovetunio dum pli ol 30 jaroj. Pere de la protagonisto Yuri Zhivago, Pasternek montras kiel transformiĝis la kompleksa kaj ambigua opinio de la rusaj intelektuloj pri la revolucio. Ia komenca fascino evoluis, laŭ la pasado de la tempo, al amara elreviĝo. Pasternak alvenis al la konkludo ke la revolucio estis tragedio por la homaro. Eble la instruo kiun oni povas eltiri el tiom malsamaj opinioj pri la sama evento estas la klasa poziciiĝo de la opiniantaj verkistoj.

# La Internacio

**Leviĝu, proletar' de l' tero,
leviĝu, sklavoj de malsat'!
La Vero tondras en kratero,
sekvos finofara bat'.
La paseon plene ni forviŝos,
amasoj, marŝu, kresku ni!
La mond' en fundament' sanĝiĝos,
ne nul', sed ĉio estu ni!**

***Por batal', por la lasta
unuiĝu nia front',
internacia estos
la tuta homa mond'!***

**Ne estas super ni defenso,
nek reĝ', nek Dio, nek patron'.
Kreantoj, ni nin savu mem do,
luktu por komuna bon'!
La rabaĵon preni de l' rabisto,
spiriton savi de l' karcer',
ni blovu fajron kun persisto,
kaj batu ni, dum ardas fer'!**

***Por batal', por la lasta...***

**Ni, laboristoj, ni, kampuloj,
partio granda de l' labor'!
Al ni la ter' laŭ justreguloj,
parazit' sin portu for!
Ja grasigos multajn nia karno,
sed malaperos ĉe l' aŭror'
la korva kaj vultura svarmo,
eterne brilos suna glor'!**

***Por batal', por la lasta...***